

André CHERPILLOD

Lingvaj
Babilajtoj



Eldonejo *La Blanchetière*

ENHAVO

	paĝo		paĝo
“Artefariteco” de Esperanto	3	Rekta objekto, uzo nekutima	120
Artikolo difina	9	Rekta objekto tra la mondo	122
Duoblaj konsonantoj	15	Seksoj estas tri, kvar, kvin...	128
Etimologio ne estas semantiko	18	La sono “ĥ”	132
Eŭropeco de nia leksiko	20	Stilfiguroj, vortfiguroj, sonfiguroj	135
Evoluo de Esperanto	21	Subjunktivo, nura fantomo	137
Faktitivo	25	Transitiveco, tikla afero	141
Finajoj (nombro de la verbaj finajoj)	26	Uskleco, serioza afero	148
Finajoj estas vortoj	32	Virinaj nomoj	156
Fontoj de la Esperanta leksiko	35	Vortfarado, koncize	158
Fuŝperantox, pereiga reformo	40	Vortorda normo	161
Genro kaj sekso	43	Vortordo (loko de la adverbo)	168
Gramatika karaktero de la radikoj	46		
Homonimoj en Esperanto	56		
Internacieco de la geografiaj nomoj	63		
Komo, ne laŭvola	69		
Kondicionalo	70		
Kromsignoj en la angla lingvo	72		
Kromsignoj en la etnaj lingvoj	74		
Kunmetitaj verboformoj, erariga mito	75		
Landnomoj, plej racia sistemo	77		
Landnomoj: <i>Kore'</i> , <i>Panĝab'</i> , <i>Ukrain'</i> ...	87		
Medialo	92		
Neceso kaj sufiĉo	93		
Neologismoj	95		
Participoj, aspektoj	96		
Planlingvoj ĉiutage parolataj	103		
Pluskvamperfekto	108		
Po, dispartiga prepozicio	110		
Propraj nomoj	112		
Refleksivo, ne ĉiam simpla	116		
		<i>Kuriozaj etimoj</i>	
		<i>Abrikoto, ĝia spirala vojaĝo</i>	172
		<i>Absinto, artiŝoko, melongeno</i>	173
		<i>Aŭtobuso, universala sed artefarita</i>	174
		<i>Ĉinio, mistera nomo</i>	175
		<i>Edzo, edzino</i>	177
		<i>Elefanto, duobla kaj afabla</i>	181
		<i>Kanono, kanono, kanono kaj kanono</i>	182
		<i>Karagano, karakalo, karakulo</i>	183
		<i>Krokodili, aligatoro, kajmani, gaviali</i>	185
		<i>Nigra Maro, belege blua</i>	186
		<i>Oranĝo, mandarino, mandareno</i>	188
		<i>Sateno kaj silko</i>	190
		<i>Terpomo kaj patato</i>	191
		<i>Tomaso kaj tomaso</i>	192
		<i>Urso, ekzemplo de vortmalpermeso</i>	193
		<i>Vagino, vanilo</i>	195

ISBN 2-906134-65-1

© André CHERPILLOD
kaj la eldonejo *La Blanchetière*
FR-72320 COURGENARD

2005

“Artefariteco” de Esperanto, pli ĝuste: laŭdira artefariteco

Plej ofte, la ĵurnalistoj, obeante al la ordonoj de la grandaj plurnaciaj entreprenoj, rifuzas diri eĉ unu objektivan vorton pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto. Kelkfoje tamen, ili akceptas balbuti kelkajn vortojn pri ĝi: tiam ili nomas ĝin pejorative *artefarita lingvo*. Sed tiu esprimo ne estas sufiĉe malestima. Tial ili plej ofte preferas nomi Esperanton *lingvo entute inventita* (franclingve: *langue inventée de toutes pièces*).

Bedaŭrinde, ankaŭ esperanto-uzantoj uzadas la esprimon *artefarita lingvo*, ne konsiante, ke ili tiel donas argumentojn al siaj malamikoj.

Ni devas rediradi tre laŭte, ke Esperanto **NE ESTAS ARTEFARITA**, ne pli artefarita ol iu ajn etnolingvo. La ĝusta termino estas *planlingvo* (*langue construite, Plansprache*).

Maksimume, oni povus diri, ke Esperanto estas “*arta lingvo*”, sed en la senco de la latina *artificiālis* «*farita arte, farita per arto*». Oni ja diras pri viadukto, kiu certe ne estas donita de la naturo, ke ĝi estas «*arta konstruaĵo*».

I. Ĉu artefariteco estas ja difekto?

Eĉ se Esperanto estus artefarita, ĉu tio estus malbonaĵo? Tute male. Ĉu estas artefarite, ke pensanta estulo deziras paroli lingvon klaran, logikan kaj facilan? Certe ne.

«*Riproĉi al Esperanto ĝian artefaritecon kompare kun la naturaj kvalitoj de la lingvoj angla aŭ franca, tio estus, kvazaŭ oni riproĉus al aŭtomobilo ĝian artefaritecon kompare kun ĉevalo. Artefariteco estas ĝenerale rezulto de la homa inteligenteco, kiu alportas, por la dezirata celo, progreson kompare kun la naturaj kondiĉoj*» (profesoro Mario Pei, Columbia University).



Jes, ĝi estas bela, eleganta, rapida... sed artefarita!

Malsano estas natura, kuracado estas arta. Veneno estas natura, kontraŭveneno estas arta. Traveturi tutan Eŭropon piede aŭ rajde por transdoni urĝan informon estas nature; uzi telefonon, faksilon aŭ interretan mesaĝon estas arte.

Kio plej ridindas, tio estas la adjektivo *artefarita* uzata por amika kaj spontana parolado de buŝo al orelo, dum estus *nature*, ke oni aŭskultus en kaskaj paroliloj la hungaran tradukon de la angla versio de io dirita de la oratoro portugallingve!

Umberto Eco, konscia pri la stulteco de la nocio *artefariteco*, deklaris humure al la itala revuo *L'Esperanto* (n°9, 1993): «*Vidu, oni instruis Esperanton duone, en tre malbonaj*

kondiĉoj, dum kelkaj jardekoj, kaj homoj amaras en Esperanto. Oni intense instruis la latinan lingvon dum jarcentoj, sed vi estu certaj ke, kiam sacerdoto kaj monaĥino amaras, ili ne uzas la latinan en tiu cirkonstanco. Konkludu mem!»

Esperanto estas tiagrade *mal-artefarita*, ke ĉe la renkontiĝo de du diverslingvaj personoj, se ambaŭ scias la lingvojn Esperantan kaj anglan, ili ĉiam komuniĝas per Esperanto, neniam per la angla. Kial? Ĉar en Esperanto ili povas pli facile konservi sian personecon, kun sia propra stilo, kun siaj dirmanieroj. Ĉar la vortoj venas pli rapide al ilia menso. Ĉar ili ne devas honti, ke ili kopias fremdan modelon, kiun ili imitas malperfekte, eĉ ridinde.

Iamaniere, ne nur Esperanto ne estas artefarita, sed ege artefarita estas la nura uzado de la angla lingvo... fare de homoj, kiuj estas nek angloj nek usonanoj.

II. Inventitaj lingvoj ekzistis.

Ekzistas (pli ĝuste, ekzistis) kelkaj lingvoj vere artefaritaj, entute inventitaj. Ke ili ekzistis, tamen ne signifas, ke ili funkciis.

Pluraj projektoj de artefaritaj lingvoj naskiĝis ekde la tempo de **Kartezio** (*Descartes*). Ĉi tiu revis «*universalan lingvon, tre facile lerneblan, prononceblan kaj skribeblan*». Ĝi devos havi gramatikon simpligitan aŭ renovigitan, kiun oni povos finlerni post kvin aŭ ses horoj.

Siavice, **Lejbnico** (*Leibniz*) longe cerbumis pri la problemo de *filozofia lingvo*, kiel oni diris liatempe, «*en kiu ĉiuj raciaj veraĵoj estos simpligitaj ĝis ia kalkulo*». Li eĉ elpensis plurajn provojn.

Oni do ne kredu, ke tiuj *filozofiaj lingvoj* estis fantazioj faritaj de stranguloj senigitaj de ĉia aŭtoritateco. Eĉ tute male! Ĉiuj baziĝis sur ia filozofia klasado de la ideoj.

Ekzemple, la skoto **George Dalgarno** inventis en 1661 iun lingvon, kiu distingis 17 klasojn de ideoj. Ĉiu klaso estis montrata per majuskla litero; la aldonitaj minuskloj, latinaj kaj grekaj, montris la derivitajn konceptojn. Ekzemple, E montris la fenomenojn, H la substancojn, N la vivulojn. Inter la vivuloj, **Nη** estis la animaloj, **Nηκ** la kvarpeduloj, **Nηκα** la ĉevalo, ktp. Ĉu oni povas imagi ion pli artefaritan?

Unu jarcenton poste, la 16an de Novembro 1794 (26an de Brumero III), la franco **Delormel** prezentis al la Konvencio lingvoprojekton bazitan sur la samaj principoj: **ave** «*litero*», **alve** «*vokalo*», **alzeve** «*diftongo*» (**alve** «*vokalo*» + **ze** «*du*»), **avi** «*silabo*», **avau** «*vorto*», **alvau** «*nomo*».

Pli konata ekzemplo estas **Solresol**, kiun inventis la franco **François Sudre** en 1855.

Jen kelkaj solresolaj vortoj.

la	la	do	ne	dore	mi	mire	kiu
misol	bono	solla	ĉiam	Domisol	Dio	dosolre	manĝi
solmi	malbono	lasol	neniam	Soldomi	Diablo	dosolla	trinki
remifala	domo	soldoremi	teatro	resolsire	labori	domifado	homo
solresol	lingvo	doremire	okulo	faresoldo	ĉevalo	laredola	aĉeti

La verboj konjugaciigis: **sidofa** «*komenci*», **dore sidofa** «*mi komencas*», **dore dodo sidofa** «*mi komencis*», **domi dodo sidofa** «*ci komencis*», **dore mimi sidofa** «*mi komencos*», **solsol do sidofa** «*ni ne komencu*», ktp.

Multegaj aliaj similaj projektoj estis faritaj. Ĉiuj estas *entute inventitaj*. Ĉiuj restis teoriaj konstruaĵoj. Neniu ĝuis eĉ komencon de uzado. Neniu akiris la statuton de **lingvo**.

Kial? Ĉar ĉiuj tiuj projektoj estas **artefaritaj je 100 %**. Ĉar lingvo *entute inventita* ne povas funkcii. **Nu, Esperanto funkcias...**

III. Lingvo estas fenomeno grandaparte natura.

Fakte, ĉiu lingvo rezultas de procezo **kolektiva** kaj **anonima**, grandaparte **nekonscia**. Ekzemple, la nuna **franca** lingvo rezultas de la evoluo de la malalta **latino** alportita en Gallion far la romiaj armeoj, al kiu aldoniĝis spontane iom grava **galla** restaĵo, kaj poste **ĝermana** alporto, kaj ankaŭ aliaj diversaj depruntaĵoj. Evidente, sen konscia volo.

Ekzemple, kiu decidis, ke la litero **t** de la latina **vīta** « vivo » devas konserviĝi en Italio, ŝanĝiĝi al **d** en Hispanio kaj Portugalio (**vida**), al **ț** en Rumanio (**viață**), kaj tute malaperi en Francio (**vie**)? Evidente, neniu. La lingvistoj nur **konstatis** tion, kaj elmetis la regulon, ke « *latina intervokala t emas ŝanĝiĝi al d en la hispana-portugala, al ț en la rumana, kaj tute malaperi en la franca* ». **Tio estas trafa ekzemplo de natureco de lingvo.**

Efektive, la evoluo de lingvo okazas spontane, pro kaŭzoj nekonataj kaj neantaŭvideblaj. Multaj homoj kredas, ke la gramatikistoj aŭ la lingvistoj fabrikas gramatikajn regulojn, kaj ke lingvoparolantoj obeas al la gramatikistoj. Absurde! Ja la gramatikistoj obeas al la parolantoj. Ne inverse. Do, kiu decidis? Mi, vi, ni ĉiuj, nekonscie. Ne aŭtoritatulo faras lingvon, sed ja la popolo uzanta ĝin.

Oni ne ŝanĝas lingvon; ĝi ŝanĝiĝas. **Ĝi ekzistis antaŭ ni, ĝi ekzistas ekster ni, ĝi ekzistos post ni.** Tio estas la senco de la esprimo **natura lingvo**.

IV. La "naturaj" lingvoj entenas grandan parton da artefariteco.

Tamen, eĉ se lingvo estas esence **natura fenomeno**, ĉiuj lingvoj entenas parton, foje eĉ grandan parton, da artefaritaĵoj.

1) Kelkfoje oni trovas **vortojn entute inventitajn**. Ili ne estas multaj, sed tamen ekzistas. Jen unu ekzemplo: la angla substantivo **kodak**, kiu poste pasis al pluraj lingvoj kiel komuna nomo (ĝis 1996, ĝi troviĝis en la franca *Petit Larousse*). Ĝi aperis ĉirkaŭ 1888. Ĝi estas tute arbitra kombinaĵo de literoj, kreita de la usona industriulo **George Eastman**, kiu serĉis por sia fotaparato « *vorton mallongan, facile prononceblan kaj sen risko de konfuzo kun aliaj vortoj de la fotografia arto* », laŭ siaj propraj vortoj.

Se **kodak** ne estus artefarita vorto, kion do signifus la vorto *artefarita*?

2) Oni trovas grandan kvanton da **fabrikitaj vortoj**. Ne « *entute fabrikitaj, el nenio* », sed tamen vere fabrikitaj. Ĉiu ajn teknika aŭ scienca vortaro liveras milojn da ili.

Antaŭ mallonga tempo, oni «fabrikis» en la angla lingvo **software**, **computer** kaj milojn da aliaj, same kiel la francoj «fabrikis» **logiciel** kaj **ordinateur**. La angla adjektivo **desoxyribonucleic** datumas de 1960: ĝi ne apartenas al la antikva ĝermana vortrezoro de la lingvo. La franca vorto **magnétoscope** ne venas de la klasika latina **magneto-scopus**, nek de la klasik-helena **μαγνητόσκοπος**: oni «fabrikis» ĝin en 1961.

Multaj el tiuj vortoj estas teknikaj aŭ sciencaj vortoj. Sed ne ĉiuj. La franca vorto **dangerosité** « danĝereco » ne rezultas de la natura evoluo de la latina **dangerositas**, kiu evidente ne ekzistas. Ĝi estis fabrikita de iu ĵurnalisto aŭ verkisto, kiu bezonis ĝin, en 1969; ĝi eniris en la vortarojn kaj nun ĝi estas abunde uzata, ĉar ĝi respondas al vera bezono.

Unu belega ekzemplo de artefarita vorto estas la franca vorto **autobus** « aŭtobuso », farita en 1906, poste konkerinta la tutan terglobon.

3) Inter tiuj fabrikitaj vortoj, kelkaj ne montras sian originon: la **akronimoj**, ankoraŭ pli artefaritaj, ol la antaŭaj. Se en *telefono*, oni facile rekonas *tele* « malproksime » kaj *fono* « sono, voĉo », vortoj kiel *ufo* (angle), *ovni* (france), *nifo* (Esperante), rivelas sian signifon nur per la nekropsio de iliaj literoj: « *unidentified flying object, objet volant non identifié, ne identigita fluganta objekto* ». Niatempe, komputiko liveras multegajn akronimojn: *algol* (*algorithmic language*), *fortran* (*formula translation*), *modem* (*modulateur-démodulateur*), *ram* (*random access memory*), ktp.

En Sovetunio, la akronimoj estis tre laŭmodaj. La vorto **КОМСОМÓЛ** « Komsomolo » ne estas evoluo de slavona vorto **КОМСОМÓЛЬ**, kiu evidente ne ekzistas. Ĝi estas la akronimo de **КОММУНИСТИЧЕСКИЙ СОЮЗ МОЛОДЁЖИ** « komunista unuiĝo de la junularo ». Aliaj konataj ekzemploj estas **колхозо** (**колхоз** ← **КОЛЛЕКТИВНОЕ ХОЗЯЙСТВО** « kolektiva farmo ») kaj **совхозо** (**совхоз** ← **СОВÉТСКИЙ ХОЗЯЙСТВО** « soveta farmo »).

4) Oni trovas **vortojn klerule formitajn**, kiuj kontrastas kun la vortoj *popole formitaj*.

Ni prenu ekzemplon. La Romanoj difinis *stelon* per la vorto *stella*. Sur la Italia teritorio, ĝi restis senŝanĝa (itala *stella*). En la Iberia duoninsulo, ĝi iĝis *estella*, kio finvenas al: kataluna *estela*, kastilia *estrella*, portugala *estrela*. En Rumanio, ĝi perdis siajn L (*stea*). Sur la Gallia teritorio, ĝi frue perdis sian finan vokalon, kiu malfortiĝis al *stelle*. Poste, la prononco faciliĝis per la ŝanĝo de *stelle* al *estelle*. Poste *estelle* estis prononcata [*estweɪ*], kiun oni skribis *estoille* aŭ *estoile*. Fine, rimarkante, ke la s ne plu estas prononcata, oni kutimiĝis skribi ĝin *étoile*, prononcata [*etweɪ*]. Ne pli frue ol ĉe la fino de la 18a jarcento, la prononco [*etweɪ*] ŝanĝiĝis al [*etwaɪ*].

Kiu decidis tiun evoluon, kiu necesigis preskaŭ du jarmilojn? Evidente neniu. Ĝi okazis laŭ maniero **malrapida, spontana kaj nekonscia**. En ĉiuj epokoj, la homoj kredis, ke ili uzas la saman vorton, kiel siaj gepatroj: fakte, la diferencoj, ja malgrandegaj, estis nerimarkataj. Sed tiuj diferencetoj, amasiĝante, finfine estigis rimarkindan diferencon.

La formado de la franca vorto *étoile*, de la kastilia *estrella* kaj de la rumana *stea*, el la latina *stella*, estas ĝuste tio, kion oni nomas **popola (aŭ spontana) formado**.

Nun ni imagu francan astronomon aŭ astrologon, kiu iam bezonis adjektivon signifuntan « stela » (ekzemple por paroli pri *stelaj influoj*). La tiama franca lingvo posedis neniun tiusignifan adjektivon. Ne gravas! La latinaj vortaroj liveras *stellāris* (vorton troviĝantan ĉe la latina verkisto Makrobo, 5a jarcento). Nia astronomo prenas *stellāris*, iom francigas ĝin, kaj tiel fabrikas *stellaire* « stela ». Tiel la vorto *stellaire* pliriĝis la francan leksikon en la 18a jarcento (ekzakte en 1778, laŭ la *Robert-Vortaro*).

Se *stellāris* finvenas al la franca *stellaire* kaj ne al « *étoilaire* », estas pro tio, ke tiu vorto transsaltis la jarcentojn, senpere de la 5a al la 18a. Ne temas pri evoluo malrapida, spontana kaj nekonscia: temas pri decido **abrupta, intenca kaj konscia**.

La formado de la franca vorto *stellaire* « stela » el la latina *stellāris* estas ĝuste tio, kion oni nomas **klerula (aŭ konscia) formado**.

La latina *talpa* « talpo » restis *talpa* en la itala, sed ŝanĝiĝis al *talp* en la kataluna, al *topo* en la hispana kaj al *taupe* en la franca (temas pri **popola formado**). Sed la latina formo estas retrovebla senŝanĝa en la franca *talpidés* « talpedoj » (**klerula formado**).

La francaj vortoj klerule formitaj estas multegaj. Tre verŝajne, la sama fenomeno ekzistas en ĉiuj lingvoj, kun pli-malpli da amplekso.

En la franca, ofte okazas, ke unu latina vorto troviĝas ĉe la origino de du malsamaj francaj vortoj (ili estas *duoblaĵoj*). Jen kelkaj ekzemploj (la unua vorto estas popole formita, la dua estas klerule formita) :

- *auscultāre* → *écouter* « aŭskulti » *kaj ausculter* « aŭskultumi ».
- *cāmĕra* → *chambre* « (dormo)ĉambro » *kaj camĕra* « kamerao ».
- *ĉăpĭtālis* → *cheptel* « brutaro, bestaro » *kaj capital* « kapitalo ».
- *captīvus* → *chétif* « malfortika, debila » *kaj captif* « kaptito, kaptita ».
- *fĕrĭĕ* → *foire* « foiro » *kaj fĕrie* « ferio », *fĕrié* « feria ».
- *frāgĭlis* → *frĕle* « gracila, fragilaspekta » *kaj fragile* « rompebla, fragila ».
- *hospĭtālis* → *hōtel* « hotelo » *kaj hōpital* « hospitalo, malsanulejo ».
- *intĕgĕr* → *entier* « tuta, entjera » *kaj intĕgre* « honesta, nekoruptebla ».
- *mōbĭlis* → *meuble* « meblo » *kaj mobile* « movebla, moviĝema ».
- *nātālis* → *Noël* « Kristnasko » *kaj natal* « naskiĝa ».
- *palma* → *paume* « polmo » *kaj palme* « palmo ».
- *pōtĭo* → *poison* « veneno » *kaj potion* « pocio ».
- *rātĭo* → *raison* « racio, saĝo » *kaj ration* « porcio ».
- *vĭgĭl* → *veille* « hieraŭo, maldormo » *kaj vigile* « noktogardisto, antaŭfesta tago ».

Nu, oni ne povas nei, ke tiuj vortoj klerule formitaj estas **artefaritaj kreaĵoj**. Ili rezultas de **konscia decido**, ne de spontana evoluo.

V. Unu lingvo ekzakte simila al la aliaj: Esperanto.

Ĉio antaŭe dirita ekzistas same en Esperanto. La nuna lingvo rezultas de unu jarcento da influoj, en ia diasporo kovranta preskaŭ la tuton de la terglobo.

Kion Zamenhof publikigis en 1887, tio ankoraŭ ne estis lingvo, tio estis embrio de lingvo, fetu de lingvo. Ekde tiam, la embrio bezonis kreski, ekvivi.

Zamenhof tute ne intencis fabriki lingvon kompletan, sur kiu li havus aŭtorrajtojn. Lingvon, kiu bezonus neniu kompletigon, kiu ne evoluus, ĉar ĝi ne bezonus evolui: tia lingvo estus vere artefarita.

Ja la malo estas vera. Ni legu tion, kion li mem skribis.

« *Unu homo tie povas esti nur iniciatoro sed ne kreanto* » (Aldono al la Dua Libro, p.6). « *Ĉio cetera devas esti kreata de la homa societo kaj de la vivo, tiel kiel ni vidas en ĉiu el la vivantaj lingvoj* » (Aldono..., p.7). « *La lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj, kaj tiu formo, kiun mi donis al ĝi, tiu gramatiko kaj vortaro, kiujn mi prezentis, devas esti sole fundamenta, sur kiu estos ellaborata la efektiva lingvo internacia de l' estonteco* » (Aldono..., p.8).

Nu, kio estas tiu fundamento? Ĝi estas (almenaŭ koncerne la vortrezoron) la parto, kiun la grandaj Eŭropaj kulturlingvoj havas komunbiene. La franca lingvisto Antoine Meillet (1866-1936) diris tute ĝuste: « *anstataŭ krei, Zamenhof eltiris el la Eŭropaj lingvoj la komunan elementon, kiun ili entenas* ». Tial oni rajtas aserti, ke en Esperanto, ne ekzistas eĉ unu elemento, kiu ne venus de la “naturaj lingvoj” (“etnolingvoj”) estus pli ĝusta).

Ankaŭ Meillet skribis pri la Esperanta leksiko: « *Nomi la familion familia ne estas krei vorton, ĉar la lingvoj hispana kaj portugala havas familia, la itala famiglia, la franca famille, la germana Familie, la angla family, la rusa familia* » (ni precizigu tamen, ke la rusa

vorto *фами́лия* signifas ne «familio», sed «*familinomo*»).

La plej bona pruvo de ĉi tio, estas ke :

93 % de la Esperantaj vortoj estas tuj kompreneblaj de latinido
90 % de la Esperantaj vortoj estas tuj kompreneblaj de ĝermanido
43 % de la Esperantaj vortoj estas tuj kompreneblaj de slavo

Se Esperanto estus artefarita, “entute inventita”, ĝi estus tuj komprenebla de neniu.

La artefariteco de la Esperanta vorto **magnetofono** ne estas pli granda, ol tiu de la franca **magnétophone**, aŭ de la germana **Magnetophon**, aŭ de la rusa **магнитофон**, kiu ne formiĝis spontane el la latina *magnetophonus*.

Ĝi ne estas pli granda, ol tiu de la japana **テープレコーダ** *têpurekôda* (adaptajo de la angla *tape-record*), aŭ tiu de la hebrea **רַשָּׁמָוֹת** *rəšamqōl*, “fabrikita” el **רָשָׁם** *rašam* «enskribi» kaj **קוֹל** *qōl* «voĉo», aŭ de ĝia sinonimo **מַגְנֵטוֹפּוֹן** *magneťōfōn*. Tiu miksaĵo de artefaritaĵoj kaj de naturaĵoj ekzistas **en ĉiuj lingvoj, senescepte**.

Ne Zamenhof kreis la sciencan leksikon, la poeziajn terminojn, la vulgaraĵojn. Sed ja la vivo, la uzado, transformis la embrian lingvon de 1887 en vivantan lingvon, kiu **evoluis, kiel ĉiuj lingvoj**.

Efektive, Esperanto, estiel vivanta lingvo, evoluas : la neologismoj puŝas la arkaikaĵojn al la forgeso. La verkojn de Zamenhof (1859-1917) oni povas kompari kun la samepokaj francaj tekstoj: ili estas tute kompreneblaj, sed ilia stilo kaj ilia leksiko iom arkaikiĝis.

Tiu hindeŭropa komuna bazo de la leksiko kaŭzas, ke oni foje akuzas Esperanton, ke ĝi estas « *miksaĵo de ĉiuj lingvoj* ». Sed tio validas pri **ĉiuj lingvoj**.

Se Esperanto estus « miksaĵo de ĉiuj lingvoj », tion oni povus diri ankaŭ pri la franca :

• **j'ai acheté dans une boutique un petit bouquin d'algèbre** « mi aĉetis en butiko etan libron de algebro » (acheter « aĉeti » estas latina, boutique « butiko » estas greka, petit « malgranda » venas senpere de la galla, bouquin « libro » estas flandra, algèbre « algebro » estas araba).

• **magasin X. : grande braderie de fauteuils et de canapés** « magazeno X. : granda rabatvendo de foteloj kaj de kanapoj » (magasin « magazeno » estas araba, grand « granda » estas latindevena, braderie « rabatvendo » estas nederlanda, fauteuil « fotelo » estas franka, canapé « kanapo » venas rekte de la greka).

Tion oni povus diri ankaŭ pri la hispana :

• **he pintado con tiza un alacrán blanco y azul en la pizarra de la botica** « mi desegnis per kreto skorpion blankan kaj bluan sur la skribtabulo de la apoteko » (pintar « pentri, desegni » estas latina, tiza « kreto » estas azteka, alacrán « skordio » estas araba, blanco « blanka » estas ĝermana, azul « blua » estas persa, pizarra « skribtabulo » estas vaska, botica « apoteko » estas greka).

Tamen neniu akuzas la lingvojn francan aŭ hispanan, ke ili estas « *miksaĵoj de ĉiuj lingvoj* »...

Artikolo difina

La japana samideano Miyamoto Masao, tamen sperta esperantisto, skribis: «*ekz. mi, kiu eklernis la lingvon jam de antaŭ 45 jaroj, ankoraŭ ne povas facile manipuli la artikolon "la". Ne nur mi, laŭ mia kredo, ĉiu japano senescepte*» (*Sarkasme kaj entuziasme*, p.12).

Tio montras, kigrade la uzo de la difina artikolo estas malfacila por la homoj, kiuj ne havas ĝin en sia denaska lingvo. Eĉ kelkfoje por la ceteraj...

Cetere, kial Zamenhof kreis difinan artikolon en Esperanto? Internacia lingvo tre povus funkcii sen difina artikolo. Ĉi-okaze, certe ne la rusa aŭ pola lingvo influis Zamenhof-on, ĉar la slavaj lingvoj funkcias tute bone sen artikolo (krom la bulgara kaj la makedona, kiuj havas postmetitan artikolon).

Fakte, kiam Zamenhof estis ankoraŭ juna gimnaziano, la bezono de difina artikolo turmentadis lin. Jen kiel li decidiĝis. Iun nokton, li sonĝis, ke li estas en kamparo kun kelkaj homoj, kaj ĉi tiuj parolis pri iu grava malfeliĉo, kiu okazos, se el arbaro videbla en la malproksimo, elvenos tri ruĝaj knabinoj. La homoj timeme rigardadis kaj observis la arbaron; subite, unu el ili ekkriis: "jen **la** tri ruĝaj knabinoj!". Zamenhof vekiĝis, jam tute certa, ke la artikolo estas utila, eĉ necesa. Efektive, la krio "jen tri ruĝaj knabinoj!", sen artikolo, havis tute alian valoron. Tiun anekdoton Zamenhof mem rakontis al Marie Hankel, kaj Waringhien transdonis ĝin en *Beletro, sed ne el katedro* (p.78).

La romano de Tolstoj, *Война и Мир*, estis plurfoje tradukita francen, jen kun la titolo *La Guerre et la Paix* «La Milito kaj la Paco», jen kun la titolo *Guerre et Paix* «Milito kaj Paco». Inter ambaŭ formoj de la franca (kaj Esperanta) titolo, estas aprecinda nuanco, kiu malestas en la rusa titolo.

Kial internacia lingvo devus senigi sin de tiu nuanco?

I. Uzado de la artikolo.

Rilate la difinan artikolon, Zamenhof ne estis tre parolema. La Fundamenta Gramatiko donas indikon nur en siaj partoj franca kaj rusa: «*L'emploi de l'article est le même qu'en français ou en allemand | употребление члена такое же, какъ въ языкахъ нѣмецкомъ, французскомъ и другихъ*». La Esperanta traduko estas ankoraŭ pli avara: «*La uzado de la artikolo estas tia sama, tiel en la aliaj lingvoj*» (*Fundamenta Krestomatio*, p.239).

La Ekzercaro estas iom pli preciza: «*La artikolo "la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj*» (§27). Sed la malfacileco ekaperas tiam, kiam oni konstatas, ke ĝia uzado ne estas la sama en ĉiuj lingvoj.

Franco, italo kaj hispano diras: «*J'aime le vin, mi piace il vino, me gusta el vino*» (mi ŝatas **la** vinon), **kun** artikolo. Sed anglo diras: «*I like wine*» (mi ŝatas vinon), **sen** artikolo.

Franco diras: «*la langue française*» (**la** lingvo franca), kun **unu** artikolo. Sed hebrelingvano diras: «*הַשָּׂפָה הַעִבְרִית ha-safa ha-'ivrīt*» (**la** lingvo **la** hebrea), kun **du** artikoloj.

Se resumi la klarigojn de la PAG (p.95-100), la difina artikolo estas uzata:

- Por indiki, ke la ulo aŭ ajo estas konata:

◊ aŭ ĉar oni jam parolis aŭ tuj parolos pri ĝi: *unu vidvino havis du filinojn; la pli maljuna...* (evidente, la pli maljuna el la du filinoj antaŭe cititaj); *mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi* (la monon, pri kiu oni tuj donos precizigon) (F §11, 14);

◊ aŭ ĉar ĝi kuŝas antaŭ la okuloj: *ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon?* (evidente, tiun saman botelon, kiu estas en miaj manoj) (F §34).

◇ aŭ ĉar ne estas ebleco de konfuzo : *mi manĝas per la buŝo* (mia buŝo) (F §8).

• Por indiki, ke la ulo aŭ ajo reprezentas sian tutan kategorion : *la birdoj flugas ; la filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj* (F §9, 36).

• Por indiki, ke la ulo aŭ ajo estas sola en sia speco : *la ĉielo estas blua ; en la tago ni vidas la helan sunon ; nun li diras al mi la veron* (F §6, 10, 24).

II. Propra nomo kun anoncvorto.

Ni konsideru kelkajn esprimojn de Zamenhof mem : *sur la montoj Ararat, skribi al la presisto Kelter*. Ĉu estus mikroskope da logiko en la forigo de la difina artikolo (*sur montoj Ararat, skribi al presisto Kelter*)? Evidente ne. Oni ne povas, en la sama esprimo, paroli pri iaj montoj, nedifinitaj, kaj tuj poste precizigi, ke temas ne pri iuj ajn montoj, sed ĝuste pri tiuj montoj nomitaj Ararat. Oni ne povas, en la sama esprimo, paroli pri ia presisto ne difinita, iu ajn presisto, kaj tuj poste difini lin per la citado de lia nomo.

Oni ne povas imagi, ke Zamenhof dirus «*Reĝo Alfonso XIII^a longe vivu!*», kio estus absurda kaj sensenca bondeziro adresita al ia nedifinita reĝo, kiu tamen estus tuj difinita per la mencio de lia nomo. Evidente, Zamenhof, kiu havis klare funkciantan cerbon, diris : «*La Reĝo Alfonso XIII^a longe vivu!*» (OV, p.390).

La PAG asertas tute ĝuste (p.99) : «*Kiam la propraj nomoj estas nomesprimoj kun anoncvorto, oni uzas la artikolon antaŭ ĉi lasta : la rivero Gango^Z; la monto Karmel^Z; la profeto Mahometo^Z; la arabo Geŝem^Z; la pastro Ezra^Z; la reĝo Salomono^Z; la reĝino Ester^Z; la vic-reĝo Sargon^B; la princo Ramzes^B; la kanceliero Seguir^B.* » Tio entenas tiom banalan elementan logikon, ke insisti pri tio aspektas apenaŭ necese.

III. Simple, sed eble ne por ĉiuj.

Tamen insisti mi devas, ĉar svarmas gazetoj (ankaŭ literaturaĵoj, sed pli malofte), en kiuj abundas substantivoj, **samtempe NEDIFINITAJ per foresto de artikolo, kaj ankaŭ DIFINITAJ per la tuja sekvado de propra nomo.**

Ekzemploj.

- **Akademiano** *Cherpillod* havas... (Monato, Marto 2004, p.21).
- la aktivajoj de **asocio** *Espéranto 44* (La Sago, n-ro 3, p.4) : iu asocio, kiu tamen nomiĝas Eo 44.
- teatraĵon de **Franca aŭtoro** *Eugène Labiche* (SAT-Amikaro, n-ro 580, p.46).
- **polica detektivo** *Jano Karal* (J.Valano, Ĉu vi kuiras ĉine?, p.5, kaj plu).
- **diktatoro** *Adolf Hitler* (La Sago, n-ro 1, p.4).
- propono farita de **ekleziulo** *Henri Grégoire* (SAT-Amikaro, n-ro 581, p.53).
- **filozofo kaj verkisto** *Jean-Paul Sartre* (La Sago, n-ro 1, p.7).
- li reprezentas **firmon** *Hachette* (PIV, p.967b).
- Franca **juristo** *René Cassin* (La Sago, n-ro 1, p.1).
- en **ĵurnalo** *La Montagne* (SAT-Amikaro, n-ro 580, p.41).
- **kaporalo** *René Cassin* (La Sago, n-ro 1, p.2).
- **komediiŝto** *Henri Monnier* kreis... (La Sago, n-ro 3, p.3).
- **ministro** *Acebes* (Monato, Majo 2004, p.11).
- **Monarkisto** *Joseph de Maistre* diris... (La Sago, n-ro 3, p.1).
- Pariza **palaco** *Chaillot* (La Sago, n-ro 1, p.5).
- kunvoko farita de **papo** *Aleksandro la Tria* (SAT-Amikaro, n-ro 579, p.33).
- agado de **prezidanto** *Aznar* (Monato, Majo 2004, p.12).
- **Kanadana profesoro** *Humphrey* (La Sago, n-ro 1, p.1 ; cetero, kial *Kanadana*?).

- **reĝino** *Suzana naskiĝis en 1941* (Monato, Novembro 2004, p.16).
- **urbo** *Sainte-Savine troviĝas en...* (La Sago, n-ro 3, p.6).
- *proksime al urbeto* **Merkine** (Monato, Marto 2004, p.19).
- *...invitis Esperantan verkiston* **Vinko Oŝlak** (Esperanto, n-ro 1170, p.114).

IV. Nova eldono de la Biblio.

En 2003, aperis nova eldono de la Biblio. Novaĵo estas, ke ĝi entenas la Duakanonajn Librojn (greklingvaj libroj, ĝenerale akceptitaj en la katolikaj Biblioĵoj, ne en la protestantaj).

Tre bedaŭrinde, la tradukinto de la Duakanonaj Libroj ne montras konstantan sintenon rilate la uzadon de la difina artikolo, kiu ĉiam ĉeestas antaŭ anoncvorto, krom antaŭ la anoncvorto *reĝo*, kio estigas katastrofan rompon kun la Esperanta stilo ĝenerale, kun la Zamenhofa stilo aparte, kaj precipe kun la stilo de la aliaj partoj de la Biblio.

Kun difina artikolo :

- **la lando** *Asirio* (Tob 1³),
- **la riveron** *Tigris* (Tob 6¹),
- **la profeto** *Jona* (Tob 14⁴),
- **la torento** *Abrona* (Jud 2²⁴),
- **la riveron** *Jordan* (I Mak 5⁵²),
- **la urbojn** *Bet-Cur kaj Gezer* (I Mak 9⁵²),
- **la pastro** *Joahim* (Bar 1⁷),
- **visis la profeto** *Habakuk* (Dan 14³³).

Sen difina artikolo :

- *reĝo Sanĥerib mortigis iujn* (Tob 1¹⁸),
- *reĝo Nebukadnecar faris...* (Jud 1⁵),
- *kontraŭ reĝo Arfaksad* (Jud 1⁵),
- *reĝo Antioĥo* (I Mak 1¹⁰, 6¹),
- *reĝo Aleksandro* (I Mak 10¹⁵),
- *reĝo Demetrio* (I Mak 10²⁵, 14¹, 15¹),
- *reĝo Ptolemeo* (I Mak 10⁵⁵, 11⁸),
- *reĝo Astiages ekdormis* (Dan 14¹).

V. Unua necesajo: ni konsultu niajn fontojn.

1) La Fundamento.

Tiuj du frazeroj apartenas al la **Fundamento** mem (§ 36) :

- **la doktoredzino** *A.*
- **la gedoktorojn** *P.*

Estas evidente, ke tute ne temas pri iu nedifinita doktoredzino, pri iuj nedifinitaj gedoktoroj: ambaŭ estas difinitaj per sia familinomo (almenaŭ per ties komenclitero). Do foresto de la difina artikolo estus fuŝlingvaĵo, sed ne Esperantaĵo.

Ĉu necesas memoriĝi, ke la **Fundamento** estas... fundamenta ?

2) La verkoj de Zamenhof.

Foliumante la verkojn de Zamenhof, oni trovas la jenajn ekzemplojn, en kiuj komuna nomo estas anoncvorto de propra nomo. Ĉiuj ekzemploj, senescepte, kongruas perfekte kun la PAGa aserto.

a) La Biblio, inkluzive de la Nova Testamento (ne tradukita de Zamenhof mem).

- **la ĉefpastro** *Kajafas* (Mt 26⁵⁷).
- **la profeto** *Natan* (II Sam 7²).
- **la Judo** *Mordeĥaj* (Est 6¹⁰).
- **la reĝo** *Ciro* (Dan 1²¹).
- **la knabo** *Samuel* (I Sam 3¹).
- **la reĝo** *David* (I Reĝ 1¹).
- **la monato** *Abib* (Elr 23¹⁵).
- **la reĝo** *Herodo* (Mt 2¹).
- **la montoj** *Ararat* (Gen 8⁴).
- **la reĝo** *Jerobeam* (I Reĝ 15¹).
- **la monton** *Nebo* (Rdm 34¹).
- **la reĝo** *Aĥaŝveroŝ* (Est 1², ktp).
- **la monto** *Sinaj* (Elr 19¹⁸, Lev 25¹).
- **la reĝino** *Ester* (Est 8¹).
- **la pastro** *Aaron* (Lev 1⁷).
- **la urbo** *Luz* (Gen 35⁶).
- **la profeto** *Habakuk* (Ĥab 1¹).
- **la valo** *Sidim* (Gen 14³).

Cetere, tiu uzo de la difina artikolo (inkluzive antaŭ la vorto *reĝo*) neniel estas pro-

praĵo de Esperanto ; ĝi estas proprajaĵo de pura logiko, trovebla en multaj etnolingvoj. Jen kelkaj ekzemploj de nacilingvaj tradukoj (evidente ne inventitaj de mi, nur kopiitaj):

• דוד המלך, ὁ βασιλεὺς Δαυίδ, **le** roi David, **Il** re David, **el** rey David, **el** rei David, **o** rei David, **imp**aratu David, **ar** roue David, **y** brenin Dafydd, **an** righ Daibhidh, **the** king David, **der** König David, **de** koning David, דוד המלך המצוי, mbreti David, **is**-sultan David.

• **la** reine Esther, **la** regina Ester, **la** reina Ester, **a** rainha Ester, **imp**arateasa Estera, **ar** rouanez Ester, **the** queen Esther, **die** Königin Esther, **de** koningin Ester, **is**-sultana Ester.

• **le** jeune Samuel, **il** giovane Samuele, **el** joven Samuel, **el** noi Samuel, **o** mancebo Samuel, **tîn**ărul Samuel, **ar** Samuel yaouank, **an** leanabh Samuel, **the** child Samuel, **der** Knabe Samuel, **de** jonge Samuël, **den** unge Samuel, детето Самуил, iž-žaghžugh Samwel.

b) La Originala Verkaro.

- **la** cenzuristo *s-ro* Gejspitz (p.513).
- **la** firmo Möller & Borel (p.532).
- **la** pastro J. M. Schleyer (p.385).
- **la** presisto Kelter (p.489).
- Sinjoro **la** Prezidanto de la R. (p.437).
- **la** Reĝo Alberto (p.403).
- **la** Reĝo Frederiko Aŭgusto (p.384).
- **la** firmo Hachette (p.225, 251, 367, 523, 525, 526, 527, 545, 546, 547, 562, 572).
- **la** pola ĵurnalisto kaj poeto J. W. (p.220).
- **la** societon "Espero" (p.512, 513, 516).
- **al la** societo "Espero" (p.516).
- **la** Societon "Espero" (p.512).
- **la** urbo Barcelono (p.391).
- **la** urbo Bulonjo (p.368).
- **la** urbo Bjelostok (p.369).
- **en la** urbon Grodno (p.511).

c) La Leteroj de Zamenhof.

- **la** firmo Hachette (I, p.77, 115).
- **la** islandan *s-ron* Nutz (I, p.212).
- **la** lertan esperantiston J. J. S. (I, p.211).
- **la** lingvisto B. de Courtenay (II, p.125).
- **la** urbo Ĥerson (I, p.113).
- **la** vilaĝo Vejseje (I, p.112).

ĉ) Fabeloj de Andersen.

- **la** amkantisto Walther (III, p.143).
- **la** Dano Holger (II, p.109).
- **la** preĝejo Santa Croce (I, p.214).
- **la** provinco Zelando (II, p.130).
- **la** reĝo Arturo (I, p.121).
- **la** reĝo Johano (I, p.116).
- **la** reĝo Kristiano la Sepa (IV, p.160).
- **la** reĝo Valdemar (II, p.131).
- **la** skulptiston Alfredon (IV, p.147).
- **la** urbo Eisenach (III, p.139).
- **la** urbo Florenco (I, p.211).

d) Marta.

- **la** strato Długa (p.65).
- **la** strato Graniczna (p.4, 31).
- **la** strato Senatorska (p.78).
- **la** strato Swieto-Jerska (p.41, 54, 92).

e) La Rabeno de Baŝarafi.

- **la** monta kastelo Sareck (p.6).
- **la** monto Sinaj (p.11, 18).
- **la** patriarko Abraham (p.18).
- **la** rabeno Abraham (p.14).
- **la** reĝo Maksimiliano (p.22).
- **la** rivero Rejno (p.18).
- **la** sankta Bartolomeo (p.24).
- **la** sankta Katerino (p.23).
- **la** sankta Werner (p.7, 14).
- **la** tamburisto Hans (p.31).
- **la** urbo Amsterdamo (p.36, 46).

f) La Rabistoj.

- **la** knabo Karolo (p.91, der Knabe Karl).
- **la** marŝalo de Saksujo (p.85, den Marschall...).
- **la** ruzulo Spiegelberg (p.53, dem Schlaupkopf).

g) La Revizoro.

- **la** ĵuĝisto Ljapkin-Tjapkin (p.95).
- **la** komercisto Abdulin (p.40, 69).
- **la** departementa pordisto Miŝejev (p.94).
- **la** restoraciiston Vlas (p.14).
- **la** sankta Antono (p.70).

- **la komercisto Ĉernjajev** (p.17).
 - **la komercistino Pantelejeva** (p.72).
 - **la sankta Onufrio** (p.70).
 - **la superpolicano Pugovicin** (p.18).
- Tute certe, oni ne povas paroli ĉi tie pri rusa influo, ĉar artikolo malestas en la rusa lingvo.

3) La verkoj de Kabe.

- **la knabino Margenjo** (*Neĝulino*, p.37).
- **la urbo M.** (*Patroj kaj Filoj*, p.62).
- **la vojo X.** (*Patroj kaj Filoj*, p.82).
- **l' diino Hator** (*La Faraono*, II, p.5, 22).
- **la nomeso Habu** (*La Faraono*, II, p.33).
- **la stelo Sirius** (*La Faraono*, II, p.5).
- **la urbo Pi-Bast** (*La Faraono*, II, p.5).

4) La Plena Ilustrita Vortaro (reviziita).

- **la ĉefanĝelo Gabrielo** (p.607b).
- **la imperiestro Aŭgusto** (p.805b).
- **la jezuito Francisko** (p.632a).
- **la konstelacio Ĝemeloj** (p.897a).
- **la konstelacio Malgranda Hundo** (p.920b).
- **la Roma regnestro kaj generalo Julio Cezaro** (p.191b).
- **la lago Ĉado** (p.519b).
- **la lando Badenio-Vurtembergo** (p.132b).
- **la planedo Venuso** (p.491a).
- **la reĝo Arturo** (p.920b).
- **la rivero Cefizo** (p.773a).
- **la teologo Tomaso la Akvinano** (p.67a).

VI. Ĉu esceptoj ekzistas ?

La PAG (p.99) aldonas, ke « *escepton faras nur malmultaj honoraj alnomoj, kiuj kvazaŭ kunkorpiĝas kun la propra nomo : Sinjoro, Sinjorino, Fraŭlino, Doktoro, Profesoro, Sankta, Beata (en religia senco) : Doktoro Zamenhof, Sankta Petro.* »

Oni povus aldoni al tiu listeto la profesion titolon *inĝeniero*, la nobelajn titolojn (*duko, grafo, ktp*) kaj la armeajn titolojn (*generalo, komandanto, leŭtenanto, ktp*).

Tiuj ĉi esceptoj estas verŝajne ŝulditaj al germana influo. Efektive, la germana lingvo ne uzas la difinan artikolon antaŭ titolo aŭ rango. Ekzemple: *er hat mit Fürst von Bismarck gesprochen « li parolis kun la princo de Bismarko », Herr Professor « sinjoro profesoro ».*

Jen kelkaj Zamenhofaj ekzemploj de foresto de artikolo.

- **barono Brambeus** (*Revizoro*, p.46); kun **generalo Sebert** (*OV*, p.563).
- **la granda lunkarto de D-ro Mädler** (*Fabeloj*, I, p.126).
- **doktoro Jeddler... forpelis min** (*Batalo*, p.92).
- **mortis Doktoro Emilo Javal...** (*OV*, p.246).
- **mi demandis generalon Sebert** (*OV*, p.565).
- **transdonu ĝin al generalo Sébert** (*Leteroj*, I, p.285).
- **letero de grafo Tolstoj...** (*OV*, p.484).
- **inĝeniero V. Brzozowski havis...** (*OV*, p.487).
- **proponon de Vi kaj de komandanto Lemaire** (*Leteroj*, I, p.292).
- **mi ricevis leteron de prof. Ostwald** (*Leteroj*, II, p.69).
- **li konis ja reĝon Frederikon** (*Fabeloj*, II, p.111); escepta ekzemplo de reĝo sen artikolo.

Tiu foresto de la difina artikolo estas konstanta ĉe la vortoj *sinjoro, sinjorino, fraŭlino*. Sed ĉe la aliaj titoloj, la Zamenhofa lingvaĵo ne estas unueca. Ekzemploj de ĉeesto de artikolo estas preskaŭ same multaj, kiel la malaj ekzemploj.

- **la doktoro Jeddler** (*Batalo*, p.13, 14).
- **la duko de Brunsvigo** (*Rabeno de B.*, p.22).
- **la grafo de Moor** (*Rabistoj*, p.4).
- **la grafo Tolstoj** (*OV*, p.485, 485, 486).
- **la kapitanon Ch. Lemaire** (*Leteroj*, I, p.112).

- al **la komandanto Lemaire** (*Leteroj*, II, p.183).
- **la profesoro Max Müller** (*OV*, p.367).

Mi aldonu ke, sub la plumo de Zamenhof, la esprimo "**la reĝo X.**" estas preskaŭ ĉiam provizita per difina artikolo, kiel oni povas konstati el la ĉi-supraj ekzemploj. Inverse, Kalocsay skribas sen artikolo: «*Reĝo Filipino, reĝino Kleopatra, Imperiestro Rudolfo, Sekreta Konsilanto Huber, Malsaĝulo Peĉjo, Saĝulo Natan*» (*Lingvo Stilo Formo*, p.73).

VII. Modernaj verkoj.

Eble oni rebatos, ke la Zamenhofa stilo estas jam malnova, kaj ke Esperanto evoluis. Ne, tute ne. Por konvinkiĝi pri la malo, ni legu kelkajn ekzemplojn ĉerpitajn en diversaj ĵurnaloj aperintaj en 2003-2004.

- **la episkopo Colonna** (*La Gazeto*, n-ro 113, p.20).
- **la franco Djemil Kessous** (*Monato*, Marto 2004, p.8).
- **la hungara E-isto Károly Fajszí** (*Heroldo*, n-ro 2051, p.4).
- en **la pola urbo Poznań** (*Esperanto*, Decembro 2003, p.253).
- **la prezidanto Namutema Wabasobe** (*Esperanto*, Marto 2004, p.52).
- **la urbo Badagry** (*Esperanto*, Marto 2004, p.55).
- en **la urbo Sainte-Savine** (*Esperanto*, Decembro 2003, p.258).
- **la urbeto Ŝiluva** (*Monato*, Aprilo 2004, p.10).
- **la valo Salzatal** (*Monato*, Majo 2004, p.20).
- **la velsipo Jeanie Johnson** (*Monato*, Majo 2004, p.21).

Nun, kelkaj literaturaj ekzemploj, hazarde plukitaj ĉe kelkaj bonaj aŭtoroj.

- **la diino Fortuno** ; **la urbo Romo** (A.Löwenstein, *La Ŝtona Urbo*, p.178, 182, 205 ; p.17).
- **la grafino Mambolino** (L.Beaucaire, *Kruko kaj Baniko*, p.36, 66, 93).
- li fondis **la havenurbon Cartagena** (G.Waringhien, *La Trofeoj*, p.7).
- en **la Kolegion Louis-le-Grand** (K.Kalocsay kaj G.Waringhien, *La Floroj de l' Malbono*, p.11).
- **la parnasa eldonisto Lemerre** (G.Waringhien, *La Trofeoj*, p.8).
- **la poeto Leconte de Lisle** (G.Waringhien, *La Trofeoj*, p.8).
- **la ponto Sankta-Angelo** (G.Waringhien, *Beletro...*, p.120).
- **la vilaĝo Rumsheim** (D.Moirand, *Murdo en Esperantujo*, p.10).

Mi povus kilometrigi tiun liston.

VIII. Vorto «el PIV», aŭ vorto «el la PIV»?

Oni ofte riproĉas min, tute malprave, kiam mi diras, ke iu vorto «*ne troviĝas en la PIV*». Sed mi insistas: **la PIV**. Efektive, mi ne parolas pri iu vortaro (eble nekonata de la alparolato), kiu estus plena kaj ilustrita (pluraj povas esti tiaj). Sed pri **la** konata vortaro speciale nomita mallonge **PIV**, kaj eldonita de SAT. Cetere, ĉu kredi, ke G.Waringhien estis tiel malklera, ke li ne sciis uzadi la artikolon? Certe ne. Nu, vidu lian Antaŭparolon al **la PIV**: ĝi entenas plurfoje la esprimojn «*la P.V., la P.I.V., la U.V.*» (p.5 ĝis 9 de la dua PIV). Male, la nova Antaŭparolo de tiu dua PIV (p.21 ĝis 27) rezignas pri la difina artikolo: «*ekzempleron de PIV, ĉefredaktoro de PIV, ktp*». Ĉu progreso? Ĉu malprogreso??...

Kaj Zamenhof, evidente, neniam parolis pri «la PIV», kiu ankoraŭ ne ekzistis. Sed tamen, tre ofte, pri «*la Universala Vortaro*» (*Antaŭparolo de la Fundamento*, p.44 ; *OV*, p.428, 429, 444, 511, 528, 529, 538, 558, ktp ; *Lingvaj Respondoj*, p.19, 38, 39). Oni ne vidas, kial la uzado de la difina artikolo devus esti malsama laŭ tio, ĉu sekvas ĝin «*PIV*» aŭ «*UV*».

Duoblaj konsonantoj

De tempo al tempo, dise-mise, oni aŭdas bonan predikanton, kiu asertas per digna tono, ke «*en Esperanto, duoblaj konsonantoj estas malpermesataj*». Laŭ kiu aŭtoritato? Laŭ kiu regulo? Mistero. Ĝenerale, ju pli malklera estas la individuo, des pli aŭtoritata estas lia aserto.

Jen ekzemplo. Antaŭ kelkaj jaroj, mi publikigis en la revuo *Monato* (Junio 1998) artikolon pri la galla lingvo. Jes, **GALLA** lingvo, kun du L. lu germana abonant(in)o, kiu ne konas la Fundamenton, forte ekkoleris kontraŭ la vorto **GALLO**, trempis sian plumon en sulfatan acidon, kaj sendis al *Monato* venĝeman leteron, en kiu ĝi miris «*ke la revuo akceptis publikigi tiun malesperantan vorton*» (Septembro 1998). Tiele! «*Malesperanta vorto*»! Ne temas pri «*neesperanta vorto*», sed pri «*malesperanta vorto*» (iom cerbumu, kio estas la *malo* de Esperanto?!). Miaflanke, mi miris, ke *Monato* akceptis publikigi tiun idiotan leteron.

Efektive, nur tre malofte oni renkontas iun sufiĉe malscivoleman, ke ĝi ne konsultas la PIVon ĉe laetrovo de nekonata vorto, kaj ankaŭ sufiĉe malhumilan kaj arogantan, ke ĝi akuzas la revuon kaj unu el la artikolaŭtoroj pri *malesperantisteco*, sen plia informiĝo. Se tiu persono konsultus la PIVon, ĝi elkovrus, ke **GALLO**, kun du L, estas vorto uzata de Zamenhof mem. Ho Lazaro-Ludoviko, kiu kreis *Esperanton*, kaj ankaŭ *Malesperanton*, pardonu al ĝi, mi petegas, ĝi ne respondecas pri sia kreteneo, probable denaska!



Kion diri pri duoblaj konsonantoj (fakte, la ĝusta termino estas *ĝeminaj konsonantoj*, sed ne gravas)? **La unua ago** nepre farenda estas la konsulto de la **Fundamento**. Ni trovos en ĝi du ekzemplojn de vortoj kun duobla konsonanto:

1) La virinno **ANNO** (§ 36), kun du N.

2) La nomo de la fama germana verkisto *Friedrich Schiller*, sub la esperanta formo **SILLERO**, kun du L. Ĝi troviĝas en la *Fundamenta Gramatiko* (§ 16 de la partoj franca, angla, germana, pola) kaj ankaŭ en la *Unua Libro* (p.40).

Tiuj du vortoj estas gravaj pro la fakto, ke ili troviĝas en la Fundamento. Eĉ se da ili ekzistis nur du, tio sufiĉus por montri, ke duoblaj konsonantoj interne de unu radiko, tute ne estas malpermesataj. Ke tiuj du vortoj estas propraj nomoj, estas akcesore.

La dua ago nepre farenda estas la konsulto de la **verkoj de Zamenhof**. Kaj ni konstatos, ke Zamenhof mem uzis multajn vortojn provizitajn per duobla konsonanto. Ĉiuj troviĝas en la PIV2 (krom *Finnmarko*; en la PIV: *Finmarko*), do ili estas facile troveblaj far' de ĉiu ajn:

- **Anneto**, karesformo de *Anno*.
- **brutte**, malnete.
- **Buddo**, sinonimo de *Budho* aŭ de *Budao*.
- **bullo**, papa dekreto (vorto jam trovebla en la *Plena Vortaro Esperanta-Rusa*, 1909).
- **finno**, loĝanto en Finnlando.
- **Finnmarko**, Norvegia regiono (formo trovebla en la *Fabeloj de Andersen*, II, p.71-72).
- **galloj**, prapatroj de la francoj; **Gallujo**, lando de la galloj.
- **Kannoj**, urbo (kiun la PIV donas ankaŭ sub la singulara formo **Kanno**).
- **nette**, sen kromajo.
- **Pirro**, filo de Afilo (greke Πύρρος).

- **regatto**, boatkonkurso.
- **senhora**, sinjorino (vorto trovebla en *La Rabeno de B.*, citita en PIV1, sed ne plu en PIV2).
- **villo**, kampara bieno.

La tria ago nepre fareda estas la konsulto de la **Plena Ilustrita Vortaro** (reviziita). Ni trovos en ĝi:

- **anno**, japana dolĉaĵo.
- **Bassa Markolo**, en Aŭstralio.
- **Bonno**, Germania urbo.
- **Cinno**, Romana virnomo.
- **Eddo**, kolekto de Islandaj poemoj.
- **Emma**, virinnomo.
- **Gujjango**, Ĉinia urbo.
- **kannado**, ano de Hindia gento.
- **Mekko**, Arabia urbo.
- **Messo**, Francia urbo (france Metz).
- **Potto**, angla kirurgo.
- **pullo**, entreprenista aranĝo.
- **robbo**, fruktosuko.
- **Sommo**, Francia rivero.
- **Sullo**, Roma diktatoro.
- **Tajjŭano**, Ĉinia urbo.
- **Tasso**, itala poeto.
- **tennoo**, la Japania regnestro.
- **tinno = tinuso**, mara fiŝo.
- **Tullo**, latina virnomo.

Oni rimarku, ke plej ofte tiuj vortoj konsistas en unusilaba radikalo. La duobligo de la konsonanto evitas tre oportune ambiguaĵojn (anno ≠ ano, finno ≠ fino, villo ≠ vilo, ktp). Evidente, duoblan konsonanton oni prononcas duoble (laŭeble).

En kelkaj el ili, la konsonantoduobleco estas laŭvola, ĉar du formoj estas registritaj:

- **Dekano = Dekano**, Hindia duoninsulo.
- **Lasso = Lasao = Lhaso**, Tibeta ĉefurbo.
- **Grakoj = Grakoj**, nomo de du Romanoj.
- **Nesso = Neso**, mitologia persono.
- **Isso = Iso**, antikva urbo.
- **Oso = Oso**, Grekia montaro.
- **Junnano = Junano**, Ĉinia provinco.
- **vatto = vato**, elektra unuo.
- **Krasso = Kraso**, Romana virnomo.

Kelkaj estis kun duobla konsonanto en la **unua PIV**. Sed la dua PIV forigis tiun formon.

- **getto** (PIV1), **geto** (PIV2), juda kvartalo.
- **ŝvanna** (PIV1), **Ŝvano** (PIV2), germana biologo.
- **vendetto** (PIV1), **vendeto** (PIV2), korsika venĝo.

En la **Poŝatlaso de la Mondo**, oni trovas aliajn tiajn vortojn (listo ne kompleta):

- **Hajjango, Huajjino, Kajjuano**, Ĉiniaj urboj.
- **Hejlongjango**, Ĉinia rivero (en la PIV2, ĝi havas pli ĝustan ortografion: *Hejlongĝjango*).
- **Isikkulo**, lago en Kirgizio.
- **Makkinlejo**, monto en Alasko.
- **Marra Montaro**, en Afriko.
- **Melvilla**, epiteto de pluraj geografiaĵoj.
- **Mokko**, Jemena urbo.
- **Parra Insularo**, insularo en Ameriko.
- **Rossa Maro**, sudpolusa maro.

La **Esperanta-Franca Vortaro** de G. Waringhien (3a eldono) citas ankaŭ:

- **Brenno**, galla ĉefo.
- **fallo**, iu fungo.

La **Esperanta-Rusa Vortaro** de E. Bokarev (1974) citas la ĉefurbon de Bangladeŝo sub la formo **Dakko** (*Dako* en la PIV2, ruse Дáкка, bengale ঢাকা *dhaka*).

La *Londona Biblio* (Ag 1²³) liveras **Mattiaso**, kun duobla T, nomon de la apostolo kiu anstataŭis Judason. Kaj la *Nobla Korano* (6¹⁰¹) donas **Ĝinno** (islama koboldo, جِنّ *ĝinn*).

Evidente, en ĉiuj vortoj ĉi-supre cititaj, la duoblaj konsonantoj troviĝas interne de Esperanta radiko: *Pollando* kaj *mallonga* **ne** entenas duoblan konsonanton, sed unu L fine de la unua parto, kaj unu L komence de la dua. Do ili **ne** estas vortoj konsiderendaj ĉi tie.

Por nomi la prapatrojn de la francoj (pli ĝuste: de la okcidentaj Eŭropanoj), sen ebla kontesto ni rajtas elekti inter du formoj: **gallo** kaj **gaŭlo**. Ambaŭ estas registritaj en la PIV. Ambaŭ estas uzeblaj. Mi ne estas sufiĉe aroganta, ol ke mi akuzus pri *malesperanteco* iun vorton, kiu ne estus la formo preferata de mi mem. La formon *gaŭlo* oni trovas interalie en la fama bildstrio *Asteriks la Gaŭlo*. Kial ne?

Tamen mi mem preferas la formon **gallo** pro tri kaŭzoj:

1) Ĝi estas la origina formo, kiun uzadis Zamenhof kaj Grabowski. La formo *gaŭlo* eniris en la lingvon pli poste.

2) Ĝi estas la pli internacia, ĉar ĝi estas subtenata de la galla **gallos**, latina **Gallus**, itala **Gallo**, germana **Gallier**, rusa **гáллы**. Male, **gaŭlo** respondas nur al la franca **Gaulois**, angla **Gaul**.

3) La *Esperanta-franca Vortaro* de G. Waringhien citas la vorton **Gaŭlo** kiel esperantan formon de la nomo de la franca ŝtatestro *de Gaulle*, kiu prezidentis de 1958 ĝis 1969. De tiu vorto, oni pluformas **gaŭlismo** kaj **gaŭlismo**. Estas do dezirinde (ne devige, sed tamen dezirinde), ke unu vorto ne havu du sencojn tute malsamajn.

Mi rediras tre klare, ke la uzo de **gallo** prefere al *gaŭlo* estas nur mia persona prefero. Ĉiu ajn plene rajtas uzi la formon **gaŭlo** aŭ la formon **gallo** laŭ sia bontrovo, ĉar ambaŭ formoj estas Esperantaj (ne *mal-*!).

La PAG (p.27) precizigas, ke «*la unuobliga de la duoblaj konsonantoj estas nenie formulita kiel regulo*». Oni ja povas suspekti, ke la fonto de tiu kutimo estas rusa influo: rusaj vortoj entenantaj duoblan konsonanton ja ekzistas, sed je malgranda nombro.

Ankaŭ K. Kalocsay, en *Lingvo Stilo Formo* (p.76-77), dediĉas kelkajn paragrafojn al tiu ĉi problemeto. Li rimarkigas, ke Zamenhof «*tre saĝe faris al si la principon, eviti duoblajn konsonantojn en la Esperantaj vortoj. Tio estis tre utila principo, dank' al kiu la Esperanta ortografio estas vere infana ludo. Sed ĉi tiu principo nenie estas deklarita kiel Fundamenta regulo. Ĝi ne estas do dogmo, kaj estas tute strange, trudi perforte utilisman principon, eĉ kiam ĝi estas malutila. Ĉar ja ekzistas kelkaj internaciaj vortoj, nepre necesaj en Esperanto, kies transpreno eblas nur per la apliko de duoblaj konsonantoj — alimaniere oni havas vortojn kun duobla senco. Duobla senco, aŭ duobla konsonanto, en ĉi tiu dilemo, laŭ la ekzemplo de Zamenhof mi nepre voĉdonas por la lasta.*»

Fine, oni ne vidas, kial duoblaj konsonantoj estus malpermesataj en lingvo, kiu ja konas duoblajn vokalojn (prononcatajn duoble!): *Aarono*, *Isaako*, *Kanaano*, *koordinato*, *maato* (Zamenhofaj); *Baalo*, *Kaabo*, *kooperi*, *kooperativo*, *koopti*, *Laokoono*, *looko*, *oolito*, *oomi-ceto*, *oosporo*, *reela*, *Saaro*, *zoofito*, *zoolito*, *zoologo*, *zoosporo*, kaj eble aliaj.

Strange, la kritikantoj de la vortoj kun duobla konsonanto neniam eligas eĉ unu vorton kontraŭ la duoblaj vokaloj...

Etimologio ne estas semantiko

Etimologio estas la scienco, kiu pritraktas la **originon kaj historion** de la vortoj. **Semantiko** estas la scienco, kiu pritraktas la **signifon** de la vortoj, vorteroj, frazoj, ktp.

Ekzemple, etimologio sciigas al ni, ke la vorto **traduki** venas de la latina **tradūcere**. Semantiko sciigas, ke la latina vorto **tradūcere** signifis esence « *trakonduki, transporti, transmeti* », kaj nur akcesore « *konduki de unu lingvo al alia* », do « *traduki* ».

Se iu konfuzas etimologion kun semantiko, li eventuale uzas la esperantan vorton **traduki** en ties origina signifo, kaj rakontas, ke li “*tradukis sian hundon en kelkaj stratoj, por ke ĝi pisu*”. Dirante ĉi tion, li konfuzas la **originon** de la vorto kun ĝia **signifo**, li konfuzas **etimologion** kun **semantiko**.

Evidente, neniu mensnormala homo asertas, ke li “*tradukas sian hundon*”.

Sed similajn erarojn kelkiuj faras. Eĉ kompetentaj vortaristoj.

La PIV liveras al ni la vortojn **insektovoruloj** kaj **karnovoruloj**, kiel nomojn de du ordoj de mambestoj. Tiuj du vortoj estas facile analizeblaj: “uloj, kiuj voras insektojn”, “uloj, kiuj voras karnon”. Oni do rajtas diri, ke hirundoj estas insektovoruloj (ĉar insektojn ili efektive voras), kaj ke ŝarkoj estas karnovoruloj (ĉar karnon ili efektive voras). Sed, laŭ la PIV mem, insektovoruloj kaj karnovoruloj estas mambestoj; do, laŭ la analizo de tiuj du vortoj, *hirundoj kaj ŝarkoj estas mambestoj !!!* Tamen, mamojn ĉe ili vi rajtas serĉadi, eĉ longe, sed ilin certe vi tute ne trovos.

Se oni ĝuste analizas la vortojn, oni rajtas diri, ke ranoj estas insekto/voraj (ekzakte), do ke ili apartenas al la ordo de la insektovoruloj (tute erare); ke krokodiloj estas karno/voraj (ekzakte), do ke ili apartenas al la ordo de la karnovoruloj (tute erare).

Fakte, tiuj du vortoj aperis en la franca lingvo (*insectivores, carnivores*) en la 18a jarcento, kiam oni komencis science klasifiki la animalojn kaj la plantojn. Sed tre maloportune oni uzis en **taksonomio** (scienco pri klasifiko) vortojn, kiuj fakte rilatas al **etologio** (scienco pri animala konduto).

La unua PIV akceptis la pli oportunajn vortojn **insektovoraj** kaj **karnovoraj** (p.1228). Ĉar **voraj** ne povas signifi « manĝantoj, vorantoj », tiuj vortoj estis kompreneblaj kiel unu tuto, ne malkompreneblaj (insektovor/oj, karnovor/oj). Ankoraŭ pli oportune, la *Enciklopedia Vortareto Esperanta* de Charles Vérax (1910) uzis **insektivoraj** kaj **karnivoraj**, kiuj **ne** estas malkompreneblaj, **ne** analizeblaj kiel « *voruloj de insektoj/karno* ».

Similan eraron kulpis Zamenhof mem, kiam li skribis **ramp'aj'** (*Universala Vortaro*). Tiu radikalo estas duelementa kaj dusilaba. Ĝi estas ankaŭ duerara: la du eraroj estas **ramp** kaj **aj**, po unu en ĉiu silabo. Efektive, **reptilio** plej ofte **ne** **rampas**, kaj **ne** estas **ajo**. Sed Zamenhof ne estis zoologo; verŝajne, en lia menso, **reptilio** konfuziĝis kun **serpento**. Multaj homoj faras la saman konfuzon, nur la diablo scias kial.

En la tempo de la Romanoj, zoologia scienco ankoraŭ ne ekzistis. Tial la Romanoj nomis **reptilia** ĉion, kio rampas (lacertoj, limakoj, lumbrikoj, raŭpoj, serpentoj, ktp). Ĝusta traduko de la antikva latina vorto **reptilia** estas do **rampulo** (*ul, ne aj*). Ramp/ulo, ulo rampanta, perfekte taŭgas por nomi ĉian animalon karakterizatan de ramp/ado (lacertoj, limakoj, lumbrikoj, raŭpoj, serpentoj, ktp), kiu ajn estas ĝia loko en la klasifiko.

En la 18a jarcento, la solaj reptilioj konataj estis: krokodiloj, lacertoj, serpentoj, testudoj. Neniu pli. Ĉiuj rampas aŭ paŝas per tre mallongaj kruroj: ili do estas *rampuloj*, aŭ *preskaŭ-rampuloj*. Kaj unu plian fojon, oni maloportune alprenis **etologian** vorton (rilatantan al translokiĝo) por **klasifiko** (nomado de grupo de vertebruloj).

Unu jarcenton poste, oni elkovris aliajn reptiliojn: diplodokon kaj brontosauŝron (kiuj kvarpiediris), tiranosauŝron kaj igvanodonton (kiuj dupiediris), dimorfodonton kaj pterodaktilon (kiuj flugis), iktosauŝron kaj pleziosauŝron (kiuj naĝis), kaj multajn aliajn, kiuj tute ne kapablis rampi:



Tiranosauŝro



Dimorfodonto



Diplodoko

Tamen la naciaj lingvoj konservis kaj proprigis la latinan vorton **reptilio**, kies senco, ekde tiam, havis nenion komunan kun la origina signifo. Oni do kulpis la gravan eraron, **konfuzi etimologion kun semantiko**. Pro tio, kiam mi rakontis al miaj gelernantoj, ke diplodoko estis reptilio, plej ofte ili rebatis: «ĉu reptilio? tamen ĝi ne rampis!». Ĉar nekonscie, eĉ sen kompetenteco en etimologio, ili ligis la vorton *reptilio* kun la nocio *rampado*: ili konfuzis etimologion kun semantiko.

Bedaŭrinde, la juna lingvo Esperanto kopiis la maloportunecon de la maljunaj etnaj lingvoj per la Fundamenta indiko de la monstra vorto *ramp'aj'* en la senco *reptilio*.

La Zamenhofan eraron pri la vorto *rampajo* la PIV ne kopiis. Tute prave, ĝi indikas «*rampuloj = reptilioj*», sed aldonas la ĉefan atentigon «*evitinda*». Ho jes, evitindega!

Sed la **PIV kulpas similan eraron**, kredante, ke *insektivor'oj* (soriko, talpo, erinaco, miogalo, kiuj plejparte estas ĉiovoruloj) estas *insekto'vor'uloj* (kiel apuso, araneo, cip-selo, hirundo, karabo, kokcinelo, rano, vesperto, ktp). Ankaŭ kredante, ke ĉiuj *karnivor'oj* (foko, hieno, hundo, kato, mustelo, pando, urso, ktp) estas *karno'vor'uloj* (kiel ruĝa formiko, kaĉaloto, mureno, piranjo, pitono, ŝarko, ktp).

Pruve. Konsultu la difinon de **pando** (p.834a): la *malgranda pando* (familio de procionedoj) «*manĝas foliojn, fruktojn kaj insektojn*»; la *granda pando* (familio de ursedoj) «*manĝas ŝosojn de bambuo*». Neniu el tiuj du specioj de pandoj manĝas karnon (oni ne povas aserti serioze, ke insektoj estas karno, precipe se akompanataj de folioj kaj fruktoj).

La PIV rekonas do, ke pandoj NE ESTAS karno'vor'uloj.

Sed procionedoj kaj ursedoj apartenas al la rabobestoj (p.152a kaj 920b); kaj rabobestoj estas «*teraj karnovoruloj*» (p.152a).

La PIV asertas do, ke pandoj ESTAS karnovoruloj.

Ĉu la samaj bestoj povas esti samtempe karnovoruloj kaj NE-karnovoruloj ???

Jen al kia **sensenca memkontraŭdira konkludo** oni alvenas, kiam oni konfuzas etimologion kun semantiko. Tamen, en la ĝusta tempo, mi atentigis al unu el la sciencaj aŭtoroj de la PIV reviziita pri tiu danĝero. Tute vane... Mia atentigo estis elpelita malmilde...

Do ne imitu tiun senlogikecon, kaj ne insultu vian sesmonatan bebon, kiu ankoraŭ rampas sur la salonaj tapiŝoj. Vi ja rajtas nomi ĝin *rampulo*, sed tute ne *reptilio*!

Eŭropeco de nia leksiko

Esperanto naskiĝis en Eŭropo. Dum longa tempo, ĝi estis uzata ĉefe en Eŭropo.

Nun, Esperanto estas uzata sur la kvin kontinentoj. Sed bedaŭrinde, io restas de la frua naskiĝa tempo. Io tro eŭropeca.

Ĉi-rilate, la dua PIV (reviziita) estas jam pli bona ol la unua. Tamen, multo estas mencienda rilate la eŭropecon de la vorttrezoro. En la PIV, ni trovas, ekzemple, la Bretonian insulon **Uesanto** (vasteco: 15 km²) kaj la Mediteranean insulon **Tenedo** (40 km²), sed ni vane serĉus la japanan insulon **Ŝikokuo** (tamen vastan je 19000 km²). Ni trovas la **Lemanan lagon** (Svisio-Francio; 582 km²), sed ne la **Vanan lagon** (Turkio; 3700 km²). Ni rajtas je **Vogezoj**, montaro longa je 125 km, sed ne je **Altintago**, centr-azia montaro 800 km longa. Ni trovas **Rueno** (105000 loĝantoj) kaj **Majenco** (184000 loĝantoj), sed ne **Dares-salamo** (750000 loĝantoj), nek **Hajderabado** (2 600 000 loĝantoj). Kaj ĉu **Palatinato**, **Grizono** kaj **Emilio** (PIVaj) estas regionoj pli indaj je citado ol **Saskaĉevano** (nePIVa; 652 000 km²: pli vasta ol tuta Francio)?

Ni eliru el geografio. La franka reĝo **Pipino** influis la mondan historion certe ne pli ol la mongola ĥano **Ĥubilajo**, kiun la PIV preterlasas. La **Merovidoj**, **Kapetidoj**, **Habsburgoj**, **Hohenstaŭfoj** kaj **Tudoroj** (PIVaj) estis gravaj reĝaj familioj de Eŭropo. Sed ne pli gravaj ol la **Ŝjaoj**, **Hanoj**, **Ĝoŭoj**, **Songoj**, **Mingoj**, ĉinaj dinastioj, el kiuj la PIV konas nenium.

Ĉiuj monatonomoj de la franca respublika kalendaro (**Vendemiero**, **Brumero**, ktp) estas troveblaj (historie interesaj, sed ne plu uzataj de longe), sed ne unu monato hebrea (**Tiŝrio**, **Aeŝvano**, ktp), kvankam ili estas uzataj nuntempe de kelkaj milionoj da homoj. Kaj el la monatoj arabaj (**Muharamo**, **Safaro**, ktp), kiuj estas evidente dek du, nur unu rajtis eniri en la PIVon: **Ramadano**, eble pro tio, ke dum ĝi oni ne manĝu dumtage.

La **Tet**-festo estas certe pli grava en Vjetnamo, ol **Anunciacio** en Eŭropo. Sed Anunciacio estas Fundamenta kaj la Tet-festo estas... nenia, eĉ ne PIVa. **Aŝuro** estas pli grava festo ĉe la islamanoj, ol **Palmofesto** ĉe la kristanoj. Sed **Aŝuro** restis humile ekster la PIV, dum **Palmofesto** rajtis eniri trifoje, jen majuskle, jen minuskle (**Palmofesto**, p.329b; **Palma dimanĉo** kaj **palmodimanĉo**, p.240a).

Koncerne la homnomojn, la PIV liveras al ni **Gertrudo**, **Justeno**, **Ursulo**, ne tre uzatajn Eŭropajn nomojn, sed nek **Aĥmedo**, nek **Fatimo**, nek **Hasano**, nomojn abunde uzatajn ĉe la araboj (oni tamen akcesore trovas **Fatima**, sub la kapvorto **ŝarifo**, p.1109a).

Se ni transiras al la antikvaj libroj, ni trovas en la PIV la apartajn nomojn de ĉiuj libroj, kies tuto konsistigas la **Biblion**. Ni trovas ankaŭ la finnan **Kalevalon**. Sed oni vane serĉus la ĉinan **Iĝingon**, la ajnuan **Jukaron**, la kiĉean **Popolvuhon**, la persan **Saderon**...

Ĉi tiu listo neniel estas kritiko al la PIV, kiu estas laŭdinda verkego, ĉu paroli pri la unua PIV, ĉu pri la dua. Ambaŭ ili estas la rezulto de kolosa laboro farita kun grandega erudicio. Des pli laŭdinda laboro, ke ĝi estis sensalajra, nur glora.

Sed la PIV, kiel la pliparto de la aliaj vortaroj, nur spegulas la ĝeneralan spiriton regantan en Esperantio, spiriton ankoraŭ tro eŭropecan.

Evoluo de Esperanto

Esperanto evoluas kiel ĉiuj naturaj lingvoj. Simple pro tio, ke ĝi estas natura lingvo.

La *Fundamento de Esperanto*, en sia *Antaŭparolo*, prezentas la aferon tre klare.

« *Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektigiĝadi* » (A6, p.47). « *Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion vidas en ĉiu natura lingvo. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj...* » (A8, p.48).

Jen nur kelkaj ekzemploj (alfabetordaj) de la evoluo de nia lingvo.

Adjektivo *kara*.

La *Universala Vortaro* tradukas ĝin jene: cher | dear | theuer | дорогой | drogi. Tio implicas, ke ĝi havas du signifojn: « *amata* » kaj « *multekosta* ». Nuntempe, ĝi estas uzata nur en la senco « *amata* » kaj tre malofte, preskaŭ neniam, en la alia senco.

Ambaŭ uzata kun artikolo aŭ akuzative (arĥaismoj).

Plurfoje, Zamenhof kaj aliaj, en la frua tempo de Esperanto, uzis la vorton *ambaŭ* kun difina artikolo, verŝajne sub la influo de la germana *die beide*.

- *la ambaŭ* manojn ŝi almetis kruce (*Fund. Krestomatio*, p.46).
- *mi nun, ne scias, kiun el la ambaŭ* elekti (*Hamlet*, III, III, 55, p.114).
- *la ambaŭ* virinoj kaj la infano eliĝis el veturilo (*Marta*, p.6).
- la leviĝo de *la ambaŭ* virinoj (*Marta*, p.43).
- ĉirkaŭpremis *la ambaŭ* manojn de Mario (*Marta*, p.81).

Poste, en 1911, Zamenhof konfesis, ke tio estas ne bona: « *kvankam mi ofte uzis la formon "la ambaŭ", tamen mi opinias nun, ke pli logike estas uzi la vorton "ambaŭ" sen artikolo* » (*Lingvaj Respondoj*, p.99).

lom pli strange, ni trovas ĉe Grabowski la vorton *ambaŭ* uzatan en akuzativo.

- *Do ni, pli aĝaj, regas ambaŭn, jen sistemo!* (*Sinjoro Tadeo*, XII, 543, p.316).

Nuntempe, la uzo de *la ambaŭ* aŭ de *ambaŭn* tute arkaikiĝis.

Centjaro, miljaro.

Tiuj du kunmetaĵoj, en kiuj *cent-* kaj *mil-* funkcias kiel prefiksoj, estas de longe anstataŭigitaj per la pli logikaj formoj *jarcento*, *jarmilo*.

Finajo *-aŭ*.

Ĝi troviĝas ĉe la fino de:

- unu pronomo: *ambaŭ*,
- ses manieraj adverboj: *adiaŭ*, *almenaŭ*, *ankaŭ*, *apenaŭ*, *kvazaŭ*, *preskaŭ*,
- kvin tempaj adverboj: *ankoraŭ*, *baldaŭ*, *hieraaŭ*, *hodiaŭ*, *morgaŭ*,
- ses prepozicioj: *anstataŭ*, *antaŭ*, *ĉirkaŭ*, *kontraŭ*, *laŭ*, *malgraŭ*.

Plurfoje en la historio de Esperanto, oni faris proponojn por mallongigi tiujn vortojn.

a) **Anstataŭigo de -aŭ per apostrofo.** Proponita de Grabowski, kaj akceptita de Zamenhof en 1892: *ankor'*, *anstat'*, *apen'*, *presk'*.

b) **Simpla formeto de -aŭ aŭ anstataŭigo de -aŭ per -e.** Tolerata de la Akademio en 1910 kaj ankoraŭ trovebla en la *Wörterbuch Esperanto-Deutsch* (Laborista Esperanto-Asocio, 1933): *anstat*, *ant*, *bald*, *ĉirk*, *kontr*; *adie*, *almene*, *ambe*, *anke*, *ankore*, *apene*, *balde*, *hiere*, *hodie*, *kontre*, *kvaze*, *malgre*, *morge*, *preske*.

c) **Formeto de -aŭ, kiam la radiko devas ricevi sufikson aŭ finaĵon.** Tolerata de la Akademio en Aprilo 1910: *adio*, *anstate*, *anstatigi*, *neanstatigebla*, *hodia*, *malgre*, *morgo* (S.Elgo), *ankora*, *almena*, *apena*, *hiero*, *hodio*, *morgo* (PAG, p.409).

Elrigardi, ŝanceliĝi.

La verbo *elrigardi* estis kalkeo (apenaŭ komprenebla) de la germana *aussehen* aŭ de la rusa *выглядеть*. Oni trovas ĝin abunde en la fruaj Esperantaj verkoj, sed poste ne plu.

• *en trankvila vetero oni povis vidi la sunon, kiu elrigardis kiel purpura floro* (La *Virineto de Maro*, 1889, *Fundamenta Krestomatio*, p.34).

Jam de longa tempo, oni uzas *aspekti*: *...la sunon, kiu aspektis kiel purpura floro.*

Same, la fru-Esperanta verbo *ŝanceliĝi* lasis de longe la lokon al *heziti*.

Ĥinujo, ĥino, ĥina.

Iom neoportune, Zamenhof elektis la radikon *ĥin*, kiun li tiris el la pola *Chiny* « Ĉinio », *Chińczyk* « ĉino », *chiński* « ĉina », en kiuj la digramo *ch* estas prononcata *ĥ*, kiel en la germana. Sed kvankam tiu pola radiko estas pli-malpli internacia laŭ la skribo, ĝia prononco estas tute ne internacia. Tial, de longe, *ĥin'* arkaikiĝis profite al la radiko *ĉin'*, ege pli internacia rilate la prononcon: *Ĉinio, ĉino, ĉina*.

Kondicionalaj participoj.

La vokal-simetrio *as*, *anta*, *ata* naskis la ideon iniciati similan simetron *us*, *unta*, *uta* (kaj *unto*, *uto*). Tiel naskiĝis la kondicionalaj participoj (*PIV*; PAG, p.135, 137, 335).

• *lia maniero vide inspekti... nepre impresus ĉeestunton* (J.Valano, *Ĉu ni kunvenis vane?*, p.15). *Nepre impresus iun, kiu ĉeestus.*

• *la ofendutoj pardonu!* (*PIV*). La personoj, kiuj eventuale estus ofenditaj.

Oni uzata akuzative, prepozitive kaj posesive (onin, je oni, onia).

«*Pro nacilingvaj kutimoj, oni emas uzi tiun pronomon nur nominative, kaj anstataŭigi ĝin per ni, vi aŭ iu ĉe la aliaj kazoj; sed la uzado de tiuj kazoj estas "tute regula" laŭ Zamenhof. Tamen, nek li mem uzis ilin iam, nek aliaj bonaj aŭtoroj ĝis nun*» (PAG, p.75).

«*Nenie en la "Fundamento" estas dirite, ke "oni" prezentas escepton el ĉiuj aliaj analogiaj pronomoj. Nur en la praktiko oni ĝis nun ne uzadis la formojn "onin" kaj "onia", ĉar... tiu ĉi vorto sonus tre strange en la oreloj de la plimulto de la Esperantistoj*» (*Lingvaj Respondoj*, p.88-89).

Tamen Zamenhof mem uzis *oni* prepozitive almenaŭ unufoje.

• *al la buŝo de oni neniu povas ordoni* (Zamenhof, *Proverbaro*).

Kaj oni trovas multajn ekzemplojn de *onin*, *je oni*, *onia*, ĉe diversaj bonaj aŭtoroj.

• *ne policon oni demandas, sed polico onin* (J.Valano, *Ĉu li venis trakosme?*, p.126).

• *se plie estas "protektanto" por onin ekspluati* (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.99).

• *la polico baldaŭ liberigos onin de tiu plago* (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.130).

- *simpla tango ja ne povas tiel kolerigi onin* (L.Beaucaire, *Kruko kaj Baniko*, p.105).
- *hipokritulo estas iu, kiu agrable traktas onin antaŭe kaj malagrade malantaŭe* (L.Beaucaire, *Kruko kaj Baniko*, p.138).
- *la pasinteco, kiel mi jam diris, foje algluiĝas al oni* (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.96).
- *mia profesoro... iam klarigis al oni, ke...* (L.Beaucaire, *El la vivo de Bervalda sentaŭgulo*, p.73).
- *... jen homo estas komplete sub onia povo* (J.Valano, *Ĉu ni kunvenis vane?*, p.37).

Prepozicio far.

La prepozicio **de** estas tiel multsignifa, ke ambiguaĵoj estas eblaj: *la administrado de la filioj de la asekuritoj mem*, estas apenaŭ komprenebla. Sed ĝi iĝas tute klara, se oni anstataŭigas la duan "de" per "fare de". Kaj tute nature, *fare de* mallongiĝis al *far' de*, kaj poste al **far**: *la traduko de "Hamleto" far Zamenhof* (PIV2, p.318a).

Tiel, ekzistas ia simetrio inter la paroj **per** ⇔ *pere de* kaj **far** ⇔ *fare de*.

La prepozicio **far** estas citita en: PIV1 (p.268a), PIV2 (p.318a), PAG (p.168 kaj 203).

Prepozicio je.

En la fruaj tempoj de Esperanto, la prepozicio **je** estis pli abunde uzata ol nuntempe.

- *ŝia florejo similas je* (→ al) *virineto de maro*; *grandan deziregon je* (→ al) *ĉio ĉi*; *la ĉielo kovriĝis je* (→ de) *nuboj*; *estis plena je* (→ de) *ĝojo*; *vi estas kontenta je* (→ pri) *via bofilo*; *interesiĝis je* (→ pri) *la propono* (*Fund. Krest.*, p.34, 36, 37, 54, 72, 90).

Prepozicioj funkciantaj subjunkcie.

• **Prepozicio** (PAG, p.54, 168) estas vorto, kiu servas por dependigi *substantivon aŭ pronomon* de alia vorto (ekz. *esti antaŭ la pordo*; *resti kun leono*; *kato sur la kuseno*).

• **Subjunkcio** (PAG, p.54, 173) estas vorto, kiu servas por dependigi *verbon* de alia vorto (ekz. *konstati, ke pluvus*; *promeni, kiam sunas*; *trinki, se oni deziras*).

Nu, en la Fundamento kaj en la Zamenhofa uzado, pluraj vortoj (anstataŭ, dum, ĝis, krom, por) havas ambaŭ funkcion, *prepozician* kaj *subjunkcian*:

- *doni teon anstataŭ kafo* (prepozicie); *anstataŭ babili, laboru* (subjunkcie).
- *ŝi parolis dum la manĝado* (prepozicie); *mi manĝis, dum ŝi parolis* (subjunkcie).
- *mi iras ĝis ilia domo* (prepozicie); *mi promenas, ĝis noktiĝos* (subjunkcie).
- *estis neniu krom mia frato* (prepozicie); *li faris nenion, krom manĝi* (subjunkcie).
- *labori por la posteularo* (prepozicie); *manĝi por vivi* (subjunkcie).

Sed en la Fundamento oni tute vane serĉus tiun dufunkciecon ĉe la prepozicioj **post**, **pri**, **pro**, **sen**, kiuj funkcias nur prepozicie (ekz. *post tri tagoj*; *mi parolas pri leono*; *pro kio ŝi ploras*; *teo sen kremo*) kaj neniam subjunkcie.

Tamen, jam en la Zamenhofa kaj Kabea lingvaĵo, oni vidas kelkajn sporadajn uzojn de **sen** kiel subjunkcio: *li tion ne povas sen elmeti sin al ia danĝero* (Zamenhof, PIV); *la suno neniam leviĝas sen rigardi batalojn* (Zamenhof, PIV); *vi ne permesas vin ofendi sen postuli kontentigon* (Kabe, PIV). Sed tio restis malofta.

Tiu klasika uzo de **sen** nur kiel prepozicio venas verŝajne de tio, ke la rusa без «sen» estas uzata nur prepozicie, neniam subjunkcie. La rusa traduko de «*li ŝiris la leteron sen legi ĝin*» ne entenas la vorton без «sen»: *он разорвал письмо, не читая его* (laŭvorte: *ne leginte ĝin*), kio konformas al la klasika Esperanta uzado.

En la 1920aj jaroj, verŝajne sub la influo de la franca **sans** aŭ de la itala **sénza**, kiuj tute normale funkcias subjunkcie kun infinitivo (*sen moviĝi: sans bouger, sénza muoversi*), la subjunkcia uzo de **sen** kun infinitivo disvastiĝis (*li restis du tagojn sen manĝi*; *li nenion*

volis decidi **sen demandi** min).

Nun ĝi estas rigardata kiel tute normala kaj bonstila.

En la 1970aj jaroj, oni vidis la aperon de kelkaj aliaj prepozicioj subjunkcie uzataj: **post**, **pri**, **pro**. Jen plukaĵo da ekzemploj.

- **post ekbruligi** novan cigaredon (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.170).
- **post zorge fermi la pordon** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.45).
- **post konsulti la registrolibron** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.58).
- **post malkovri, ke Paŭlo jam estis...** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.138).
- **post parki sian aŭton** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.218).
- **post perdi sian damon** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.182).
- li ekprenis seĝon **post senigi ĝin de kelkaj revuoj** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.171).
- **post vidi vin** (J.Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p.61).
- **post viŝi ĉiuj fingrospuron** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.207).
- des pli se temas **pri murdi junan laboriston** (J.Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p.100).
- li parolis nur **pri mortigi nian patrinon** (J.Valano, *Ĉu li bremsis sufiĉe?*, p.125).
- **pro ŝmire skribi sur la Granda Ponto** (J.Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p.24).
- mi konas la vivon **pro ĝin sperti** (J.Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p.71).
- **pro timi, ke oni kaptos lin ĉe l' freŝa far'** (J.Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p.55).
- eksigita **pro transdoni parton de la partia mono** (J.Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p.36).
- nu, ĉu nur **pro vidi ŝin tiel?** (S.Elgo, *Ŝia lasta poŝtkarto*, p.196).
- kaj lian angoron **pro viziti sian patron...** (S.Elgo, *La Nokto de la ezoko*, p.12).

Sufikso -io (☞ Landnomoj).

Verbigo de adjektivoj: finaĵo -i signifanta esti ...-a.

En Aprilo 1907, Zamenhof deklaris, ke «*la formoj "amatas", "amitas", anstataŭ "estas amata", "estas amita" per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo*». Sed li aldonas, ke tion ĉi li ne konsilas: oni «*povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se "as", "is", ktp signifus "estas", "estis"; sed... ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas*» (*Lingvaj Respondoj*, p.97; *OV*, p.444).

Sed nuntempe, pli kaj pli ofte, oni aŭdas frazojn, kiel «*la libroj de Cherpillod aĉetebblas ĉe la aŭtoro*», kio finvenas al la starigo de regulo, laŭ kiu aĉetebli signifas **esti aĉetebla**. Alidire, la finaĵo **-i** alprenas la sencon **esti -a**, almenaŭ kiam la radiko estas adjektiva.

Eble, la unua fojo, kiam tiu dirmaniero estis uzata en pasiva formo (*-ati, -iti*), estas la traduko, far A.Grabowski en 1918, de la pola epopeo *Sinjoro Tadeo*, de A.Mickiewicz: «*laŭdatu Jezu-Kristo*» (VI, 604, p.172), en kiu *laŭdatu* signifas videble «*estu laŭdata*», kaj «*provoko de mi jam senditas (=estas sendita), ĉar en Litvo dueloj nun malpermesitas (=estas malpermesitaj)*» (VIII, 325-326, p.204).

Tio ne kontraŭdiras la Fundamenton, kiu proponas «*kiu kuraĝas rajdi sur leono?*» (§7), kaj ankaŭ *sani* (§42) «**esti sana**». Tamen ni rimarku, ke *kuraĝi* ne signifas ekzakte «**esti kuraĝa**», sed «*esti sufiĉe kuraĝa por...*». La nuanco estas konsiderinda.

- *la kuŝanto ja belis, eĉ belegis* (J.Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p.8). Pli forte, ol *estis belega...*

Tamen ne estus oportune, ke oni ĝeneraligus la ekvivalenton «*i = esti ...a*». Efektive, tio senigus la lingvon je unu valora nuanco: en «*la herbo verdas*», oni sentas ian agon fare de la herbo, dum «*la herbo estas verda*» estas nur la banala konstato de stato. Ni ne perdu tiun nuancon pro la erara opinio, ke **verdi** estus preciza sinonimo de «*esti verda*».

Faktivivo

Ĝi estas unu "voĉo" de la Esperanta verbo. ☞ *Medialo, Transitiveco.*

Faktivivo estas verboformo prezentanta la agon kiel « *trudatan de la subjekto al iu / io, kiu plenumas ĝin pro ties efiko* » (PAG, p.133).

La faktitivan voĉon oni esprimas per la sufikso **-igi**.

• *li venigis la kuraciston.* Li trudas la agon *veni* al la kuracisto, kiu tial plenumis ĝin.

La senco mem de la sufikso **-igi** faras, ke ĉiuj *ig*-verboj estas transitivaj, do havas pasivon. Konsekvence, vortformoj *-igota, -igata, -igita, -igebla*, estas tute normalaj.

• *la patrino devigis ŝin manĝi en la kuirejo* (F §13) → *ŝi estis devigata manĝi en...*

La Eŭropaj lingvoj malhavas faktitivan formon en sia konjugacio, sed esprimas ĝin per helpverbo (france *rire* « ridi » → *faire rire* « ridigi », itale *ridere* « ridi » → *far ridere* « ridigi », germane *lachen* « ridi » → *lachen lassen* « ridigi »).

La Eŭropaj lingvoj malhavas ankaŭ la eblecon uzi la faktitivan voĉon en pasiva formo :

• *Petro ridigas* (aktive) *Paŭlon* → *Paŭlo estas ridigata* (pasive) *de Petro*. En la franca, oni povas diri *Pierre fait rire Paul* (aktive), sed la pasiva dirmaniero estas neebla.

Verŝajne, la ideo de la Esperanta faktitivo havas sian fonton en la hebrea lingvo, en kiu ĉiu verbo havas faktitivan formon, inkluzive en pasivo: קִרְאָה *caŝaq* « ridi » → חִחֲקָה *hichŝiq* « ridigi », קִרְאָה *hōcŝaq* « esti ridigata ».

La rekta objekto de faktitiva verbo povas difini ulon/ajon, kiu *faras* la agon, aŭ ulon/ajon, kiu *suferas* la agon. Tio dependas de la senco de la verbo.

• *li legis la leteron* → la letero estis legata. Ĉi tie, *legigi* signifas « igi legata ».

• *li legis la knabeton* → la knabeto legis. Ĉi tie, *legigi* signifas « igi leganta ».

Kelkfoje, povas okazi dusenceco :

• *la kamparano manĝigis siajn kokinojn.* Ĉu la kokinoj faras aŭ suferas la agon ?

• *la kamparano manĝigis siajn kokinojn, ĵetante al ili grenerojn.* Ĉi tie, *manĝigi* signifas evidente « manĝantigi » : li igis la kokinojn *manĝantaj*.

• *la kamparano organizis nuptan festenon, dum kiu li manĝigis siajn kokinojn.* Ĉi tie, *manĝigi* klare signifas « manĝatigi » : li igis la kokinojn *manĝataj*.

Se la kunteksto ne montras sufiĉe klare, kiu senco estas ĝusta, nenio malhelpas, ke oni uzus la kompleksajn formojn *manĝantigi, manĝatigi*.

Faktiviva formo povas esti *sinteza* (ekz. *lernigi*), aŭ *analiza* (ekz. *igi lerni*). Ĉe la uzo de refleksiva pronomo aŭ posesivo, la *sintezan formon* (*lernigi*) oni rigardu logike kiel **unu** verbon, la *analizan formon* (*igi lerni*) kiel **du** verbojn.

• *li lernigis* (sinteza formo) *al la knabo LIAN lecionon* (la lecionon de *la knabo*; la refleksivo *sian lecionon* resendus al la subjekto *li* kaj difinus erare la lecionon de *li*).

• *li igis la knabon / lerni* (analiza formo) *SIAN lecionon* (la lecionon de *la knabo*; la refleksivo *sian lecionon* resendus al la subjekto de *lerni*; male, *lian lecionon* difinus la lecionon de *li*).

La subjekto de la kaŭzata ago (en *lernigi*, la kaŭzata ago estas *lerni*) povas esti esprimata per la prepozicioj **al** aŭ **per**, depende de la senco de la verbo.

• *mi aŭdigos al vi belan muzikon.* Vi aŭdos, *vi* estas la subjekto de la kaŭzata ago.

• *mi amuzigos la gastojn per aktoroj.* La aktoroj amuzos, *gastoj* estas la subjekto de la kaŭzata ago.

Finaĵoj

Reala nombro de la verbaj finaĵoj en la etnaj lingvoj

En Francio (ĉu ankaŭ en aliaj landoj? mi ne scias...), ĉe la esperantistaj budoj en diversaj popolaj manifestacioj, oni kelkfoje vidas propagandan afiŝon, kiu kretene entenas la plej kretenan kretenaĵon, kiu estas imagebla. Propagandi favore al Esperanto estas laŭdinda ago, sed propagandi per honte stultega mensogo estas fakte **MAL**propagandi. Kaj tio estas nepre kondamninda. Eĉ krima.

Tiu afiŝo asertas, ke, por konjugacii verbon, la nombro de la necesaj **finaĵoj** estas:

- en la franca lingvo : **2265**
- en la angla lingvo : **652**
- en la germana lingvo : **364**
- en la rusa lingvo : **157**
- en Esperanto : nur **12**

Evidente, la celo estas montri, kiomgrade la nacilingvaj konjugacioj estas infere malfacilaj, kompare kun la paradiza facileco de la esperanta konjugacio.

Dum longa tempo, tiuj nombroj trotadis en mia cerbo: ilia nekredibla grandeco forte ekscitis mian scivolemon, kaj precipe mian dubemon. Efektive, mi ne estas spongo, kiu kapablus ensorbi ion ajn. Homo mi estas, kaj homo kapablas juĝi mem.

Kiel devus fari ĉiu ajn mensnormala homo aĝa je pli ol kvin jaroj, mi demandis al mi, kie kaŝas sin tiuj **pli-ol-du miloj** (!) da francaj finaĵoj, kiujn mi neniam vidis en iu ajn lernolibro pri la franca konjugacio. Ĉi tiu ne estas simplega, sed tamen...

Do mi esploris la aferon pacience kaj sincere. Jen la rezulto.

I. Finaĵoj de la francaj verboj.

Unue mi enmanigis la *Dictionnaire des verbes français* (J. et J.-P. Caput, Larousse, 1969). Tiu libro entenas ĉiujn francajn verbojn, kaj disigas klare la finaĵojn disde la radikaloj per streketo. Sufiĉas nombri la finaĵojn, kion mi faris. Tiu ĉi nombrado estas do perfekte objektiva, kaj lasas la lokon al neniam ajn persona interpretado.

Jen do la **kompleta listo** de la **francaj verbaj finaĵoj**, klasitaj laŭ la tempoj kaj modoj.

Infinitivo: er ir oir re

Prezenca indikativo: e es ons ont ez ent is it issons issez issent s t x

Prezenca subjunktivo: e es ions iez ent isse isses issions issiez issent

Imperfekto: ais ait ions iez aient issais issait issions issiez issaient

Futuro: eraĵ eras era erons erez eront irai iras ira irons irez iront

Simpla preterito: ai as a aĵes aĵes erent is it ĵmes ĵtes irent us ŭs ut ŭt ŭmes ŭtes
urent rai ras ra rons rez rant s t mes tes rent

Prezenca kondicionalo: erais erait erions eriez eraient irais irait irions iriez iraient
rais rait rions riez raient

Imperfekta kondicionalo: asse asses aĵ assions assiez assent isse isses it issions

issiez issent usse usses ŭt ussions ussiez ussent sse sses ssions ssiez ssent t

Imperativo: e s ons ez is issons issez

Prezenca participo: ant issant

Preterita participo: é i i s u ŭ t

Tiu listo de finaĵoj estas jam impona kompare kun la «12» Esperantaj finaĵoj. Se oni nombras ilin, oni trovas la jenan sumon: **132**. Ni troviĝas je kosma distanco de la freneza nombro ĉi-supra (mi memorigas ĝin: 2265!).

Sed fakte, tiu nombro 132 valoras nenion, ĉar multaj finaĵoj estas plurfunkciaj. Por scii la **veran nombron** de la francaj verbaj finaĵoj, necesas establi ilian liston, prefere laŭ la alfabeto, por ne ripeti la saman plurfoje:

a ai aient ais ait âmes ant as asse assent asses assiez assions ât âtes
e é ent er era erai erais eraiement erait eras èrent erez erions eriez erons eront
es ez i iez îmes ions ir ira irai iraiement irais irait iras irent irez iriez irions irons
iront is issaient issais issait issant isse issent isses issez issiez issions issont it
ît îtes mes oir ons ont
ra rai raient rais rait ras re rez rent rions riez rons ront
s sse sses ssent ssiez ssions t tes u û ûmes urent us ūs ut ût ûtes x

La sumo estas 100. **Ekzistas en la franca konjugacio CENT FINAĴOJ**. Unu plia ne ekzistas (krom se mi eraretis). Komparu la realaĵon (100) kun la imbecilaĵo (2265)!

Kiu estis la psikozulo, kiu inventis la nombron 2265? Mi ne scias. Ironie, mi nomu lin **“s-ro 2265”**: li plej meritas tiun kromnomon. Ĉu li estis senhonta mensogulo, ĉu katastrofa nenionsciulo, ĉu sensprita humurulo? Ĉu li pensis *«pfu! mi diru ion ajn, ne gravas, neniu kontrolos!»* Mi ne scias. Mi scias nur, ke li alportis al nia lingvo **grandan malbonon**, kaj pli bone agus, se li pasigus sian liberan tempon nur per la solvado de krucvortenigmoj.

La plej malnova spuro, kiun mi trovis, de tiu kretenaĵo, estas la *Cours pratique d'espéranto* (2a eldono, Librairie Centrale Espérantiste, 1933, p.81), kaj ankaŭ la *Cours rationnel et complet d'espéranto* (2a eldono, Fédération Espérantiste du Travail, 1933, p.81). Tiuj du lernolibroj datumas de la sama jaro kaj entenas la saman kretenaĵon sur la sama paĝo, kvankam granda parto de iliaj entenaĵoj malsamas. Kiu kopiis kiun?? Mi ne scias.

Kelkaj kontraŭdirantoj — ĉar *“ĉiu abomenaĵo trovas sian adoranton”* (Proverbaro) — atakis min: *«sed vi forgesis, ke ekzistas ankaŭ neregulaj verboj!»*. Mi devis respondi al tiuj naveguloj: *«eble vi rigardas min stultega, eble mi estas tia, sed tamen ne tiagrade, ke mi forgesus, ke ekzistas neregulaj verboj»*. Evidente, mi nombris la finaĵojn de **ĉiuj francaj verboj**, kaj regulaj kaj neregulaj. Cetere, tiu ĉi kritiko estas nur ventofara kaj eliras el la laringo, ne el la cerbo: la nereguleco de la neregulaj verboj preskaŭ neniam situas en la finaĵoj, sed en la radikaloj.

Alia kontraŭdiranto skribis al mi sespaĝan leteron, tre dense tajpitan, por klarigi al mi, ke la franca konjugacio estas ege pli malfacila ol la Esperanta. Multajn dankojn, sed tion mi scias de longe. La stultega afiŝo mencias la **finajojn** (franclingve *terminaisons*), kaj mi parolas pri la **finajoj**; mi ne parolas pri facileco aŭ malfacileco, ankaŭ ne pri nombro de tempoj kaj modoj en la franca konjugacio, kio estas tute ekster la afero.

Ĉar la malbonfara afiŝo mencias **2265** finaĵojn, kvankam nur **100** ekzistas, ni povas atribui al ĝia unua linio **tiun kretenecon indicon: 22,65** (kvociento de 2265/100).

Plej katastrofe estas por la estonteco de nia lingvo, ke tiu kretenaĵo estis multfoje papagumita sen ia ajn neŭrona funkciado de la rediranto. Unu ekzemplo: la broŝuro *Une humanité, une langue*, de Simone Glodeau (p.9).

Kaj tio estas terura **malpropagando**. Se iu intencus efike malhelpi la disvastiĝon de

Esperanto, li ne agas alimaniere. Iam, iu nekonato, videble malfavora al nia lingvo, diris al mi, ĉe la vido de la dirita stultajo: « *se vi esperantistoj publikigas tiajn idiotajojn, mi ne bezonas demandi, ĉu ankaŭ via fuŝlingvaĉo estas simila idiotajo* ». Jes, laŭvorte, mi ĵuras.

Kiel skribis Zlatko Tiŝljariĉ, « *Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj* ». Ĉu vivos malgraŭ, aŭ ĉu mortos pro...?

II. Finaĵoj de la anglaj verboj.

Ni transiru al la angla lingvo. Ĉu 652 finaĵoj ekzistas?

Ĉiu ajn mensosana homo, almenaŭ se li/ŝi scias, eĉ supraĵe, eĉ unuagrade, eĉ balbute, la anglan lingvon, facile rimarkis, ke tiu lingvo **ne** havas finaĵojn. Estas ja konate, ke la moderna angla lingvo perdis la finaĵojn, kiuj ekzistis en la old-angla, kaj plu ekzistas en la germana. Tial la angla, 99 fojojn el 100, ne kapablas distingi morfologie la verbojn disde la substantivoj.

Kion signifas **drink**? Ĉu « trinki », ĉu « trinko, trinkaĵo »? Ambaŭ. Kaj ankaŭ « drinki » kaj « drinkado » (*Esperanto and English Dictionary*, de J.C.Wells, p.239).

Ĝuste pro la **foresto de ĉia finaĵo**, la vorto **work** signifas same bone « laboro » kaj « labori », dum tiuj du vortoj estas distingeblaj en franca (*travail/travailler*), en itala (*lavoro/lavorare*), en hispana (*trabajo/trabajar*), en rumana (*muncă/munci*), en germana (*Arbeit/arbeiten*), en nederlanda (*werk/werken*), en rusa (*рабо́та/рабо́тать*), en pola (*praca/pracować*), en ĉeĥa (*práce/pracovat*), en litova (*darbas/dirbti*), en greka (*δου-λειά/δουλεύω*), en albana (*púnë/punóĵ*), en hungara (*dolog/dolgozik*), en hebrea (*'avoda/'avad*), en turka (*çalışma/çalışmak*), en japana (*hataraki/hataraku*), en Volapuka (*vob/vobön*) kaj en la pliparto de la aliaj lingvoj.

Tiu bedaŭrinda ambigueco de la angla lingvo estas cetere la kaŭzo de multaj eraroj kaj konfuzoj. Sed tio estas alia afero.

Ĝuste pro la **manko de finaĵoj**, nur la ĉeesto de la persona pronomo ebligas la rekonon de la persono: **I work** « mi laboras », **you work** « vi laboras », **we work** « ni laboras », **they work** « ili laboras »; **I, he, she, it, we, you, they worked** « mi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili laboris ».

Do, por solvi la problemon, mi prenis la *Harrap's Grammaire anglaise* (Lexus et Gert Ronberg, Harrap, 1997), cele al la serĉado de la mitaj 652 finaĵoj. Evidente, mi nombris la finaĵojn de la verboj regulaj kaj neregulaj: cetere, same kiel en la franca, la verboj regulaj kaj neregulaj **ne** malsamas per la finaĵoj, sed per la radikaloj.

Jen la rezulto:

Infinitivo kaj imperativo: neniu finaĵo.

Prezenta indikativo: s (est)

Preterita indikativo: e ed d t (edst)

Prezenta participo: ing

Preterita participo: ed en n

La sumo estas tre malalta, precipe ĉe komparo kun la 652 de la idiotajo: nur 11. Sed **ed** estas dufunkcia; plie, la finaĵoj **est** kaj **edst** (singulara dua persono) ne plu estas uzataj. Do, la vera nombro de la anglaj finaĵoj estas **OK** (d e ed en ing n s t).

Ĉar la malpropaganda afiŝo mencias **652** finaĵojn, kvankam nur **8** ekzistas, ni povas atribui al ĝia dua linio **tiun kretenecon indicon: 81,50** (vero multobligita per 81,5 !!!).

Ni admiru senretene la kolosan grandecon de la nombro 652, kiun tamen kelkaj

personoj rediradas kun serioza mieno! Sinjoro Dio, mi petegas vin, se vi disponas pri iom da libera tempo, faru, ke ili neniam diru tion ĉeeste de persono iom vizitinta lernejon!

III. Finaĵoj de la germanaj verboj.

Pri la germana konjugacio, mi konsultis mian kutiman *Grammaire allemande* (E. Clarac. E. Wintzweiler et L. Bodevin, Masson, 1942). Ĝi estas malnova, sed ne des pli malbona. Tute same, ĝi disigas klare la radikalojn disde la finaĵoj. Ekzakte same, kiel mi agis pri la verboj francaj kaj anglaj, mi nombris la finaĵojn de la verboj regulaj kaj neregulaj (facila laboro, nur iom teda).

Jen la rezulto:

Infinitivo: en eln ern

Prezenta indikativo: e est st et t en

Prezenta subjunktivo: e est en et

Preterito: te test ten tet ete etest eten etet

Imperativo: e en

Prezenta participo: end

Preterita participo: t et en

La sumo estas 27. Sed kiel okazis pri la francaj finaĵoj, kelkaj estas plurfunkciaj. Jen do la alfabeto listo de ĉiuj finaĵoj:

e eln en end ern est et ete eten etest etet st t te ten test tet

Sumo: 17. Ĉar la malesperantista afiŝo mencias 364 finaĵojn, kvankam nur 17 ekzistas, ni atribuu al ĝia tria linio **tiun kretenecon indicon: 21,21.**

IV. Finaĵoj de la rusaj verboj.

Fine, mi faris la saman esploron pri la rusa konjugacio. Mi prenis la franclingvan libron *Conjugaison du verbe russe, Спряжение русского глагола* (L.I. Pirogova et S.I. Makarova, Éditions du Progrès, Moscou, sen dato).

Jen la rezulto de mia esploro:

Infinitivo: ть ти чь

Prezencfutura indikativo: ю у ешь ёшь ишь ет ёт ит ем ём им ете ёте ите уют уют ат ят

Preterita indikativo: л ла ло ли

Imperativo: и й ь ите йте ьте

Kondicionalo: бы (ĝi ne estas vera finaĵo, sed tamen enkalkulebla elemento)

Aktiva participo: ущий ющий ащий ящий вший ший

Pasiva participo: емый имый енный ённый анный янный тый

Gerundio: а я вши

Refleksivo: ся съ

La sumo estas 51.

Ĉar la fifama kretenaĵo predikas 157 finaĵojn, kvankam nur 51 ekzistas (unu triono), ni povas atribui al ĝia kvara linio **tiun kretenecon indicon: 3,08** (la plej malgrandan!).

V. Finaĵoj de la Esperantaj verboj.

Ĉiu esperantuzanto konas ilin de longe:

Infinitivo: i

Indikativo: is as os

Volitivo: u

Kondicionalo: us

Participo : int ant ont it at ot

La sumo estas ja **12**. Tamen oni povas argumenti :

- 1) Ke la 6 participaj "finajoj" estas fakte sufiksoj, ne finajoj. Veraj finajoj estas nur 6.
- 2) Ke la ses participaj sufiksoj (int ant ont it at ot) ne povas esti uzataj sen unu plia finajo, ofte a, sed ankaŭ o kaj e. Tio iom grandigas la nombron de la necesaj finajoj.

VI. Formoj de la Volapukaj verboj.

Ofte la esperantistoj plendhurlas al la Ĉielo, kvazaŭ martiroj, kiam iu parolas pri Esperanto nekompetente kaj malfavore. Efektive, ni ofte suferas pro tio.

Sed ili mem ne timas paroli malkompetente kaj malfavore pri lingvoj, kiujn ili rigardas (ĝenerale malprave) kiel rivalojn kaj pri kiuj ili scias neniegon.

Ekzemple, oni legas kelkfoje, ke « *Volapuko posedas 505 440 derivitajn formojn de ĉiu verbo* ». Tio estas trovebla, interalie, en *Une humanité, une langue*, de Simone Glodeau (p.13), kaj en la unua eldono de *L'Homme qui a défié Babel* (p.103; feliĉe forestanta en la dua eldono). Tio subkomprenigas, ke Volapuko estas ridinda sensencaĵo eksterordinare malfacila, eĉ neuzebla.

Sed ĉu estas io serioza en tiu fantasta aserto ?

Ĉiam scivoleme, mi kolektis kaj nombris la verbajn elementojn de la Volapuka lingvo.

Personaj sufiksoj : ob ol or og om of on oy os

Plurala finajo : s

Tempaj prefiksoj : a e ä i o u ö ü

Pasiva prefikso : p

Modaj sufiksoj : öd ös öv öl ön la

La sumo de la necesaj elementoj por konjugacii Volapukan verbon estas **25** (la duoblo de Esperanto).

Al la aserto mencianta **505 440** formojn, kvankam nur **25** elementoj sufiĉas, oni povas atribui **tiun kretenecon indicon : 20 217,60**.

Sed mi konfesu, ke ne sole la esperantistoj kulpas. Laŭ E.Drezen (*Historio de la Mondo-lingvo*, p.104), la nombro 505 440 estas ŝuldita al Karl Lenze, la unua diplomita instruisto de Volapuko. Estas malfacile eltrovi, kiel li kalkulis ĉi tiun absurdan nombron. La plej amuze stranga afero estas, ke li fieris pri ĝi. La sola certajo estas, ke temas pri nombro de kombinaĵoj, ne pri nombro de apartaj formoj. Cetere, ĝi estas la produto de la jenaj primoj : $2^5 \times 3^5 \times 5 \times 13 = 505\,440$.

Sed nombro de kombinaĵoj estas informo sena je ĉia valoro. Ankaŭ en Esperanto, oni povas imagi multegajn kombinaĵojn, helpe de tre malgranda nombro da elementoj (*iri, iras, iradis, irota, irebla, neirebleco, alirebla, deiris, ekiros, elirus, enirantaj, enirantaro, enirejo, foriros, ĝisiri, laŭiranta, preterironta, reira, retroirado, subiro, suprenirante, suriri, traŭro, transirejo*, kaj plurajn centojn da aliaj ; ĉiuj estas kombinaĵoj de la radiko *ir*).

Tio ĝuste pravas ne la malfacilecon de la lingvo, sed ĝian facilecon, tiom pri Volapuko, kiom pri Esperanto !

VII. Finajoj de la ĉinaj verboj.

Fine, ni komparu la nombron de finajoj en Esperanto (**DEK DU**) kun la nombro de finajoj en la ĉina lingvo (**NUL**). Se la facileco aŭ malfacileco de iu lingvo situus nur en la nombro de la verbaj finajoj, ni devus alveni al la konkludo, ke la ĉina lingvo estas ege pli facila ol

Esperanto !!! Jen elementa banalaĵo, pri kiu "s-ro 2265" eĉ ne pensis!

VIII. La plej genia debilaĵo.

Laŭ iu flugfolio, oni povas mendi en la franca vilaĝo *Guillaumes* (departemento *Maraj Alpoj*, poŝta kodo 06470, preciza loko *M.F. du Plan*) propagandajn leterkovertojn. Pli ĝuste: "mal-propagandajn", pro la sama kaŭzo, kiel ĉi-antaŭe.

Ili montras la konsternegan aserton:

• Langue logique sans exceptions : Espéranto : 12 conjugaisons Français : 2250 conjugaisons
Espéranto : 28 lettres = 28 sons Anglais : 5 voyelles = 15 sons

(Lingvo logika sen esceptoj : Esperanto : 12 konjugacioj, Franca : 2250 konjugacioj).

Jes, vi bone legis, ne viŝu viajn okulvitrojn : **12 KONJUGACIOJ ekzistas en Esperanto.**

Aĥ! kiel mensogis la kursgvidanto, kiu, antaŭ duonjarcento, asertis al mi, tiam timema komencanto, ke **nur UNU** konjugacio ekzistas en Esperanto por ĉiuj verboj! Ekzistas en Esperanto **11 ceteraj konjugacioj**, pri kiuj tiu fia homo diris nenion!

Kaj en la franca lingvo, ekde mia junaĝo, mi kredis, ke ekzistas **tri** konjugacioj! Dank' al tiu leterkoverto, mi scias nun, ke ekzistas **2247 pliaj konjugacioj**, pri kiuj miaj instruistoj kaj miaj lernolibroj, tiom la elementaj kiom la altnivelaj, ne diris unu vorton!

**Kaj ni miras, kaj ni ne komprenas, kaj ni plendas, kaj ni ĝemas,
kiam niaj kontraŭuloj rigardas nin frenezuletoj !!!...**

Evidente, ĉia ajn mensosana homo, legante tiun kretenaĵon, aliĝas definitive al la kampo de niaj kontraŭuloj, eĉ se antaŭe li estis hezitema.

IX. Konkludo.

La fi-fama nazio *J.P. Goebbels* iam diris, ke ju pli grandega estas mensogo, des pli facile la homoj kredos al ĝi.

Bedaŭrinde, tio estas kelkfoje vera. Sed ne prenu tion kiel bazan regulon. Informu, propagandu, jes. Sed sincere. Ne mensogu, ne papagumu ajne. Ĉar kiam via alparolato konscios, ke vi ajnumis rilate Esperanton, lia fido al ĝi, kiu eventuale estis naskiĝanta, **malaperos por ĉiam**. Kaj vi estos kreinta **unu plian malamikon**. Kvazaŭ da malamikoj ni ne havus jam sufiĉe !...



Mi scias Esperanton de 60 jaroj. Kaj mi partoprenas en la Esperanta movado de 50 jaroj. Nu, de 50 jaroj, mia plej akra kaŭzo de mirego, estas: « **kial la esperantistoj elspezas tiom da energio, por MALHELPI, ke la homoj rigardus Esperanton kiel seriozan aferon?** ». Verŝajne, mi mortos antaŭ ol trovi la respondon.

Vidu ankaŭ miajn ĉapitrojn *Fontoj de la Esperanta leksiko* kaj *Fuŝperantox*.

Finajoj estas vortoj

Jen kion skribis Zamenhof en la Unua Libro, en 1887. «*Mi aranĝis plenan **dismembrigon** de la ideoj en **memstarajn vortojn**, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el **senŝanĝaj vortoj**... Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj alkutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi **dismembrigon** de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj... Tiel ekzemple la devenon de la vorto "fratino", kiu en efektiveco konsistas el tri **vortoj**: frat (frato), in (virino), o (kio estas, ekzistas)...*» (Fundamenta Krestomatio, p.234).

Tio estas perfekte klara: **frat, in kaj o** estas **tri vortoj**. Oni eĉ povas aldoni, ke kiu ne komprenis tion, tiu komprenis nenion el la intima naturo de la lingvo Esperanto. Oni foje kritikis, ke en la lasta frazo de la Zamenhofa paragrafo, la vorto "vorto" havas du malsamajn signifojn (unu "vorto" konsistas el tri "vortoj"). Sed kial du aŭ tri vortoj ne rajtus kuniĝi por formi novan vorton? Ĉu ne estas banale, ke la du vortoj *floro kaj brasiko* kuniĝas por formi la vorton *florbrasiko* (france *chou-fleur*, germane *Blumenkohl*, Volapuke *florabrasid*)?

Tiu **plena dismembriĝo** estas kaŭzo, ke Esperanto havas **nenion komunan** kun la hindeŭropaj fleksiaj lingvoj. Esperanto estas aglutina lingvo, kiel la hungara, la vaska, la turka; eĉ iel izola lingvo, kiel la ĉina, la vjetnama.

En 1893, Zamenhof denove precizigas: «*ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas **apartan vorton***» (Lingvaj Respondoj, p.57). Evidente, finajoj, prefiksoj kaj sufiksoj estas "gramatikaj partoj en la lingvo". Do ili estas vortoj. Tiel parolis la homo, kiu plej bone sciis Esperanton, pro tio, ke li ĝin iniciatis.

La Fundamento diras la samon: «*la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj (des mots | independent words | selbstständige Wörter | самостоятельные слова)*» (regulo 11 de la Fundamenta Gramatiko, Fundamenta Krestomatio, p.241). Tio implicas, ke oni rajtas uzadi **a, as, e, i, is, o, os, u, us**, kiel **vortojn**, eĉ se tion oni ne ofte faras.

Kio estas vorto? Laŭ la PIV, vorto estas «*morfemo aŭ morfem-kombinaĵo, konsistiganta **sintakse uzeblan formon***». Laŭ la PAG (p.53), vorto estas «*silab(ar)o, **memstare uzebla** kaj esprimanta apartan ideon...; ...ankaŭ o, as ktp. estas vortoj*».

Sed spite la klare kaj aŭtoritatan de la Fundamento kaj de la PAG, iuj gramatikistoj (ekzemple: Akademia prelego en Berlino, la 6an de Aŭgusto 1999) iel volas refari la lingvon laŭ sia propra bondeziro, ne akceptante la fundamentan bazon de la Zamenhofa Esperanto, en kiu finajoj estas vortoj. Laŭ ili, «*vorto estas minimuma parolelemento, per kiu oni povas fari senchavan respondon al iu demando; ekzemple, al la demando "ĉu la libro estas sur aŭ sub la tablo?", oni povas respondi koncize "sur"; la elemento "sur" sufiĉas por respondi al la demando: "sur" estas do vorto*». Kaj ili aldonas, ke ĝuste finajoj ne estas vortoj, ĉar «*oni ne povas uzi simplan finaĵon por respondi al demando; finajoj estas morfemoj, oni ne povas trakti ilin kiel vortojn*».

Tolereme, ni akceptu, eĉ se provizore, tiun ĉi difinon. Kaj ni imagu la jenan dialogon:

«*Ĉu vi lavis la telerojn? — Mi estas anta*». Aŭ pli simple: «*Mi as*». Tute klare.

Aŭ ĉi tiun, same klaran:

« Ĉu vi jam skribis la leteron, aŭ nur skribos ĝin? — Os ».

La respondanto ne estas pli parolema, ol la ĉi-supra, kiu kontentiĝis per la respondo « *sur* » koncerne la lokon de la libro. Li povus respondi pli parolabunde: « *ĝis nun mi ankoraŭ ne skribis la menciitan leteron pro tempomanko, sed certe mi skribos ĝin, eble morgaŭ* ». Sed spite lian parolavarecon, lia respondo « *os* » ja havas sencon, ĝi konsistas el elemento sintakse uzebla. Ĝi konsistas en unu **vorto**, ekzakte kiel « *sur* [la tablo] ».

Tio montras ke, eĉ se oni akceptas la ĉi-supran mallarĝigan difinon « *minimuma parol-elemento, per kiu... ktp* », **as** kaj **os** estas vortoj, nek pli nek malpli ol **sur**. Do, **la finaĵoj estas vortoj**. Tion asertas ne mi, sed ja la Esperanta lingvo kaj ties aŭtoro. Nekontesteble.

Inverse, mi malfacile konceptas demandon, al kiu oni povus respondi per la nura vorto « *la* ». Ĉu konkludi, ke **la** ne estas vorto? Tamen ĝi estas formo sintakse uzebla...

Cetere, la PIV akceptas, ke **o**, **as**, **is**, **os** estas « *memstaraj morfemoj* ». Alivorte, « *aŭtonomaj parolelementoj* ». Sed kio estas *memstara morfemo*, se ne **vorto**?

Se finaĵoj estas vortoj, kio estas ilia signifo? Tre simple:

- **o** signifas « *kio estas, ekzistas* » (Zamenhof, *Unua Libro, Fundamenta Krestomatio*, p.234),
- **a** signifas « *kiu havas econ, kiu rilatas al* »,
- **e** signifas « *laŭ maniero* »,
- **i** signifas « *fari agon, esti en stato* ».

El la senco de **i**, oni povas facile dedukti, ke la signifo de **as** estas « *faras agon, estas en stato* », ktp.

Verŝajne, la unua Esperanta verkisto, kiu uzadis finaĵojn kiel memstarajn vortojn perfekte kompreneblajn, estas Antoni Grabowski: *la ideoj de l' o vera* (PIV, p.798a).

En lia traduko de la pola epopeo *Sinjoro Tadeo*, de A. Mickiewicz (1918), oni trovas:

- *se mastro 'as fore* (I, 152), • *Stumpul' 'as bela hundo* (I, 718),
- *gusto 'as poluro* (III, 607), • *en kastel' 'as vestiblo* (I, 262),
- *kiu 'as malica* (VII, 316), • *Macjek, simplul' malriĉa, 'is plej estimata* (VI, 543),
- *mi 'as Jacek Sopllica* (X, 459), • *al mi, junul' kuraĝa, mond' 'as malfermita* (X, 515).

Tiuj dirmanieroj estas tuj kompreneblaj, ĉar en la vortoj estas aŭ *estis*, la elementoj *as* aŭ *is* estas ege pli gravaj, ol la elemento *est*.

Ankaŭ en *Prologo* (p.5-6), de Eŭgeno Miĥalski, ni trovas, ekde la unua poemo:

- *nekaptebla "os", neniam kaj ĉiam as'anta,*
- *"is", "as", "os" — tri elementoj de Tuto,*
- *sfinkse-enigma "os".*

Kaj en *Memkritiko* (p.43), de Victor Sadler, ni trovas la jenan version, ne tre klaran:

- *ĉi us-ojn mokus per ĉe vi floraj os- kaj as-oj.*

Ankaŭ la PAG (p.374) akceptas:

- *ne forgesu pri l' o dirita.*

Estas neniu esenca diferenco inter « *l' o dirita* » kaj « *la dirita afero* ». La PAG rekonas, ke « *tia uzo gramatike kaj Fundamente estas plene rajtigita* ». Kaj Zamenhof, en 1908, proponis al la Lingva Komitato, ke oni permesu tion, kiel neologismon.

Sed oni devas rekoni, ke tiuj memstaraj uzoj de la finaĵoj estas tre maloftaj kaj preskaŭ rezervitaj al la poezia lingvaĵo. Tio estas facile komprenebla: por la ĝenerala uzado, la

finajoj estas tro mallongaj kaj ilia mallongeco igus ilin apenaŭ kompreneblaj.
Sed tio estas nur **praktika** ĝeno, neniel teoria malpermeso.

Ankaŭ afiksoj estas vortoj.

Neniu povas nei, ke la esprimo « *ulo ema iĝi estro* » pli-malpli similas al « *homo intenca ekesti direktoro* ». Tamen ĝi konsistas nur el kvar sufiksoj kun po unu finajo. Fakte, el kvar vortoj. Tio pruvas tute simple, ke en nia lingvo ankaŭ afiksoj estas vortoj. Do ne necesas halanĝi altfilozofie pri la temo « *kio estas vorto?* »: ni **konstatas**, tute simple, ke afiksoj estas vortoj. Kaj, estiel vortoj, ili obeas al la samaj reguloj, kiel ĉiuj ceteraj vortoj. Ili kapablas alpreni finaĵojn (*aro, disen, eblo, ecoj, eki, eksa, fia, fore, iĝi, ina, male, praa, ree, umi...*), ili kapablas grupiĝi inter si (*anaro, ariĝi, boeco, nedisigebla, ebleco, eksigi, estrado, geiĝi, idaro, igado, ineco, paulo...*).

Kaj kiel ĉiuj ceteraj vortoj, la afiksoj estas aŭ substantivaj, aŭ adjektivaj, aŭ verbaj.

Substantivaj : *aj, an, ar, ec, ej, er, estr, id, il, in, ing, ism, ist, obl, on, uj, ul.*

Adjektivaj : *ebl, em, end, ind, dis, ek, for, mis, re.*

Verbaj : *ad, ig, iĝ.*

Senkarakteraj : *aĉ, eg, et, um, bo, eks, ge, mal, pra.*

La senkarakteraj afiksoj povas alkroĉiĝi al ĉiu ajn radiko : *dometo, flavaĉa, ridegi, malami, malsupro, mishelpi, prakelta*, sen ia ŝanĝo de la gramatika karaktero de la radiko.

Jen kelkaj ekzemploj de prefiksoj vorte uzataj.

- *la mon' ruliĝis sur la planko dis* (K.Kalocsay, *Lingvo Stilo Formo*, p.61).
- *la globetoj ruliĝis dis en la ĉambro* (PAG, p.479).
- *hartufoj kreskantaj dis kaj mis* (J.Valano, *Ĉu li venis trakosme?*, p.36).
- *irante ek, mi turnis mian kapon* (K.Kalocsay, *Lingvo Stilo Formo*, p.61).
- *por li oni sentis nek simpation, nek mal* (S.Elgo, *La Nokto de la ezoko*, p.28).
- *atendo vana, li ne venis re* (K.Kalocsay, *Lingvo Stilo Formo*, p.61).
- *el kampoj ili iris al siaj hejmoj re* (K.Kalocsay, *Lingvo Stilo Formo*, p.61).
- *la laboristoj venis de la kamparo re* (PAG, p.123).
- *venis fiŝisto re de la duno* (PAG, p.482).
- *venis Alkeo mem al virginoj Lesbiaj re* (PAG, p.482).
- *mi spiritojn vokis, kiel peli re?* (PAG, p.482).
- *ĉe la krado ŝi malŝlosis kaj zorge re* (S.Elgo, *La Floroj de l' krepusko*, p.19).
- *re kaj re prezenti siajn ekskuzojn* (*Dictionnaire français-espéranto*, p.195).
- *ni iru al la Eternaj Kalendaroj retro* (PAG, p.482).

Kiel ekzemplo de afiksoj vorte uzataj, jen la komenco de ŝerca letero de Claude Piron : « *Ulego mia! Inda kvazaŭido de mia praeco! Duonduopo de mia adado! Kiam via umajo ekĉeis al mi, mi eke hmis, poste ohois, iom ahais, jen bais, jen eheis, eble eĉ ejis aŭ hihis, jen kaj jen hurais, tiam kaj iam papais, sed neniam fufufuis. Doas, ke tia umajo ne endigas, ke oni veu aŭ huju, ĉu? Kial, pro la ecoj de la ajo, fiule beaĉi aŭ ojaĉi kiel fineniind-ulaĉo?...* »

Oni povas konstati el tiu ŝerca teksto, ke sufiksoj, prefiksoj, prepozicioj, interjekcioj, ktp, povas esti ĉe la origino de vorto de iu ajn kategorio.

Tiu memstara uzo de la afiksoj kiel vortoj estas propra trajto de Esperanto, aparte genia. Efektive, Volapuko estas aglutina lingvo, ekzakte kiel Esperanto. La Volapukaj prefiksoj kaj sufiksoj estas nevariemaj kaj povas, kiel la Esperantaj, alkroĉiĝi al iu ajn radiko. Sed, malkiel la Esperantaj, ili **ne** povas esti uzataj memstare.

Fontoj de la Esperanta leksiko

La plej sukcesa propagando **malfavora** al Esperanto estas farita, ne de la partianoj de la uson-angla lingvo, ne de la partianoj de la reviviĝo de la latino, ne de la partianoj de iu planlingvo, kiel Ido, Volapük, Solresol, Uropi, k.a. Tute ne. La plej sukcesa propagando **malfavora** al Esperanto estas farita... de la esperantistoj.

Ĉe la esperantistaj budoj en diversaj popolaj manifestacioj, foiroj, kermesoj, ktp, oni foje vidas "propagandan" afiŝon, kiu asertas, ke

75% de la esperanta leksiko konsistas el **latinaj-grekaj** vortoj

20% de la esperanta leksiko konsistas el **germanaj-anglaj** vortoj

5% de la esperanta leksiko konsistas el **rusaj** vortoj

Kelkfoje, tio estas montrata per tiu grafikaĵo :



Legante tiujn ĉi nombrojn, se mi ne estus esperantofono, mi tuj pensus: « *kiel horora estas verŝajne tiu esperanto! Mi supozas, ke la frazo "tiu virino estas tre bela" tradukiĝas "diese gunê est oĉen beautiful", aŭ "ista ženŝĉina is sehr kalê", aŭ "eta mulier einai very schön"! Tiu fuŝmiksaĵo montras mensan nivelon respondantan al tiu de mezinteligenta sesjara infano. Tute certe, mi neniam okupiĝos pri tia kretenaĵo!* »

Ĉu vi ne kredas min? Do klarigu la kaŭzon, kial okazas ofte la jena fakto. Nekonato petas informeton pri Esperanto, sed samtempe aldonas, kun malfavora tono, ke Esperanto ne estas vera lingvo, sed nur « *ia senviva teoria kodo* », « *fuŝa miksaĵo de pluraj lingvoj* », « *amalgamo de ĉiuj lingvoj* ». Kiam mi rebatas, ke Esperanto, tute male, estas vivanta lingvo, samgrade kiel ĉiu ajn etnolingvo, la nekonato respondas: « *vi ne povas nei, ke via esperanto estas miksaĵo de kelkaj lingvoj, nur artefarita kodo, ĉar VIA propagando mem asertas tion!* » Al tiu rebato mi povas nur silenti kaj honti.

Jes, honti, ke partianoj-uzantoj de Esperanto elvomas tiajn sensencaĵojn.

Por ke la fi-fama aserto "75/20/5" entenu iom da vero, eĉ nur iomete, necesus, ke ĉiuj Esperantaj vortoj estus de deveno **aŭ** latin-greka **aŭ** german-angla **aŭ** rusa. Sed tio havas nenion komunan kun la realaĵo, kiel tuj konstatas eĉ la plej malklera komencanto.

Mi supozas, ke ĉeestus apud mi la unua persono, kies limigita intelekto elpensis tiun sloganon. Mi demandus al ĝi (li/ŝi), en kiun kategorion ĝi vicigas, ekzemple, la vortojn abato, abrikoto, ĝangalo. Verŝajne, mi ĝuus ĝian konfuzan balbutadon (kvankam...

ĝuus... ĉu vere la spektaklo de la homa stulteco estas ĝuiga?)

Ni iom esploru tiujn tri vortojn, por ordigi ilin, ĉu en "75", ĉu en "20", ĉu en "5".

• **ABATO.** Ĉu tiu vorto estas latina-greka? ĉu germana-angla? ĉu rusa?

Ĝi tradukiĝas: itale-rumane **abate**, hispane **abad**, portugale **abade**, france **abbé**, novgreke **αββάς**. Do ĝi eniras en la kategorion latinan-grekan. Sed ĉu nur?

Jen aliaj tradukoj: germane **Abt**, nederlande **abt**, angle-svede **abbot**, dane-norvege **abbed**, islande **ábóti**. Do ĝi eniras en la kategorion germanan-anglan. Ĉu ankaŭ?

Ni ne alvenis al la fino: ruse **аббат**, pole-ĉeĥe-kroate **opat**, bulgare **абат**. Do ĝi eniras ankaŭ en la kategorion rusan (pli ĝuste *slavan*). Ĉu fine?

Tute ne, ĉar restas ankoraŭ: irlande **Ab**, kimre **abad**, albane **abat**, hungare **apát**, finne **apotti**, malte **abbati**. Kaj verŝajne multaj aliaj, kiujn mi nek trovis nek serĉis.

Ĉu la idioteco de la demando ne estas tuj videbla?

• **ABRIKOTO.** Ĉu temas pri vorto latina-greka? germana-angla? rusa? Ĝi tradukiĝas: france **abricot**, itale **albicocca**, hispane **albaricoque**, katalune **abercoc**, germane **Aprikose**, nederlande **abrikoos**, angle **apricot**, skandinave **aprikos**, islande **aprikósa**, ruse **абрикós**, litove **abrikosas**, latve **aprikoze**, japane **アブリコ** *aburiko*.

Ree, la demando estas senseenca.

• **ĜANGALO.** Ĉu latina-greka? ĉu germana-angla? ĉu rusa? Jen kelkaj tradukoj: angle-france-nederlande **jungle**, itale **giungla**, rumane **junglă**, germane **Dschungel**, ruse **джунгли**, pole **dżungla**, ĉeĥe **džungle**, slovake **džungľa**, bulgare **джунгла**, serbe-makedone **џунгла**, novgreke **ζούγγλα**, albane **xhúngël**, litove **džiunglės**, latve **džungļi**, hungare **dzsungel**, hinde **जंगल** *ĝaṅgal*, panĝabe **ਜੰਗਲ** *ĝaṅgal*, urdue **جنگل** *ĝaṅgal*, bengale **জঙ্গল** *ĝongol*, japane **ジャングル** *ĝaṅguru*.

Triafoje, ĉia demando pri "latin-grekeco", "german-angleco" aŭ "ruseco", estas nura ventofarado.

Nun, kion ni diru pri la **deveno** de tiuj vortoj? Ĉu temas pri origino latin-greka? ĉu german-angla? ĉu rusa? Evidente, neniu el tiuj tri hipotezoj entenas eĉ plej liliputan seriozecon.

- **ABATO** venas, tra la greka **ἀββάς** kaj la latina **abbās**, de la **aramea** **אבבא** *abbā*.
- **ABRIKOTO** venas de la **araba** **الْبَرْهوق** *al-barquq*.
- **ĜANGALO** venas de la **sanskrita** **जंगल** *ĝaṅgala*.

Jen do tri vortoj, nek esceptaj nek literaturaj nek sciencaj nek teknikaj, kiuj energie rifuzas eniri en la ĉi-suprajn kategoriojn: ili ne estas **aŭ** latinidaj, **aŭ** ĝermanidaj, **aŭ** slavaj; ili estas **KAJ** latinidaj **KAJ** ĝermanidaj **KAJ** slavaj **KAJ**... aliaj.

Unuvorte, ili estas **internaciaj**.

Kaj ili devenas **NEK** de la latin-greka, **NEK** de la german-angla, **NEK** de la rusa.



Nun, ni iom pristudu la aferon, metante en ĝin iom da seriozececo, kion ne faras la uloj, kiuj rekopias okulkferme tiun faman kretenaĵon.

Ni konsultu la verketon de L.Bastien, *Naŭlingva Etimologia Leksikono* (unua eldono, 1907). Fakte, *etimologia* ĝi tute ne estas, sed nur **kompara**. Ankaŭ *naŭlingva* ĝi ne estas,

sed **oklingva** (5 latinidaj lingvoj : *latina, franca, itala, hispana, portugala* ; 2 ĝermanidaj : *germana, angla* ; nur 1 slava : *rusa*). Sed ne gravas. Ni prenu ĝin tia, kia ĝi estas.

Tiu verketo entenas 2445 vortojn, kiujn mi listigis en sep grupojn.

- **Grupo L** : la vortoj, pri kiuj responda vorto ekzistas en almenaŭ unu el la **5 latinidaj lingvoj**, sed nek en la ĝermanidaj nek en la rusa. Ekzemple : *abelo, ajlo, alumeto, ami*.

- **Grupo Ĝ** : la vortoj, pri kiuj responda vorto ekzistas en almenaŭ unu el la **2 ĝermanidaj lingvoj**, sed nek en la latinidaj nek en la rusa. Ekzemple : *amboso, bedo, blovi, ŝuo, tago*.

- **Grupo S** : la vortoj, pri kiuj responda vorto ekzistas en la **rusa lingvo**, sed nek en la latinidaj nek en la ĝermanidaj. Ekzemple : *barakti, ĉerpi, klopodi, krano, nepre*.

- **Grupo LĜ** : la vortoj, pri kiuj respondaj vortoj ekzistas en almenaŭ unu el la **5 latinidaj lingvoj** kaj en almenaŭ unu el la **2 ĝermanidaj lingvoj**, sed ne en la rusa. Ekzemple : *ablative, absceso, aluno, baleno, bapti, beto*.

- **Grupo LS** : la vortoj, pri kiuj respondaj vortoj ekzistas en almenaŭ unu el la **5 latinidaj lingvoj** kaj ankaŭ en la **rusa**, sed ne en la ĝermanidaj lingvoj. Ekzemple : *apro, fabo, iri, lano, nubo*.

- **Grupo ĜS** : la vortoj, pri kiuj respondaj vortoj ekzistas en almenaŭ unu el la **2 ĝermanidaj lingvoj** kaj ankaŭ en la **rusa**, sed ne en la latinidaj lingvoj. Ekzemple : *baki, brovo, budo, dorno, levkojo*.

- **Grupo LĜS** : la vortoj, pri kiuj respondaj vortoj ekzistas en almenaŭ unu el la **5 latinidaj lingvoj**, en almenaŭ unu el la **2 ĝermanidaj lingvoj** kaj ankaŭ en la **rusa**. Ekzemple : *akcento, altaro, ananaso, anĝelo, anizo, areno, artiŝoko, asigni, Aŭgusto, azoto...*

Jen la rezulto de la nombrado.

- **Grupo L** : 212 vortoj = 8,67 %.
- **Grupo Ĝ** : 111 vortoj = 4,54 %.
- **Grupo S** : 13 vortoj = 0,53 %.

} 8,67 + 4,54 + 0,53 = **13,74 %** (unugrupaj vortoj).

Parenteze, se la slogano "75/20/5" havus ian similecon kun la realaĵo, la sumo de la ĉiantaŭaj tri grupoj estus 100 %. Sed ĝi estas nur 13,74 %. La kretena slogano estas do malvera por 86,26 % de la Esperantaj vortoj ! Bele, inteligente, ĉu ? !

Sed ni daŭrigu la nombradon.

- **Grupo LĜ** : 1080 vortoj = 44,17 %.
- **Grupo LS** : 24 vortoj = 0,98 %.
- **Grupo ĜS** : 49 vortoj = 2,01 %.

} 44,17 + 0,98 + 2,01 = **47,16 %** (dugrupaj vortoj).

• **Grupo LĜS** : 956 vortoj = 39,10 %.

39,10 % (trigrupaj vortoj).

Ni vidas tuj, ke 39,10 % de la Esperantaj vortoj **NE** estas **aŭ** latinidaj **aŭ** ĝermanidaj **aŭ** slavaj, kiel asertas la "esperantistoj", kiam ili propagandas **MAL**favore al sia lingvo. Ili estas **KAJ** latinidaj **KAJ** ĝermanidaj **KAJ** slavaj.

Nun, ni faru la **ĉefan kalkulon**.

- Kiom da Esperantaj vortoj ia **latinido** (franco, italo, ktp) kapablas kompreni unua-

vide ? Evidente la vortojn de la grupoj **L, LĜ, LS** kaj **LĜS** (kiuj entenas la literon **L**) :

8,67 + 44,17 + 0,98 + 39,10 = **92,92 %**.

• Kiom da Esperantaj vortoj ia **ĝermanido** (germano, anglo, ktp) kapablas kompreni unuavide? Evidente la vortojn de la grupoj **Ĝ, LĜ, ĜS** kaj **LĜS** (kiuj entenas la literon **Ĝ**):
 $4,54 + 44,17 + 2,01 + 39,10 = 89,82 \%$.


• Kiom da Esperantaj vortoj ia **slavo** (ruso, polo, ktp) kapablas kompreni unuavide? Evidente la vortojn de la grupoj **S, LS, ĜS** kaj **LĜS** (kiuj entenas la literon **S**):
 $0,53 + 2,01 + 0,98 + 39,10 = 42,62 \%$.

Konklude, la nombroj "75 + 20 + 5" montras la kulminon de la stulteco. Ege pli grave: ili estas **mensogaj** kaj **malfavoraj** al Esperanto. Kaj ilia sumo « 100 », kiu respondas al nenio senc-hava, estas perfekte senutila. Eĉ malutila.

Jen kion devus aserti **honestaj kaj inteligentaj paneloj aŭ flugfolio** (*honestaj*, ĉar humile fidela al la plej vera veraĵo; kaj *inteligentaj*, ĉar favora al nia lingvo):

93 % de la Esperantaj vortoj estas tuj kompreneblaj de latinido
 90 % de la Esperantaj vortoj estas tuj kompreneblaj de ĝermanido
 43 % de la Esperantaj vortoj estas tuj kompreneblaj de slavo

Tion oni povas montri ankaŭ per tiu grafikaĵo, en kiu la tri cirkloj havas areon proksimume proporciajn al la nombroj 92,92, 89,82 kaj 42,62. Ili estigas sep areojn proksimume proporciajn al 8,67, 44,17, 4,54, 39,10, 0,98, 0,53 kaj 2,01.



Eble povas kelkfoje okazi, ke iu petas vin prelegi propagande pri la temo «*Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Nu, Esperanto estas vere internacia*».

Tiam, por prui la veran internaciecon de nia leksiko, vi povas elekti, kiel ekzemplon, panoramon de la vorto **koro**. Jen faciligaj informoj.

- Ĝi estas ja latinida: latine **cōr**, france **cœur**, okcitane **còr**, itale **cuòre**, korsike **còre**, romanĉe **COUR**, katalune **cor**, hispane-galege **corazón**, portugale **coração**, rumane **cord**.
- Sed la latina vorto devenas de la hindeŭropa radiko **kerd**.

- La hindeŭropa radiko estas retrovebla en la greka κῆρ kaj καρδία, skote cridhe, irlandgale CROÍ, hitite kard.
- En la ĝermanida familio, en kiu la origina **k** fariĝis regule **h**, ni trovas la saman radikon, sed sub la meza formo **hert**: germane Herz, jide הַרְצָה *harc*, angle heart, nederlande hart, frise hert, dane-norvege hjerte, svede hjärta, islande hjarta.
- Simila formo ekzistas en la sanskrita हृद् *hr̥d*, kiu finvenas al: pangabe हिरदा *hirdā*, sinhale හර්දය *hrdhaya*.
- En la slav-balta familio, la **k** fariĝis **s**, kio donas la mezan formon **serd**: slavone срѣдъце, ruse сѣрдце, ukraine-beloruse сѣрце, pole serce, ĉeĥe-slovake srdce, slovene-kroate srce, serbe-makedone срце, bulgare сърце, litove širdis, latve sird.
- Al tio ni aldonu la armenan սիրտ *sirt*.

Ĉu oni povas imagi, ke iu perfortus tiun vorton, provante ĝian eniron en la fi-faman sistemon "75/20/5"? Evidente, la vorto **koro** estas nek latinida, nek ĝermanida, nek slava:

**ĝi estas la centra formo de hindeŭropa radiko,
alivorte ĝi estas INTERNACIA.**

Kompreneble, "internacia" ĉi tie ne signifas, ke tiu radiko ekzistas en ĉiuj lingvoj de la mondo (tio estus nek ebla nek kontrolebla!). Sed nur, ke ĝi ekzistas en **tre granda nombro da kulturlingvoj**.

Se restas al vi iom da tempo, ĉe la fino de tiu hipoteza prelego, vi povos paroli ankaŭ pri la vorto **domo**, kiu venas de la latina **dōmūs**, pola-slovaka **dom**, ĉeĥa **dům**, rusa-belorusa **дом**, ukraina **дім**. Sed kun la senco « hejmo », ĝi ekzistas en la bulgara-makedona **дом**, kroata-slovena **dom**. Kun la senco « kupolo », ĝi estas la angla **dome**, la franca **dôme**. Kun la senco « katedralo », ĝi pasis al la germana **Dom**, nederlanda **dom**, itala **duomo**, hungara **dóm**. Ĝin oni trovas ankoraŭ ĉe la origino de la esperantaj vortoj **dimanĉo**, **domeno**, **domicilo**, **dominanto**, **dominio**, **Dominiko**.

Fakte ĝi rilatas kun la hindeŭropa radiko **dem** (ideo de domo, de konstruo), trovebla en la greka **δέμω** « konstrui », **δόμος** kaj **δῶμα** « konstruaĵo ».

Do ankaŭ tiu vorto estas pleje internacia, ne tute en sia senco, sed ja en sia formo.



Laste, sed ne balaste, ni rimarku, ke neniam Zamenhof diris aŭ skribis ion, kio similus, eĉ de malproksime, al la fi-fama "75/20/5"! La opinio de Zamenhof ja ne estas nenio...

Ĉu mi vivos sufiĉe longe por vidi la kretenaĵon "75/20/5" definitive formetitan en rubujon? Dube... La homoj tiel malŝatas, ke iu metas ilian nazon en ilian fekon...

Efektive, mi scias Esperanton de 60 jaroj. Kaj mi partoprenas en la Esperanta movado de 50 jaroj. Nu, de 50 jaroj, mia plej akra kaŭzo de mirego, estas: « **kial la esperantistoj elspezas tiom da energio, por malhelpi, ke la homoj rigardus Esperanton kiel seriozan aferon?** ». Verŝajne, mi mortos antaŭ ol trovi la respondon.

Tamen kelkfoje, la esperantistoj citas fiere la diron de la granda lingvisto A. Meillet: « **Esperanto estas la genia sintezo de la grandaj Eŭropaj kulturlingvoj** ». Meillet diris « sintezo », ne "miksaĵo". Ĉar "esperantisto" li ja ne estis...

Vidu ankaŭ miajn ĉapitrojn *Finajoj (reala nombro)* kaj *Fuŝperantox*.

Fuŝperantox, pereiga reformo

«*Esperanto ? Kia kretenaĵo ! Konsultante Interreton, tute hazarde, mi trovis umojn en Esperanto. Nelegeble ! Troviĝas stranĝaĵoj, kiel gx, jx, xh, qh, zx, ktp, kiujn neniu homa gorĝo kapablas elparoli. Tio nur konfirmas, tion, kion mi ĉiam opiniis : tie kretena artefaritaĵo neniel kapablas funkcii*». Jes, laŭvorte. Tion oni ofte diris al mi. Tre ofte.

Efektive, s-ro Ajnulo, legante, ke *cxarmaj sxafoj hxore gxojas cxuijxauxde*, penas prononci tion laŭ la reguloj de sia denaska lingvo. Supoze la franca : *kksarmaj sksafoj ?ksore gksoĝas kksjŭjksôksde*. «*Kia hororo ! Eĉ ne unu vorto rekonebla ! Kaj ili aŭdacas aserti, ke tio estas internacia lingvo ! Eĉ se la angla ne estas facila, tamen ĝin mi ege preferas !*»

Jen al kiu rezulto alvenas la fiaj Esperanto-entombigistoj, kiuj forlasis la Zamenhofan lingvon, kaj kreis tiun bastardan subdialekton de Esperanto, kaj eĉ ne kuraĝis doni al ĝi oficialan nomon. Tial, mi nomas ĝin **Fuŝperantox**. Kun granda efikeco, ĝi kontribuas forpeli for de nia lingvo multajn interesatojn.

Vi rebatos, ke **Interreto** ne akceptas la ĉapelitajn literojn. Sed Zamenhof antaŭvidis la problemon : «*Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u*» (*Fundamenta Gramatiko*, §A; Esperanta teksto en *Fundamenta Krestomatio*, p.239).

Metu vin en la lokon de tiu s-ro Ajnulo, kiu verŝajne estas nur duone favora al nia lingvo, eĉ eble tute malfavora. Se li legas vortojn, kiel *chapel*o, *char*o, *chardasho*, *chevalo*, *shafo*, *shaumo*, *shelo*, *shranko*, li ne miras, rekonante *chapeau*, *char*, *csárdás*, *cheval*, *Schaf*, *Schaum*, *shell*, *Schrank*, kiujn li kapablas prononci. Eĉ la digramo *gh* ne mirigas lin, ĉar li jam vidis ĝin en italdevenaj vortoj (*ghetto*...). Sed ĉe la vido de la klaŭneskaj *cxapelo*, *cxaro*, *cxardasxo*, *cxevalo*, *sxafo*, *sxauxmo*, *sxelo*, *sxranko*, *gxis*, *gxoji*, lia ĉi-supra komento trudiĝas mem. Eĉ se li ne estas anglalingvano, li komprenas la anglajn vortojn *China*, *chinchilla*, *Djibouti*, pli facile, ol la fuŝperantoxajn *Cxinio*, *cxincxilo*, *Gxibutio*!...

En la **fonetiko** de la lingvo, Zamenhof montriĝis avara je vokaloj : nur **5** (a e i o u). Kompare, Volapuko havas 8 vokalojn kaj la franca 16. Inverse, li estis malavara je konsonantoj : **23**, verŝajne pro slava influo. Kompare : 21 en Ido, 19 en Volapuko, 20 en la franca.

La sumo estas do : 5 vokaloj + 23 konsonantoj = **28 sonoj** (*fonemoj*, diras la fakuloj).

Plie, Zamenhof, tute prudente, starigis la regulon «1 litero ⇔ 1 sono», kio implicas «28 sonoj ⇔ 28 literoj».

Por skribi ilin, li havis je sia dispono nur **22** signojn : la 26 literojn de la latina alfabeto, el kiuj oni devas depreni **q, w, x, y**, kies roloj estis jam alprenitaj de alia litero.

Ekzistis **solvoj** nur du :

- Uzi **digramojn**, imite al la lingvoj franca (an, ch, gn, ou), itala (ch, gh), germana (ie, sch), angla (ea, ee, sh, th), sveda (sj), pola (rz, sz), albana (gj, sh, xh, zh), hungara (sz, zs), ktp.

- Krei **6 kromsignitajn literojn**, imite al la lingvoj franca (â, â, é, è, ê, ë), hispana (ñ, ù), portugala (ã, õ), germana (ä, ö, ü), ĉeĥa (ě, ň, š, ž), pola (ą, ę, ł, ó, ń, ź), kroata (š, ž), litova (ė, š, ū, ž), rumana (ă, î, ș, ț), albana (ë), hungara (á, ö, ő, ü, ú), turka (ç, ğ, ö, ş, ü), ktp.

Zamenhof kredis optimisme, ke baldaŭ la Esperanta alfabeto troviĝos en ĉiuj presejoj. Tial li elektis la duan solvon kaj kreis **ses supersignitajn literojn** (ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ). **Nur ses !** Malgrandega nombro, kompare kun multaj etnolingvoj (☞ *Kromsignoj en la etnaj lingvoj*) !

En Januaro 1889, Zamenhof skribis en la *Aldono al la Dua Libro* (p.6) : «*Se ia el la tipo-*

grafioj ne povas presi verkojn kun signetoj superliteraj (^) kaj (~), ĝi povas anstataŭigi la signeton (^) per la litero "h" kaj la signeton (~) tute ne uzadi ».

Ree, en 1890, en *La Esperantisto*, li skribas : « Multaj plendas, ke la skribado per ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankaŭ en la presado de verkoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la "Aldono al la Dua Libro" : anstataŭ la signeto superlitera oni povas **kuraĝe uzadi la literon h** kaj anstataŭ ŭ – simplan u » (*Lingvaj Respondoj*, p.45).

En tiu ĉi teksto, anstataŭigu « presado de verkoj » per « sendo de elektronikaj mesaĝoj », kaj vi mirkonstatos, ke **la problemo de Interreto estas solvita de 117 jaroj**.

En Oktobro 1907, Zamenhof sendis telegramon al generalo Sebert. Evidente, la tiama poŝta administracio ne konis la Esperantajn ĉapelitajn literojn. Ne gravis : « *Post semajno venos Parizon aranghi konsilighon. Letere pli.* » (*Leteroj de Zamenhof*, II, p.56). Per tiu telegramo, li iniciatis nenion : li simple aplikis la elementan regulon de la Fundamento.

Kaj ni memoru, ke « **neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!... Ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus LA KOMENCO DE NIA MORTO** » (Antaŭparolo de la Fundamento, A1, 4-5).

Jes, nia **MORTO**. Sen rigora respekto de la Fundamento, ni iras al certa morto. Eble eĉ pli rapide ol oni kredas. « *Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon... tiam aŭtoritata komitato... havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn...; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute sensanĝa* » (Antaŭparolo de la Fundamento, A1, 2-3).

« **Kuraĝe uzadi la literon h** », skribis Zamenhof. Jes, sed **malkuraĝe**, kion oni faru ?

Malkuraĝe, oni elcerbigu diversajn mortigajn kretenaĵojn, el kiuj Fuŝperantox ne estas la unua (ĉu la lasta?). Kiu estas tiu **oni**? **Oni** reprezentas tre diversajn saloneskajn teoriulojn.

Jen kelkaj el ili (ho Lazaro Ludoviko, pardonu ilin!):

- En 1979, V.Setälä kaj B.Collinder prezentis sian *Fundamentan* (tiele!) *Esperanton sen supersiĝoj*. Tipa ekzemplo : *charmaj ŝafoj xore qojas chiuzhawde*. Sed tiu reformo de Setälä kaj Collinder estis reformita de Setälä kaj Collinder : *txarmaj xafoi khore djoyas txiujaude*. Tuj poste, la dua reformo de Setälä kaj Collinder estis reformita de Setälä kaj Collinder : *charmaj ŝafoi khore djoyas chiujaude*. Kion ni pensu pri la fideindeco de tiuj du uloj? Ni notu, ke de 1930 Vilho Setälä estis membro de la Akademio de Esperanto, kies ĉefa celo estis kaj plu estas « *konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto* » (artikolo 1 de la statuto)!

- NHA (Nova Helpa Alfabeto): *charmaj ŝafoj khore joyas chiuzaude*. Tiu sistemo estas la kreaĵo de du homoj (jes, du) : André Albault, Yannic Gicquel kaj Jean Doublet. Inter ili, troviĝas la eksa prezidanto de la Akademio (vidu ĉi-supre la artikolon 1 de la statuto)!

- INKA (Internacia Ne-Kontraŭfundamenta Alfabeto) : *qarmaj xafoj h Gore joyas qiuwxawde*. Ĝuste nomite : **INKA** estas klara kiel... *inkobotelo*. Laŭ ĝia aŭtoro Ottó Haszpra, nun akademiano (vidu ĉi-supre la artikolon 1 de la statuto), tiu sistemo estas "plej internacia". Kaj nepre admiru la hipokritecon : "**Ne-Kontraŭfundamenta**" !

- SEFOSAS (SenĜstsepte Fonetika Ortografio Sen Aldonay Signoy), elpensajo de iu Matthias Behlert : *tcarmaj cafoj xore djoyas tciujawde*. Ĝuste nomite : **SEFOSAS**... *fosas* la tombon de Esperanto.

- Jen unu el la plej groteskaj : *Carmaj Safoj Gore Gojas CiuJaUde*. Ĝi implicas la forjeton de la majuskloj en ties kutima uzado ; ĝi estas kreaĵo de la fama nekonato "pierre estève"!!!

La fakto, ke **Interreto** ne transsendas la ĉapelitajn literojn (krom por malmultegaj fakuloj,

kiuj penetris en la sakralan sanktejon de *Askio, Unikodo*, aŭ io mistere simila) estas ridinda preteksto. Ni vidis, ke Zamenhof klare antaŭvidis la Interretan problemon kaj ties solvon.

Anstataŭ postuli, ke maŝino adaptiĝu al lingvo, kio estas infanece banala, tiuj danĝeraj maskeraduloj postulas, ke lingvo adaptiĝu al maŝino, kio estas ridindece stulta. Ni ne forgesu, ke la vida aspekto de lingvo apartenas al tiu lingvo, same kiom la aŭda aspekto.

La hungaroj, litovoj, slovakoj, turkoj, neniam havis la stultan ideon adapti siajn civilizitajn lingvojn al Interreto. Nur la "artefarita lingvo" Esperanto, nura kodo "*sen kulturo, sen historio*", kiel diras s-ro Stultul, devus fari tion... kaj malaperi profite al la usonangla...

La provoj de pravigo de tiu **reformo** meritas la unuan premion de hipokriteco.

1. Laŭdire, ĝi ne estas reformo, sed nur **teknika truko** uzenda por transdoni elektronikajn mesaĝojn, kiuj estos redonitaj al la ricevonto en normala skribo.

Tio estas **fia mensogo**, almenaŭ por 99,9999% de la Teranoj, kiuj NE estas profesiaj komputikistoj. Evidente, la mesaĝoj senditaj al mi en Fuŝperantox alvenas al mi en Fuŝperantox (→ tuj, rubujen!). Cetere, pli kaj pli ofte, mi ricevas leterojn, per la normala poŝto, skribitajn en Fuŝperantox. Ĉu la celo estas faciligi la laboron de la leterportistoj?

Iu eĉ verkis libron, paperan, ne Interretan, titolitan **Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?** La respondo evidentas: «*kun tiaj lingvo-mortigantoj, certe ne. En 2045, jam de longe, Esperanto apartenas al la historio de la ne-sukcesintaj "artefaritaj lingvoj"*».

2. Laŭdire, la Fundamenta solvo (kun h) **ne taŭgas**, ĉar vortoj, kiel *dishaki, flughaveno, mishelpi, pachoro, senchava, seshora, taghelo, vangharoj*, estus komprenataj kiel *diŝaki, fluĝaveno, miŝelpi, paĉoro, senĉava, seŝora, vanĝaroj*... Tio vere signifas: rigardi ĉiujn esperantistojn kiel mensdebilulojn. Estas klare, ke *fluĝaveno, paĉoro, senĉava, seŝora* kaj *taghelo* ne ekzistas. Plie, nenio malhelpas, ke oni skribus (ĉefe en elektronikaj mesaĝoj): *flug-haveno, pac-horo, senc-hava, ses-hora, tag-helo*, ktp, kio forigas ĉian heziton.

3. Kelkfoje, oni aldonas, ke s-ro Ajnulo ne scias legi *cxarmaj sxafoj hxore gxojas cxixjauxde*, tute same, kiel li ne scias legi, ekzemple (se li ne estas pollingvano), la polan frazon *potrzebuję książki mówiącej o podróżach*. Tiu argumento estas priplorinde stulta: s-ro Ajnulo **scias**, ke tiu pola frazo estas facile legebla, ne de li mem, kiu ne scipovas la polan, sed de 40 milionoj da pollingvanoj. Inverse, li **kredas**, ke Esperanto **estas parolata de neni**, simple pro tio, ke ĝi **estas parolebla de neni**.

En 1982, sub la klera prezidanteco de William Auld, la Akademio notis «*kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto... Neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj... La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo... lu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion*» (Aktoj de la Akademio, III, p.72).

Nuntempe, **kondamni** energie tiun novan **reformon** devus esti la plej urĝa tasko de la Akademio. Sed ve! ne atendu tion: Waringhien mortis, Auld emeritiĝis. **Nuntempe la pli granda parto de la axademianox korespondaxas per Fuŝperantox!!!** Honton al ilix!

Ekde nun, mi atendas trankvile la insultajn recenzojn, kiujn estigos tiu ĉi mia artikolo.

Mi partoprenas en la Esperanta movado de 50 jaroj. Nu, de 50 jaroj, mia plej akra kaŭzo de mirego, estas: «*kial la esperantistoj elspezas tiom da energio, por MALHELPI, ke la homoj rigardus Esperanton kiel seriozan aferon?*» Verŝajne, mi mortos antaŭ ol trovi la respondon.

Vidu ankaŭ miajn ĉapitrojn *Finaĵoj (reala nombro)* kaj *Fontoj de la Esperanta leksiko*.

Genro kaj sekso

Gramatika genro estas unu el la kategorioj, inter kiujn multaj lingvoj dispartigas la substantivojn.

La hindeŭropaj lingvoj dispartigas la substantivojn en **tri kategoriojn**: *maskulaj* (aŭ *viraj*), *feminaj* (aŭ *inaj*) kaj *neŭtraj*. Tamen en la modernaj latinidaj lingvoj, la neŭtra genro iom post iom malaperis: genroj estas nur du. Ankaŭ en la skandinavaj lingvoj, la genroj estas du: la *ne-neŭtra* (kiu rezultas de kunfandiĝo de la maskulo kun la femino) kaj la *neŭtra*. Kaj kelkaj hindeŭropaj lingvoj tute ne havas genron: la armena, la persa.

La semidaj lingvoj (hebrea, araba, malta) dispartigas la substantivojn en nur du kategoriojn: maskulaj kaj feminaj (neŭtro ne ekzistas). Tiu apartaĵo ekzistas ankaŭ en la modernaj keltaj lingvoj (bretona, kimra, gaela).

Tiu nocio de genro respondas al neniu logiko: la *suno* estas maskula en Francio, femina en Germanio. Inverse, la franca *luno* estas femina, la germana estas maskula. La francaj vortoj *ordonnance* «serva soldato», *recrue* «rekruto», *sentinelle* «sentinelo» estas feminaj, kvankam ili preskaŭ ĉiam difinas virojn. La germana *Weib* «virino» kaj la pola *dziewczę* «junulino» estas neŭtraj, kvankam ili difinas virinojn.

Tiu nocio de genro estas la kaŭzo de granda malfacileco en la lingvoj, kiuj havas ĝin. Eĉ kleraj franclingvanoj hezitas aŭ eraras pri la ĝusta genro de multaj vortoj ne ofte uzataj.

Sed la nocio de genro estas tute fremda al la pliparto de la lingvoj situantaj ekster tiuj du grupoj: la hungara, la finna, la vaska (eŭska), la kartvela (gruza), la turka, la mongola, la japana, la ĉina, kaj multegaj aliaj. La hungara *ő*, la finna *hän*, la vaska *hura*, la kartvela *ობის*, la turka *o* kaj la mongola *тэр* signifas tute same «li» kaj «ŝi»: ekzistas neniu ebleco, ke oni distingas la sekson per la nura uzo de persona pronomo. Same pri la ĉina *tā* (sed seksan distingon oni tamen povas fari skribe: 他 *tā* «li», 她 *tā* «ŝi»).

Genro kaj sekso estas du aferoj tute apartaj. Genro povas ekzisti aŭ ne ekzisti, depende de la lingvoj. Sekso estas natura afero, biologia, universala.

Zamenhof tute pravis: «*en lingvo arta tiu ĉi sekso de la substantivoj estas tute elfjetita, ĉar montriĝis, ke ĝi ne havas en la lingvo eĉ la plej malgrandan celon*» (OV, p.292).

Efektive, se granda parto de la homaro fartas tre bone sen gramatika genro, kial Esperanto embarasus sin per tiu malfacila kaj neutila nocio?

La Fundamenta Gramatiko (§1) ellasas maloportunan esprimon, koncerne la artikolon: «...*invariable pour tous les genres, nombres et cas* | ...*for all genders, numbers, and cases* | ...*für alle Geschlechter und Fälle, für die Einzahl und Mehrzahl* | ...*одинаковый для всех родовъ, падежей и чисель* | ...*dla wszystkich rodzajów, przypadków i liczb*» (egala por ĉiuj genroj, kazoj kaj nombroj).

Tiu bedaŭrinda uzo de la vorto *genroj* povus konduki al la erara kredo, ke genroj ekzistas en Esperanto. Feliĉe, la Esperanta traduko, aprobita de Zamenhof mem, estas «*egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj*» (Fundamenta Krestomatio, p.239). Ĉi tie, la ĝusta vorto *sekso* anstataŭas la maloportunan vorton *genro*.

La afero estas do tute klara kaj bone resumita:

«*Genro ne ekzistas en Esperanto*» (PIV, p.389b).

« Gramatika genro ne ekzistas en Esp-o » (PAG, p.60).

Tamen oni trovas ankoraŭ malbonajn aŭ mezbonajn lernolibrojn, kiuj asertas, ke tri genroj ekzistas en Esperanto :

DISTINCTION DES GENRES.

L'espéranto a trois genres : masculin, féminin et neutre.

Sont masculins tous les noms d'hommes et de métiers exercés par des hommes.

Sont féminins tous les noms de femmes et de métiers exercés par des femmes.

Sont neutres tous les noms d'objets inanimés et d'animaux dont le sexe n'est pas déterminé.

(Cette classification est empruntée à l'anglais.)

(Ni parolu en Esperanto, Cours de Langue internationale Espéranto, par André Ribot, Marmande, 1960)

Kelkfoje, la lernolibroj asertas, ke en Esperanto « *la gramatika genro estas natura* » : ili precizigas, ekzemple, ke *hundo* estas "maskula" vorto, kies "femina" formo estas *hundino*, ekzakte kiel la germana *Hund* estas maskula vorto, kies femina formo estas *Hündin*.

Sed tio estas rekte erara. La vero NE estas, ke "*la gramatika genro estas natura*", sed ke « *gramatika genro ne ekzistas* ». La vorto *hundino* ne estas femina vorto : ĝi estas sengenra kunmetaĵo konsistanta el *hundo + ino*. Temas pri hundo, kaj samtempe pri ino.

Similaj kunmetaĵoj ekzistas en la franca, ekzemple, kiam oni diras *une baleine mâle* « baleno-masklo » (ĝi estas baleno kaj ĝi estas masklo), *un dauphin femelle* « delfeno-femalo » (ĝi estas delfeno kaj ĝi estas femalo). Temas pri kunmetaĵoj, sen ia rilato kun gramatika genro : *baleine* estas franca femina vorto, eĉ kiam temas pri masklo ; *dauphin* estas franca maskula vorto, eĉ kiam temas pri femalo.

Asertante, ke genroj ekzistas en Esperanto, tiuj lernolibroj plene konfuzas genron kun sekso kaj enmetas erarajn nociojn en la kapojn de la lernantoj. Erarajn nociojn, kiujn ili eble konservos dum sia tuta vivo.

Tial, kelkaj personoj asertas, ke kiam oni parolas pri virino, oni ne rajtas uzi vortojn, kiel *esperantisto*, *komencanto*, *lernanto*, *prezidanto*, *sekretario*, ktp, kiujn ili rigardas maskulaj vortoj. Laŭ ili, pri virino, oni devas uzi *esperantistino*, *komencantino*, *lernantino*, *prezidantino*, *sekretariino*, ktp, kiujn ili rigardas feminaj vortoj.

Ili ne komprenas, ke Esperanto estas aglutina lingvo. La hindeŭropaj lingvoj estas fleksiaj : tio necesigas akordiĝon de la vortoj inter si. Oni ne rajtas diri : "*ma sœur est instituteur, meine Schwester ist ein Lehrer*"; oni devas diri : *ma sœur est institutrice, meine Schwester ist eine Lehrerin*. La franca frazo "*ma sœur est instituteur*" estas same absurda, kiel estus la Esperanta frazo "*mia fratino estas maskla instruisto*".

La franca vorto *jument* entenas du informojn, unu pri la animala specio, unu pri la sekso. Sed tiuj du informoj estas nedisigeblaj, la vorto ne estas tranĉebla. La esperanta vorto *ĉevalino* entenas, tute same, du informojn, unu pri la specio, unu pri la sekso. Sed la granda diferenco estas, ke tiuj du informoj estas disigeblaj : *ĉevalino* estas *ĉevalo ino* (kaj *ĉevalo* kaj *ino*). La PAG (p.454) asertas tute klare, ke « *tajlorino estas tajloro ino* ».

Do la frazo *ŝi estis elektita sekretariino de la grupo* (PAG, p.61) estas samsignifa kiel "*tiu ino estis elektita ina sekretario de la grupo*". Ĝi entenas dufoje la informon, ke temas pri ino. Tio ne estas lingve erara, sed tamen ne-utila kaj ne-eleganta. Unu uzo de *in* sufiĉas : la frazo « *ŝi estis elektita sekretario de la grupo* » estas perfekte klara kaj tute ĝusta. Mi

eĉ aldonas : tute konforma al la spirito de Esperanto.

Sed se oni akceptas, ke la sufikso **-in** estas uzinda, nur kiam ĝi estas necesa por la transdono de la informo, oni logike alvenas al la konkludo, ke al virino oni povus diri *"bonan tagon, sinjoro"*, ĉar al virino mi ne bezonas diri, ke ŝi estas ino, tion ŝi ja scias. Tamen neniu diras tion. Aŭ, se mi prezentas mian edzinon al iu persono, mi povus diri *"mi prezentas al vi mian edzon"* (ĉar ŝia ineco estas ja videbla). Sed neniu parolas tiel.

Efektive, kelkaj vortoj, precipe familiaj titoloj, havas fortan seksan valoron : *av(in)o*, *edz(in)o*, *fianĉ(in)o*, *fil(in)o*, *frat(in)o*, *knab(in)o*, *kuz(in)o*, *nep(in)o*, *nev(in)o*, *onkl(in)o*, *patr(in)o*, *sinjor(in)o*, *vir(in)o*, ktp. Sen la *in*, ili estas sentataj kiel viraj ; kun la *in*, ili estas sentataj kiel virinaj. En tiaj kazoj, tiu redundanco estas tute permesata, eĉ plej normala. Redundanco estas ofte kaŭzo de pli granda klareco. Jen tri ekzemploj el la Fundamento :

- *mia onklino* estas bona **virino** (§ 33),
- *mia fratino* estas tre bela **knabino** (§ 33),
- *la juna vidvino* fariĝis denove **fianĉino** (§ 33).

Certe, *"mia onklino estas bona **viro**"* aŭ *"mia fratino estas bela knabo"* estus ŝokaj.

Sed tio estas vera nur por tre malmulte da vortoj. Inverse, vortoj kiel *emerito*, *esperantisto*, *franco*, *instruisto*, *komencanto*, *ministro*, *poeto*, *prezidanto*, *ruso*, *sekretario*, kaj multegaj aliaj, estas sentataj kiel senseksaj, ne-entenantaj seksan nocion. Ili tute ne ŝokas, se ili estas uzataj por virinoj en la jenaj kazoj.

1) Kiam la informo entenata en la frazo havas nenian rilaton kun la sekso de la persono. Tio okazas oftege.

- *ni ricevis cirkuleron subskribitan de la **sekretario** de nia asocio*. Ĉu temas pri sinjoro X. aŭ pri sinjorino Y. ? Mi ne scias, kaj ne volas scii : informo pri sekso estas perfekte senutila. En ambaŭ kazoj, temas pri *sekretario*.

- *nia aŭtoro tre lerte enscenigas nin* (W.Auld, Antaŭparolo de *La Ŝtona Urbo*, p.11). Fakte temas pri la aŭtorino Anna Löwenstein, sed ŝia sekso havas nenian utilon en tiu frazo.

- *George Sand estas franca **verkistino** de la 19a jarcento*. Unufoja precizigo, ke George Sand estas virino, povas esti utila, ĉar eble la leganto (precipe se ne franclingvano) ne scias tion. Sed en la sekvaĵo de la teksto, se la vorto **verkisto** revenos, estos tute neutile, ke oni ĝin denove ornamus per la sufikso *-in*.

2) Kiam alia vorto en la frazo precizigas klare, ke temas pri virino.

- *mia **edzino** estas mezgrada **instruisto***.
- *de 1980 ĝis 1996, la **prezidento** de la Islanda Respubliko estis **virino***.
- *Anna Aĥmatova : rusa **poetino** (1889-1966)*. *Ŝi estas unu el la plej grandaj rusaj **poetoj***

(Sergio Pokrovskij, *Lingvaj Respondoj*, p.41).

- *Maria, ĉu vi estas **idioto** ?* (M.Boulton, *Virino ĉe la landlimo*, p.10). Ne *idiotino*.
- *vi do opinias **ŝin** ebla **kulpinto**, ĉu ?* (J.Valano, *Ĉu ni kunvenis vane?*, p.122). Ne *kulpintino*.

3) Kiam ili estas uzataj de virino parolanta pri si mem.

- *ŝi rakontis : "tiun jaron, mi laboris kiel **kuracisto** en la urba hospitalo."*
- *"Mi, **spiono** ? De kie vi prenis tiun fantazian akuzon?" ŝi fine akre demandis* (Johán Valano, *Ĉu li venis trakosme?*, p.125). Ne *spionino*.

Gramatika karaktero de la radikoj

Ni ĉiuj, kiam ni komencis la lernadon de Esperanto, elkovris mire-admiri, ke ekzemple el la radiko *parol'* oni povas kaj rajtas fari tute libere *parolo*, *parola*, *parole*, *paroli*. Kaj tiel plu. Kaj ni konkludis, iom rapide, ke *parol'* en si mem estas nek substantiva, nek adjektiva, nek adverba, nek verba; ke oni povas vortigi ĝin substantive, adjektive, adverbe, verbe; sed ke la radiko mem, la radiko nuda, estas... nenia.

Multaj esperantistoj kredas tion dum sia tuta vivo, kaj tamen parolas kaj skribas tute ĝustan lingvaĵon. Sed ili ne pravas en la teorio. Se la nudaj radikoj estus neŭtralaj, Esperanto ne funkcius, ĝia strukturo estus neklarigebla. Tamen ĝi funkcias...

I. Historio de la afero.

Kiam eksplodis la Ido-krizo, en Oktobro 1907, la esperantistoj devis alfronti la kritikojn de la idistoj kaj defendi sian lingvon. Tiuj kritikoj celis precipe la esperantan « derivadon ». Sed fakte, Esperanto ne konas derivadon, sed nur **kunmetadon**. Efektive, laŭ Zamenhof mem, ĉiu elemento de Esperanta vorto devas esti rigardata kiel memstara **vorto**: *trinkaĵo* ne estas derivaĵo de *trinki*, sed ja **kunmeto** de tri vortoj: *trink* + *aj* + *o*.

Tiam la esperantistoj devis esplori ĝisfunde sian lingvon, kiun ĝis tiam ili uzadis intuicie, ne por paroli ĝin pli bone, sed por pli bone kompreni ĝiajn intimajn mekanismojn. Kaj okazis ekzakte tio, kio okazas en la aliaj lingvoj: **ne teorio kaj reguloj kreis lingvon, sed vivajn regulojn de vivanta lingvo konstatis (nur konstatis!) la gramatikistoj.**

Oni do esploris, kial oni "rastas per *rastilo*", dum oni pioĉas, ne per **pioĉilo*, sed simple per *pioĉo*; kial oni "preĝas en *preĝejo*", sed fabrikas en *fabriko*, ne en **fabrikejo*; kial "kudras *kudristo*", dum tajloras ne **tajloristo*, sed *tajloro*; kial "homo maljuna estas *maljunulo*", dum homo emerita estas *emerito*, ne **emeritulo*.

Kaj oni eltrovis, ke la kaŭzo estas genie simplega:

- **La radikoj *emerit'*, *fabrik'*, *pioĉ'*, *tajlor'* estas substantivaj**: tio signifas, ke en si mem, eĉ sen la finaĵo *o*, ili jam havas la substantivajn sencojn de ulo, ejo, ilo, isto.
- **La radiko *jun'* estas adjektiva**: tio signifas, ke en si mem, eĉ sen la finaĵo *a*, ĝi jam havas adjektivan senco; *juno* difinas do econ, ne ulon.
- **La radikoj *kudr'*, *preĝ'*, *rast'*, estas verbaj**: tio signifas, ke en si mem, eĉ sen la finaĵo *i*, ili jam havas verban senco; *kudro*, *preĝo*, *rast* difinas do agojn, sed nek iston, nek ejon, nek ilon.

La Esperantaj radikoj estas do dispartigendaj en tri ĉefajn kategoriojn: **radikoj substantivaj, radikoj adjektivaj, radikoj verbaj.**

Oni povas aldoni du akcesorajn kategoriojn:

- **La radikoj adverbaj** (ekzemple, *nepr'*, *subit'*). Sed en la vidpunkto de pluformado kaj vortfarado, ili kondukas kiel radikoj adjektivaj. Oni do povas preterlasi ilin.
- **La radikoj senkarakteraj**: la partikuloj (prepozicioj, konjunkcioj, subjunkcioj, ktp).

Ekde tiu ĉi eltrovo de la **gramatika karaktero de la radikoj**, la aferoj iĝis mirinde simplaj. Tiu teorio fontas unue el la laboro de aŭtenta sciencisto, *René de Saussure* (1872-1943), kiu dum pluraj jaroj studis la strukturon de la Zamenhofa lingvo kaj fine povis

starigi la bazajn regulojn, al kiuj dekomence obeis la vortfarado.

Liaj ĉefaj verkoj pri tiu temo estis :

- *La logika bazo de la vortfarado en Esperanto*, publikigita en 1910, sub la pseŭdonimo *Antido*, okaze de la 6a Universala Kongreso en Vaŝingtono.
- *La construction logique des mots en Espéranto*, publikigita iom poste. Tie li demonstras la logikan ĝeneralan signifon de la finaĵoj kaj ilian egalecon kun la sufiksoj. Zamenhof aprobis tiun broŝuron, sed deziris, ke oni ne diskonigu lian opinion ĝis post la decido de la Akademio.
- *Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto* (Bern 1915, reeldono A.Iltis 1969). Ankaŭ ĉi tiu broŝuro ricevis aprobon de Zamenhof (vidu poste).

Kelkan tempon post la 6a Kongreso, la Akademio kreis specialan komisionon por ekzameni la proponojn de Antido kaj esplori la tutan demandon pri la vortteorio. Ĝi konsistis el *R.de Saussure*, prezidanto, *H.Höveler* (1859-1918) kaj *A.Grabowski* (1857-1921). En Majo 1913, la Akademio oficiale akceptis la unuajn du propoziciojn de Saussure : « ke la vortformado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur t.n. reguloj de derivado » kaj « ke oni observu la du principojn de neceso kaj sufiĉo » (☞ *Finajoj estas vortoj kaj Neceso kaj sufiĉo*).

R.de Saussure redonis do fidon al la esperantistoj, montrante, ke la radikoj, la sufiksoj kaj la finaĵoj funkcias kiel memstaraj vortoj : la vorto *laboro* estas la kunmetaĵo de la du **vortoj labor kaj o**, ekzakte kiel *vaporŝip'* estas la kunmetaĵo de *vapor kaj ŝip'*.

Bedaŭrinde, pro la milito, kaj ankaŭ pro tio, ke la Akademio opiniis la teorion ne plene matura en ĝia formo, la aliaj propozicioj de *Saussure* ne estis traktitaj.

Tiu teorio estis poste kompletigita de kelkaj gigantoj de la gramatiko, kiel estis *Eugen Wüster*, *Kálmán Kalocsay*, *Gaston Waringhien*. Ĝi aperas en la tria parto de la *Plena Analiza Gramatiko* (laŭ formo nerefuteble ĝusta kaj konforma al la lingvouzado, sed ne ĉiam perfekte klara) kaj ĝin spegulas la PIV. **La Akademio finfine aprobis ĝin**, sekve de la kleraj esploroj de *André Albault* (*Aktoj de la Akademio*, I, p.58-70), kiu ne teoriumis, sed apogis sin sur serio de **konstatoj** de la efektiva lingvouzado. Jen pri tio la opinio de *G.Waringhien* : « kontraste al la diversfelaj teoriistoj, kiuj volis — kaj plu volas — submeti la lingvan materialon al siaj postulatoj, D-ro Albault, kondensante la observojn de Saussure kaj de Kalocsay, prezentis la verajn principojn de la Esperanta Vortfarado, tiajn, kiaj ili rezultas el la objektiva analizo de la konstanta uzado » (Antaŭparolo de *Vojaĝo tra la landoj*, de A.Albault, p.4).

II. Evidenteco kaj universaleco de tiu teorio.

Eĉ komencanto, se oni petas, ke li/ŝi aldonu taŭgan finaĵon al la radikoj *dom'*, *grand'*, *kur'*, certe ne respondos “*domi, grando, kura*”, sed tute certe «*domo, granda, kuri*». La kaŭzo estas simple, ke – eĉ sen lingvistika kompetenteco – li sentas :

- en *dom'*, ideon de substantivo, de konkretaĵo,
- en *grand'*, ideon de adjektivo, de kvalito,
- en *kur'*, ideon de verbo, de ago.

Kaj neniuj vortaro prezentas tiujn tri radikojn alimaniere, ol kun iliaj plej naturaj finaĵoj : **domo, granda, kuri**.

Cetere, ĉi tio tute ne estas apartaĵo de la Esperanta lingvo. La samon oni povas konstati en ĉiu ajn etna lingvo.

En lingvoj hindeŭropaj, kiel la franca, la germana, la hispana, la itala, la nederlanda, la pola, la rusa, oni povas konstati la saman fenomenon.

- boire «trinki» estas verba: el ĝi oni derivas *boisson* «trinkajo», *buveur* «trinkanto», *buvable* «trinkebla», ktp;
- *córrere* «kuri» estas verba: el ĝi oni derivas *corrènte* «flua, kurento», *corrière* «kuriero», *corsivo* «kursivo», ktp;
- *dank* «danko» estas substantiva: el ĝi oni derivas *bedanken* «danki», *dankbaar* «dank-ema», *dankbaarheid* «dankemo», ktp;
- *dziecko* «infano» estas substantiva: el ĝi oni derivas *dziecięcy* «infana», *dziecinada* «infanajo», *dziecinnieć* «infaniĝi», ktp;
- *pequeño* «malgranda» estas adjektiva: el ĝi oni derivas *pequeñez* «malgrandeco», ktp;
- *schön* «bela» estas adjektiva: el ĝi oni derivas *Schöne* «belo, belulino», *Schönheit* «beleco», ktp;
- *великий* «granda» estas adjektiva: el ĝi oni derivas *величинá* «grando», *величие* «grandeco», *увеличить* «grandigi», *увеличиться* «grandiĝi», *увеличение* «grandigo», ktp.

En lingvoj ne-hindeŭropaj, kiel la araba, la ĉina, la finna, la hebrea, la hungara, la turka, oni povas konstati la saman.

- *büyük* «granda» estas adjektiva: el ĝi oni derivas *büüklük* «grandeco», *büütmek* «grandigi», *büümek* «grandiĝi», *büüyme* «grandigo», ktp;
- *كَتَبَ kataba* «skribi» estas verba: el ĝi oni derivas *كِتَابَة kitāba* «skribado», *كِتَاب kitāb* «skribajo, libro», *كُتُبِيّ kutubiyy* «skribaja, libra», ktp;
- *lapsi* «infano» estas substantiva: el ĝi oni derivas *lapsellinen* «infana», *lapsuus* «infan-aĝo», *lapsellisuudet* «infanajoj», ktp;
- *nagy* «granda» estas adjektiva: el ĝi oni derivas *nagyít* «grandigi», *nagyság* «grandeco», *nagyítás* «grandigo», ktp;
- *שָׁמַר šamar* «gardi» estas verba: el ĝi oni derivas *שְׁמִירָה šəmīraḥ* «gardado», *שֹׁמֵר šōmer* «gardisto», *מִשְׁמָר mišmar* «gardistaro», *נִשְׁמַר nišmar* «singardi», ktp;
- *小人 xiǎo* «eta» estas adjektiva: el ĝi oni derivas *小人物 xiǎorénwù* «etulo», ktp.

III. Neceseo de tiu teorio.

Cetere, tiu divido de la radikoj en tri kategoriojn estas nepre necesa, se oni volas uzi kaj kompreni la lingvon senerare kaj sen ambiguaĵoj.

Por ke lingvo estu funkcipova, necesas antaŭ ĉio unu kondiĉo: ke ĉiu vorto estu komprenata de ĉiu uzanto de la lingvo kun **unu** ĉefa signifo. Por demonstri la neceson, ke ĉiu radiko apartenu al unu (nur unu!) kategorio, ni helpos nin per la ekzempla radiko **brems'**, kaj ni tuj faros **du supozojn** (el kiuj nur unu montriĝos ĝusta):

- ① Unua supozo: la radiko **brems'** estas **verba**. Tiukaze, *brems* signifas **agon**; do la substantivo *bremso* estas la nomo de tiu ago; *bremso* estas preskaŭ sam-signifa, kiel *bremsado*. Kaj la ilo necesa por *bremsi* estas evidente *bremsilo*.
- ② Dua supozo: la radiko **brems'** estas **substantiva**. Tiukaze, *brems* signifas **aĝon**; konsidere de la signifo de la radiko, tiu aĝo estas certe ilo. Do *bremso* difinas la ilon por *bremsi*, kaj la ago estas devige la *bremsado*.
- ③ Tria supozo, ke la radiko **brems'** estus **adjektiva**, kondukas al nenio senc-hava.

Ĉiu el miaj du supozoj **povus esti ĝusta**. Ĉe ĉiu el ili, Esperanto funkcius kontentige. Sed estas neeble, ke tiuj **ambaŭ** supozoj **estus ĝustaj**: *bremso* ne povas difini kaj la ilon por bremsi kaj la agon bremsi. Devige, el tiuj du supozoj, kiujn mi faris, unu respondas al la efektiva uzado de la lingvo, la alia ne. Unu estas ĝusta, unu estas erara. La radiko **brems'**

povas esti **Aŭ verba Aŭ substantiva**. Sed ĝi povas esti **NEK ajna, NEK ambaŭa**. Fakte, nur mia dua supozo spegulas la efektivan lingvouzadon: **brems'** estas **substantiva**. Oni bremsas per bremsilo; tiu ago estas la bremsado. Kaj **bremsilo* estas erara pleonasmo.

Nun, ni konsideru la radikon **korekt'**. En la efektiva uzado de la lingvo, *korekt'* elvokas agon, verban ideon ("mi korektos tiun malbonan tekston"): **korekt'** estas do verba radiko. Ankaŭ en la Fundamento, ĝi estas tradukita jene: corrigir | correct | bessern, corrigiren | исправлять | poprawiać. Ĉiuj kvin tradukoj estas verboj.

La PIV difinas *korekt'* tute prave: «1. anstataŭigi eraran vorton, literon, ktp, per la ĝusta; 2. forigi la difektojn». Rezultas, ke **korekto** estas la «ago de iu, kiu korektas», ke **korektisto** estas «responsulo pri korekto» kaj ke **korekta** signifas «rilata al korekto» (france *correctif*, angle *corrective*, ruse *исправительный*), ekzemple en «korektaj reguloj de presejo (reguloj rilataj al korekto)».

Sed ve! Zamenhof uzis la adjektivon **korekta** plurfoje, eĉ multfoje, **ne** en la senco «rilata al korekto», sed en la senco de la franca-angla *correct*, germana *korrekt*, rusa *правильный*, esperanta *ĝusta*, *ekzakta*, *senerara*, *laŭregula*. Multaj faris same.

Nu, doni al **korekta** tiun signifon, implicas, ke **korekt'** estas **adjektiva radiko**. Tiukaze, «anstataŭigi eraran vorton, literon, ktp, per la ĝusta» devus esti, ne *korekti*, sed «*korektigi*», ke «ago de iu, kiu korektas» estus «*korektigo*», ke responsulo pri forigo de eraroj estus «*korektigisto*» kaj ke «*korekto*» estus sinonimo de «*ĝusteco*, *ekzakteco*».

Supozi, ke *korekt'* estus **kaj verba kaj adjektiva**, kondukus al plena ĥaoso: responsulo pri forigo de eraroj (ĉu «*korektado*, ĉu *korektigado*») estus *korektisto*, aŭ *korektigisto*, laŭ onia bontrovo. Frazo kiel «*la korekto* (ĉu «*korektado*», ĉu «*ĝusteco*») de ĉi tiu teksto *levas problemojn*» estas dusenca (do sensenca), kio ne estas allasebla en Esperanto.

La radiko *korekt'* devas aparteni al **UNU kategorio**, ne al du.

El tiu Zamenhofa malatento, ni tiru tri konkludojn:

1. Ni neniam uzu **korekta** en la senco «*senerara*», kiu rezultas de malatento. «*Korekta laboro*» **ne** estas «*senerara laboro*», sed «*laboro konsistanta en korektado*».
2. Se ĉiuj Esperantaj radikoj apartenus, kiel *korekt'*, samtempe al du kategorioj, aŭ al iu ajn kategorio, Esperanto estus tute simple neuzebla.
3. Ni pardonu al Zamenhof, kiu **ne** estis neeraripova.

Ĉi tie, unu grava punkto estas nepre menciinda.

La teorio de la *gramatika kategorio de la radikoj* **ne** havas sian fonton en la fakto, ke la Fundamento tradukas plej ĝenerale la radikojn, jen per kvin substantivoj, jen per kvin adjektivoj, jen per kvin verboj. Tute ne! Ĝi havas sian fonton en la **efektiva uzado de la lingvo**. Efektive, nura traduko ne estas uzebla lingva kriterio. Plie, tiu kriterio ne ĉiam estus fidinda: ekzemple la kunmetitan formon *dis'rev'ig'* la Fundamento tradukas francen kaj germanen per substantivoj (désenchantement | Enttäuschung), anglen per adjektivo (disenchanted), rusen kaj polen per verboj (разочаровываться | rozczarować się).

Tio pravas, ke la ĉefa celo de la Fundamento **ne** estas la fiksado de la gramatikaj kategorioj kaj ke ni ne devas ohoi aŭ hurai, kiam ni trovas en ĝi mallertaĵojn.

IV. Nerefutebla kaj nerefutita demonstrado.

Kun sia ĉiama genio, *Kálmán Kalocsay* demonstris tiamaniere la ĝustecon de tiu teorio (La gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj, Budapeŝto, 1938, reeldono A.E. Itis, 1980).

1) Ni konsideru paroĵn de **verbaj vortoj** kun sencoj pli-malpli similaj :

① *agenti-kolporti, profeti-aŭguri, tajlori-kudri,*

② *broŝi-kombi, marteli-bati, pioĉi-ŝoveli,*

③ *farbi-kolorigi, pendoli-balanciĝi, silabi-legi.*

Ni ŝanĝu tiujn verbojn al substantivoj. Ni konstatas, ke :

① *agento, profeto, tajloro* estas **personoj** ; *kolporto, aŭguro, kudro* estas **agoj**.

② *broso, martelo, pioĉo* estas **iloj** ; *kombi, bato, ŝovelo* estas **agoj**.

③ *farbo, pendolo, silabo* estas **objektoj** ; *kolorigo, balanciĝo, lego* estas **agoj**.

La diferencoj estas frapaj. Ĉar la aldonitaj finaĵoj estas la samaj (o), **la diferenco povas veni NUR DE LA RADIKOJ MEM.**

Por doni al *agento, profeto, tajloro, broso, farbo*, sencon de ago, kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni **ad** : *agentado, profetado, tajlorado, broŝado, farbado*.

Por doni al *kolporto, aŭguro, kudro*, sencon de persono, kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni **ist** : *kolportisto, aŭguristo, kudristo*.

Por doni al *kombi, bato, ŝovelo*, sencon de ilo, kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni **il** : *kombilo, batilo, ŝovelilo*.

Por doni al *kolorigo, lego*, sencon de objekto, kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni **af** : *kolorigaĵo, legaĵo*.

2) Nun ni konsideru paroĵn de **adjektivaj vortoj** kun sencoj pli-malpli similaj :

• *afabla-amika, granda-kolosa, kruela-barbara, nobla-nobela, stulta-azena.*

Ni ŝanĝu tiujn adjektivojn al substantivoj. Ni konstatas, ke :

• *afablo, grando, kruelo, noblo, stulto* estas **kvalitoj** ; *amiko, koloso, barbaro, nobelo, azeno* estas **konkretaĵoj**.

Ĉar la aldonitaj finaĵoj estas denove la samaj (o), ankaŭ ĉi tie la diferenco **povas veni NUR DE LA RADIKOJ MEM.**

Por doni al *afablo, grando, kruelo, noblo*, sencon de persono, kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni **ul** : *afablulo, grandulo, kruelulo, noblulo, stultulo*.

Por doni al *amiko, koloso, barbaro, nobelo, azeno*, sencon de kvalito, kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni **ec** : *amikeco, koloseco, barbareco, nobeleco, azeneco*.

La diferenco konstatabla en la pluformado povas veni NUR de diferenco en la intima karaktero de la radikoj mem.

V. Logikeco de la kategorioj.

Tiu unikategorieco ne estas samgrade necesa pri ĉiuj Esperantaj radikoj. Ekzemple, **fast'** kaj **festen'** estas tradukitaj per verboj en la Fundamento. Ili troviĝas en la PIV ankaŭ sub la formo de verboj : **fasti** kaj **festeni**. El ili oni pluformas **fasto** kaj **festeno**. Sed fakte, oni ankaŭ povus konsideri, ke **fasto** kaj **festeno** estus substantivaj, kaj ke el ili oni pluformus la verbojn **fasti** kaj **festeni**. Tio ŝanĝus nenion en la signifo.

Same, ĉu **atenti** estas baza verbo, el kiu oni pluformas **atento** kaj **atenta** ? Ĉu **atenta** estas baza adjektivo, el kiu oni pluformas **atento** kaj **atenti** ? Ajne, ĉar tiuj distingo neniel influas al la signifo de la vortoj *atenta, atento, atenti*. Nur pro amo al tradicio kaj pro ia alkutimiĝo al la Fundamento (attentif | attentive | aufmerksam | внимательный | uwaŝny), oni klasas **atent'** en la adjektivajn radikojn.

Sed por la grandega plimulto de la radikoj, la kategorio estas evidenta kaj natura :

• Ekzemploj de **substantivaj radikoj** : *aer, akv, barbar, best, brems, broŝ, dom, flor,*

glas, ĝarden, hom, infan, kamp, land, martel, muzik, pak, pan, patr, pioĉ, reĝ, scienc, sun, tabl, tag, urb, vest, vir. Ekzemploj de **substantivaj sufiksoj**: an, ar, ej, il, ist, on, uj, ul.

• Ekzemploj de **adjektivaj radikoj**: afabl, agrabl, alt, bel, blank, bon, ĉarm, dik, etern, grand, ĝentil, ĝust, hel, jun, just, klar, kler, kruel, larĝ, long, nigr, pur, ruĝ, van. Ekzemploj de **adjektivaj sufiksoj**: ebl, em, end, ind.

• Ekzemploj de **verbaj radikoj**: ag, am, aŭd, bat, ĉas, danc, dorm, erp, far, ĝu, hak, hav, imag, ir, jet, kant, kis, komb, konstru, korekt, kur, kuŝ, manĝ, naĝ, parol, pas, perd, plug, reg, sid, skrib, trink, trov, ven, vid. Ekzemploj de **verbaj sufiksoj**: ig, iĝ.

Oni apenaŭ povas imagi, ke la kategorioj estus: aeri, aga, alti, belo, doma, havo...

Nur por kelkaj dekoj da radikoj eblas heziti, ĉu temas pri radikoj adjektiva aŭ substantiva, aŭ ĉu temas pri radikoj verba aŭ substantiva.

Sed eĉ tiukaze, la solvo estas simpla:

• Kun adjektiva radikoj, la finaĵo **-o** havas la signifon de kvalito. Se **o**-pluformaĵo de iu radikoj ne signifas kvaliton, tiu radikoj ne povas esti adjektiva. Kion signifas **laiko**? Ĉu "kvalito de iu, kiu..."? Tute ne. **Laiko** estas « homo ne apartenanta al pastraro, homo sen aparta kompetenteco ». La kvalito estas la **laikeco**; la radikoj **laik'** estas do **substantiva**.

• Kun verba radikoj, la finaĵo **-o** havas la signifon de ago, aŭ de konkreta manifestiĝo aŭ rezulto de tiu ago. Se **o**-pluformaĵo de iu radikoj ne signifas agon, tiu radikoj ne povas esti verba. Kion signifas **vesto**? Ĉu "ago kovri iun..."? Tute ne. **Vesto** estas « ĉio kovranta la korpon ». La ago estas la **vestado**; la radikoj **vest'** estas do **substantiva**.

VI. Oportunaj korektoj.

En kelkaj malmultaj lokoj, la Universala Vortaro, lasta parto de la Fundamento, zorgas eviton de eraroj pri la karaktero de la radikoj:

- **bor'**: angle bore (vb.).
- **pres'**: angle print (vb.).
- **vel'**: angle sail (subst.).
- **nobel'**: france noble (subst.), kontraste kun **nobl'**: france noble (adj.).

Tamen oni ne povas aserti, ke la Fundamento estis verkita kun la intenco montri la ĝustan kategorion de ĉiuj radikoj. Tial, en pluraj okazoj, oni devas esplori la lingvouzon de Zamenhof kaj de la aliaj bonaj aŭtoroj por konstati la kategoriecon. Kaj oni kelkfoje konstatas, ke la kategorio citita en la Fundamento ne spegulas la efektivan lingvouzon.

Ekzemple, la Fundamento citas la radikojn **flor'** unue sub la formo **flori** (kaj nur poste sub la formo **floro**), kio allasas la ideon, ke **flor'** estus verba radikoj. Se tio estus ĝusta, **floro** signifus « ago flori », kaj oni donus al la amatino bukedon de "florajoj". Sed evidente, tio ne spegulas la realan uzadon de la lingvo. La radikoj **flor'** estas substantiva, kiel montras ĝia reala uzado: **rozo estas floro, la rozo apartenas al Teodoro** (Fundamento, §5). La nomo de la ago estas ne **floro**, sed ja **florado**.

Same, **guto, urino** neniam signifas agon, sed male ion tute konkretan. Sekve, la radikoj **gut'**, **urin'** estas ne verbaj, sed substantivaj. Tio verŝajne validas ankaŭ pri **pak'**.

Plie, ja okazis, ke laŭ la jaroj iuj radikoj transiris de unu kategorio al alia. La radikoj **plant'** estas verba en la Fundamento (planter | plant (vb.) | pflanzen | сажать, насаждать | sadzić). Do **planto** difinas la agon planti. Sed poste, kun la lingva evoluado, la radikoj **plant'** alprenis la sencon « kreskaĵo », kio donis al ĝi substantivan karakteron.

La unua PIV sekvis obeeme, sed maloportune, la Fundamenton. Sola escepto: **abomen'** troviĝas en la Fundamento kiel substantiva radikoj, sed en la PIV1 sub la formo **abomeni**.

Sed la PIV reviziita restarigis kelkajn radikojn en la kategorioj konformaj al la efektiva nuntempa uzado (F kaj PIV1 → PIV2).

acida → acido	flori → floro	ruli → rulo/ruli	ŝviti → ŝvito
celi → celo	fluida → fluido	semi → semo	urini → urino
detala → detalo	glui → gluo	streki → streko	valori → valoro
direkti → direkto	guti → guto	stuki → stuko	vesti → vesto
doti → doto	paki → pako	ŝarĝi → ŝarĝo	vindi → vindo
fendi → fendo	planti → planto		

VII. Zamenhofeco de tiu sistemo.

Kiam Zamenhof ekkonis la du broŝurojn de R. de Saussure, li senhezite aprobis ilin.

• Pri *La construction logique des mots en Espéranto*, li skribis al la aŭtoro (en Julio 1910): « *Mi trovas ĝin bonega. Laŭ mia opinio estus tre utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Esperanto, por ke ĉiu esperantisto, precipe la verkantoj, atente ĝin tralegu kaj por ke ili penu observi tiujn principojn, kiujn vi bonege esploris kaj klarigis. Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan aprobon... Via verko povas servi kiel bona modelo de efektive gravaj kaj utilaj Akademiaj laboroj* » (*Originala Verkaro*, p.455, *Lingvaj Respondoj*, p.3). Sed Zamenhof deziris, ke oni ne konigu lian opinionon ĝis la Akademio faros oficialan decidon.

• Pri la *Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto*, li skribis al la aŭtoro (la 8an de Majo 1915): « *Quant à vos Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio, je peux vous dire que je n'y trouve rien qu'on puisse désapprouver. J'estime que l'Académie peut donner son approbation à votre livre (Koncerne viajn "Fundamentajn Regulojn de la Vort-teorio", mi povas diri al vi, ke en ĝi mi trovas nenion, kion oni povus malaprobi. Mi opinias, ke la Akademio povas doni sian aprobon al via libro)* » (*PAG*, p.387).

• En letero al *Th. Cart* (la 24an de Februaro 1907), Zamenhof konsilas doni al la radikoj *stamp'* kaj *stuk'* signifon verban (*OV*, p.539, *Lingvaj Respondoj*, p.3).

Tiuj Zamenhofaj juĝoj estas senapelaciaj.

VIII. Mallertaj provoj de refuto.

Post la brila demonstro de K. Kalocsay kaj G. Waringhien (*Plena Analiza Gramatiko*, p.372-390), « *ni estas en tia stato, ke ni posedas elprovan teorion, kiu fidele klarigas, kiel estis formitaj – kaj plu ĉiutage formataj – la vortoj uzataj de Zamenhof kaj de la bonaj aŭtoroj. Plie ĉiuj nunaj uzantoj de la lingvo, se ili nur korekte lernis ĝin, skribe aŭ parole formas la vortojn laŭ la principoj de tiu teorio, eĉ se ili ne studis aparte tiujn ĉi.*

Ĉefa punkto estas jena: la probablecon, ke oni starigos novan teorion, ni povas konsideri nula, ĉar necesus, ke la nova kapablu klarigi almenaŭ tiel multe kaj tiel funde kaj esence kiel la ĝisnuna: ĝi povus esti nura parafrazo » (*A. Albault, Aktoj de la Akademio*, I, p.60).

Efektive, oni povas imagi, ke iam iu lingvisto starigos novan pli ĝustan teorion. Sed por esti kredinda kaj signifa, tiu nova teorio devos:

1. refuti ĉiujn argumentojn de la ĝis nun oficiale akceptita teorio;
2. klarigi sukcese ĉiujn lingvajn konstatojn, ĉefe en la vortfarado.

Ĝis nun, tiu hipoteza nova teorio ne aperis, eĉ je mikroskopa skalo.

Tamen pluraj gramatikistoj (ilia agemo kompensas ilian malmultecon) elkatedre

kontestis la oficialan teorion per sciencaspektaj argumentoj. Ili eĉ asertas, ke la nuligo de tiu teorio neniel povas ĝeni la komprenon. Ni ekzameni ilian argumentaron (mi citas nenium propran nomon, ĉar ja la opiniojn mi kontraŭstaras, ne la personojn mi atakas).

1) « *Temas nur pri vortiĝo en iun ajn kategorion* ».

Ke la radikoj *vortiĝas en iun ajn kategorion*, tio estas jam evidenta ekde la unua horo de lernado de Esperanto, dum kiu la lernantoj elkovras, ke el *patr'* oni povas fari tute regule *patro, patra, patre, patri*. Sed aserti tion estas same interese, kiel aserti, ke mallumas dum la nokto.

2) « *Ĉiu radiko havas nur emon vortiĝi al iu aŭ alia kategorio* ».

Estas tute certe, ke *tabl'* vortiĝas preskaŭ ĉiam al *tablo*, kaj tre malofte al *tabla, table, tabli* (cetere, tio havas simplan kaŭzon, kiun ne vidas la miopuloj: la radiko *tabl'* estas substantiva!).

Tamen ni akceptu (provizore!), ke la radiko *bros'* (ekzemple) ne havas gramatikan karakteron, sed havas nun *emon* vortiĝi substantive (*broso*). Tiam la sola utila demando estas ĉi tiu: **KUN KIU SIGNIFO?** Ĉu *broso* difinas la agon brosi? Ĉu ĝi difinas la ilon por brosi? Ĉu ĝi difinas homon brosantan? mistero... Neniam tiu demando estas farita de la "senkarakterula klando".

Same, ni akceptu (provizore!), ke *komb'* havas nur *emon* vortiĝi verbe (*kombi*). Sed kiam ĝi ne sekvas tiun *emon* kaj vortiĝas substantive aŭ adjektive, tio finvenas **AL KIU SIGNIFO?** Ĉu *kombi* difinas la agon kombi? Ĉu la ilon por kombi? Ĉu homon kombantan?

Tamen, por simplaj homoj kiel mi kaj vi, kiuj ne embarasas sin per pseŭdosciencia terminaro, la respondo estas mirinde simpla: *broso* ne povas difini agon, ĉar la difino mem de *bros'* entenas la noción *aĵo, ilo* (alidire *bros'* estas **substantiva** radiko); *kombi* nepre difinas agon, ĉar la difino mem de *komb'* entenas la noción *ago, ado* (alidire, *komb'* estas **verba** radiko).

La afero estas simplega, kiel la tuto de la lingvo Esperanto. Sed por konstati kaj aprezi tiun genian simplecon, oni devas ne ŝtopi siajn okulojn per ŝajne sciencaj argumentoj.

3) « *La kategorio plej ofte uzata estas nomata la primara vorto de la dirita radiko* ».

Ekzemple, *tablo* estas la primara vorto de la radiko *tabl'*. Kial ne?

Sed la nocio de *kategorio plej ofte uzata* malgrandigas la tutan demandon al nura statistika problemo kaj zorge preterlasas la ĉefan aferon: la **SIGNIFON** de la *primara* vorto, kaj ankaŭ la signifon de la vortoj *sekundaraj, terciaraj, kvaternaraj*...

4) « *La kategorioj estas tute arbitraj* ».

Laŭdire, la PIVa kategorio de *danc', kis', koler'*, estus arbitra. Ke la PIVa kategorio de ĉi tiuj tri radikoj estas arbitra, tre povas esti. Ili elvokas spontane *dancon, kison, koleron*, sed ankaŭ la agojn *danci, kisi, koleri*.

Kial Zamenhof tradukis ilin en la Universala Vortaro per kvin verboj? mi ne scias. Sen damaĝo por la lingvo, ili povus esti tradukitaj per kvin substantivoj, aŭ troviĝi en la PIV sub la apostrofita formo de nuda radiko. Fakte, ilia senco mem kaŭzas, ke ili hezitas inter la verba karaktero kaj la substantiva karaktero. Ilin oni povas nomi « dubkarakteraj radikoj », ĉar ne ekzistas esenca diferenco inter *kisado* (ago kisi) kaj *kisaĵo* (kontakto lipoj-vango), nek inter *kolero* (simpla fakto) kaj *kolerado* (ago pli-malpli longa).

Ni jam vidis la samon pri la vortoj *atenta, fasti, festeni*.

Sed la ekzisto de kelkaj dubkarakteraj radikoj ne malhelpas, ke la pliparto de la Esperantaj radikoj havas precizan karakteron, kaj ke Esperanto ne estus uzebla sen tiu karaktero.

En la Berlina Akademia prelego (Aŭgusto 1999), estis eldirata la argumento, ke la du vortoj *kantigi* kaj *muzikigi*, laŭforme proksimaj, havas du malproksimajn sencojn. Efektive, oni *kantigas infanojn*, ekzemple, sed oni *muzikigas poezion*.

Tiu argumento, kiu evidente celis kontraŭi la oficialan Zamenhofan teorion, estas bona, bonega, mirinde-dankinde bonega, ĉar **kun la celo pruvi ion, ĝi pruvas ekzakte la malon.**

La klarigo estas genie simpla:

- *kantigi infanojn* signifas « *igi infanojn kanti (ne kantoj)* »,
- *muzikigi poezion* signifas « *igi poezion muziko (ne muziki)* ».

Tute simple pro tio, ke *kant'* estas **verba radikoj**, dum *muzik'* estas **substantiva radikoj**. Simple kiel la ovo de Kolumbo...

5) « *La sistemo de Zamenhof estas intuicia, ne racia* ».

Alidire, la kategorio de la etnaj vortoj influis lin. Kial ne? Ĉu ekzistas homoj, kiuj neniam estas senkonscie influataj de siaj opinioj, de siaj refleksoj, de sia idiosinkrazio?

Plej malĝuste estus difini Zamenhofon, kiel faras iaj enciklopedioj, kiel « lingviston ». Zamenhof ne estis katedra lingvoteyoriulo (kiaj estas plej ofte liaj kontraŭdiruloj), sed funkciis ĉefe per geniaj intuicioj. Eble, ĝuste pro tio, tiuj intuicioj ofte preteratingas la katedrajn lingvistojn.

Estas tute certe, ke la kategorio de la etnaj vortoj influis lin. Ekzemple, kial *komb'* estas verba, dum *bros'* estas substantiva? La respondo estas simpla: la rusa lingvo havas verbon signifantan « kombi » (причёсывать), sed ne havas verbon signifantan « brosi »: por « brosi », la rusa lingvo diras « purigi brose » (чистить щёткой). Zamenhof pensis do *komb'* verbe, kaj *bros'* substantive. Se la denaska lingvo de Zamenhof estus la franca aŭ la ĉina, li eble kreus tiujn ĉi du vortojn aliaj.

Bedaŭrinde, tio estas sen rilato kun la priparolata teorio. Esperanto funkcias same bone, se *komb'* estus substantiva, kaj *bros'* verba; tiukaze, oni brosus sin per **brosilo* kaj oni kombus sin per **kombo*. Aŭ se ambaŭ radikoj estus verbaj; aŭ se ambaŭ estus substantivaj. La lingvo ne estas tia, sed povus esti tia. Male, Esperanto ne funkcias, se *bros'* kaj *komb'* estus ajnaj. Oni tiam brosus sin per « *broso* » aŭ « *brosilo* », kaj kombus sin per « *kombo* » aŭ « *kombilo* », laŭ la nura hazardo, aŭ la persona emo de la parolanto. Esperanto estus la sola lingvo, ĉu inter la planlingvoj, ĉu inter la etnaj lingvoj, en kiu la vortoj havus nenian fiksitajn signifon, sed ŝanĝiĝus laŭ onia bontrovo.

6) « *Tio ekzistas en la etnaj lingvoj, sed estas neakceptebla en Esperanto* ».

Dum la Berlina prelego de Aŭgusto 1999, tiu aserto estis dekfoje gurdita, sen ia ajn ombro de komenco de demonstreto. Sed eĉ se ĝi estus centfoje psalmokantata de granda floro, oni ne bone vidus, kial teorio tiagrade racia devus esti neakceptebla en la racia lingvo Esperanto. Se la Esperantaj radikoj estus senkarakteraj, tiam Esperanto estus verŝajne la sola lingvo en la mondo, kiu havus tiun apartaĵon.

7) « *La radikoj nur difinas aŭ aĵon-ulon, aŭ econ, aŭ agon* ».

Kelkaj personoj, el la « senkarakterula klano », rifuzas la esprimon *gramatika karaktero*

de la radikoj. Sed ili rekonas, ke la Esperantaj radikoj difinas, jen aĵon-ulon, jen kvaliton, jen agon. Ekzemple, *bros'* kaj *komb'* en si mem estas senkarakteraj, sed ilia difino entenas « *bros' = ilo por...* », « *komb' = ago...* ». Konsentite. Fakte, tio estas nur alia maniero, diri, ke *bros'* estas substantiva, kaj *komb'* verba. Simpla vort-afero.

Do temas esence pri vorta kverelo, ne tre grava. Ne temas pri funda gramatika kverelo, komparebla kun la afero *ata-ita*.

8) « Tiu teorio kaŭzas konfuzon inter sintakso kaj semantiko ».

Sed tiuj du aferoj estas konstante ligataj! Fakte, temas ne pri konfuzo, sed pri reciproka influo.

En la franca lingvo, ekzemple, oni ofte konstatas tiujn du fenomenojn.

- **Semantiko influas sintakson.** Anstataŭigo de vorto (semantika ŝanĝo) estigas alian vortordon (sintaksa ŝanĝo): *une vieille maison* « malnova domo », *une maison neuve* (ne: *une neuve maison*, neebla vortordo) « nova domo ».

- **Sintakso influas semantikon.** Alia aranĝo de frazo (sintaksa afero) ŝanĝas ĝian signifon (semantika afero): *un grand homme* « fama homo », *un homme grand* « altkreska homo »; *un brave homme* « bona homo », *un homme brave* « kuraĝa homo »; *une pièce sombre* « malluma ĉambro », *une sombre pièce* « malĝojega teatraĵo ». Ĉeesto aŭ foresto de komo (sintaksa afero) tute aliigas la signifon (semantika afero): *les élèves qui ont fini leur devoir peuvent sortir* « la lernantoj finintaj sian taskon rajtas eliri »; *les élèves, qui ont fini leur devoir, peuvent sortir* « jam fininte sian taskon, la lernantoj rajtas eliri ».

Ankaŭ en Esperanto, oni konstatas reciprokan influon inter sintakso kaj semantiko.

- **Semantiko influas sintakson.** Oni povas paroli pri « *legata libro* » kaj pri « *aŭdata bruo* », kun prezencaj participoj. Sed, kiam ĉesas la legado de la libro kaj ankaŭ la aŭdo de la bruo, la rezulto estas ĝenerale « *legita libro* » kaj « *ne plu aŭdata bruo* ». Alivorte, la signifo de *legi* kaj *aŭdi* (semantika afero) havas fortan influon al la maniero uzi iliajn participojn (sintaksa afero).

- **Sintakso influas semantikon.** En la frazo « *oni forprenis de Johanino la infanon* », la esprimo “*de Johanino*” estas komplemento de *forprenis*: infano, kies patrinon oni ne nomas, estis disigita de Johanino, eble nura vartistino. En « *oni forprenis la infanon de Johanino* », la esprimo “*de Johanino*” estas komplemento de *infanon*: la fil(in)o de Johanino estis forprenita, eble dum la foresto de la patrino. La du frazoj estas semantike malsamaj, nur pro sintaksa ŝanĝo, sen iu leksika modifo. La kaŭzo de tiu malsameco ne estas ia mita “miksajo semantiko-sintakso”, sed simple la multsenceco de la prepozicio *de*.

9) « Pluraj akademianoj rifuzas tiun teorion » (Berlino, 1999).

Tre povas esti. Verŝajne estas.

Tio estas bona ekzemplo de t.n. “aŭtoritatula argumento”, mezepoke skolastika, la plej malbona el ĉiuj. Des pli, ke oni povas kontraŭi ĝin per bumeranga argumento, ke tiu teorio estis subtenata de *Zamenhof*, *Saussure*, *Wüster*, *Minor*, *Kalocsay*, *Waringhien*, se citi nur la plej eminentajn fakulojn, aprobata de 34 akademianoj (kontraŭ 1 nea voĉdono de R. Rossetti, kaj 1 sindetena de E. Sonnenfeld, mi ne scias kial), kaj oficialigita de la Akademio en Junio 1967 (*Aktoj de la Akademio*, I, p.57).

Do ĝi povas esti rifuzata de pluraj akademianoj (kiujn mia argumentaro evidente ne konvinkos), kaj tamen farti tre bone.

Homonimoj en Esperanto

Iam, al kandidato ĉe la unuagrada ekzameno, la ekzamenanto demandis: «*ĉu homonimoj ekzistas en Esperanto?*» Ĉar la ekzamenato tute ne atendis tian demandon, li iom hezitis, kaj fine respondis: «*mi supozas, ke ne*», verŝajne pro tio, ke li opiniis nekonscie, ke aŭtoro de planlingvo ne metus intence en sian kreaĵon vortojn, kiuj havus plurajn tute malsamajn signifojn.

Ŝed li eraris: homonimoj ekzistas en Esperanto, kiel en ĉiu vivanta lingvo.

Jen listo de PIVaj homonimoj, tre verŝajne ne kompleta.

- **aerogramo**: ① aerpoŝta letero; ② diagramo pri la aero.
- **arkeo**: ① ŝipo de Noa; ② prabakterio.
- **atlaso**: ① kolekto de mapoj; ② sateno; ③ nuka vertebro.
- **bato**: ① frapo; ② Biblia mezurunuo.
- **bito**: ① metala ŝtipo; ② komputika mezurunuo.
- **blanketo**: ① subskribita dokumento; ② raguo.
- **brizo**: ① regula vento; ② planto.
- **cisto**: ① natura veziko; ② Mediteranea arbusto.
- **dekano**: ① fakultata profesoro; ② iu kemiaĵo.
- **do, re, mi, la, si**: ① muziknotoj; ② diversaj leksikaj elementoj.
- **drilo**: ① borilo; ② paviano.
- **ero**: ① konsistiga elemento; ② kronologia sistemo (= erao).
- **faŭno**: ① kampara duondio; ② tuto de bestoj de unu regiono.
- **franko**: ① ano de ĝermana tribo; ② franca-belga eksa monunuo.
- **galio**: ① planto el la rubiacoj; ② elemento n-ro 31 (= galiumo).
- **glio**: ① angla kanto; ② nerva ĉelaro.
- **glicino**: ① ornama planto; ② unu el la aminoacidoj.
- **gnomo**: ① fabela estaĵo; ② sentenco, proverbo.
- **graduso**: ① mezurunuo por anguloj; ② latina vortaro.
- **grafo**: ① nobelo; ② matematika grafikaĵo.
- **gruzo**: ① malsubtila sablo; ② ano de Kaŭkaza popolo (= kartvelo).
- **ĝino**: ① grenbrando; ② araba fabela estaĵo (= ĝinno).
- **hilo**: ① specio de anuroj; ② bazo de la ovo.
- **hino**: ① hibrido ĉevalo-azenino; ② Biblia mezurunuo.
- **hupo**: ① hartufo; ② veturila avertilo.
- **jonio**: ① simbolo de virina seksorgano; ② elemento n-ro 90 (= ionio).
- **kabo**: ① promontoro; ② fiakro; ③ Biblia mezurunuo.
- **kanao**: ① planto; ② japana skribsigno.
- **karpo**: ① manĝebla fiŝo; ② pojna ostaro (= karpeo).
- **kataro**: ① muka inflama elfluo; ② ano de dualisma religio.
- **katarakto**: ① okula malsano; ② akvofalo.
- **kivio**: ① frukto; ② Novzelanda birdo.
- **koro**: ① muskola organo; ② Biblia mezurunuo.
- **kornedo**: ① monaĥina kapvesto; ② standardo-portisto.
- **korpuso**: ① divido de armeo; ② kolekto de tekstoj.

- **kreko** : ① malgranda anaso ; ② malgranda golfo.
- **labo** : ① stomaka membrano ; ② laboratorio.
- **lantano** : ① elemento n-ro 57 ; ② planto (= lentano).
- **leo** : ① ŝipflanko ; ② Rumania monunuo.
- **liro** : ① korda muzikilo ; ② Italia eksa monunuo.
- **lukso** : ① uzado de rafinitaĵoj ; ② unuo de lumiga intenso.
- **marko** : ① speciala signo ; ② eksa monunuo en Finnlando kaj Germanio.
- **mato** : ① maldelikata kovraĵo ; ② ŝakigita reĝo.
- **medo** : ① alkohola trinkaĵo ; ② ano de gento loĝanta en Medio.
- **mino** : ① subtera kavaĵo ; ② antikva mezurunuo.
- **numido** : ① genro de birdoj ; ② ĉefa gento de Numidio.
- **parto** : ① io apartigita ; ② ano de olima skita popolo.
- **pato** : ① malprofunda kaserolo ; ② ŝakluda termino.
- **peso** : ① ago mezuri la pezon ; ② Sud-Amerika monunuo.
- **piĉo** : ① vulvo kaj/aŭ vagino ; ② tonalto.
- **pigo** : ① birdo ; ② mezurunuo de longo.
- **pirolo** : ① birdo (= pirulo) ; ② plurjara herbo ; ③ heterocikla kemiaĵo.
- **popo** : ① ortodoksa pastro ; ② moderna muzikstilo.
- **psilo** : ① jonglisto-dresisto ; ② insekto el la hemipteroj.
- **rando** : ① ekstrema parto de objekto ; ② Sud-Afrika monunuo.
- **reduto** : ① fortifikajo ; ② maskobalo.
- **reto** : ① teksaĵo el ŝnuroj ; ② ano de gento loĝanta en Retio.
- **rodeo** : ① alpelo de brutoj ; ② Azia planto.
- **roko** : ① malmola parto de terkrusto ; ② usoneska muzikaĉo.
- **rumbo** : ① grado de kompasa skalo ; ② danca muziko.
- **rupio** : ① Hindia monunuo ; ② haŭta lezo.
- **septo** : ① intervalo inter sep notoj ; ② interna mureto.
- **sinuso** : ① matematika termino ; ② enosta facia kavaĵo.
- **soleo** : ① genro de fiŝoj ; ② krura muskolo.
- **sparo** : ① longa peco en maŝino ; ② mara fiŝo.
- **spato** : ① mineralo ; ② osta tumoro ; ③ granda brakteo.
- **spino** : ① vertebra kolumno ; ② fizika nombro.
- **spiranto** : ① frikativa konsonanto (= frikativo) ; ② planto el la orkidacoj (= spiranteso).
- **stanco** : ① okversa strofo ; ② dekoraciita ĉambrego.
- **stipo** : ① planto el la poacoj ; ② funga trunketo (= stipito).
- **ŝoto** : ① piedbato sur pilkegon ; ② malaltnivela regiono.
- **taksio** : ① luebla aŭtomobilo ; ② tropismo.
- **talo** : ① tarsi ostoj ; ② vegeta korpo de la algoj.
- **talio** : ① korpoparto ; ② elemento n-ro 81 (= taliumo).
- **taro** : ① pezo de entenantajo ; ② specio de tropika planto.
- **tartano** : ① velŝipeto ; ② skota lanŝtofo.
- **tektono** : ① Azia arbo ; ② deformiĝo de la terenoj.
- **temo** : ① preparolataĵo ; ② bizanca regiono.
- **temperi** : ① iel pentri ; ② dividi la okton en 12 partojn.
- **termo** : ① elemento ; ② publika banejo (plurale).
- **termito** : ① insekto ; ② iu teknika miksaĵo.

- **tiko**: ① nerva kuntiro; ② kotona ŝtofo.
- **toniko**: ① baza noto de la gamo; ② medikamento.
- **topiko**: ① parto de la retoriko; ② medikamento.
- **trako**: ① konstruaĵo el reloj; ② ano de gento loĝanta en Trakio.
- **trito**: ① muzika intervalo; ② genro de amfibioj (= trituro).
- **tritono**: ① atomkerno de tritio; ② mar-dio; ③ genro de amfibioj (= trituro).
- **trolo**: ① poŝforma fiŝreto; ② skandinava fabela estaĵo.
- **vasko**: ① fontana konko; ② eŭsko.
- **vazo**: ① ujo; ② vaskulo.
- **zenano**: ① Hindia parto de domo; ② ŝtofo.

En tiun liston mi enmetis nur la verajn homonimojn, registritajn en la PIV sub du apartaj kapvortoj. Sed evidente mi ne enmetis la diversajn uzmanierojn de unu vorto (ekzemple, en la PIV, la vorto *libro* havas 8 signifojn; sed ne temas pri veraj homonimoj).

Kelkaj homonimoj estas tiaj nur rilate al sia radikalo, sed estas cititaj en la PIV laŭ du malsamaj gramatikaj kategorioj.

- **agamia**: senseksa. • **agamio**: Amerika birdo.
- **akra**: tranĉa aŭ pika. • **akro**: unuo de termezurado (= akreo).
- **akrocefalo**: birdo el la silviedoj. • **akrocefala**: pintkrania.
- **aktina**: kemie aktiva. • **aktino**: muskola proteino.
- **bari**: meti ion por malhelpi la iradon. • **baro**: unuo de premo.
- **bejo**: turka guberniestro. • **beja**: ruĝbruna.
- **bori**: fari truon en. • **boro**: elemento n-ro 5.
- **braĵi**: kuntiri velon. • **braĵo**: skribo por blinduloj.
- **dura**: malmola. • **duro**: hispana monunuo.
- **galanto**: plurjara herbo. • **galanta**: uzanta rafinitan ĝentilecon.
- **kalandri**: glatigi tolaĵojn. • **kalandro**: paseroforma birdo.
- **kardinala**: matematika termino. • **kardinalo**: eklezia altrangulo.
- **kniki**: flankenflexiĝi. • **kniko**: specio de centaŭreo.
- **kopuli**: sekskuniĝi. • **kopulo**: verbo akompananta predikativon.
- **levi**: meti pli alten. • **levo**: bulgara monunito.
- **likvidi**: reguligi. • **likvido**: speco de konsonanto.
- **logi**: peni altiri al si. • **logo**: ① marista mezurilo; ② biblia mezurunuo.
- **maĉi**: buŝe dispremi. • **maĉo**: sporta konkurso (= maĉo).
- **mola**: cedanta al premo. • **molo**: grammolekulo.
- **radikala**: trafanta la principojn. • **radikalo**: ① vorto sen finaĵo; ② ero de molekulo.
- **rodo**: marparto ŝirmita kontraŭ la vento. • **rodi**: ronĝi.
- **rufa**: ruĝe flava. • **rufo**: ferdekdomo.
- **sekvestri**: forpreni kaj deponi. • **sekvestro**: nekroza osto.
- **sola**: ne akompanata. • **solo**: koloida pseŭdosolvaĵo.
- **solena**: aranĝata kun pompo. • **soleno**: mara molusko.
- **steno**: mezurunuo de forto. • **steni**: stenografi.
- **sublima**: altece distingiĝa. • **sublimi**: pasigi korpon de solida stato en vaporan.
- **taki**: ① ĝiri; ② boardi. • **tako**: Bangladeŝa monunuo.
- **tatui**: fari desegnaĵojn sur haŭto. • **tatuo**: Sud-Amerika animalo.
- **trado**: tropika vento (= alizeo). • **tradi**: forpreni havaĵon de ŝuldanto.
- **vara**: prezentanta internan devion. • **varo**: ① vendebla objekto; ② mezurunuo.

Aliaj homonimoj rezultas de la ĉeesto de sufikso.

- **fekulo** : tuber-amelo. • **fek'ulo** : fi-homo.
- **heroino** : danĝera drogo. • **hero'ino** : femala heroo.
- **kometo** : vaganta astro. • **kom'eto** : malgranda komo.
- **menueto** : danco. • **menu'eto** : mallonga menuo.
- **mitulo** : iu molusko. • **mit'ulo** : ulo iel rilata al mitoj.
- **pistilo** : femala flororgano. • **pist'ilo** : instrumento per kiu oni pistas.
- **radaro** : eholokalizilo. • **rad'aro** : aro da radoj.
- **romano** : literaturaĵo. • **Rom'ano** : loĝanto en Romo.
- **sud'ano** : loĝanto en sudo. • **Sudano** : Afrika lando.
- **urino** : piso. • **ur'ino** : femala uro.
- **valeto** : ĉambristo. • **val'eto** : malgranda valo.

Oni trovas homonimojn ankaŭ ĉe la propraj nomoj.

- **Algolo** : ① stelo ; ② programlingvo.
- **Belo** : ① kromnomo de la dio Marduko ; ② Usona inĝeniero.
- **Elbo** : ① Italia insulo ; ② Germania rivero.
- **Eŭropo** : ① kontinento ; ② mita virino amata de Zeŭso.
- **Loto** : ① Francia rivero ; ② Biblia persono.
- **Paskalo** : ① franca filozofa ; ② programlingvo.
- **Vieno** : ① ĉefurbo de Aŭstrio ; ② Francia urbo ; ③ Francia rivero.

Kelkaj komunaj vortoj estas homonimoj de propra nomo.

- **akeo** : bradipo. • **Akeo** : Aŝajano.
- **akeno** : seka frukto. • **Akeno** : Germana urbo (= Aŝeno).
- **andreo** : genro de muskoj. • **Andreo** : vira nomo.
- **andromedo** : arbusteto. • **Andromedo** : helena princino.
- **anno** : japana dolĉaĵo. • **Anno** : virina nomo.
- **atlaso** : ① maparo ; ② sateno ; ③ nuka vertebro. • **Atlaso** : Afrika montaro.
- **bruto** : besto grege bredata. • **Bruto** : latina virnomo.
- **buleo** : papa dekreto. • **Buleo** : angla matematikisto.
- **ciro** : ŝmirajo por ledajoj. • **Ciro** : persa reĝo.
- **dako** : ano de traka tribo (= daco). • **Dako** : ĉefurbo de Bangladeŝo (= Dakko).
- **dekano** : ① ĉefprofesoro ; ② iu kemiaĵo. • **Dekano** : Hindia duoninsulo (= Dekkano).
- **dieto** : nutromaniero. • **Dieto** : parlamento en kelkaj landoj.
- **dilo** : ligna trabeto. • **Dilo** : ĉefurbo de Orienta Timoro.
- **dono** : ago doni. • **Dono** : Eŭropa rivero.
- **elektro** : fizika fenomeno. • **Elektro** : fratino de Oresto.
- **eriko** : arbusteto. • **Eriko** : vira nomo.
- **estero** : kemia kombinaĵo. • **Estero** : virina nomo (= Estera).
- **francio** : elemento radioaktiva n-ro 87 (= franciumo). • **Franc'io** : Eŭropa lando.
- **francisko** : milithakilo. • **Francisko** : vira nomo.
- **frondo** : branĉo kun folioj. • **Frondo** : ribelo en Francio, en la 17a jc.
- **galbo** : kurba konturo. • **Galbo** : vira nomo.
- **gango** : minerala maso. • **Gango** : Hindia rivero.
- **gento** : homa grupo. • **Gento** : Belgia urbo.
- **germanio** : elemento n-ro 32. • **German'io** : Eŭropa lando.

- **gordio** : specio de vermoj. ● **Gordio** : Frigia reĝo.
- **ĝino** : ① grenbrando ; ② araba fabela estaĵo (= ĝinno). ● **Ĝino** : fondinto de ĝainismo.
- **har'aro** : tuto de haroj. ● **Hararo** : ĉefurbo de Zimbabveo.
- **ionio** : elemento n-ro 90 (= jonio). ● **Ionio** : Grekia regiono.
- **iriso** : parto de la okulo. ● **Iriso** : kurierino de la dioj.
- **julo** : forta remilo. ● **Julo** : vintra festo.
- **karolo** : religia popolkanto. ● **Karolo** : vira nomo.
- **kataro** : ① muka inflama elfluo ; ② ano de dualisma religio. ● **Kataro** : Azia ŝtato.
- **koreo** : muskola malsano. ● **Koreo** : Azia ŝtato.
- **kubo** : regula sesedro. ● **Kubo** : Amerika ŝtato.
- **lucerno** : pendanta lampo. ● **Lucerno** : Svisia urbo.
- **luko** : aperturo en tegmento. ● **Luko** : vira nomo.
- **maniko** : parto de vesto. ● **Maniko** : maro inter Anglio kaj Francio.
- **miceno** : ombrefungo. ● **Miceno** : Grekia urbo.
- **oranĝo** : frukto. ● **Oranĝo** : ① Francia urbo en Provenco ; ② rivero en Sud-Afriko.
- **paskalo** : unuo de premo. ● **Paskalo** : ① franca filozofo ; ② programlingvo.
- **polonio** : elemento radioaktiva n-ro 84. ● **Polonio** : kortegano en Hamleto.
- **ponto** : superrivera konstruaĵo. ● **Ponto** : antikva Azia reĝlando.
- **porto** : ago porti. ● **Porto** : Portugalia urbo.
- **pretorio** : pretorejo. ● **Pretorio** : ĉefurbo de Sud-Afriko.
- **rabato** : malaltigo de prezo. ● **Rabato** : ĉefurbo de Maroko.
- **ramo** : murrompilo. ● **Ramo** : avataro de Viŝnuo.
- **regulo** : normo, leĝo. ● **Regulo** : virnomo.
- **ruto** : venena planto. ● **Ruto** : edzino de Boazo.
- **sagitario** : genro de herboj. ● **Sagitario** : konstelacio kaj zodiaka signo (♐).
- **samaro** : elemento n-ro 62. ● **Samaro** : regiono de Palestino.
- **savo** : ago savi. ● **Savo** : Eŭropa rivero.
- **sejno** : fiŝkapti trenreto. ● **Sejno** : Francia rivero.
- **seleno** : elemento n-ro 34. ● **Seleno** : helena diino.
- **senegala** : ne havanta egalajon. ● **Senegala** : rilata al Senegalio.
- **tarso** : ostaro de la piedradiko. ● **Tarso** : Turkia urbo.
- **termino** : vorto aŭ sintagmo. ● **Termino** : Romana dio.
- **tirano** : absoluta regnestro. ● **Tirano** : ĉefurbo de Albanio.
- **titano** : elemento n-ro 22. ● **Titano** : filo de Urano kaj Gaja.
- **varo** : ① vendebla objekto ; ② mezurunuo. ● **Varo** : Francia rivero.
- **vato** : mola kotono. ● **Vato** : skota inĝeniero.

Oni ĉi tie vidas klare la nepran necesecon de la uskleco (elekto inter uzo de minusklo kaj uzo de majusklo). Esprimo kiel «*kuba sistemo*» rilatas al mineralogio, dum «*Kuba sistemo*» rilatas al ekonomio aŭ politiko de la insulo de *Fidel Castro*.

Ne komprenis tion la aŭtoro de la «*iam kompletigota verkaro de I.L.zamenhof*»!

Oni povus kredi, ke almenaŭ la afiksoj situas ekster tiu problemo. Neniel.

- **an** : ① membro, loĝanto, partiano ; ② saturita hidrokarbonido.
- **at** : ① partipico ; ② oksigenhava acido aŭ salo.
- **en** : ① subfamilio ; ② duoble ligita hidrokarbonido.
- **id** : ① filo ; ② senoksigena acido aŭ salo.
- **ik** : ① nomoj de arto aŭ tekniko ; ② nomoj de oksido.

- **il**: ① instrumento ; ② kemia radikalo.
- **in**: ① femalo ; ② kemiaĵo ; ③ trioble ligita hidrokarbonido.
- **it**: ① participo ; ② inflama malsano ; ③ oksigenhava acido aŭ salo.
- **meta**: ① supera, posta ; ② kemia prefikso.
- **on**: ① frakcio ; ② ketono ; ③ funkcia unuo.
- **oz**: ① malsano ; ② nomo de oksido kaj salo ; ③ monosakarido.

Evidente, tiu listo estas ne kompleta, eĉ ne strebas al kompleteco.

Ĉu estas malavantaĝo en la ekzisto de tiuj homonimoj? Plej ofte ne. Ĝenerale, la kunteksto ebligas komprenon de la ĝusta senco de la vorto. Se pastoro predikas, ke «*saĝa viro konstruis sian domon sur roko*», dum iu diras «*miaj gefiloj tre ŝatas danci rokon*», eĉ idioto ne faras konfuzon inter ambaŭ rokoj. Same, neniu konfuzas **dekanon** (saturita hidrokarbonido $C_{10}H_{22}$) kun **dekano** (fakultata ĉefprofesoro).

Tamen, kelkfoje, la ekzisto de homonimoj povas estigi etan ĝenon.

Kelkaj konsideroj pri la ortografia problemo.

Rilate la ortografion, oni povas klasi la lingvojn en du grupojn (nur tre proksimume):

- La lingvoj, en kiuj la **origino** de la vortoj estas pli grava, ol ilia **prononco**. Plej ofte, ili estas maljunaj lingvoj, riĉigitaj de longa kultura tradicio.
- La lingvoj, en kiuj la **prononco** de la vortoj estas pli grava, ol ilia **origino**. Ofte, sed ne ĉiam, ili estas junaj lingvoj, ankoraŭ ne ŝarĝitaj de longa kultura tradicio.

En la unuan grupon, ni metu senhezite la anglan, la germanan, la francan (kaj, almenaŭ parte, la hispanan kaj la portugalan), kiuj havas **ortografion etimologian**.

Kial la franca lingvo skribas **chlorophylle** «*klorofilo*», kaj ne pli simple **klorofil**? Estas por montri la **signifon** de tiu vorto: **chloro** venas de la greka **χλωρός** «*verda*», kaj **phylle** de **φύλλον** «*folio*». Klorofilo estas do «*la verda konsistaĵo de la folioj*».

Tiu vortero **phyll**, kiu havas nenion komunan kun **phyl**, **phil** kaj **fil**, estas trovebla ankaŭ, ekzemple, en **phyllophage**, tuj komprenebla kiel «*foliomanĝanto*». Sed en **phylogénique** «*filogenia*», la vortero **phyl** signifas «*raso, tribo*» (greka **φῦλον**). En **philologie** «*filologio*», **phil** signifas «*ami, ŝati*» (greka **φιλέω**). Kaj en **filiforme** «*fadenforma*», **fil** estas simple la franca **fil** «*fadeno*».

Kial la germana lingvo skribas **Philanthropie**, **Rhythmus**, **Theologie**, kun pluraj **h**, kiuj ludas nenian rolon en la prononco? Kial la angla skribas **philanthropy**, **rhythm**, **theology**, kun pluraj **h** kaj **y** ne-necesaj? Simple pro tio, ke tiuj vortoj entenas la grekajn **φιλέω** «*ami*», **ἄνθρωπος** «*homo*», **ῥυθμός** «*ritmo*», **θεός** «*dio*». Kial la hispana skribas **hacer** «*fari*» kaj ne **azer**? Tial, ke tiu verbo venas de la latina **fācere**.

La granda **avantaĝo** de tiu sistemo estas do, ke ofte la vortoj havas tujan signifon, ĉe la unua vido. La **malavantaĝo** estas, ke la ortografio estas kelkfoje malsimpla.

En la duan grupon, ni metu la kroatan, la ĉeĥan, la finnan, la litovan, la svahilan, la tahitian, la turkan, kaj multajn aliajn. En tiuj lingvoj, la skribmaniero de la vortoj spegulas ĉefe ilian prononcon kaj preterlasas ilian originon: ili havas **ortografion fonetikan**.

La **avantaĝo** de tiu sistemo estas, ke la ortografio estas plej ofte simpla. La granda **malavantaĝo** estas, ke multaj vortoj ne havas unuavidan signifon. Male de la francaj respondaj vortoj, la hispanaj **filófago**, **filogénico**, **filología**, **filiforme**, diras nenion pri siaj signifoj. En la itala **ittologia** «*iktiologio*», oni rekonas pli malfacile **ιχθύς** «*fiŝo*»

kaj λόγος «parolado», ol en la franca *ichthyologie*, en la germana *Ichthyologie* aŭ en la angla *ichthyology*. Krom por fakulo, nenio en la aspekto de la vortoj montras, ke la rusaj adjektivoj *термический* «termika» kaj *терминологический* «terminologia» (kiuj ambaŭ entenas *term*) havas nenion komunan: la unua entenas la grekan *θερμός* «varmo», la dua la latinan *terminus* «termino».

Dua granda **malavantaĝo** de tiu sistemo estas do, ke ĝi multigas la nombron de la **homonimoj**. Jen la **ĉefa afero**. Kiel ni vidis, al la francaj *phyll*, *phyl*, *phil*, *fil* (ne homonimaj, almenaŭ skribe), respondas la italaj-hispanaj *fil*, *fil*, *fil*, *fil* (perfekte homonimaj).

En internacia helplingvo, kiel estas Esperanto, ĉu oni preferu *etimologian ortografion* (malfacilan, sed precizan), aŭ *fonetikan ortografion* (facilan, sed malprecizan)? Evidente, **fonetikan**. Sed post elekti (oportune!) tiun sistemon, ni ne plendu pri la **ekzisto de homonimoj**: tio estas la neevitebla kosto de fonetika ortografio.

Se Esperanto havus etimologian ortografion (kiel tiu de *Interlingua*), la vortoj **pirometro** kaj **pirotekniko** estus skribataj **pyrometro* kaj **pyrotechniko*: oni ne erarus pri la signifo, tuj komprenante, ke ili entenas *πῦρ* «fajro». Sed kun la Esperanta fonetika ortografio, estas risko, ke oni povas erari, kaj kompreni ilin en la senco «*pirometro*: aparato por mezuri la pirojn» kaj «*pirotekniko*: tekniko de piro-produktado». La vorto **hidrofila** (male de **hydrophila*) povas esti komprenata kiel «rilata al iu filo de hidro» kaj la **filogenio** (male de **phylogenio*) povus difini la *genion* de mia *filo*.

Sed tiu ĝeno ne estas granda. Oni eĉ rajtas diri, sen paradokso, ke estas tre oportuna afero, ke Esperanto havas homonimojn.

Unue, tio ebligas vortludojn: kion farintus R.Schwartz sen ekzisto de homonimoj? Li ne povus paroli pri «*letero sendata sendita al sendota fraŭlino*» (sen'data, send'ita, sen'dota).

Kaj ĉefe, tio pruvas, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Efektive, homonimoj ekzistas en la naturo mem. Kelkaj aŭtoroj de planlingvoj opiniis, ke la vortoj de planlingvo devas esti perfekte unusencaj. Sed tiuj teoriuloj falis en la kaptilon de neuzebla artefaritaĵo.

Kaj oni neniam tro rediros, ke Esperanto **ne** estas artefarita lingvo. Verŝajne, en la tuta mondo, la sama vorto **kiwi** difinas kaj Novzelandan birdon kaj la frukton de aktinidio. La **natura** lingvo Esperanto ne povas agi alimaniere, ol per la esperantigo de tiu nomo, sub la formo *kivio*, por difini ambaŭ nociojn.

Zamenhof tiris la vorton **skatolo** el la itala **scàtola**. Bone. Sed poste, kemiistoj bezonis vorton por nomi la 3-metil-indolon, malbonodoran substancon troveblan en fekaĵo kaj havantan alkoholan funkcion. Internacie, tiu vorto estas **skatol**, el la greka **σκατός** «fekaĵo», kun la finaĵo **ol**, pro la alkohola funkcio. En la **natura** lingvo Esperanto, estus neeble, ke ĝi ne ekzistus sub sia internacia formo. Jen pro kio ekzistas du **skatoloj**, el kiuj nur unu malbonodoras (pri la alia, dependas de la entenaĵo).

Mi diris, ke ĝenerale la ekzisto de homonimoj ne igas la lingvon pli malfacile uzebla. Tamen laŭeble oni evitu tion. Kelkfoje, la vortaristoj evitis tre oportune la ekziston de homonimoj per la taŭga elekto de la fonta vorto. La franca vorto **scolopendre** difinas: genron de miriapodoj kaj specion de filiko. Se la franca vorto estus la fonto de la esperanta vorto, ĉi tiu estus **skolopendro**, kaj estus dusenca. Sed niaj vortaristoj tiris tre lerte la nomon de la besto kaj la nomon de la filiko, ne de la franca lingvo, sed de la latina. Tiel la besto, latine **scōlōpendra**, donis la vorton **skolopendro**. Kaj la nomo de la filiko, latine **scōlōpendrium**, estas **skolopendrio**. Dank' al tiu oportuna elekto, tiuj du vortoj estas paronimoj (vortoj similaj, tamen ne identaj), sed ne homonimoj.

Internacieco de la geografiaj nomoj

Plej ofte, la geografiaj nomoj tre similas inter la diversaj lingvoj. Ekzemple, ne estas notindaj diferencoj inter: france **Belgique**, flandre **België**, itale **Bèlgi**, angle-hungare **Belgium**, hispane **Bélgica**, germane-svede **Belgien**, novgreke **Βέλγιο**, pole **Belgia**, ruse **Бéльгия**, japane **ベルギー** *berugī*. Ĉiuj tiuj nomoj estas identaj rilate la signifon, kaj pli-malpli similaj rilate la formon. Ĉiu lingvo nur adaptas ilin al sia fonetiko kaj al sia skribo.

Tamen, ekzistas esceptoj. La lando, kiun la preskaŭ-tuta homaro nomas *Finland*, estas nomata en tiu lando mem, ne *Finland*, sed per tute alia vorto: *Suomi*. Same, la albanoj nomas sian landon *Shqipëri*, kaj la hindoj nomas la sian *Bharat*. Do oni povas, kaj rajtas, kaj devas, fari la demandon: ĉu Esperanto devas konformiĝi al la **internacia** uzado, aŭ al la **enlanda** uzado? ĉu Esperanto estas **internacia** lingvo uzanta **internaciajn** vortojn?

I. Opinio de Zamenhof.

Kiel ĉiam, ni unue demandu al Zamenhof mem, kion li opinias pri tiu problemo.

En la *Unua Libro*, li klarigis la kriteriojn, kiujn li alprenis por certigi la **maksimuman internaciecon** de la leksiko. Jen la teksto:

1. La vortojn, kiuj estas **egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj**, mi lasis tute **sen ia ŝanĝo**.

2. El la vortoj, kiuj en malsamaj lingvoj sonas malegale, mi prenis aŭ tiujn, kiuj estas **komunaj al du aŭ tri plej ĉefaj eŭropaj lingvoj**, aŭ tiujn, kiuj apartenas nur al unu lingvo, sed estas popularaj ankaŭ ĉe la aliaj popoloj.

3. En tiuj okazoj, kiam la donita vorto en ĉiu lingvo sonas alie, mi penis trovi vorton, kiu havus eble nur signifon proksimuman aŭ uzon pli maloftan, sed estus **konata de la plej ĉefaj nacioj**.

4. En la ceteraj okazoj, mi prenis ordinare el **la lingvo latina**, kiel lingvo duone internacia.

5. Mi flankiĝadis de tiuj ĉi reguloj nur tie, kie tion ĉi postulas apartaj cirkonstancoj, kiel ekzemple la evito de homonimoj, la simpleco de la ortografio, ktp.

(*Fundamenta Krestomatio*, 18a eldono, p.238).

Tiu **fundamenta teksto** ne koncernas speciale la geografiajn nomojn. Sed evidente, se ĝi aplikiĝas al la ĝenerala leksiko, ĝi des pli logike aplikiĝas al la geografia leksiko.

Kaj dekoj da ekzemploj montras, ke en la elekto de la geografiaj nomoj, Zamenhof ĉiam sekvis la ĉi-suprajn regulojn, kaj ĉiam konsideris **NUR LA INTERNACIAN UZADON** de la nomo kaj **neniam** la etnolingvan uzadon.

Jen listo de geografiaj nomoj. Ĉiuj estas ŝulditaj al Zamenhof mem. Oni povos kompari la **internacian zamenhofan** nomon, kun fikcia nomo etnolingva (signita de asterisko).

Aŭstrujo (latina *Austrīa*, angla-pola *Austria*, hispana *Austría*, rusa *А́встрия*, novgreka *Αυστρία*) kaj ne ***Osterajfio** (germana *Österreich*, nederlanda *Oostenrijk*).

Bukareŝto (germana *Bukarest*, angla *Bucharest*, franca *Bucarest*, pola *Bukareszt*, rusa *Бухарэ́ст*) kaj ne ***Bukureŝto** (rumana *București*).

Danubo (latina *Dānūbīus*, franca-angla *Danube*, itala *Danūbio*) kaj ne ***Donauo** aŭ ***Dunaĵo** aŭ ***Dunavo** aŭ ***Dunao** (germana *Donau*, pola-ĉeĥa-kroata *Dunaj*, rusa *Дуна́й*, serba-bulgara *Дунав*, hungara *Duna*, rumana *Dunărea*). La latindevena nomo **Danubo** estas perfekta ilustraĵo de la 4a ĉi-supra regulo.

Danujo (latina *Dānīa*, rusa *Да́ния*, pola *Dania*, hungara *Dánia*) kaj ne ***Danmarko**

(dana Danmark).

Egipt'ujo (latina Ægyptus, helena Αἴγυπτος, angla-ĉeĥa Егyпт, germana Ägypten, franca Égypte, nederlanda Egypte, hispana Egipto, pola Egipt, rusa Егíпет) kaj ne ***Misro** (araba مِصر *miṣr*, turka MİSİR). Ni notu, ke nur unufoje Zamenhof uzis *Egipto* kiel nomon de la lando: « en la tago de Bazilo Egiptano, на Василья Египтянина » (*La Revizoro*, p.15).

Finlando (germana-norvega Finnland, angla-sveda-dana Finland, franca Finlande, pola Finlandia, rusa Финляндия) kaj ne ***Suomio** (finna Suomi).

Florenco (latina Flōrentīa, franca-angla Florense, hispana Florencia, germana Florenz, pola Florencja, ĉeĥa Florencie, rusa Флорéнция, novgreka Φλωρεντία) kaj ne ***Firenzo** (itala Firenze).

German'ujo (latina Germānīa, angla Germany, rusa Гермáния, novgreka Γερμανία) kaj ne ***Dojĉlando** (germana Deutschland, nederlanda Duitsland, dana Tyskland).

Grek'ujo (latina Græcīa, itala-hispana Grecia, franca Grèce, angla Greece, germana Griechenland, pola Grecja, rusa Гре́ция) kaj ne ***Helado** aŭ ***Helaso** (novgreka Ελλά́δα, helena Ἑλλάς).

Hind'ujo (angla-itala-hispana-portugala-hungara India, franca Inde, germana Indien, pola-ĉeĥa Indie, rusa Индия, persa هند *hend*) kaj ne ***Barato** (hinda भारत *bhārat*).

Hispan'ujo (latina Hispānīa, pola Hiszpania, rusa Испáния, novgreka Ισπανία) kaj ne ***Espanujo** (hispana España, portugala Espanha).

Hungar'ujo (bas-latina Hungāriā, angla Hungary, hispana Hungría, itala Ungheria, germana Ungarn, latva Ungārija, franca Hongrie, nederlanda Hongarije, novgreka Ουγγαρία) kaj ne ***Madjarujo** aŭ ***Madjarorsago** (hungara Magyarország, ĉeĥa Maďarsko).

Ĥin'ujo, nun **Ĉin'ujo** (pola Chiny, angla-germana-hispana China, franca Chine, itala Cina, ĉeĥa Čína) kaj ne ***Ĉonkĉjo** aŭ ***Ĉongkĉjo** (ĉina 中国 *zhōngguó*).

Japan'ujo (angla-germana-nederlanda Japan, itala Giappone, franca Japon, hispana Japón, portugala Japão, ĉeĥa Japonsko, rusa Япо́ния, pola Japonia, novgreka Ιαπωνία, hungara Japán) kaj ne ***Nihono** (japana 日本 *nihon*).

Kolonjo (latina Cōlōnīa, itala-hispana Colonia, franca-angla Cologne, novgreka Κολωνία) kaj ne ***Kelno** aŭ ***Kolno** (germana Köln, rusa Кё́льн).

Kopenhago (germana Kopenhagen, angla Copenhagen, franca Copenhague, pola Kopenhaga, rusa Копенга́ген) kaj ne ***Kebenhavno** (dana-norvega København).

Lisbono (franca Lisbonne, angla Lisbon, itala Lisbóna, pola Lizbona, germana Lisabon, rusa Лиссабóн, ĉeĥa Lisabon, novgreka Λισσαβόνα) kaj ne ***Lisboo** (portugala-hispana Lisboa). Arkaika formo Lisabono estas trovebla en la *Fundamenta Krestomatio*, p.88.

Litov'ujo (pola Litwa, rusa ЛИТВá, kun ebla influo de la angla Lithuania, franca Lituanie, germana Litauen) kaj ne ***Ljetuvujo** (litova Lietuva).

Norveg'ujo (germana Norwegen, franca Norvège, pola Norwegia, rusa Норвéгия, angla Norway, novgreka Νορβηγία) kaj ne ***Norgo** (norvega-sveda-dana Norge).

Prago (germana Prag, franca-angla Prague, itala-hispana-portugala-pola Praga, hungara Prága, rusa Пра́га, albana Prágë) kaj ne ***Praho** (ĉeĥa-slovaka Praha).

Rus'ujo, Rus'lando (angla Russia, franca Russie, germana Russland, nederlanda Rusland, ĉeĥa Rusko, litova Rusija) kaj ne ***Rosujo** (rusa Россíя, pola Rosja).

Skot'ujo, Skot'lando (angla Scotland, germana Schottland, nederlanda Schotland, rusa Шотлáндия, itala Scòzia, franca Écosse) kaj ne ***Albaino** (skotgaela Albain).

Sved'ujo (angla Sweden, germana Schweden, franca Suède, pola Szwecja, rusa Швéция, hungara Svédország) kaj ne ***Sverigo** (sveda-norvega Sverige).

Tamizo (franca Tamise, itala Tamigi) kaj ne ***Temzo** (angla Thames).

Varsovio (bas-latina Varsovia, franca Varsovie, novgreka Βαρσοβία) kaj ne ***Varŝavo** (pola Warszawa, rusa Варшава). Tamen Grabowski uzis plurfoje la formon *Varŝavo*.

Aliaj landonomoj, kvankam ne Zamenhofaj (krom se mi eraras), estas unuanime uzataj Zamenhof-maniere, laŭ la regulo de **internacieco**, kaj **ne** laŭ la regulo de enlandeco:

Alban'io (latina Albānīa, franca Albanie, angla-pola Albania, germana Albanien, novgreka Αλβανία, rusa Албания) kaj ne ***Ŝkiperio** (albana Shqipëri).

Armen'io (latina Armēnīa, greka Ἀρμενία, franca Arménie, angla-hispana-pola Armenía, rusa Армения) kaj ne ***Hajastano** (armena Հայաստանի hayastan).

Birmo (germana Birma, rusa Бирма, angla Burma, franca Birmanie, hinda बर्मा *bar-mā*) kaj ne ***Mjamo** (birma မြန်မာနိုင်ငံ *myamma naygan*).

Irlando (angla Ireland, franca Irlande, germana Irland, rusa Ирландия) kaj ne **Ejro** (gaela Éire, Éire), vorto ekzistanta en la PIV, sed ne komun-uza.

Jordan'io (angla Jordan, franca Jordanie) kaj ne ***Urduno** (araba اَلْأُرْدُنْ *al-urdunn*).

Koreo (angla-germana-pola-hungara Korea, franca Corée, itala-hispana Corea, portugala Coreia, novgreka Κορέα, rusa Корéя) kaj ne ***Ĝosono** aŭ ***Hanguko** (korea 조선 *ĝosŝon* kaj 한국 *hanguk*).

Maroko (franca Maroc, germana Marokko, rusa Марóкко, itala Maròcco, angla Morocco) kaj ne **Marakeŝo** (araba مَرَّاكُش *marrākuš*), kiu havas alian signifon (urbo).

Tajlando (angla-germana Thailand, franca Thaïlande, rusa Таиланд, hinda थाईलैंड *thāilainḍ*) kaj ne ***Pratestajo** (taja ประเทศไทย *prathesthay*).

Vistulo (bas-latina Vistūla, franca Vistule) kaj ne ***Vislo** (pola Wiśła, rusa Висла).

Ĉiuj ĉi-supraj vortoj obeas al la regulo de **internacieco**. Neniu el la ĉi-supraj fantaziaj vortoj (signitaj de asterisko, kio signifas « ne-ekzistanta ») estas internacia: ĉi tiuj obeas nur al la etnolingva uzado. Ĉu tio ne sufiĉas por montri, ke Esperanto estas INTERNACIA lingvo, obeanta nur al INTERNACIAJ kriterioj, cele al INTERNACIA uzado?

« Landnomoj, diras la Akademio, estas elektitaj laŭ la **internacieco**, forme kaj signife » (Akoj de la Akademio, III, p.38). Sed ne ĉiuj Akademianoj obeas la Akademion...

II. Unu prava escepto: **Aĥeno**.

Ne ekzistas internacia nomo por tiu Germania urbo: la germana nomo estas Aachen kaj ĝi pasis al la nederlanda Aken, rusa Аахен, japana ｱｰﾝ *āhen*, ĉina 亞琛 *yàchēn*. Ĝi venas de la latina Aquæ Granī « akvoj de Granos » (nomo de galla dio, « la brila »).

Oni retrovas la latinan nomon en: itala Acquisgrana, hispana Aquisgrán, portugala Aquisgrano, pola Akwisgran. La franca-angla nomo estas Aix-la-Chapelle (Aix « Aikso » + la chapelle « la kapelo »). La plej stranga estas la ĉeĥa Cáchy, kiu venas de la germana zu Aachen « al Aĥeno ».

Ĉeeste de tia diverseco, ne ekzistas alia rimedo, ol la alpreno de la enlanda nomo.

III. Alia prava escepto: **Kimrio**.

Sama problemo ekzistas pri tiu lando, parto de Britio.

La angla nomo estas Wales, imitata de la germana Wales, de la pola Walía kaj de la rusa Уэльс. La franca estas pays de Galles kaj la itala paese di Galles. La irlanda an Breatain Beas signifas « la Malgranda Britio » kaj ĝi kontrastas kun an Breatain Mór « Britio » (precize « la Granda Britio »). La esperantigo de tiuj nomoj povus konduki

al *Uelso, Uelso, Valso, Valeso, Galso, Galeso*, ktp...

Ĉeeste de tia diverseco, la plej bona solvo estas: por la loĝantoj, *Kimro*, de la enlanda vorto *Cymro* aŭ *Cymry*; kaj por la lando, *Kimrio*, de la enlanda vorto *Cymru*.

La origino estas la old-kimra *combrog* «samlاندano», de *com* «kun» kaj *brog* «lando». Ĝi finvenas ankaŭ al la latina *Cambrīa* (vidu *kambrio* en la PIV).

IV. Unu mallertajo: *Javo*.

La formo *Javo* konformas nek kun la enlanda formo nek kun la internacia, sed ĉefe kun la germana-slava: germana-nederlanda *Java*, ĉeĥa *Jáva*, pola *Jawa* (kun j prononcata kiel en Esperanto), rusa *Ява*, bulgara *Ява*.

Sed fakte la enlanda nomo estas *Jawa*, prononcata *ĝawa*. La internacia nomo estas sama: angla-franca-hispana *Java* (kun j prononcata jen ĝ, jen j, jen ĥ), itala *Giava*, hinda *जावा* *ĝāvā*, bengala *জাভা* *ĝabha*, persa *جاوہ* *ĝāveh*, araba *جاوا* *ĝāwā*, japana *ジャバ* *ĝawa*.

La formo *Javo* estas do nete pli oportuna. Ĝi estas trovebla, interalie, en la *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch*, de Erich-Dieter Krause (Hamburg, 1999), p.324a.

V. Unu kontraŭ-Fundamenta abomenaĵo: *Barato*.

De kelka tempo, oni vidas en la esperanta gazetaro iun strangan geografian nomon, ne troveblan en la pliparto de la vortaroj, ĉu esperantaj, ĉu nacilingvaj: la nomon *Barato*. Laŭ la kunteksto, temas pri tiu sama ŝtato, kiun la normalaj esperantistoj, kiuj uzadas normalajn vortarojn kaj parolas normalan Esperanton, nomas *Hindio*, aŭ *Hindujo*. Ve! la *Barata malsano* grave infektis eĉ la Akademion, kiu devus esti laŭstatute plej rezista!

Strange, iu Akademia *Barato*-ano akceptas (tolereme!) la pezan formon *Hindlando*, sed nepre rifuzas la banalan *Hindio* (*Lingva Arto*, p.40), kvankam la sufikso *-io* estas sinonimo de *-lando*.

En la hinda lingvo, *Hindion* oni nomas भारत *bhārat*, kaj *hindo* estas भारतीय *bhāratīya*. Kial ne? Sed ĉu la ekzisto de tiuj ĉi nacilingvaj vortoj estas sufiĉa kaŭzo, ke ni aŭtomate, blinde, gurde, papage, psitake kaj senpripense esperantigus ĝin?

Ne, ne, milfoje NE. Akcepti ĝin estus akcepti, ke **Esperanto rezignus pri sia statuto de internacia lingvo**. Efektive, tiu ŝtato havas **INTERNACIAN** nomon: ĝi estas la diversaj formoj de la radiko *Hind* aŭ *Ind*, kiu devenas de la persa هند *hend*. Neniu alia.

Internacie: itala-hispana-portugala-rumana *India*, franca *Inde*, angla-nederlanda-norvega-hungara *India*, germana-dana-sveda *Indien*, islanda *Indland*, irlandia *an tSúdá*, pola-ĉeĥa *Indie*, kroata *Indija*, rusa-bulgara *Индия*, serba *Индија*, belorusa *Індыя*, ukraina *Індія*, novgreka *Ινδία*, albana *Indí*, armena *Հնդիստանի* *handiastan*, kartvela *ინდოეთი* *indo-eti*, finna *Intia*, turka *Hindistan*, araba *الهند* *al-hind*, novhebrea *הודו* *hoddū*, urdua *هند* *hind*, *هندوستان* *hindūstān*, tamula *இந்தியா* *intiyā*, sinhala *ඊන්දියාව* *indiyāva*, svahila *Uhindi*, indonezia *Hindia*, japana *印度* aŭ *インド* *indo*, vjetnama *Ấn Độ*, ĉina *印度* *yindù*.

Ni notu bone, ke ankaŭ la hindoj uzas la vortojn *इंडिया* *indiyā* kaj *हिंदुस्तान* *hindustān*.

Origino de *hind*'. La hinda vorto *हिंदी* *hindī*, bengala *হিন্দী* *hindī* «hindo» venas de la persa *هندی* *hendī* «hindo», kaj ĉi tiu siavice venas de la sanskrita *सिन्धु* *sindhu* «Sindo, Induso (riveronomo)». Tiu nomo estas do aŭtenta hinda nomo, kaj ne ia koloniisma kreaĵo.

Disvastigo de *Barat*'. Nun, kompare, en kiuj lingvoj ekzistas la radiko *barat*? En tre malmultaj lingvoj, el kiuj neniu estas uzata ekster la mondoparto konsistanta el Hindio kaj apudaj landoj: hinda-nepala भारत *bhārat*, pangaba *ভারত* *bhārat*, bengala *ভারত* *bharot*, sinhala *භාරතය* *bhārataya*, tamula *பாரத* *pārata*, telugua *భారత* *bhārata*, urdua *بھارت*

bhārat. La origino estas la tibeta བླ་རྩ་ལྷ་མོ་ bhārata, kiu siavice venas de la sanskrita भारतखण्ड bhāratakhṇḍa, kiu difinis nordan Hindion.

Fundamento. Nun ni memoru la 15an regulon de la Fundamenta Gramatiko, eble la plej grava el la tuta Fundamento: «**La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenīs el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo**» (Fundamenta Krestomatio, p.241).

Tiu ĉi regulo jam troviĝis en la *Unua Libro* (Fundamenta Krestomatio, p.233).

Do laŭ ĉi tiu regulo, kiun ĉiu esperantouzanto estas petata obei, precipe se li/ŝi estas akademiano, la vorto Barato estas rekte kontraŭ-Fundamenta. Ke parto de la Hindianoj uzas ĝin en sia etna lingvo, estas tute alia afero, kiu ne koncernas la esperantistaron. Evidentas, ke pri *Esperanta* vorto, decidis la *Esperanto-uzantoj*, ne la *hindi-uzantoj*.

Estas notinde, ke la unua PIV citis (p.95a) la saman ŝtatnomon, sed sub la formo *Baratio*, kio estis iom pli allasebla, almenaŭ historie: «la lando de la reĝo Barato».

Gaston Waringhien, kiu majstre kaj klare gvidis la Akademion de 1963 ĝis 1979, skribis: «*Estas evidente, ke, ankoraŭ pli ol la komunuzaj, la propraj nomoj de la landoj devus submetiĝi al la leĝo de internacieco*» (Lingvo kaj Vivo, p.181). Eĉ se mi ne ĉeestus lian entombigon en Decembro 1991, mi konstatus, ke Waringhien estas vere mortinta.

La *Barata* fantaziaĵo estis elpensita de kelkaj snobaj Hindianoj, kiuj arogis al si la rajton decidi elkatedre-direktore, nome de la tuta esperantistaro. Siatempo ili uzis ankaŭ la formon *Bharato*, kun *bh* neprononcebla por 80% de la homaro. Sed tiu vorto, ĉu sub la formo *Barato*, ĉu sub la slanga formo *Bharato*, apartenas ne al la Zamenhofa Esperanto, sed ja al ia regiona dialekto de Esperanto, kaj ne koncernas la esperantistan mondon.

La alpreno de tiu vorto igus Esperanton pli malfacila ol ĉiu ajn nacia lingvo, kio estas ja la kulmino de la memmortiga stulteco, kontraŭ kiu Zamenhof luktis senĉese. La rezulto estus, ke ĉiu ajn Terano (krom la Hindianoj), scianta nek la anglan nek Esperanton, tuj komprenus la anglan vorton *India*, kaj ne komprenus la respondan Esperantan vorton!!!

Se ni akceptus ĝin, ni povus tute trankvile atendi la tempon, kiam kelkaj *Oslo*-anoj decidus, ke ilia lando devas nomiĝi *Norgo*; iliaj najbaroj decidus tiam, ke ili loĝas en *Sverigo*. Kaj evidente la *dojĉoj* ekloĝos tiam en *Dojĉlando*, kiun oni ne konfuzu kun la najbara lando *Osterajfo*. La svisoj, depende de la kantono, loĝos en *Ŝvajco*, *Sŭiso*, *Svizzero* aŭ *Svizro*. Kaj en la Esperanta gazetaro, aperos informoj de *Albaino*, *Ĉongkŭo*, *Ĉosono*, *Esto*, *Gritbriteno*, *Ĝazairo*, *Hajastano*, *Helado*, *Junajtedsteco*, *Madjarorsago*, *Misro*, *Naĥcio*, *Nihono*, *Polsko*, *Pratestaĵo*, *Ŝkiperio*, *Ŭelso*. Ekzistos tiom da esperantoj, kiom da ŝtatoj. Sed eĉ antaŭ tiu tempo, Esperanto estos jam mortinta...

Ĉar en tiaj kondiĉoj, pli kompreneblaj estus *Volapŭk* aŭ *Uropi*, kiuj havas landnomojn internaciajn: certe la Volapuka *Lindiyān* estas pli komprenebla ol la malesperanta *Barato*.

La *Aktoj de la Akademio, III*, estas katastrofe ne-konsekvencaj, kiam ili prave deklaras, ke «*landnomoj estas elektitaj laŭ la internacieco, forme kaj signife*» (p.38), kaj samtempe akceptas plurloke la monstron *Barato* (p.44, 58, 68), kies **internacieco estas nula**.

VI. Kartvelio, Gruzio, Georgio.

Eble iu atakemulo rebatos, ke antaŭ nelonge la nomo *Gruzio* (PIV1) estis anstataŭigita de *Kartvelio* (PIV2). Sed fakte, la afero estas tute malsama. Pri Kartvelio/Gruzio, internacia nomo **ne ekzistas**. Oni trovas en la diversaj etnolingvoj tre diversajn radikojn:

- Angla-itala-hispana-hungara **Georgia**, franca **Géorgie**, germana **Georgien**, novgreka

Γεωργία «Kartvelio» ← latina *Gēorgi*, greka Γεωργίος «kartveloj» ↯ nomo de sankta Georgo, patrono de la kartveloj ekde mezepoko.

• Turka *Gürçistan*, persa گرجستان *gorĝestān*, mongola Гүрж «Kartvelio» ← kartvela გურზ *gurz* ↯ nomo de sankta Georgo.

• Rusa Грүзия, germana *Grusien*, ĉeĥa *Gruzie*, bulgara Грүзия, hungara *Gruzia* «Kartvelio» ← rusa грузин «kartvelo» ↯ persa گُگ *gōg* «lupo».

• Armena Վրաստան *vrastan* «Kartvelio» ← վրացի *vraci* «kartvelo».

En tia kazo, la 15a Regulo de la Fundamento ne estas aplikebla. Ankaŭ ne la Zamenhofaj reguloj de la Unua Libro. La sola solvo estas, ke ni akceptu la enlandan nomon **Kartvelio**: kartvela საქართველო *sakartvelo* «Kartvelio», ქართველი *kartveli* «kartvelo», ქართული *kartuli* «kartvela».

Sed tio havas nenion komunan kun la perfekte internacia radiko **Hind**, kiu eniras perfekte en la kadron de la 15a Regulo. Jam sufiĉas, ke la senutila *Suomio*, kies grado de internacieco estas nula (same kiel la Volapuka *Suomiyän*), okupas senutile lokon en la PIV. Tiu vorto estas malofte uzata en Esperantio, eĉ de la Finlandanoj. Tio estas memkomprenebla: kiam Finlandano uzas la internacian lingvon Esperanto, li deziras esti internacie komprenata, ĉefe de la ne-Finlandanoj. Do li prefere uzas internaciajn vortojn.

VII. Demando por eventuala kvizo: kie troviĝas *Klaŭdiforomo*?

Ne serĉu, vi ne trovos. Tiu urbo ne ekzistas, ĝi troviĝas nenie. En neniuj lando. Sur neniuj mapo. En neniuj fea rakonto. Eĉ ne en Erevono, en Kazohinio aŭ en Liliputo.

Ĝi estas trovebla **nur en la PIV** reviziita (p.535b).

Klaŭdiforomo estas la fantazia nomo de la ĉefurbo de Karintio, unu el la regionoj de Aŭstrio, germanlingva lando. La germana nomo estas *Klagenfurt*, kio finvenas tre banale al la Esperanta *Klagenfurto*. Sed laŭdire, la slovenoj nomas ĝin *Celovec*. Tion ili plene rajtas. Tial, iu fantaziulo arbitre fabrikis latinaspektan nomon, kiu elvokas misteran *Forumon* de ia nepreciza *Klaŭdo* (ĉu la konata imperiestro?...). Tiu pseŭdolatina nomo estas tiel fama..., ke mi ne povis trovi unu mapon de la antikva Eŭropo, kiu menciis ĝin.

La kialo de tiu ĉi PIVa elekto estas amuza: eble *Klagenfurto* estus ne komprenata de la slovenlingvanoj, kaj certe *Celoveco* estus ne komprenata de la germanlingvanoj. En tiu korŝira alternativo, la nov-bakita *Klaŭdiforomo* havas eksterordinaran mirindan avantaĝon: ĝi estas **komprenata de NENIU**. Nekomprenebleco estas - ĉu ne?! - la celo de internacia lingvo...

Eble, iu estonta aŭtoro de novega PIV re-reviziita elcerbigos samstile ian *Argentorato*, kiu anstataŭos *Strasburgo*, *Kastroregino* por meti en la lokon de *Regensburgo* kaj *Singiduno*, kiu estos sinonimo de *Belgrado*...



Ve, tiaj monstraj eltrovoj, kiaj estas *Barato* aŭ *Klaŭdiforomo*, ridindigas la lingvon antaŭ seriozaj personoj kaj lingvistoj, kiuj demandas, kial “internacia” planlingvo estas **malpli internacia, do pli malfacila, ol iu ajn nacia lingvo**, ekzemple la angla: *Klagenfurt* kaj *India* estas kompreneblaj de iu ajn Terano, sed nek *Barato* nek *Klaŭdiforomo*.

«*Se ni volas, ke la mondo estimu Esperanton, unue ni devas ĝin respekti. La naiva ruzajo: fuŝi la lingvon por povi skribi la adresojn en la angla sen pretendi, ke ili estas en Esperanto, trompos neniun krom la ruzulo(n) mem*» (Sergio Pokrovskij, *Lingvaj Respondoj*, p.28).

Komo, ne laŭvola

Ĉiu lingvo havas siajn proprajn kutimojn rilate interpunkcion. Sed fakte, la diferencoj ne estas tiel grandaj! Punkto, punktokomo, dupunkto, demandosigno, krisigno, ekzistas en la pliparto de la lingvoj. Almenaŭ de la lingvoj latinlitere skribataj.

Sed estas unu punkto, ĉe kiu la diferenco estas granda. «*Per komo oni apartigas suborditajn propoziciojn disde la ĉefpropozicio. Ankaŭ la rilatajn propoziciojn oni devas apartigi per komo: mi vidis, ke li venas; mi ne scias, ĉu tio estos oportuna*» (PAG, p.29).

Ni kontrolu en la Fundamento. Jen kelkaj ekzemploj.

- *li petas, (komo) ke mi estu atenta* (§ 26). • *li tuj faris, (komo) kion mi volis* (§ 31).
- *mi montris al la infano, (komo) kie kuŝas ĝia pupo* (§ 18).
- *la domo, (1a komo) en kiu oni lernas, (2a komo) estas lernejo* (§ 40).
- *kvankam vi estas riĉa, (1a komo) mi dubas, (2a komo) ĉu vi estas feliĉa* (§ 26).

En du kazoj, tiu komo forestas: kiam la frazo estas tre mallonga; kiam la dua propozicio estas infinitiva kaj ne estas enkondukita de subjunkcio.

- *mi volas ke vi tien iru* (§ 19, tre mallonga frazo).
- *mi volis ŝlosi la pordon* (§ 34, *ŝlosi la pordon* ne estas enkondukita de subjunkcio).
- *ĉu vi havas korktirilon, (komo) por malŝtopi la botelon?* (§ 34, *malŝtopi la botelon* estas enkondukita de la subjunkcio *por*).

Ankaŭ **ĉe komparativo**, oni ĝenerale disigas per komo la du elementojn de la komparo.

- *li ne vivos pli, (komo) ol unu tagon* (§ 31). • *mi estas tiel forta, (komo) kiel vi* (§ 10).

Fakte, por **bone interpunkcii** Esperantan tekston, oni unue lernu la arton **bone interpunkcii** sian denaskan lingvon (ĉi-rilate, multegaj el miaj samlandanoj bezonegas pliboniĝon).

Ĉe hezito, unu troa komo estas pli bona, ol unu maltroa.

Rilate la uzadon de komo, oni povas apartigi la etnajn lingvojn en du grupojn.

1) Kelkaj funkcias ekzakte kiel Esperanto, disigante la propoziciojn per komo.

Bulgare: знаех, (komo) че ще дойдеш «mi scias, ke vi venos».

Ĉeĥe: vím, (komo) že Stanja je v Praze «mi scias, ke Stanja estas en Prago».

Finne: voitteko sanaa, (komo) missä on... «ĉu vi povas diri, kie troviĝas...».

Germane: er weiß nicht, (komo) was er tun soll «li ne scias, kion li faru».

Hungare: örülök, (komo) hogy telefonálsz «mi ĝojas, ke vi telefonas».

Islande: ég hélt, (komo) að þú vissir þetta «mi kredis, ke ci scias tion».

Pole: nie wiem, (komo) co się stało «mi ne scias, kio okazis».

Ruse: скажи ему́, (komo) что я придú завтра «diru al li, ke mi venos morgaŭ».

2) Aliaj, male de Esperanto, ne disigas la propoziciojn en la jenaj ekzemploj.

Albane: dua (ne komo) që ai ta dijë «mi deziras, ke li sciu ĝin».

Angle: he said (ne komo) that he wanted to see me «li diris, ke li volas vidi min».

France: il a dit (ne komo) qu'il voulait me voir «li diris, ke li volas vidi min».

Hispane: dime (ne komo) a quien miras «diru al mi, kiun ci rigardas».

Itale: il segreto (ne komo) che ti ho confidato «la sekreto, kiun mi konfidis al ci».

Nederlande: ik bekenne (ne komo) dat hij gelijk heeft «mi konfesas, ke li pravas».

Portugale: creio (ne komo) que vai chover «mi kredas, ke tuj pluvos».

Rumane: cred (ne komo) că sîntem vecini «mi kredas, ke ni estas najbaroj».

Svede: jag hoppas (ne komo) att ni lyckas «mi esperas, ke vi sukcesos».

Kondicionalo

Oni ne povas tro insisti pri la fakto, ke la Esperanta konjugacio estas la ekzakta paŭsaĵo de la slava. Kiel ekzemplon, ni konsideru la konjugacion de rusa verbo.

Prezenta indikativo: я дéлаю « mi faras », ты дéлаешь « ci faras », ktp.

Preterita indikativo: я дéлал « mi faris », ты дéлал « ci faris », ktp.

Futura indikativo: я б́уду дéлать « mi faros », ты б́удешь дéлать « ci faros », ktp.

Kondicionalo: я дéлал бы « mi farus », ты дéлал бы « ci farus », ktp.

Imperativo: дéлай « ci faru », дéлайте « vi faru ».

Participo: дéлающий « faranta », дéлаемый « farata », ktp.

Infinitivo: дéлать « fari ».

Oni tuj vidas, ke la rusa konjugacio entenas ekzakte la samajn tempojn kaj modojn, kiel la Esperanta konjugacio (☞ *Subjunktivo*).

Tute intence, mi ne konsideras la fakton, ĉi tie ne utilan, ke rusa verbo ekzistas sub du formoj, pli ĝuste du *aspektoj* (☞ *Participoj*):

- la *imperfektiva aspekto* (*несовершенный вид*), kiu montras senliman agon (daŭran, ne finitan, ripetatan): дéлать « fari, faradi, esti faranta ».
- la *perfektiva aspekto* (*совершенный вид*), kiu montras kunliman agon (finitan, rezultan): сдéлать « fari, finfari ».

En la rusa konjugacio, la indikativa modo distingas klare tri tempojn: prezenton, preteriton, futuron. Male, la kondicionala modo (*сослагательное наклонение*) estas ununura kaj ne distingas la tempon. **Ekzakte kiel en Esperanto.**

En la rusa, la tempon montras la kunteksto aŭ adverbo: я был бы рад вас видеть сейчас « mi estus kontenta vin vidi nun », я был бы рад вас видеть вчера « mi estus kontenta vin vidi hieraŭ », я был бы рад вас видеть завтра « mi estus kontenta vin vidi morgaŭ ».

I. En Esperanto, unu kondicionalo sufiĉas.

Preskaŭ ĉiam, la simpla kondicionalo sufiĉas, eĉ por indiki preteritan hipotezan agon. Tute malprave oni kredus, ke por traduki preteritan kondicionalon de la latinidaj kaj ĝermanidaj lingvoj, oni nepre devas fabriki Esperantan preteritan kondicionalon.

• kiu *dirus* al Abraham, ke Sara mamnutros infanojn? (Gen 21⁷). Estas evidente, ke *dirus* havas preteritan valoron. La slavaj Biblio uzas ĉi tie simplan kondicionalon: кто сказал бы Аврааму..., хто б сказав Авраамови..., któžby to był rzekł Abrahamowi..., kdo by był řekl Abrahamovi..., kto by był kedy povedal Abrahamovi..., ko bi rekaó Авраму...

• estus pli bone, se mia patrino min ne *naskus* (Zamenhof, PAG, p.149). Same, *naskus* havas preteritan valoron, memkompreneblan el la senco de la frazo.

• mi *farus* pli bone, se mi *edziĝus* kun senartifika kaj bona kampulino (Zamenhof, traduko de George Dandin, p.5). Estas evidente, ke *farus* kaj *edziĝus* havas preteritan valoron. Originala teksto: j'aurais bien mieux fait... (preterito) de m'allier en bonne et franche paysannerie (Molière).

Tamen, kiam oni nepre devas montri la pasintecon de la ago, kaj la kunteksto ne sufiĉas por tion indiki, oni ja rajtas uzadi la kompleksan formon *estus ...-inta*.

• vi *estus devinta* esti pli inteligenta (PAG, p.149). Tiu formo montras klare pasintecon, sed estas peze maleleganta (*estus devinta esti!*).

Male, "vi *devus* esti pli inteligenta" montrus prefere nuntempecon.

Sed tute ne estas necese, ke oni uzus tiun kompleksan formon en ambaŭ propozicioj.

• mi ne **farus** la eraron, se li **antaŭe dirus** al mi la veron (aŭ se li **estus dirinta** al mi la veron) (Fundamento, §24). Nur la kunteksto montras eventuale, ĉu **farus** havas prezencan aŭ preteritan valoron.

• se mi **estus lerninta**, mi **esplorus aferojn**, kiujn oni neniam **esploris** (Zamenhof, traduko de George Dandin, p.35). Ĉi tie, **lernus** indikus nuntempan agon; la preterita formo **estus lerninta** estas necesa. Franca originalo: *si j'avais étudié* (preterito), *j'aurais été* (preterito) *songer à des choses où on n'a jamais songé* (Molière). En la dua propozicio, la simpla formo **esplorus** sufiĉas; la peza formo **estus esplorinta** estus senutila balasto.

Por eviti la pezecon de la kompleksa formo **estus ...inta**, oni ja povas kunfandi ĝin en **-intus**. Tiu formo ne estas Fundamenta, sed ĝi ankaŭ ne estas kontraŭ-Fundamenta, kaj ĝi estas uzata de longe, de la plej bonaj aŭtoroj.

- tio **estintus bona** (PAG, p.149). En la pasinteco. Sed tio **estus bona**, en la nuntempo.
- ĝi **povintus esti eĉ pli malbona** (G.Waringhien, *Parnasa Gvidlibro*, p.8). Traduko de la franca esprimo *ça aurait pu* (preterito) *être pire*.

II. Kondiĉo ne ĉiam postulas uzon de kondicionala modo.

Pri la uzado de la subjunkcio **se**, oni nepre distingu du tute apartajn kazojn.

1) **Eventualeco**. Temas pri supozo, kiu **eble** realiĝis, realiĝas, realiĝos. Ĉi-kaze, oni ne uzas la us-formon. Oni uzas indikativon, ĉu preterite, ĉu prezence, ĉu future (la lingvoj franca kaj latina funkcias sammaniere).

- se vi **diris tion**, vi **eraris**. Eble vi ĝin diris (latine: *si hoc dixisti, errasti*).
- ĉiufoje, kiam vi **diris tion**, vi **eraris** (latine: *si hoc dicebas, errabas*).
- se li jam **venis**, petu lin al mi (F §26). Eble li jam venis.
- se vi **diras tion**, vi **eraras**. Eble vi ĝin diras (latine: *si hoc dicis, erras*).
- se ni **bezonas** uzi prepozicion... (F §29). Efektive ni kelkfoje bezonas prepozicion.
- se **forestas la suno**, **sufiĉas la luno** (Zamenhof, *Proverbaro*). Kelkfoje ĝi forestas.
- se vi **diros tion**, vi **eraros**. Eble vi ĝin diros (latine: *si hoc dices, errabis*).
- se mi **legos** en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi **finos** la tutan libron en kvar tagoj (F §14). Verŝajne mi legos 15 paĝojn ĉiutage.
- se **Peĉjo ne semos**, **Petro ne rikoltos** (Zamenhof, *Proverbaro*). Eble li semos, eble ne.

Oni uzas ankaŭ infinitivon.

- se ne **paroli pri...** (PIV). Eventuale oni ne parolas pri...
- se lin **kompari kun la nuna reĝo...** (Zamenhof, *Hamleto*, I, II, 159, p.17).

2) **Fiktiveco**. Temas pri supozo, kiu **ne** realiĝas/realiĝis. Nur ĉi-kaze, oni uzas la us-formon (la franca uzas kondicionalon, la latina subjunktivon). La senco mem de tiu formo malhelpas, ke oni uzus ĝin en futuro.

- se vi **dirus tion**, vi **erarus**. Sed vi ĝin ne diras (latine: *si hoc diceres, errares*).
- se vi **dirintus tion**, vi **erar(int)us**. Sed vi ĝin ne diris (latine: *si hoc dixisses, erravisses*).
- se mi **estus sana**, mi **estus feliĉa** (F §20). Sed sana mi ne estas.
- se li **scius**, ke mi estas tie ĉi, li **tuj venus al mi** (F §20). Sed li ne scias tion, do ne venas.
- se mi **petus lin**, li **dirus al mi la veron** (F §24). Sed mi ne petas lin.
- se vi **scius**, kiu li estas, vi lin pli **estimus** (F §26). Sed vi ne scias tion.
- **ho**, se vi **estus al mi kiel frato!** (Biblio, Kan 8¹). Sed vi ne estas tia.
- ŝi **kuris al li renkonte**, kvazaŭ ŝi **volus lin kisi**, sed ŝi tion ne faris (Zamenhof, PIV, p.646).

Kromsignoj en la angla lingvo

La energia propagando favora al la uson-angla lingvo (eĉ de anglalingvaj esperantistoj!) asertas kutime, ke la skribo de tiu lingvo estas simpla, ĉar ĝi entenas neniu literon kun supersigno, sed nur la 26 literojn de la latina alfabeto, tute nudajn. La intenca konsekvenco estas, ke Esperanto aspektas kiel ia monstraĵo, kun siaj ses ĉapelitaj literoj.

Do mi konsultis ne amatoran verkon, sed la tre oficialan *Oxford Dictionary of English Etymology* (Oxford University Press, Ely House, London W.1. First published 1966, reprinted 1967). Oni ne ne povos kontraŭi min, kun la akuzo, ke mi uzis iun ajn verkon.

Mi konstatis, ke multaj anglaj vortoj entenas literojn supersignitajn (à, â, é, è, ê, ë, ï, ñ, ô, ö, ü), aŭ subsignitajn (ç), aŭ kun speciala formo (æ, œ).

Tiuj vortoj ne estas vere angladevenaj: ilia origino estas fremda (latina, franca, itala, greka, ktp). Sed tio tute ne gravas: nur gravas, ke ili eniris en la anglan lingvon, do povas troviĝi en iu ajn angla teksto. Povas okazi, ke oni devas ilin tajpi aŭ presi. Ili povas troviĝi en teksto sendota per elektronika poŝto.

Ĉio tio tute ne estas opinio mia, sed objektiva fakto.

Jen la rezulto de mia esploro. Da tiaj vortoj, mi trovis 224.

à : bric-à-brac, pietà, podestà, tête-à-tête, vis-à-vis.

â : débâcle, papier mâché, pâté.

æ : ædile, ægis, ægrotat, Æneid, Æolian, æon, æruginous, Æsculapian, æsthetic, æsthete, æstival, ætiology, althæa, amœbæan, amphibæna, anæmia, anæsthesia, aphæresis, archæology, athenæum, bougainvillæa, cæcum, cærulean, Cæsar, Cæsarean, cæsium, cæstus, cæsura, chimæra, coryphæus, cyclopædia, diæresis, elæo-, encænïa, encyclopædia, eudæmonium, Græcism, gynæceum, gynæco-, hæmatite, hæmato-, hyæna, hypæthral, Linnæan, Mænad, mediæval, nævus, pæan, pædo-, pæon, palæolithic, palæontology, palæstra, præcipe, præmunire, prænomen, præpostor, prætor, proprætor, propylæum, pyæmia, quære, quæstor, Rhæto-Romanic, Rhæto-Romance, Sabæan, spiræa, synæresis, tænia, telæsthesia, tenebræ, tropæolum, uræmia, uræus.

ç : façade, Provençal.

é : appliqué, attaché, beurré, blasé, bouts rimés, broché, café, chargé d'affaires, chassé, cliché, congé, consommé, corvée, coupé, curé, dansetté, débâcle, décollété, décor, dégage, déjeuner, démarche, démenti, détour, diamanté, distingué, dragée, écarté, éclair, éclaircissement, éclat, écru, élan, élite, éloge, émeute, entrée, étui, fiancé, fiancée, ingénue, macramé, malgré, maté, matériel, mêlée, ménage, métier, mouillé, née, névé, outré, papier mâché, passé, pâté, patée, piqué, pisé, précieuse, précis, protégé, purée, Réaumur, réchauffé, recherché, régime, retroussé, roué, sauté, séance, semée, soirée, soufflé, tenné, visé.

è : ampère, arrière-ban, arrière-guard, barège, bayadère, confrère, cortège, crèche, gruyère, jardinière, portière, rivière, Sèvres, suède, trouvère.

ê : arête, bêche-de-mer, bête noire, crêpe, fête, mêlée, tête-à-tête.

Kunmetitaj verboformoj, erariga mito

Kunmetitaj verboformoj ekzistas en multaj Eŭropaj lingvoj. Ili konsistas el du partoj: unu helpverbo (*esti, havi, voli, devi, iri, ktp*) kaj iu speciala formo (participo, infinitivo) de la konjugaciata verbo. Sed tiu kunmetaĵo havas apartan senceon (preterito, futuro, kondicionalo, ktp), kiu **ne** rezultas de la sencoj de la unuopaj vortoj. Jen ekzemploj.

Franca, itala, hispana, portugala, rumana: j'ai lu, ho lètto, he leido, hei lido, am citit « mi legis » (laŭvorte: *mi havas legita*).

Interlingue, Interlingua: yo ha leet, io ha legete « mi legis » (laŭvorte: *mi havas legita*).

Germana, angla, nederlanda, norvega, sveda, islanda: ich habe gelesen, I have read, ik heb gelezen, jag har lest, jag har läst, ég hefi lesinn « mi legis » (laŭvorte: *mi havas legita*).

Interlingue: yo va leer « mi legos » (laŭvorte: *mi iras legi*).

Rumana: voi citi « mi legos » (laŭvorte: *mi volas legi*).

Germana: ich werde lesen « mi legos » (laŭvorte: *mi iĝas legi*).

Angla, nederlanda, norvega, sveda: I shall read, ik zal lezen, jag skall lese, jag skall läsa « mi legos » (laŭvorte: *mi devas legi*).

Rusa, ĉeĥa: я буду читать, буду číst « mi legos » (laŭvorte: *mi estos legi*).

Pola: będę czytał aŭ będę czytać « mi legos » (laŭvorte: *mi estos legis aŭ mi estos legi*).

Serba: ja ћу читати (aŭ читаћу) « mi legos » (laŭvorte: *mi volas legi*).

Oni facile konstatas, ke en ĉiuj ĉi-antaŭaj nacilingvaj esprimoj, troviĝas la verboj *havas, iras, volas, iĝas, devas, estos*, kvankam la esprimo **ne** entenas la senceon de tiuj verboj. Ja temas pri **kunmetitaj verboformoj**. Sed tiajn formojn oni vane serĉus en Esperanto.

I. Profunda kaŭzo de disvastiĝintaj eraroj.

Multaj homoj, tute nekonscie, rigardas sin la centro de l' mondo. Kiam Esperanto komencis esti konata en okcidenta Eŭropo, ĝi tuj estigis fervorajn adeptojn. Por ĉi tiuj, la plej urĝa afero estis la verkado de lernolibroj en la lingvoj de okcidenta Eŭropo. Do, kun laŭdinda fervoro, ili eklaboris.

Kompare, ni supozu, ke en Francio aperas nova lernolibro de rusa lingvo. Verŝajne, la aŭtoro estas iu kompetentulo, kiu posedas altan diplomon de rusa lingvo, instruis la rusan lingvon dum jaroj, eĉ eventuale vivis kelkan tempon en Rusio. Do lia verko havas verŝajne ian valoron.

Male, la unuaj aŭtoroj de lernolibroj de Esperanto **NE** posedis altan diplomon de Esperanta lingvo, **NE** instruis la Esperantan lingvon dum pluraj jaroj, kaj **NE** vivis kelkan tempon en Esperantio. Unuvorte, ili havis **NULAN** kompetentecon. Ni ne kritiku ilin: ili estis fervoraj, sindonemaj, laboremaj.

Sed la nekompetenteco de tiuj unuaj aŭtoroj, kune kun la homa emo rigardi sin umbiliko de l' mondo, kaŭzis, ke ili kulpis plurajn erarojn, eventuale gravajn. Poste, venis aliaj aŭtoroj, kiuj verkis novajn lernolibrojn... rekopiante la antaŭajn. Kaj tiel plu, tiel plu, tiel plu.

Tiel naskiĝis kelkaj eraroj, eraregoj, kiuj vivis, pluvivis, vivadis, pluvivadis dum pli ol unu jarcento. Kaj ankoraŭ ne mortis. Ekzemple, la fantoma ekzisto de **kunmetitaj verboformoj**, pri kiuj la Sesa Regulo de la Fundamenta Gramatiko ne diras eĉ unu vorton.

Jen tri ekzemploj ĉerpitaj el amaso. En la *Grammaire complète*, de Camille Aymonier (3a eldono, Hachette, 1910, p.76 kaj 79), oni trovas la jenan fantazian konjugacion.

Mode Indicatif. Parfait indéfini. *Mi estas aminta*: j'ai aimé. *Mi estas amita*: j'ai été aimé.

Plus-que-parfait. *Mi estis aminta*: j'avais aimé. *Mi estis amita*: j'avais été aimé.

Parfait antérieur. *Mi estis aminta*: j'eus aimé. *Mi estis amita*: j'eus été aimé.

Futur antérieur. *Mi estos aminta*: j'aurai aimé. *Mi estos amita*: j'aurai été aimé.

La samo estas trovebla en *L'Espéranto en douze leçons*, de Pierre Delaire (p.102 kaj 111). Ĝi estas perfekta imitaĵo de la franca konjugacio. La aŭtoroj ne demandis al si, kial la Esperanta konjugacio devus sekvi la francan modelon, prefere ol sekvi la ĉinan, la turkan, la araban... Tiuj aŭtoroj estis franclingvanoj kaj ne kapablis eliri el la franclingva muldilo.

Similan sistemon oni trovas en la *Gramatiko* de Ludwig Emil Meier (1891, dua eldono, 1903): *Mi estas amata* : ich werde (bin) geliebt. *Mi estas amita* : ich bin geliebt worden.

Mi estis amata : ich wurde geliebt. *Mi estis amita* : ich war geliebt worden.

Ni memoru, ke Zamenhof deklaris « *malbona* » tiun ĉi Gramatikon (OV, p.490).

II. Kunmetitaj verboformoj NE ekzistas en Esperanto.

«*La komplekso esti + participo ne reprezentas verban formon; erare estas paroli pri "kompleksaj formoj". Ĝi estas rigardata kiel ordinara rilatigo de subjekto al predikata adjektivo, kiaj estas "la domo estas alta, preta, komforta ...ktp" (A.D. Atanasov, La Lingva Esenco de Esperanto, p.49). Efektive, la kunmetaĵo "esti + participa adjektivo" ne havas apartan sencion, kiu estus malsama de la sencoj de la unuopaj vortoj. Do esti pentrita, estas pentrita nepre ne estas kunmetita verboformo, ne pli ol estis ruĝa aŭ estos blua.*

Oni povas konstati, ke ekzistas neniu diferenco inter tiuj du serioj da okazajoj.

a) Kopulo *esti* + ordinara adjektivo.

① « *kiam mi vizitis lin unuafoje, la muroj de lia ĉambro estis blankaj* ».

② « *kiam mi vizitis lin la postan jaron, la muroj de lia ĉambro estis flavaj* ».

③ « *kiam mi vizitis lin du jarojn pli poste, la muroj de lia ĉambro estis bluaj* ».


Tio implicas, ke inter miaj unua kaj dua vizitoj, oni refarbis la murojn flavaj. Kaj inter miaj dua kaj tria vizitoj, oni refarbis ilin bluaj.

b) Kopulo *esti* + participa adjektivo.

① « *lastan dimanĉon, mi restis hejme, ĉar mia aŭto paneis, ĝi estis riparota* » (ĝi estis en la stato montrata de la ĉi-suba desegno ①; alidire ĝi ne funkciis).

② « *mardon, mi devis vojaĝi aŭtobuse, ĉar mia aŭto estis riparata* » (ĝi estis en la stato montrata de la desegno ②: en ripara ateliero).

③ « *ĵaŭdon, mi vojaĝis aŭte, ĉar mia aŭto estis riparita* » (ĝi estis en la stato montrata de la desegno ③; alidire, ĝi funkciis).



aŭto riparota

aŭto riparata

aŭto riparita

Tio implicas, ke verŝajne lundon, la aŭto estis kondukita al riparejo. Kaj ke eble merkredon, la riparado estis finita. La participoj uzataj kun *esti* esprimas do simple, en kiu parto de la ago *ripari* (antaŭ, dum, post) lokiĝas la stato montrata de tiu verbo *esti*.

La afero estus sama, se oni asertus, ke dimanĉon mia aŭto estis blanka, mardon flava, ĵaŭdon blua. Tio implicus, ke lundon mia aŭto estus refarbita flava, kaj merkredon ĝi estus refarbita blua.

Ĉia aserto pri ekzisto de kunmetitaj verboformoj tiaj, kiaj ili ekzistas en la Eŭropaj lingvoj, estas centprocente ekster la propra logiko de Esperanto. Plie, ĝi estas la ĉefa kaŭzo de la fama deflankiĝo de la Fundamenta lingvaĵo, kiun oni nomis *atismo*.

☞ *Participoj, Pluskvamperfekto.*

Landnomoj, plej racia sistemo

Ĉiu esperanto-uzanto scias, ke, rilate la landnomojn, du sistemoj ekzistas.

I. La du landnomaj sistemoj.

Unue, ni nomu ĉiun el ili per oportuna nomo.

1) "**Sistemo UJ**" (**gento** → **Gentujo**). La simpla vorto, sen ia sufikso, difinas membron de iu gento. Kaj la lando, kie vivas tiuj homoj, estas nomata per pluformita vorto, provizita per la Fundamenta sufikso **-ujo**, aŭ per la pli moderna sufikso **-io**.

Ekzemple: *angloj vivas en Anglujo* (aŭ *Anglio*), *ĉinoj vivas en Ĉinujo* (aŭ *Ĉinio*).

2) "**Sistemo AN**" (**Lando** → **Landano**). La simpla vorto, sen ia sufikso, difinas landon. Kaj la homoj, kiuj vivas en tiu lando, estas nomataj per pluformita vorto, provizita per la Fundamenta sufikso **-ano**. Tiu sistemo estas pli abunde uzata, ol la alia.

Ekzemple: *Angolanoj vivas en Angolo*, *Kanadanoj vivas en Kanado*.

II. Ĉu tiu sistemo estas ĥaosa?

Kelkfoje oni parolas pri *ĥaosa afero*, pri *homaj freneziligoj*.

Ni ne troigu. **Tiu sistemo, fakte, estas plej natura, plej racia kaj plej internacia.**

Kaj oni ne vidas, kial la landnomoj devus konsisti en nur unu sistemo. Por neniu nocio Esperanto havas unuoblan sistemon. Ni starigu kelkajn komparojn.

- Nomoj de **lokoj** finiĝas per la sufikso **-ejo** (*ĉevalejo*, *preĝejo*, *vendejo*, ktp), sed la vortoj *stalo*, *templo*, *butiko*, ktp, ne havas sufikson kaj tamen difinas lokojn.

- Nomoj de **instrumentoj** finiĝas per la sufikso **-ilo** (*fosilo*, *frapilo*, *ŝovelilo*, ktp), sed la vortoj *pioĉo*, *martelo*, *ŝpato*, ktp, ne havas sufikson kaj tamen difinas instrumentojn.

- Nomoj de **profesiuloj** finiĝas per la sufikso **-isto** (*instruisto*, *kudristo*, *stiristo*, ktp), sed la vortoj *profesoro*, *tajloro*, *ŝoforo*, ktp, ne havas sufikson kaj tamen difinas profesiulojn.

Tute same, nomoj de **landoj** finiĝas per la sufikso **-ujo/-io** (*Britujo*, *Francio*, ktp), sed la vortoj *Islando*, *Mozambiko*, ktp, ne havas sufikson kaj tamen difinas landojn.

Nomoj de **loĝantoj** finiĝas per la sufikso **-ano** (*Brazilano*, *Siberiano*, ktp), sed la vortoj *etiopo*, *japano*, *svedo*, ktp, ne havas sufikson kaj tamen difinas loĝantojn.

Kiel skribas A. Albault, « *kial postuli de propraj nomoj, lingvaj elementoj finfine pli eksteraj, kion oni ne postulas de la ordinara vortoj?* » (*Vojaĝo tra la landoj*, p.45).

III. Arkaika unuobla sistemo: plene artefarita.

Okazas, ke esperantistoj demandas, kial Zamenhof inventis du malsamajn sistemojn, kial li ne unuformigis la tutan aferon, ĉu per la alprenado de la sola "sistemo UJ" (*francoj en Francujo*, *irlandoj en Irlandujo*), ĉu per la alprenado de la sola "sistemo AN" (*italanoj en Italo*, *peruanoj en Peruo*).

Fakte, ĝis 1895, regis la t.n. *Arkaika Zamenhofa Principo*, laŭ kiu ĉiuj landnomoj estis formataj per la sufikso **-uj** aldonata al radiko, kiu devige difinis landanon. Tiel oni havis « *Amerikoj en Amerikujo*, *Braziloj en Brazilujo*, *Holandoj en Holandujo*, *Palestinioj en Palestinujo*, ktp ». Sed, dank' al sia korespondado kun la tuta mondo, Zamenhof mem rapide konsciigis, ke tiu sistemo, malinternacia kaj artefarita, ne estas vivipova.

« *Se mi dum longa tempo uzadis "Brazilujo", "Ĉilujo" k.t.p., mi konfesas nun, ke tio estis eraro* » (1911, *Lingvaj Respondoj*, p.14-15).

Kial tiu sistemo ne estis vivipova? Ĉar ĝi estis artefarita, kaj Esperanto **ne** estas artefarita lingvo, sed **natura** lingvo, kiu ne povas funkcii kun malnatura sistemo.

Volapuko entenis ankoraŭ grandan parton da artefariteco. Tial, unu sola sistemo estis uzata: la "sistemo AN" (Lando → Landano): *Fransänans in Fransän* «*Francanoj en *Franco», *Kanadänans in Kanadän* «*Kanadanoj en Kanado*» (fakte en la tempo de Schleyer, la nomoj estis iom malsamaj). La grado de artefariteco de Esperanto, kun ĝia sola sistemo UJ, estis tiam la sama (almenaŭ pri ĉi tio), kiel la Volapuka, kun ĝia sola sistemo AN.

IV. La natura sistemo.

Se la sistemo UJ, uzata sola, estas artefarita, kio do estas la **natura sistemo**? La naturan sistemon mi klarigos per du ekzemploj.

1) **Turkoj kaj Turkio.** Dum multaj jarcentoj, nomadaj triboj vivis en centra Azio. Ili ne havis precizajn landlimojn, sed ili jam havis nomon: ili nomis sin mem *Türük*, aŭ *Türk*. Poste, dum la 14a-15a jarcentoj, iom post iom, multaj el ili instaligis en Malgrand-Azion. Tiel naskiĝis la Otomana Imperio, kiu poste estis nomita pli simple, en ilia lingvo, *ترکیه*, *Türkiye*. Oni do konstatas, ke:

- unue ekzistis gentonomo: **turkoj**.
- nur poste ekzistis landonomo: **Turkio**.

Tio estas objektiva fakto: **la simpla radiko *turk'*, sen ia sufikso, estas ORIGINE nomo de popolo, de gento. La nomo de la lando aperis nur poste: ĝi estas pluformaĵo necesiganta la uzon de sufikso.** Turkio ne ekzistus sen la antaŭa ekzisto de la turkoj.

2) **Venezuelo kaj Venezuelanoj.** Kiam Kristoforo Kolumbo alboridiĝis al tiu lando, en 1498, la maristoj nomis la marbordon *Venecieto*, hispanlingve *Venezuela*, pro ia simileco de aspekto kun la itala Venecio. Poste, kiam oni fiksis la limojn de la koloniita lando, oni oficialigis tiun nomon, kiu havas do nenian rilaton kun la triboj vivantaj en tiu regiono (interalie kariboj). Kaj evidente oni nomis la loĝantojn (ĉiujn: praloĝantojn kaj koloniistojn) *Venezolanos* (hispanlingve). Oni do konstatas, ke:

- unue ekzistis landonomo: **Venezuelo**.
- nur poste ekzistis loĝantonomo: **Venezuelanoj**.

Tio estas objektiva fakto: **la simpla radiko *Venezuel'*, sen ia sufikso, estas ORIGINE nomo de lando. La nomo de la loĝantoj aperis nur poste: ĝi estas pluformaĵo necesiganta la uzon de sufikso.** Venezuelanoj ne ekzistus sen la antaŭa ekzisto de Venezuelo.

En la naturo, pli precize en la historio, ekzistas do du specoj de radikoj.

- La radikoj, kiuj origine difinas popolon. Ekzemploj: *anglo, arabo, belgo, bretono, ĉeĥo, dano, etiopo, finno, flandro, gaelo, germano, greko, helveto, hispano, italo, kelto, kimro, malagaso, numido, persio, ruso, sakso, tataro, trako, uzbeko*, ktp.

- La radikoj, kiuj origine difinas landon aŭ regionon. Ekzemploj: *Alasko, Alzaco, Angolo, Argentino, Ĉilio, Irano, Islando, Kanado, Laoso, Nepalo, Peruo, Provenco, Sudano, Tibeto, Tirolo, Toskano, Usono, Zelando*, ktp.

Oni vidas, ke ne Zamenhof, ne la esperantistoj, sed la historio mem kreis du sistemojn. Tial oni rajtas diri, ke tiu duobla sistemo estas **plej natura**.

Estus kontraŭnature, ke oni dirus, ke **Turkanoj vivas en *Turko*, aŭ ke **venezueloj vivas en *Venezuelujo* (aŭ **Venezuelio*). Male, estas tute laŭnature, ke oni diras, ke *turkoj vivas en Turkio* (aŭ *Turkujo*), kaj ke *Venezuelanoj vivas en Venezuelo*.

V. Internacieco de la duobla sistemo.

Tiu duobla sistemo estas trovebla en tre granda nombro da lingvoj: preskaŭ ĉiuj Eŭropaj lingvoj, kaj pluraj Aziaj (sed ne ĉiuj).

1) Nacilingvaj ekzemploj de la "sistemo UJ" (popolnomo → landnomo).

- En la franca lingvo: *Allemand* → *Allemagne*, *Arabe* → *Arabie*, *Belge* → *Belgique*, *Bulgare* → *Bulgarie*, *Grec* → *Grèce*, *Letton* → *Lettonie*, *Russe* → *Russie*, *Serbe* → *Serbie*.
- En la itala lingvo: *Còrso* → *Còrsica*, *Croato* → *Croàzia*, *Grèco* → *Grècia*.
- En la hispana lingvo: *Andaluz* → *Andalucía*, *Árabe* → *Arabia*, *Sueco* → *Suecia*.
- En la angla lingvo: *German* → *Germany*, *Greek* → *Greece*, *Thai* → *Thailand*.
- En la germana lingvo: *Deutscher* → *Deutschland*, *Pole* → *Polen*, *Rumäne* → *Rumänien*.
- En la greka lingvo: *Ἄγγλος* → *Ἀγγλία*, *Γάλλος* → *Γαλλία*, *Ρώσος* → *Ρωσία*.
- En la albana lingvo: *Belge* → *Belgjikë*, *Daneze* → *Danimarkë*.
- En la hungara lingvo: *magyar* → *Magyarország*, *török* (turko) → *Törökország*.
- En la turka lingvo: *Azerî* → *Azərbaycan*, *Ermeni* → *Ermenistan*, *Türk* → *Türkiye*.

2) Nacilingvaj ekzemploj de la "sistemo AN" (landnomo → loĝantonomo).

- En la franca lingvo: *Autriche* → *Autrichien*, *Brésil* → *Brésilien*, *Canada* → *Canadien*, *Chine* → *Chinois*, *Congo* → *Congolais*, *Corée* → *Coréen*, *Cuba* → *Cubain*, *Espagne* → *Espagnol*, *Inde* → *Indien*, *Islande* → *Islandais*, *Israël* → *Israélien*, *Japon* → *Japonais*, *Liban* → *Libanais*, *Libye* → *Libyen*, *Norvège* → *Norvégien*, *Suède* → *Suédois*, *Syrie* → *Syrien*.
- En la itala lingvo: *Cina* → *Cinése*, *Cipro* → *Cipriota*, *Olanda* → *Olandése*.
- En la hispana lingvo: *Castilla* → *Castellano*, *España* → *Español*, *Irlanda* → *Irlandés*.
- En la angla lingvo: *Iceland* → *Icelandic*, *Japan* → *Japanese*, *Russia* → *Russian*.
- En la germana lingvo: *Chile* → *Chilene*, *Island* → *Isländer*, *Österreich* → *Österreicher*.
- En la greka lingvo: *Ιράν* → *Ιρανόσ*, *Κίνα* → *Κινέζος*, *Νιγηρία* → *Νιγηριανός*.
- En la albana lingvo: *Bosnje* → *Bosnjake*, *Francë* → *Franceze*, *Spanjë* → *Spanjolle*.
- En la hungara lingvo: *India* → *indiai*, *Irán* → *iráni*, *Kanada* → *kanadai*, *Kína* → *kínai*.
- En la turka lingvo: *Cezayir* (Alĝerio) → *Cezayirli*, *Çin* → *Çinli*, *Irak* → *Irakli*.

Tio estas nuraj ekzemploj, kiujn oni povus facile multigi. Ili nur montras, ke la ekzisto de du kategorioj estas tute ordinara en multaj lingvoj.

3) Nereguleco en la nacilingvaj sistemoj.

Okazas ofte, ke du lingvoj ne sekvas la saman sistemon rilate al iu lando: la franca *Russe* → *Russie*, la germana *Russe* → *Russland* kaj la hungara *orosz* → *Oroszország* apartenas al la "sistemo UJ", dum la angla *Russia* → *Russian* apartenas al la "sistemo AN". La hispana *España* → *español* kaj la finna *Espanja* → *espanjalainen* apartenas al la "sistemo AN", dum la hungara *spanyol* → *Spanyolország* apartenas al la "sistemo UJ".

Oni do ne serĉu en nacilingvaj nomenklaturetoj perfektan regulecon, kiun ili ne kapablas doni. Ni nur konstata, ke ĝenerale du kategorioj ekzistas, kiel en Esperanto, kaj ke ili malsamas en la diversaj lingvoj.

4) Miksa sistemo.

Fakte, en la nomenklaturetoj de multaj lingvoj, tri kategorioj ekzistas.

Okazas ofte, ke la simpla radiko ne ekzistas, aŭ eble ekzistis sed poste malaperis, aŭ plu ekzistas, sed kun alia signifo. Tiukaze, ambaŭ nomoj (la gentonomo kaj la landnomo) estas derivaĵoj.

Ekzemple, la latina havis la vortojn **Itālus** «italo» → **Itālĭa** «Italio» (sistemo UJ). Tiuj ĉi du vortoj pasis al la itala lingvo, jene: **italo** «itala» → **Itàlia** «Italio» (sistemo UJ, same). Sed poste, la vorto **italo** «itala» ne plu estis uzata en la ĉiutaga lingvo. Nova derivado okazis: **Itàlia** «Italio» → **italiano** «italo» (sistemo AN). Oni havas do nuntempe sistemon de tri vortoj: **italo** «itala» → **Itàlia** «Italio» → **italiano** «italo», el kiuj la unua estas nur literatura kaj la du ceteraj estas ambaŭ derivaĵoj.

Jen franclingvaj ekzemploj. La vortoj signifataj de steleto, aŭ ne ekzistas, aŭ ekzistas kun alia signifo.

- **angle* → *Anglais* «anglo» kaj *Angleterre* «Anglio» (*angle* signifas «englo»),
- **dane* → *Danois* «dano» kaj *Danemark* «Danio»,
- **eston* → *Estonie* «Estonio» kaj *Estonien* «estono»,
- **finne* → *Finnois* «finno» kaj *Finlande* «Finnlando»,
- **franc* → *France* «Francio» kaj *Français* «franco» (*franc* signifas «franko»),
- **hongre* → *Hongrie* «Hungario» kaj *Hongrois* «hungaro» (*hongre* signifas «kastrita»),
- **itale* → *Italie* «Italio» kaj *Italien* «italo»,
- **lituan* → *Lituanie* «Litovio» kaj *Lituanien* «litovo»,
- **polon* → *Polonais* «polo» kaj *Pologne* «Polio».

Konklude, oni kelkfoje plendas, ke Esperanto havas dukategorian sistemon. Sed ĉe la konsidero, ke multaj naciaj lingvoj havas trikategorian sistemon, oni rajtas fieri pri la simpleco kaj racieco de nia lingvo.

VI. Fakte, tiu “internacieco” ne estas tuta.

En kelkaj lingvoj, precipe ekstrem-orientaj, nur unu sistemo ekzistas por ĉiuj landoj: la sistemo AN. La kunmetaĵo entenas, ĉu iun sufikson, ĉu la vorton signifantan «homo» (sufikse aŭ prefikse, depende de la lingvoj): ĉine 人 *rén*, japane 人 *gin*, koree 사람 *saram*, vjetname người, indonezie orang.

- Finne: Ranska «Francio» → ranskalainen «franco (Francio-ano)», Suomi «Finnlando» → suomalaisen «finna, finno (Finnlando-ulo)».
- Hinde: फ्रांस *frāns* «Francio» → फ्रांसीसी *frānsīsī* «franco (Francio-ano)», भारत *bhārat* «Hindio» → भारतीय *bhāratīya* «hindo (Hindio-ano)».
- Ĉine: 法国 *fǎguó* «Francio» → 法国人 *fǎguórén* «franco (Francio-homo)», 中国 *zhōngguó* «Ĉinio» → 中国人 *zhōngguórén* «ĉino (Ĉinio-homo)».
- Japane: フランス *furansu* «Francio» → フランス人 *furansuĝin* «franco (Francio-homo)», 日本 *nihon* «Japanio» → 日本人 *nihonĝin* «japano (Japanio-homo)».
- Koree: 프랑스 *pŭrangsŭ* «Francio» → 프랑스사람 *pŭrangsŭsaram* «franco (Francio-homo)», 한국 *hanguk* «Koreo» → 한국사람 *hanguksaram* «Koreano (Koreo-homo)».
- Vjetname: Pháp «Francio» → Người Pháp «franco (homo-Francio)», Việt Nam «Vjetnamo» → Người Việt Nam «Vjetnamano (homo-Vjetnamo)».
- Indonezie: Perancis «Francio» → orang Perancis «franco (homo-Francio)», Indonesia «Indonezio» → orang Indonesia «Indoneziano (homo-Indonezio)».

VII. Naskiĝo de la Esperanta duobla sistemo.

Ekde 1900, Zamenhof delasis sian unuan sistemon (sistemo UJ), kiun li prave juĝis netaŭga. Kelkaj formoj postrestis de tiu epoko (*aŭstro* → *Aŭstrujo*, *ĉino* → *Ĉinujo*, *egipto* → *Egiptujo*, *japano* → *Japanujo*, *portugalo* → *Portugalujo*); ili ne estas tute naturaj, sed tiel firme enradikiĝis, ke oni devas rigardi ilin definitivaj.

Bedaŭrinde, la diversaj reformoj tiam proponitaj pekis en multaj flankoj.

1) Etnografia principo, de L. de Beaufront.

Verŝajne, Louis de Beaufront estas la unua, kiu agnoskis, en 1898, la necesecon de du kategorioj: «**1.** Kiam la ideo de lando superregas tiun de popolo, la radiko nomas la landon. **2.** Kiam la ideo de popolo superregas tiun de lando, la radiko nomas la popolon. **3.** Kiam la popolo loĝanta la landon konsistigas rason, aŭ nacion, kiun la historio faras analoga al raso, ni uzas por ĝi la radikon; en aliaj okazoj ni nomas per ĝi la landon. **4.** Escepte la nomoj finiĝantaj per -lando nomas la landon» (laŭ L'Espérantiste, 1898, p.95).

Sed kiel difini «superregon»? Kiel difini «rason» aŭ «nacion analogan al raso»? Ĉu akcepti, ke estas unu raso en Etiopujo (sistemo UJ) kaj ne en la apuda Somalio (sistemo AN)? Ĉu unu raso en Hindujo (absurdajo) kaj pluraj en Nepalo (plua absurdajo)? Kaj escepto estas bezonata!

2) Principo de supereco de la landnomoj, de É.Boirac.

En 1909, aperis la *Plena Vortaro* de É.Boirac. En la *Antaŭparolo*, li starigas la principon, «ke la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso -an,... kaj ke la alia maniero... estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda» (citita de G.Waringhien, *Lingvo kaj Vivo*, p.182).

Do ĉiuj landoj Eŭropaj (krom du aŭ tri esceptoj) kaj multaj Aziaj, estus kutime nomataj per sistemo nur «dua, akcesora»? Tio estas pensiga...

VIII. Zamenhofs pravigo de la duobla sistemo.

Zamenhof, kun sia kutima intuicio, agnoskis la necesecon de du kategorioj, kaj provis en 1911 doni la jenan pravigon.

«En la novaj landoj (ekzemple en ĉiuj landoj Amerikaj), la lando fakte kaj morale apartenas ne al ia difinita gento, sed egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj; tial estas afero tute natura, ke tie la lando ne uzas por si (per "uj") la nomon de ia gento, sed kontraŭe, ĉiuj ĝiaj loĝantoj uzas por si (per "an") la nomon de la lando.

Tute alia afero estis (kaj tradicie restis) en la landoj malnovaj; ĉiun pecon da tero okupis ia speciala gento, nomis la landon sia speciala genta propraĵo kaj ĉiujn aligentajn loĝantojn aŭ ekstermis, aŭ permesis al ili vivi en la lando kiel "fremduloj"; tial la landoj malnovaj preskaŭ ĉiam portas la nomon de tiu aŭ alia gento, kaj en Esperanto... ni tion esprimas per la sufikso "uj"» (*Lingvaj Respondoj*, p.14).

Fakte, Zamenhof sekvis ĉi tie sian intuicion, agnoskante la duoblan sistemon. Poste, li penis pravigi tiun intuicion per racia klarigo. Sed tiu klarigo estas ege malĝusta.

1) Kiel difini «novecon» aŭ «malnovecon» de lando? Ĉu Egiptujo kaj Etiopujo (sistemo UJ) estus «malnovaj», dum la apuda Sudano (sistemo AN) estus «nova»? Ĉu Nepalo (sistemo AN) estus «nova», kompare kun la «malnoveco» de Hindujo (sistemo UJ)?

2) Koncerne Usonon («nova lando», «lando Amerika»), kiu apartenas «egalrajte (!) al ĉiuj siaj loĝantoj», E.Drezen komentis prudente: «Zamenhof estis tiel ĉarmita per la penso, "ke tiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio", ke li forgesis pri la miliono da nigruloj persekutataj kaj ekspluatataj» (Zamenhof: *Bioideologia studo*, 1929, p.13).

Same, en tiu tempo, ĉiuj landoj Afrikaj estis kolonioj, en kiuj la regantoj kaj la regatoj tute ne estis egalrajtaj. Tamen, la Afrikaj landoj, krom Egiptio kaj Etiopio, sekvas la sistemon AN. Ĉi tie, Zamenhof montriĝas pli revema ol pragmata.

3) Male, Nederlando kaj Islando (landoj nek « *novaj* » nek « *Amerikaj* ») vere « *apartenas egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj* » kaj tamen apartenas al la sistemo AN. La PIV2 rimarkigas prave (p.23b), ke « *certe Islando estas gente pli homogena ol "la ujo de la francoj"!* ».

Similajn principojn resumas la *Enciklopedio de Esperanto* (1933, p.323): « *la gento donas sian nomon al sia lando per aldono de l' sufikso uj, kiam temas pri la Antikva mondo (Eŭropo, Azio kaj Egiptujo); sed, kiam temas pri la Nova mondo (Afriko, esceptante Egiptujon, Ameriko, Aŭstralio kaj Oceanio), estas la lando, kiu donas sian nomon al la regnano per aldono de l' sufikso an* » (E.Grosjean-Maupin).

Ĉi tie, la dispartiga linio ne plu estas la nocio *noveco/malnoveco* de la lando, sed la nocio *Antikva mondo* (sistemo UJ) / *Nova mondo* (sistemo AN). Estas facile rebati:

1) Ke *Anamo, Asirio, Cejlon, Irlando, Islando, Kamboĝo, Kipro, Laoso, Libano, Nederlando, Nepalo, Palestino, Siano, Siberio, Sirio, Tibeto, Tonkino* ne apartenas al la « *Nova mondo* » kaj tamen funkcias (kaj jam funkciis en 1933) laŭ la sistemo AN.

2) Ke *Etiopujo* (Afriko) funkcias (kaj jam funkciis en 1933) laŭ la sistemo UJ.

Konklude, nek la pravigo de Zamenhof, nek tiu de Grosjean-Maupin, respondas al la krudaj faktoj.

IX. La vera principo.

Mi tute ne intencas ĉi tie proponi novan principon, kiu ŝanĝus ion, sed nur **novan klarigon** de la universale akceptita sistemo (preskaŭ universale...).

Krom kelkaj eraroj, kiujn mi prezentos en la sekvanta ĉapitro, kaj kiujn korekti estus facile (kio ne signifas, ke iu aŭtoritato faros tion...), nia Esperanta nomenklaturado estas **egeracia**. Simple pro tio, ke **ĝi obeas preskaŭ ĉiam al la naturo, t.e. al la etimologio**.

• Kial *Brazilo, Ekvadoro, Gvineo, Islando, Israelo, Kanado, Kreto, Laoso, Malto, Nepalo, Nov-Zelando, Somalio, Urugvajo, Usono, Venezuelo*, funkcias laŭ la sistemo AN? Tute simple pro tio, ke ekde la apero de tiuj nomoj, en kiu ajn lingvo, ili estis **nomoj de lando**. En Esperanto, natura lingvo, ili estas do **nomoj de lando**. Doni al ili signifon gentonoman estus absurda artefaritaĵo: ĉi-kaze, la gentonomo postulas la sufikson **-ano**.

• Kial *afgano, anglo, ĉeĥo, dano, etiopo, finno, franco, germano, greko, mongolo, rumano, skoto, turko, uzbeko*, funkcias laŭ la sistemo UJ? Tute simple pro tio, ke ekde la apero de tiuj nomoj, en kiu ajn lingvo, ili estis **nomoj de gento**. En Esperanto, natura lingvo, ili estas do **nomoj de gento**. Doni al ili signifon landnoman estus absurda artefaritaĵo: ĉi-kaze, la landnomo postulas taŭgan sufikson (**-ujo, -io, -lando, -istano**).

Kaj ĉio tio estas vera, senkonsidere, ĉu la lando estas malnova, meznova aŭ plej nova; senkonsidere, ĉu ĝi apartenas al Antikva mondo, al Mezepoka mondo, al Moderna mondo.

Se granda parto de la landoj Afrikaj kaj Amerikaj apartenas al la sistemo AN, la kaŭzo estas tute simple, ke ili rezultas de koloniado. Kiam la hispanaj kaj portugalaĵ koloniistoj desegnis landlimojn en Suda Ameriko, kiam la anglaj, francaj kaj portugalaĵ koloniistoj decidis landlimojn en Afriko, ili tute ne zorgis pri la teritorioj loĝataj de tiu aŭ alia aŭtoktona popolo. Ili faris tion laŭ sia bontrovo, laŭ kriterioj politikaj, ekonomiaj, kapitalismaj, ktp, sed certe ne tribaj. Do ili nomis **landojn**, ne popolojn.

Sed okazis, ke oni nomis **landon** ankaŭ en Eŭropo. Ĉe la eltrovo de Islando, oni evidente ne nomis tiun insulon laŭ la nomo de la tiea popolo, ĉar ĝi ne estis loĝata. Oni evidente donis nomon al la **lando** (*is-land*: « lando de glacio »). La loĝantoj de Nederlando povintus

nomi sin *batavoj* (antikva nomo de popolo) kaj la landon *Batavujo*/*Batavio*. Sed ili preferis forlasi tiun popolnomon, kaj insisti pri la malalteco (*neder*) de sia lando. Tion ili rajtas.

Inverse, pluraj triboj nomis sin mem "*german*" (nomo de **popolo**) longe antaŭ ol oni fiksas la landlimojn de *Germanio*. Ekzistis **popolo** "*frank*", en tempo, kiam neniu ankoraŭ aŭdis pri iu lando nomita *Francio* aŭ *Frankio*.

Mi diris, ke nia landnoma sistemo estas **racia**; mi ne diris, ke ĝi estas perfekta.

Aŭstr', *egipt'*, *portugal'*, *ĉin'*, *japan'* estas origine nomoj de lando. Internacie, ili estas nomoj de lando. La natura logiko postulus: **Aŭstranoj vivas en *Aŭstro*, **Portugalanoj vivas en *Portugalo*, **Ĉinanoj vivas en *Ĉino*, ktp. Sed oni faris la malon: tio estas dekomenca eraro. Sed eraro, kiu iĝis de ĉiuj akceptata, ne plu estas eraro.

Pruve: neniu esperantofono diras: «*okaze de vojaĝo en *Ĉino kaj *Japano, mi konatiĝis kun multaj *Ĉinanoj kaj *Japananoj*». Vole-nevole, *ĉino* kaj *japano* estas gentonomoj. Cetere, Zamenhof avertis nin: «*la plej grava leĝdonanto estas la uzado*» (O.V., p.573; *Lingvaj Respondoj*, p.56). «*Komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco*» (*Lingvaj Respondoj*, p.15).

Do *aŭstr'*, *egipt'*, *portugal'*, *ĉin'*, *japan'* havas gentonoman signifon.

Ni notu tamen, ke iam la Aŭstria Esperanto-Instituto decidis rekomendi *Aŭstrio* kaj *Aŭstrian*. Tiu decido havas nur tre malgrandan gravecon, ĉar evidente ne la aŭstroj, sed ja la esperantistoj decidis pri Esperanta nomo.

X. La trisignifa sufikso *-ujo*.

Inter la Fundamentaj sufiksoj, *uj* estas la sola, kiu havas tri signifojn sufiĉe diversajn. La Fundamento (*Ekzercaro*, §20) donas la jenajn ekzemplojn.

- *pom'* (*пomme* | *apple* | *Apfel* | *яблоко* | *jablko*) → *pom'uj'* (*pommier* | *apple-tree* | *Apfelbaum* | *яблоня* | *jablonoj*).
- *cigar'* (*cigare* | *cigar* | *Cigarre* | *сигара* | *cygaro*) → *cigar'uj'* (*porte-cigares* | *cigar-case* | *Cigarrenbüchse* | *портъ-сигаръ* | *cygarnica*).
- *Turk'* (*Turc* | *Turk* | *Türke* | *турокъ* | *Turek*) → *Turk'uj'* (*Turquie* | *Turkey* | *Türkei* | *Турция* | *Turcja*).

La *Unua Libro* jam donis la samajn tri signifojn al *uj*, sed laŭ la ordo *cigar'*, *pom'*, *Turk'*.

La PIV difinas *uj* tiel: «*sufikso montranta aferon, destinitan enteni tion, kion esprimas la radiko*». La ĉefa signifo estas **enteno**. Sed pli precize, la unua signifo estas «*arbo*»; la dua estas «*enteno, skatolo, kruĉo*»; la tria estas «*lando*».

Tamen estas malfacile akcepti, ke Turkujo "*entenas*" turkojn kaj pomujo "*entenas*" pomojn, ekzakte kiel cigarujo *entenas* cigarojn.

Cetere, tiu sufikso havas alian strangan apartaĵon: kiel la ceteraj sufiksoj, ĝi povas esti uzata kiel memstara substantivo, sed en tiu ĉi kazo, ĝi ĉiam havas nur la duan signifon, neniam la du aliajn. Oni neniam diras, ke *Kanado estas vastega "ujo"* (sed *lando*), nek ke iu ĝardenisto plantis kelkajn "*ujojn*" (sed *arbojn*).

XI. Apero de la sufikso *-io*.

Post la unua Mondmilito, aperis la sufikso *-io* por anstataŭi *-ujo* en la tria senco (lando).

Fakte, Zamenhof mem uzis tiun sufikson *-io*, sed tre diskrete. En 1906, en la broŝuro *Homaranismo*, li proponis *Parizio*, *Peterburgo*, anstataŭ *Francujo*, *Rusujo* (tio estis iom revema intenco lukti kontraŭ naciismo). Samjare, G.Moch proponis la alprenon «*de nova sufikso -i- por anstataŭi -uj- en ĝia geografia senco*».

En 1911, Zamenhof akceptis *Alĝerio*, *Brazilio*, *Ĉilio*, *Meksikio*, *Tunizio*, kaj deklaris, ke se la Akademio anstataŭigus la "uj" per "i" en *Aŭstrujo*, *Belgujo*, *Svisujo*, li tion ne malkonsilus (*Lingvaj Respondoj*, p.15). Kiam en nur tri landoj? Daŭre, pro la mania obsedo pri unugenteco/plurgenteco.

Sed la vera naskiĝdato de la sufikso *-io* estas Decembro 1918, kiam Hector Hodler decidis, ke en la revuo de UEA, *Esperanto*, tiu nova sufikso anstataŭos la klasikan *-ujo*. Baldaŭ Teo Jung imitis lin en *Esperanto Triumfonta*, kaj ankaŭ Lanti en *Sennaciulo*. Ĝi estis subtenata de E.Privat kaj abunde uzata ĉe SAT.

Bedaŭrinde, ekde la komenco, kelkaj misuzis la novan sufikson, alroĉante ĝin ien ajn kaj iel ajn: **Islandio*, **Kanadio*, **Kubio*, **Malajio*, **Marokio*, **Urugvio*, ktp. Absurde!

La grado de internacieco de *-io* estas granda: itale-hispane-portugale *-ia*, france *-ie*, angle *-y*, germane *-ien* aŭ *-ei*, nederlande *-ië*, novgreke *-ία*, ĉeĥe *-ie*, pole *-ja*, ruse-bulgare *-ия*, ukraine *-ія*, litove *-ija*, hungare *-ia*, turke *-iye*, arabe *-يية* *-iyya*, hebree *יייה* *-iyya^h*.

La origino estas la latina *-ia*, greka *-ία*.

Male, la grado de internacieco de *-ujo* estas proksimume nula.

Evidente, la sufikso *-io* havas tiun apartaĵon, ke ĝi ne povas esti uzata memstare. Alidire, *io* tute sola ne povas signifi «lando» (cetere, tute same kiel *ujo*).

Ĉu *-io* = *-ujo*? Ne. Oni zorge atentu, ke *-io* ne estas plena sinonimo de *-ujo*.

Fakte, *-io* havas tri signifojn, aŭ pli ĝuste tri uz-manierojn.

1) **Ĝi aldoniĝas al gentonomo; tiukaze ĝi estas sinonimo de *-ujo*.** Sed nur tiukaze. Estas neniu senca diferenco inter *Franc'ujo* kaj *Franc'io*. Ambaŭ formoj estas analizeblaj kiel «lando de la francoj». La elekto de unu aŭ alia sufikso dependas de onia prefero.

2) **Ĝi aldoniĝas al nomo de ĉefurbo aŭ ia geografiaĵo.** Tiukaze, ĝi tute ne estas sinonimo de *-ujo*. La eraraj nomoj **Alĝerujo*, **Senegalujo* (kiuj estis foje uzataj) estus analizeblaj kiel «lando de la *alĝeroj, de la *senegaloj», sed la gentonomoj **alĝero*, **senegalo* ne ekzistas: *Alĝero* estas urbo kaj *Senegalo* estas rivero.

a) Aldonita al la nomo de ĉefa urbo: *Alĝer'io*, *Babilon'io*, *Brandenburg'io*, *Dijon'io*, *Limoĝ'io*, *Luksemburg'io*, *Meksik'io*, *Perigoz'io*, *Rom'io*, *Tuniz'io*.

Nota. La landnomo *Meksiko* estas oficiala (Oficiala Aldono n-ro 8, *Aktoj de la Akademio*, II, p.13).

b) Aldonita al la nomo de ia geografiaĵo (dezerto, lago, maro, monto, rivero): *Ĉad'io*, *Jordan'io*, *Kamerun'io*, *Morav'io*, *Namib'io*, *Niĝer'io*, *Ocean'io*, *Senegal'io*.

Nota. La rivero *Niĝero* donas la nomon de du Afrikaj ŝtatoj: *Niĝero* aŭ *Niĝerlando* (ĉefurbo: Niameo) kaj *Niĝerio* (ĉefurbo: Abuĝo).

Nota. En *Lingvo kaj Vivo* (p.187), Waringhien uzas la formojn *Nigero*, *Nigerio*.

c) Nepreciza nocio: *Esperant'io*, *Fueg'io*, *patr'io*, *Sovet'io*.

3) **Ĝi estas ankaŭ ŝajna sufikso.** Ne vera sufikso. En tiu kazo, la litero *i* apartenas al la radikalo, la landnomo **ne** entenas ian sufikson. Ni komparu:

- La nomo *Ĉad'io* (ĉi-supre) **ja** entenas: radikalon *Ĉad*, sufikson *i* kaj finaĵon *o*. Ĝi vere entenas la sufikson *-io*, kaj estas analizebla kiel «la lando de la lago Ĉado».

- Male, la nomo *Siri'io* **ne** entenas: radikalon *Sir*, sufikson *i* kaj finaĵo *o* (**Siro* ne ekzistas), sed ja radikalon *Siri* kaj finaĵon *o*.

Tiu pseŭdosufikso ekzistas en: *Asirio*, *Aŭstralio*, *Azio*, *Bolivio*, *Burundio*, *Cilicio*, *Ĉilio*,

Emilio, Fiĝio, Gambio, Indioj, Indonezio, Kapadocio, Karintio, Kastilio, Kiribatio, Kolombio, Liberio, Libio, Malajzio, Malavio, Malio, Maŭritanio, Melanezio, Mezopotamio, Mikronezio, Nubio, Polinezio, Samario, Siberio, Sirio, Somalio, Tanzanio, Zambio, ktp.

Evidente, la loĝantoj ne estas **asiroj, *azoj, *ĉiloj, *gamboj, *kolomboj, *liberoj, *maloj, *nuboj*, ktp, sed ja *Asirianoj, Ĉilianoj, Kastilianoj, Zambianoj*, ktp.

La unua PIV metis la nomon *Aŭstrio* en tiun kategorion (loĝanto: *Aŭstriano*). Sed ne ekzistas por tio serioza kaŭzo. Kun Zamenhof, ni akceptu *aŭstro* → *Aŭstr'ujo, Aŭstr'io*.

En 1909, la Akademio opiniis, ke estas tro frue por decidi ion. Sed en Julio 1920, la Akademio, instigita de Th.Cart, kondamnis la sufikson *-io*. P.Corret tiam sprite argumentis, ke « *Svisio povus nur signifi "io svisa", nome ian svisajon, eble laktoĉokoladon* »!!! Bedaŭrinde, Corret pekis per malbona scio de la reguloj de la vortfarado...

En 1922, la Lingva Komitato malkonsilis la uzon de la sufikso *-io* per 74 voĉoj kontraŭ 5. Sekve de tio, dum longa tempo (inter la du Mondmilitoj), oni multe kverelis pri *-ujo/-io*.

En 1975, la Akademio « *nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo* » (Aktoj de la Akademio, II, p.14).

En *Lingvo kaj Vivo* (p.187), G.Waringhien pledas pro la aldono de *-io* al la landnomoj finiĝantaj per *-ano*, por eviti konfuzon kun la loĝantosufikso: *Iranio, Pakistanio, Turkestanio*. Sed tio (feliĉe!) ne trovis imitantojn.

XII. La "sufikso" *-lando*.

Precize, *-lando* ne estas sufikso, sed ordinara substantivo. Tamen, ĝi povas funkcii kiel dua elemento (ĉefelemento) de kunmetitaĵo. Do ĝi ebligas la formadon de landnomoj.

« *Vian ideon pri la uzado de la aldono "lando" mi plene aprobas. Laŭ la reguloj de Esperanto oni povas tute bone diri Franclando, Anglolando, Kanadlando, Perulando k.t.p.* » (letero al Fruictier, 1902, *Originala Verkaro*, p.426, *Lingvaj Respondoj*, p.14).

Efektive, *Franclando* estas analizebla kiel « lando de francoj ». Oni ne vidas ian kaŭzon, kial tiu kunmetaĵo estus malpermesata. En 1972, Pierre Delaire verkis kaj publikigis libron titolitan *La Dolĉa Franclando*. Sed ni rimarku, ke el la kvar nomoj cititaj de Zamenhof kiel ekzemploj, nur du estas allaseblaj laŭ la nunaj kriterioj: *Franclando* kaj *Anglolando*. La du ceteraj pekas kontraŭ la regulo de *Neceso kaj Sufiĉo* (kiu en 1902 ankoraŭ ne estis elpensita), ĉar *Kanado* kaj *Peruo* entenas jam la nocion *lando*.

Praktike, pro bonsoneco, oni uzas *-lando* precipe post unusilabaj radikoj: *Dan'lando, Grek'lando, Pol'lando, Rejn'lando, Rus'lando, Skot'lando, Svis'lando, Taj'lando*.

Ĉe kelkaj landnomoj finiĝantaj per *-lando*, ĉi tio estas ne aparta elemento, sed parto de la radikoj: *Burgenlando, Gronlando, Holando, Islando, Jutlando, Kvinslando, Laplando, Nederlando, Niĝerlando, Togolando*. La loĝantoj de tiuj landoj ne estas la **gronoj, *hoj, *iroj, *isoj*, ktp, sed tute certe la *Gronlandanoj, Holandanoj, Irlandanoj*, ktp.

Inverse, la nomo *Tajlando* estas vere analizebla kiel « lando de la tajoj » (*-lando* ĉi tie funkcias kiel sufikso). Sed pro naciaj kutimoj kaj ankaŭ pro belsoneco, oni neniam uzas *Tajio, Tajujo*. Cetere, ni rimarku, ke *tajo* kaj *Tajlandano* ne estas sinonimoj: la *tajoj* vivas grandaparte en Tajlando, sed ankaŭ minoritate en Birmo, Ĉinio, Laoso, Vjetnamo; male, la *Tajlandanoj* estas la loĝantoj de Tajlando, tute egale ĉu ili estas tajoj aŭ ne.

Unu avantaĝo de *-lando* estas, ke ĝi ebligas la jenan diferencon: « *mi ne estas franco, sed anglo; tamen de kelka tempo mi estas Franclandano (t.e. mi loĝas en Francio)* ».

XIII. La pseŭdosufikso *-(i)stano*.

Ĝi venas de la persa استان *ostān* «lando». Ĝi estas abunde uzata ankaŭ en la tjurkaj lingvoj (kazaĥa, kirgiza, turkmena, uzbeka, ktp). En la turka, oni trovas ĝin, ekzemple, en: Arabistan «Arabio», Bulgaristan «Bulgario», Ermenistan «Armenio», Gürcistan «Kartvelio», Hirvatistan «Kroatio», Hindistan «Hindio», Kürdistan «Kurdio», Lehistan «Polio», Macaristan «Hungario», Moĝolistan «Mongolio», Yunanistan «Grekio».

En *Afgan'istano*, *Kazaĥ'istano*, *Kirgiz'istano*, *Kurd'istano*, *Taĝik'istano*, *Turkmen'istano*, *Uzbek'istano* (nePIVaj), *-istano* estas pseŭdosufikso. Efektive, la gentonomoj estas *afgano*, *kazaĥo*, *kirgizo*, *kurdo*, *taĝiko*, *turkmeno*, *uzbeko*. Tiuj landnomoj estas do sinonimoj de *Afganio*, *Afganujo*, *Kazaĥio*, *Kazaĥujo*, ktp, solaj formoj registritaj en la PIV.

Same, en la *Grand Dictionnaire Espéranto-Français*, G.Waringhien citas *Beluĉ'istano* kaj ĝian sinonimon *Beluĉo'lando*, kio implicas la ekziston de la gentonomo *beluĉo*.

Sed *-stano* estas ŝajna sufikso (pseŭdosufikso) en: *Dagestano*, *Hindustano*, *Pakistano*, *Raĝastano*, *Turkeŝtano* (PIVaj). En ĉi tiuj nomoj, *-stano* apartenas al la radiko. Efektive, *Pakistano* ne estas analizebla kiel «*lando de la pakoj*». La loĝantoj estas evidente la *Pakistananoj*.

Tiuj ĉi formoj estas internaciaj, do uzeblaj (kvankam ne devigaj) en Esperanto laŭ la 15a Regulo de la Fundamenta Gramatiko: «**La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo**» (*Fundamenta Krestomatio*, p.241). La esenco de tiu ĉi grava regulo jam troviĝis en la *Unua Libro* (*Fundamenta Krestomatio*, p.233).

Evidente, oni rajtas uzi ankaŭ *Afganio*, *Kazaĥio*, *Kirgizio*, *Kurdio*, *Taĝikio*, *Turkmenio*, *Uzbekio*. Tiu elekteleco estas unu el la grandaj avantaĝoj de Esperanto.

Sed oni ne povas rigardi *-istano* kiel normalan sufikson, kies uzado estus libera (**Anglistano*, **Polistano*, estus apenaŭ kompreneblaj). Oni ne povas uzi ĝin alimaniere, ol pri nomoj, kiuj jam internacie entenas ĝin. Evidente, ĝi ne havas memstaran uzon.

XIV. Resume...

Por nomi landon, oni kelkfoje havas iom vastan elektelecon. Ekzemple, *Afganio*, *Afganujo*, *Afganlando*, *Afganistano*; *Eburio*, *Eburbordo*, *Ebura Bordo*, *Eburlando*, eĉ *Ivorio* kaj *Kotdivoaro*. Kial plendi pri tio? Nur ploremuloj bedaŭras tiun riĉecon.

En pluraj lingvoj, oni trovas diversajn sinonimojn ĉe la landnomoj.

- En la franca lingvo, oni rajtas elekti inter *Kirghizistan*, *Kirghizstan* kaj ankaŭ *Kirghizie* (laŭ la *Petit Robert*), kaj la enciklopedioj hezitas inter *Viêt Nam*, *Vietnam* kaj *Viêt-nam*. Kaj *Nippon* estas sinonimo de *Japonais*.

- En la ĉina lingvo, *Ĉinio* povas esti *Zhōngguó* (中国) aŭ *Zhōnghuá* (中华).

- En la korea lingvo, *Koreo* povas esti *Hanguk* (한국 aŭ 韓國) aŭ *Ĉosŝon* (조선 aŭ 朝鮮): en Sud-Koreo, oni preferas *Hanguk*; en Nord-Koreo, *Ĉosŝon*.

- Ankaŭ en Esperanto, ni havas sinonimojn, eĉ tute sendepende de la diverseco de la sufiksoj. Ekzemple, la balta lando, kies ĉefurbo estas Rigo, povas esti nomata *Latvio* aŭ *Letonio*. Iu Mediteranea Italia insulo nomiĝas laŭvole *Sardio* aŭ *Sardinio*. Oni hezitas inter *Kongo*, *Kongolo* kaj *Kongolando*, inter *Togo*, *Togolo* kaj *Togolando*, inter *Fajrolando* kaj *Fuegio*. Oni rajtas elekti ankaŭ inter *Grenlando*, *Gronlando* kaj *Groenlando*. Egalvaloras *Celtio* kaj *Keltio*. Kaj se via alparolato ne komprenas *Laplando*, diru *Laponio*.

Landnomoj: Kore', Panĝab', Ukrain', Vjetnam'

La problemo, ĉu uzi *Koreo/Koreano* ("la Koreanoj loĝas en Koreo"), ĉu *koreo/Koreio* ("la koreoj loĝas en Koreio"), jam plurfoje interesis la esperantistaron. Kvankam ĝi estis kontentige solvita de la Akademio en 1992 (*Aktoj de la Akademio*, III, p.61), la afero revenas foje en la aktualajon.

Kaj se oni komparas la unuan PIVon kun la PIV reviziita, oni elkovras kun miro plurajn diferencojn: la vortoj *Panĝabo, Ukraino, Vjetnamo* ne havas la saman signifon.

I. Bazaj reguloj.

Por solvi ĉian tian problemon, mi starigis la jenan sistemon de **kvar reguloj**, uzeblaj laŭ hierarkia ordo: oni apliku la duan **nur** se la unua ne estas aplikebla; la trian **nur** se la unua kaj dua ne estas aplikeblaj; la kvaran **nur** se la unuaj tri ne estas aplikeblaj.

Unua regulo: Fundamento. Se la koncernata radiko troviĝas en la Fundamento, oni uzu ĝin kun la senco, kiun ĝi havas en la Fundamento, sen plia diskuto.

Tio estas simpla apliko de la netuŝebleco de la Fundamento.

«Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon» (*Antaŭparolo*, p.43).

Dua regulo: ĝenerala uzado. Se la koncernata radiko estas de longe uzata de la esperantistaro kun unu konstanta signifo, oni uzu ĝin kun tiu sama signifo.

Tio estas simpla konstato de la fakto, ke lingvo (kiu ajn lingvo, ĉu etnolingvo, ĉu planlingvo) evoluas mem, ne obeante al arbitra decido de eminentulo(j).

«La plej grava leĝdonanto estas la **uzado**» (L.L.Zamenhof, *O.V.*, p.573, *Lingvaj Respondoj*, p.56). «Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial **komuna ĝisnuna uzado** devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco» (L.L.Zamenhof, *Lingvaj Respondoj*, p.15).

Ekzemplo de apliko de tiu ĉi regulo estas la senco donita al la radikoj *aŭstr'*, *ĉin'*, *japan'*, *portugal'*, uzataj de ĉiam nur en la senco gentonoma.

Tria regulo: internacieco. Se la koncernata radiko estas uzata en la tuto, aŭ almenaŭ en la plimulto, de la grandaj kulturlingvoj de la mondo, oni uzu ĝin laŭ la formo kaj kun la signifo, kiujn ĝi havas en tiuj lingvoj.

Tio estas simpla apliko de la fakto, ke Esperanto estas **monda** lingvo, ne **regiona** lingvo, **internacia** lingvo, ne **nacia** lingvo. Konsekvence, ĝi ne povas obei al **regiona** aŭ **nacia** uzado, sed nur al **monda, internacia** uzado.

«Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia» (*Unua Libro*, kovrilpaĝo).

«La vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj,... mi lasis tute **sen ia ŝanĝo**» (*Unua Libro, Fundamenta Krestomatio*, 18a eldono, p.238).

Kvara regulo: etnolingva uzado. Se neniu el la tri ĉi-antaŭaj reguloj estas aplik-ebla (malofta kazo), oni konsideru la etnolingvan uzadon de la koncernata radiko.

Nun, unu afero restas ekzamenenda:

- Ĉu tiuj reguloj estas nur *miaj*? Se jes, forĵetu ilin sen hezito.
- Ĉu tiuj reguloj estas *Zamenhofaj*? Se jes, konsideru ilin kun atento.

Evidente, kiam Esperanto estis farata, aŭ ĵus farita, miaj unuaj du reguloj ne povis

ekzisti: Fundamento ne ekzistis, komuna uzado ankaŭ ne.

Sed oni nur legu mian ĉapitron *Internacieco de la geografiaj nomoj*. Oni trovos en ĝi dekojn da ekzemploj pruvantaj, ke Zamenhof ĈIAM konsideris la regulon de internacieco (mian *trian regulon*) antaŭ la etnolingva uzado (mia *kvara regulo*).

Konsekvence, la redaktado de tiuj ĉi kvar reguloj estas mia, la stilo estas mia, certe.

Sed la enteno estas CENTPROCENTE ZAMENHOFA.

II. Apliko de tiuj reguloj al la radiko *kore'*.

Unua regulo: Fundamento. Ne aplikebla, ĉar *kore'* ne troviĝas en la Fundamento.

Dua regulo: Ĝenerala uzado. Ne aplikebla, ĉar ankoraŭ nuntempe *unuanima konsento ne ekzistas*. Sufiĉas konstati, ke la *lando* estas nomata:

- *Koreo* en la unua PIV, en la *Grand Dictionnaire Espéranto-français* de G.Waringhien, en la *Esperanto-English Dictionary* de M.C.Butler, en la *Bulgara-Esperanta Vortaro* de A.D.Atanasov, en la *Nova Vortaro Esperanto-Japana* de Okamoto Joŝicugu, en la *Vocabolario Esperanto-Italiano* de U.Broccatelli, sur la *Mondmapo* de T.Sekelĵ kaj en la *Poŝatlaso de la Mondo*. Loĝantoj: *Koreanoj*. Forno oficialigita de la Akademio (*Aktoj de la Akademio*, III, p.61).

- *Koreo* aŭ *Koreio* en la *Vortaro Japana-Esperanta* de Miyamoto Masao (p.632a), en la *Ĉina-Esperanta Vortaro* (Pekino, 1985, p.682) kaj en la *Vocabolario Italiano-Esperanto* de C.Minnaja. Loĝantoj: *Koreanoj* aŭ *koreoj*.

- *Koreo*, *Koreio* aŭ *Koreujo* en la *Esperanta-Rusa Vortaro* de E.Bokarev. Loĝantoj: *Koreanoj* aŭ *koreoj*.

- *Koreio* en la dua PIV, en la *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* de E.D.Krause, en la *Esperanto-Korea Vortaro* de Hajpin Li kaj en la *Jarlibro 2004* de UEA (p.31). Loĝantoj: *koreoj*.

- *Koreio* aŭ *Koreujo* en la *Esperanto-Ĉina Vortaro* (Pekino, 1990). Loĝantoj: *koreoj*.

- *Koreujo* en la *Enciklopedio de Esperanto* (1933, p.303) kaj en la *Esperanto and English Dictionary* de J.C.Wells (p.291b). Loĝantoj: *koreoj*.

Do ĉu *Koreanoj* loĝas en *Koreo*, ĉu *koreoj* loĝas en *Koreio*?

lu energia skribemulo, legante, ke «*unuanima konsento ne ekzistas*», trempis sian koleran plumon en vinagron, kaj skribis (*Literatura Bazar*, n-ro 206) skurĝan artikolon kontraŭ mia diro.

Unue, li asertas, ke «*inter E-uzantoj unuanimeco neniam ekzistas*» (neniam!!!). Se ĉi tio speguletus la veron, eĉ de malproksime, Esperanto ne estus uzebla: la uzebleco de kiu ajn lingvo havas esence kiel fonton la unuanimecon de ĝiaj uzantoj. Feliĉe, unuanimeco ekzistas en Esperanto por preskaŭ la tuto de la leksiko (esceptoj estas tre malmultaj).

Tiu skribemulo estas ankaŭ kalkulemo. Li eltrovis, dank' al Interreto, ke «*84% el la esperantistoj uzas la sistemon koreoj en Koreio, 6% la sistemon koreoj en Koreujo, 9% la sistemon koreanoj en Koreo kaj 1% mikŝitan sistemon*». Povas esti, ke tiuj nombroj estus ĝustaj, mi nek kontrolis nek kontrolos. Sed mi ŝuldas koran dankon al mia kritikemulo, ĉar kun la intenco pruvi, ke mi stultumas, li precize pravas, ke mia aserto estas tute ĝusta: **pri la senco de la radikalo *kore'* unuanimeco NE ekzistas**. Estas vera bombono por la menso, kiam iu stultulo, kun la celo malpravigi onin, alportas plian pruvon, ke oni pravas.

Tria regulo: internacieco. Aplikebla sen ia malfacilo. «*Ekzistas monda internacieco por la landnomo Kore' : ĝi koncernas ne nur la latinidajn, ĝermanidajn kaj slavajn lingvojn, sed ankaŭ la sanskritidajn kaj la iranajn, ankaŭ la afrikajn kaj aziajn*» (laŭ *Aktoj de la Akademio*, III, 1992, p.61).

Nu, en 1992, sub la klera regado de A.Albault, la Akademio perfekte pravis. Jen la diversaj nomoj de tiu *lando* en kelke da lingvoj: angle-germane-nederlande *Korea*, france *Corée*, itale *Corèa*, hispane *Corea*, portugale *Coreia*, novgreke *Κορέα*, ruse-bulgare

Koréja, pole-ĉeĥe Korea, litove Korėja, norvege-svede Korea, irlande AN CÓIRÉ, hungare-finne Korea, kartvele კორეა korea, novhebree קֹרֵי קֹרֵי qōre'a^h, arabe كوریا kūrīyā, hinde कौरिया kōriyā, perse کوره kore^h, turke Kore.

Tiuj vortoj devenas de la nomo de la dinastio *Koryo* (고려 koryō, 918-1392, ĉine 高麗 gāolì, vjetname Cao-ly, taje Kaoli).

Sed **neniu** el tiuj nomoj difinas la loĝantojn. **Ĉiuj** difinas la **landon**.

Tiu rimarkinda internacieco kondukas al la uzado de la radiko **KORE'** en la senco «**LANDO DE LA KOREANOJ**». Rezigni pri tiu internacieco estus rezigni pri la **internacieco de Esperanto**, eĉ tute sendepende de iu Akademia decido. Oni malfacile vidas, je la nomo de kia maldemokrateco, tiel vasta interkonsento (eble 99,9% de la homaro, eble eĉ iom pli!) devus forviŝiĝi. Se estas vere, ke 90% de la esperantistaro uzas la sistemon *koreoj en Koreio aŭ en Koreujo*, tio montras nur, ke 90% de la esperantistaro (inter kiuj, kelkaj Axademianoj!) ankoraŭ ne ĝuste konsciis pri la necesa internacieco de sia lingvo.

Konklude, «**la formo Koreujo estas kontraŭfundamenta**» (*Aktoj de la Akademio*, III, p.62).

Ĉar la apliko de la tria regulo solvas la problemon, la konsidero de la kvara regulo ne estas necesa. Ni tamen ekzamenu ĝin.

Kvara regulo: etnolingva uzado. Ĝi estas **ne aplikebla**, ĉar etnolingva uzado de la radiko **kore'** ne ekzistas. La Koreanoj mem **NE UZAS la radikon kore'**: en la korea lingvo, la lando nomiĝas 조선 *ĝosŝon* (ĉine 朝鮮 *cháoxiān*, japane 朝鮮 *ĉōsen*) aŭ 한국 *hanguk* (japane 韓国 *kankoku*), kaj «korea lingvo» estas 한국어 *hangugŭ* aŭ 한국말 *hangukmal*.

Ni notu unue, ke pri ia ajn **Esperanta** vorto decidus la **Esperantanoj**, ne la **Koreanoj**; due, ke la **Koreanoj** mem ne hezitas presigi poŝtmarkojn kun la angla nomo **Korea**!

III. Apliko de tiuj reguloj al la radiko **panĝab'**.

Unua regulo: Fundamento. Ne aplikebla, ĉar **panĝab'** ne troviĝas en la Fundamento.

Dua regulo: ĝenerala uzado. Same ne aplikebla, ĉar ankoraŭ nuntempe unuanima konsento ne ekzistas. Sufiĉas konstati, ke la **lando** estas nomata:

• **Panĝabo** en la unua PIV, en la *Grand Dictionnaire Espéranto-français* de G.Waringhien, en la *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* de E.D.Krause, en la *Vocabolario Italiano-Esperanto* de C.Minnaja kaj en la *Poŝatlaso de la Mondo*. Loĝantoj: *Panĝabanoj*.

• **Penjabo** en *Monato*. Loĝantoj: *Penĵabanoj*.

• **Panĝabio** en la dua PIV (tute sola!). Loĝantoj: *panĝaboj*.

• **punĵaba** ĉe W.Auld (*Pri Lingvo kaj aliaj Artoj*, p.95). Lando: *Punĵabo*. Loĝantoj: *Punĵabanoj*.

Do ĉu Panĝabanoj loĝas en Panĝabo, ĉu panĝaboj loĝas en Panĝabio?

Tria regulo: internacieco. Aplikebla sen ia malfacilo. Ni esploru la nomon de tiu **lando** en kelkaj lingvoj: angle **Punjab**, france **Pendjab**, germane **Pandschab**, hispane **Penyab**, itale **Pangiàb**, ruse **Панджáb**, perse-urdue پنجاب *panĝāb*, hinde पंजाब *panĝāb*, bengale পঞ্জাব *panĝab*, indonezie **Punjab**.

En ĉiuj tiuj lingvoj, la nomo difinas la **landon**, ne la loĝantojn. Do ankaŭ la Esperanta nomo **Panĝabo** difinas **landon**, ne loĝanton.

Kvara regulo: etnolingva uzado. Ĉar la tria regulo jam solvis la problemon, ni povus preterpasi la kvaran regulon. Ni tamen ekzamenu ĝin.

La enlanda nomo estas पंजाब *panĝāb*, kiu signifas «kvin riveroj», evidente en la senco «lando de kvin riveroj»: पंजाब *panĝ* «kvin» (parenca kun la greka πέντε) kaj आब *āb*

«akvo» (parenca kun la latina *aqua*). Temas pri kvin flankriveroj de Induso: *Bias, Chenab, Jhelum, Ravi, Sutlej*. Cetere, la senco «landano de kvin riveroj» estus absurda.

Do ankaŭ la etnolingva uzado konfirmas, ke **Panĝabo** difinas **landon**, ne loĝanton.

Prave, A. Albault deklaras «*absurda*» la formon *Panĝabujo* (*Aktoj de la Akademio*, III, p.36). Evidente, la PIVa *Panĝabio* estas same absurda.

Cetere, la PIV mem ne estas konstanta en la eraro: ĝi uzas (p.652b) la esprimon *Pakistana Panĝabo*, en kiu *Panĝabo* estas ja nomo de lando!!!

IV. Apliko de tiuj reguloj al la radiko *ukrain'*.

Unua regulo: Fundamento. Ne aplikebla, ĉar *ukrain'* ne troviĝas en la Fundamento.

Dua regulo: ĝenerala uzado. Same ne aplikebla, ĉar ankoraŭ nuntempe unuanima konsento ne ekzistas. Sufiĉas konstati, ke la **lando** estas nomata:

• **Ukraino** en la unua PIV. Loĝantoj: *Ukrainanoj*.

• **Ukrajno** en la *Fundamenta Krestomatio* (p.58, 66), en la *Plena Analiza Gramatiko* (p.460), en la *Esperanto-English Dictionary* de M.C. Butler, en la *Grand Dictionnaire Espéranto-français* de G. Waringhien, en la *Aktoj de la Akademio* (III, p.65), sur la *Mondmapo* de T. Sekelj kaj en *Lingvo kaj Vivo*, de G. Waringhien (p.184). Loĝantoj: *Ukrajnanoj* aŭ *ukrajnanoj*.

• **Ukrajno** aŭ **Ukrajnio** en la *Vocabolario Italiano-Esperanto* de C. Minnaja. Loĝantoj: *Ukrajnanoj* aŭ *ukrajnoj*.

• **Ukrainio** en la dua PIV, en la *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* de E.D. Krause, en la *Bulgara-Esperanta Vortaro* de A.D. Atanasov kaj en la *Jarlibro de UEA*. Loĝantoj: *ukrainoj*.

• **Ukrajnio** en la *Vivo de Zamenhof*, de E. Privat (p.71, 75) kaj en la *Lingvaj Respondoj* de Sergio Pokrovskij (p.24). Loĝantoj: *ukrajnoj*.

• **Ukrainio**, **Ukrajno** aŭ **Ukrajnujo** en la *Esperanta-Rusa Vortaro* de E. Bokarev. Loĝantoj: *ukrainoj* aŭ *Ukrajnanoj*.

Do ĉu Ukrainanoj loĝas en Ukraino, ĉu Ukrajnanoj loĝas en Ukrajno, ĉu ukrainoj loĝas en Ukrainio?

Tria regulo: internacieco. Aplikebla sen ia malfacilo. Ni esploru la nomon de tiu **lando** en kelkaj lingvoj: france-angle-germane **Ukraine**, hispane **Ukrania** aŭ **Ucrania**, itale **Ucraina**, rumane **Ucraina**, irlande **an Ūcráin**, pole-litove **Ukraina**, albane **Ukrahinë**, novgreke **Ουκρανία**, ruse **Україна**, beloruse **Украіна**, bulgare **Україна**, hungare **Ukrajna**, finne **Ukraina**, armenie **Ալկրաինիստ** *ukraina*, kartvele **უკრაინის** *ukraina*, turke **Ukrayna**, hebree **אֻקְרַיִנָּה** *ūkra'ina*ⁿ, arabe **أُوکْرَايِنَا** *ūkrayinā*, perse **اوکرائین** *ūkrāin*, hinde **उकुराइन** *ukraina*, mongole **Украина**, japane **ウクライナ** *ukuraina*, ĉine **乌克兰** *wūkèlán*.

En ĉiuj tiuj lingvoj, la nomo difinas unuanime la **landon**, ne la loĝantojn. Do ankaŭ la Esperanta nomo **Ukraino** difinas **landon**, ne loĝanton.

Kvara regulo: etnolingva uzado. Ĉar la tria regulo jam solvis la problemon, ni rajtus preterpasi la kvaran regulon. Ni tamen ekzamenu ĝin.

La enlanda nomo **Україна** venas de la old-slava **оукраина**, kiu signifas «apudlima **regiono**», de **оу** «apud» (ruse **у** «apud, ĉe») kaj **краи** «regiono» (ruse **край** «lando, provinco, regiono»). Loĝanto estas: ukraine **українець**, ruse **українец**.

Do ankaŭ la etnolingva uzado konfirmas, ke **Ukraino** difinas **landon**, ne loĝanton.

G. Waringhien rimarkis: «Ukrajna signifas ruslingve 'limlando'; sekve Ukrajno absolute ne povas esti uzata por nomi loĝanton» (*Lingvo kaj Vivo*, p.184). Tio estas klare kaj nerefutebla, kaj Waringhien estis nia plej alta aŭtoritato. Sed li mortis, formortis, plene

mortis, tute mortis... Foriris kato, dancas ratoj...

Akcesore, ĉu preferi *Ukrain*, ĉu *Ukrajn*? La formo *Ukrain* ŝajnas pli proksima al la ukraina Україна, kaj ankaŭ al la rusa Україна.

V. Apliko de tiuj reguloj al la radiko *vjetnam'*.

Unua regulo: Fundamento. Ne aplikebla, ĉar *vjetnam'* ne troviĝas en la Fundamento.

Dua regulo: ĝenerala uzado. Same ne aplikebla, ĉar ankoraŭ nuntempe unuanima konsento ne ekzistas. Sufiĉas konstati, ke la *lando* estas nomata:

• **Vjetnamo** en la unua PIV, en la *Plena Analiza Gramatiko* (p.460), en la *Grand Dictionnaire Espéranto-français* de G.Waringhien, en la *Esperanto-English Dictionary* de M.C.Butler, en la *Vocabolario Italiano-Esperanto* de C.Minnaja kaj sur la *Mondmapo* de T.Sekelj. Loĝantoj: *Vjetnamanoj*.

• **Vjet-Namo** (stranga dispartigo!) en la *Aktoj de la Akademio*, III, p.65.

• **Vjetnamio** en la dua PIV, en la *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* de E.D.Krause, en la *Esperanta-Rusa Vortaro* de E.Bokarev, en la *Granda Vortaro Vjetnam-Esperanta*, de Nguyen Minh Kinh kaj en la *Jarlibro de UEA*. Loĝantoj: *vjetnamoj*.

Do ĉu *Vjetnamanoj* loĝas en *Vjetnamo*, ĉu *vjetnamoj* loĝas en *Vjetnamio*?

Tria regulo: internacieco. Aplikebla sen ia malfacilo. Ni esploru la nomon de tiu *lando* en kelkaj lingvoj: france Viêt Nam, Vietnam aŭ Viêt-nam, angle-germane Vietnam, hispane-rumane Vietnam, itale Vietnàm, novgreke Βιετνάμ, pole Wietnam, ĉeĥe Vietnam, ruse Вьетна́м, ukraine В'єтна́м, beloruse В'єтна́м, litove Vietnamas, hungare Vietnám, finne Vietnam, arabe فييتنام *fiyātnām*, hebree וַיֶּתְנָם *wyetnam*, turke Viyetnam, perse ويتنام *vyetnām*, indonezie Vietnam, mongole Вьетнам, ĉine 越南 *yuè'nán*, japane ベトナム *betonamu*.

En ĉiuj tiuj lingvoj, la nomo difinas la *landon*, ne la loĝantojn. Do ankaŭ la Esperanta nomo *Vjetnamo* difinas *landon*, ne loĝanton.

Cetere, oni ne komprenas, kial *Anamo* devus difini regionon (« *Anamo, la centra parto de Vjetnamio* », PIV2, p.85a), dum *Vjetnamo* absurde difinus loĝanton (ambaŭ entenas *nam* « sudo »).

Kvara regulo: etnolingva uzado. Ĉar la tria regulo jam solvis la problemon, ni povus preterpasi la kvaran regulon. Ni tamen ekzameni ĝin.

La vjetnama Viêt Nam difinas la *landon*. Ĝi venas de Viêt (nomo de olima princlando sude de Ĉinio) kaj *nam* « sudo ». Ja « sudo », ne « sud'ano »! La vjetnama vorto por « *Vjetnamano* » estas *Ngườ*i* Viêt Nam*.

Do ankaŭ la etnolingva uzado konfirmas, ke *Vjetnamo* difinas *landon*, ne loĝanton.



En la unua PIV, sub la klera gvidado de G.Waringhien, ĉiuj kvar radikoj pritraktitaj en ĉi tiu ĉapitro havis difinon logikan kaj konforman al la spirito de Esperanto kaj al la ĝenerala sinteno de Zamenhof: « *Чтобы языкъ былъ всемирнымъ, не достаточно назвать его такъ-вымъ, Пор ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia* » (*Unua Libro*, kovrilpaĝo).

Sed la dua PIV, bedaŭrinde, tre bedaŭrinde, “reviziis” ilin...

Nu, ni vidis, ke tiuj reguloj, kvankam redaktitaj de mi mem laŭ la formo, **estas CENTPROCENTE ZAMENHOFAJ** laŭ la enteno.

La Zamenhofeco de mia demonstro estas ĝuste tio, kion *Literatura Bazar*o (n-ro 206) nomas « *unu detalo* »!!! La Majstro ne meritis tion...

Medialo

Ĝi estas unu “voĉo” de la Esperanta verbo. ☞ *Faktivito, Transitiveco.*

Medialo estas verboformo difinanta **agon** (ne staton) prezentatan « *kiel reaganta al la subjekto mem* » (PAG, p.133). Alidire, la subjekto de la ago estas ankaŭ la objekto de tiu ago: la subjekto faras la agon pri si mem.

La medialan voĉon oni esprimas per la sufikso **-iĝi**.

• *ŝi sidiĝis sur la kanapo.* La ago *sidiĝi*, plenumita de *ŝi*, koncernas nenium alian ol *ŝin*.

La senco mem de la sufikso **-iĝi** faras, ke ĉiuj *iĝ*-verboj estas netransitivaj. Konsekvence, vortfinoj **-iĝota*, **-iĝata*, **-iĝita*, **-iĝebla*, estas sensecaj, do nuraj barbarismoj.

La verboj, kiuj povas alpreni la medialan voĉon, estas la jenaj.

◊ La transitivaj verboj (ili tiam iĝas netransitivaj): *komenci (komenci la kurson) → komenciĝi (la kurso komenciĝas)*; *fini → finiĝi*; *ruli → ruliĝi*; *turni → turniĝi*.

◊ La netransitivaj stat-verboj (ili tiam iĝas ag-verboj): *kuŝi (esti kuŝanta) → kuŝiĝi (iĝi kuŝanta)*; *pendi → pendĝi*; *rusti → rustiĝi*; *stari → stariĝi*.

Sed kun la netransitivaj ag-verboj, **-iĝi** estas pleonasma: *ĉesi, droni, morti, ŝveli* estas ag-verboj netransitivaj, do koncernas nur la subjekton. La aldono de **-iĝi** ŝanĝas nenion en iliaj signifoj (*ĉesiĝi, droniĝi, mortiĝi*, kvankam uzataj de Zamenhof, estas evitindaj).

Konfuzoj nepre ne farendaj.

1) La medialo kun la pasivo.

La medialo esprimas agon reagantan al la subjekto mem; la pasivo, agon suferatan.

• *la ŝipeto turniĝis* (medialo) *ĉirkaŭ si mem* (Zamenhof, PIV, p.1193b). Neniu turnis ĝin.

• *leporoj kaj kunikoj estis turnataj* (pasivo) *sur rostostango* (Zamenhof, PIV, p.1193b). Evidente, ili ne turniĝis mem, sed iu turnis ilin.

• *ĉu la kandelo estis estingita, aŭ ĝi estingiĝis mem?* (Zamenhof, PIV, p.462a).

Tre malbonstila estas la jena dirmaniero, bedaŭrinde ofte renkontata:

• *V.A. denove elektiĝis prezidanto de Litovio* (Monato, Sept. 2004, p.12c). Tiu dirmaniero allasas la opinion, ke V.A. elektis sin mem, tute demokratie! Necesa(j) korekto(j):

• *V.A. estis denove elektita prezidento de Litovio.*

« *Same malĝuste estas: la letero skribiĝas, la bildo pentriĝas, ktp* » (PAG, p.167). Doni al la mediala voĉo pasivan signifon, grave senigus Esperanton je valora esprimkapablo.

Kelkfoje tamen, la senco de la verbo faras, ke inter ambaŭ formoj oni apenaŭ sentas nuanceton.

• *Georgo Vaŝington estis naskita* (pasivo; F §12) = *Georgo Vaŝington naskiĝis* (medialo). Fajna nuanceto: en *estis naskita*, oni pli bone sentas agon fare de la patrino, ol en *naskiĝis*.

2) La medialo kun la refleksivo.

La refleksivo esprimas agon volan, conscian; la medialo, agon nevolan, nekonscian.

• *li demetis la vestojn, sin banis* (refleksivo) *en ŝtona banujo* (Kabe, PIV, p.137a). Ago vola.

• *la salikaj branĉoj baniĝis* (medialo) *en la rivero* (PIV, p.137b). Ago nevola kaj nekonscia.

Ankaŭ ĉi tie, la senco mem de la verbo kelkfoje faras, ke inter ambaŭ formoj oni apenaŭ sentas nuanceton.

• *super la tero sin trovas* (refleksivo) *aero* (F §26).

• *en ĉiu objekto troviĝas* (medialo) *difekto* (Zamenhof, Proverbaro).

Neceso kaj sufiĉo

En 1911, kiam la Akademio entreprenis studadon de la Esperanta vortfarado, ĝi oficialigis la jenan principon: «*La vortformado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur tiel nomitaj "reguloj de derivado"*». Tio estis respondo al la ldistoj, kiuj ne komprenis, ke Esperanto montras «*plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn...*» (*Fundamenta Krestomatio*, p.234), kaj nepre volis vidi derivadon tie, kie estas nur kunmetado.

Poste, la Akademio difinis la du limojn, inter kiuj oni devas resti en la uzado de la sufiksoj. Tial, ĝi oficialigis la tiel nomitan *Principon de neceso kaj sufiĉo*.

a) Principo de neceso.

En la konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finaĵojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

b) Principo de sufiĉo.

Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzataj, tiu ĉi sufikso povas esti elfjetata kiel neutila kaj nenecesa (PAG, p.387).

c) Mallonga formo kuniganta la du principojn en unu frazo.

En la konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, afiksojn kaj finaĵojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan (PAG, p.388).

Laŭ la *Principo de neceso*, oni diru *konstruado*, se oni nepre parolas pri la ago de tiuj, kiuj konstruas, kaj *konstruaĵo*, se oni parolas pri io konstruita. Kaj oni uzu *konstruo* nur tiam, kiam la senco estas tre ĝenerala, aŭ kiam la kunteksto allasas nenian dubon pri la ĝusta signifo de la vorto.

• *nenia konstruo povas esti sen bruo* (Zamenhof, *Proverbaro*).

«*Ni povas diri "li batalas por la bono kaj belo", ĉar tie ĉi ni parolas nur simple pri la ideo de la adjektivoj "bona", "bela"; sed "bonulo", "belulo" (tiel same kiel ekzemple "bonaĵo", "boneco" k.t.p.) prezentas ion pli ol simple substantivigitan adjektivon, kaj tiun sencan ni devas esprimi per ia difinita sufikso*» (letero de Zamenhof al Couturat, 17-9-1905, *Lingvaj Respondoj*, p.5).

Laŭ la *Principo de sufiĉo*, oni ne almetu la sufikson *-ec* al la sufikso *-em*. Efektive, *-em* apartenas al la adjektivaj sufiksoj: ĝi montras do kvaliton. Sekve, la nomo de tiu kvalito estas sufiĉe montrata per *-emo*, sen bezono uzi *-emeco*. Zamenhof plej ofte uzis *konservemeco*, *malkaŝemeco*, ktp. Sed post la oficialigo de tiu principo, oni kontentiĝis per *konservemo*, *malkaŝemo*, ktp.

Laŭ la sama principo de *sufiĉo* oni ne diru:

• **amazonino* (tamen kelkfoje uzata de Zamenhof), **madonino*, **matronino* kaj **nimfino*, ĉar *amazono*, *madono*, *matrono* kaj *nimfo* jam entenas la nocion *ino*. Same, *primadono*, *meretrico*, *subreto* signas nepre virinan estaĵon.

• **emeritulo* kaj **laikulo*, ĉar *emerito* kaj *laiko* jam entenas la nocion *ulo*.

• **emociiga* kaj **konvinkiga*, ĉar *emocia* kaj *konvinka* jam entenas transitivan nocion

(emocii kaj konvinki estas transitivaj).

- **francano*, ĉar *franco* jam entenas la nocion *ano*.
- **agemeco*, **laboremeco*, ĉar *agemo*, *laboremo* jam entenas la nocion *eco*.
- **fabrikejo*, ĉar *fabriko* jam entenas la nocion *ejo*.
- **ĉagrenigi*, **falsigi*, ĉar *ĉagreni* kaj *falsi* jam entenas la nocion *igi*.
- **martelilo*, **pioĉilo*, ĉar *martelo*, *pioĉo* jam entenas la nocion *ilo*.
- **sufloristo*, *ŝoforisto*, ĉar *sufloro*, *ŝoforo* jam entenas la nocion *isto*.
- **friponulo*, **konatulo*, ĉar *fripono* kaj *konato* jam entenas la nocion *ulo*.
- **Holandujo*, **Irlandujo*, **Islandujo*, **Nederlandujo*, **Zelandujo*, ĉar *Holando*, *Irlando*, *Islando*, *Nederlando* kaj *Zelando* jam entenas videble la nocion *lando*.

• **Koreujo* aŭ **Koreio*, ĉar *Koreo* jam entenas la nocion *lando* (= *-io* aŭ *-ujo*). Sed pri tiu punkto, ne ĉiuj konsentas, ve! Eĉ la Akademio rezignis pri la saĝa, sagaca kaj racia decido farita en 1992!

Male, oni nepre diru *ortodoksulo*, *sopranulo*, *basulo*, ĉar la radikoj *ortodoks'*, *sopran'* kaj *bas'* ne entenas la nocion *ulo*.

Oni foje trovas la adverbojn *juse*, *kiele*, *nune*, *pleje*, *tiele*, *tuje*. La adverbaj finaj -e aldonitan al adverbaj vorto oni povas rigardi kiel senutilaĵojn; tamen ĝi ne estas nepre kondamnenda, ĉar ĝi plifortigas la adverbajn sencojn.

Estas notinde, ke plej ofte, sen la scio de la radikaj karakteroj, oni ne povas ĝuste ŝpari pri la sufiksoj, ĉar oni ne povas prijuĝi, ĉu la radikoj entenas ian subkomprenitan elementon aŭ ĉu oni devas marki ĝin per sufikso:

• se la sufikso *-em'* estus substantiva, ĝi ne entenus la ideon *eco*, tiam oni devus uzi la formon **-emeco*; sed en la realo, *em'* estas adjektiva, ĝia difino entenas la ideon *eco*, sekve oni ne uzu la formon **-emeco*, sed simple *-emo*.

• se *fabrik'* estus verba, ĝi ne entenus la ideon *ejo*, tiam oni devus uzi la formon **fabrikejo*; sed en la realo, *fabrik'* estas substantiva, ĝia difino entenas la ideon *ejo*, sekve oni ne uzu la formon **fabrikejo*, sed simple *fabriko*.

• se *suflor'* estus verba, ĝi ne entenus la ideon *isto*, tiam oni devus uzi la formon **sufloristo*; sed en la realo, *suflor'* estas substantiva, ĝia difino entenas la ideon *isto*, sekve oni ne uzu la formon **sufloristo*, sed simple *sufloro*.

☞ Gramatika karaktero de la radikoj.

Neniu persono kaj neniu Akademio, devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon, eĉ aldoni unu literon en la alfabeto!... ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus LA KOMENCO DE NIA MORTO » (Antaŭparolo de la Fundamento, iom modifita).

Neologismoj

Neologismo estas « vorto enkondukita en iun lingvon, kie ĝi ĝis tiam ne estis uzata » (PIV). Zamenhof klare vidis la problemon: « *Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektigiĝadi... Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova.* » (Fundamento, Antaŭparolo, A6, A8). En la frua tempo de Esperanto, la opinioj diverĝis, ĉu esti favora al la neologismoj, ĉu esti malfavora. Fakte, la ĉefa afero ne estas teoria favoro/malfavoro al la neologismoj, sed nur **utilo/neutilo** de ĉiu aparta neologismo.

La utilaj neologismoj obeas al unu aŭ pluraj el tiuj principoj.

- Difini koncepton neesprimeblan per la vortoj jam ekzistantaj en la lingvo. Ekzemple, en sia traduko de *La Fundo de l' Mizer*, Kabe uzas la vorton "**tajga**" en ties pola formo, inter citiloj. Fakte, estus lia devo krei la neologismon **tajgo**, ekde tiam necesan.

- Nomi novajn konceptojn, ideojn, aparatojn ktp. La nuna epoko necesigis la kreadon de miloj da tiaj vortoj: **aidoso, ekologio, ico, kamerao, kolfozo, komputoro, kromosomo, kvazaro, magnetoskopo, modemo, ramo, softvaro, sputniko...**

- Eviti pezajn vortkunmetojn (precipe en literaturaĵoj). Ekz. **medolo, mjelo** kaj **suro** anstataŭ la ridindaj (tamen Zamenhofaj) **ostocerbo, spina cerbo** kaj **tibiviando**; **ŝminko** anstataŭ **vizaĝŝmirajo**.

- Esprimi ideon, kiu estus esprimebla per sinsekvo da vortoj. Ekz. **baŭmi** (ekstari sur la postaj piedoj), **blink** (intermite lumi), **kontempli** (longe kaj medite rigardadi), **nelge** (antaŭ ne longe), **olim** (antaŭ tre longe), **heni, iai, rori** (ĉevalbleki, azenbleki, leonbleki).

- Distingi nuancojn. Ekz. **jelpi** ne signifas ekzakte **boji**; **sturmi** estas alio ol **ataki**.

- Simpligi pseŭdosufiksajn vortojn. Ekz. **dekoro** (← dekoracio), **erudi** (← erudicio), **federi** (← federacio), **koment** (← komentario), **proleto** (← proletario), **rezulti** (← rezultato), **situo** (← situacio), **sponta** (← spontanea), **ŝovina** (← ŝovinisma).

- Krei pli mallongajn vortojn, ĉefe (sed ne nur) por la poezio. Ekz. **aflikti** (malĝojigi), **ĉipa** (malmultekosta), **efemera** (maldaŭra), **kalva** (senhara), **olda** (maljuna), **trista** (malgaja).

- Krei literaturajn vortojn: **linda** (alloga plaĉaspekta), **lirli** (milde flustri), **ruro** (kamparo).

- Krei vortojn familiarajn aŭ slangajn, kiel ekzistas en ĉiuj lingvoj. Ekz. **fatraso** (aĉaĵaro), **glupo**¹ (kretenejo), **jobojobo**² (apenaŭ sin trenanta maljunulo), **kaputa** (rompiĝinta), **miŝmaŝo** (senordego), **piŝi** (urini), **porna** (malĉasta), **stukaĉo** (fi-denuncisto).

- Krei vortostokon maldecan, kiel ekzistas en ĉiuj lingvoj. Ekz. **bugri, ĉuro, fek 1, fiki, frandzi, gadmeso, kaco, kojono, midzi, piĉo, pugo, putino** (eventuale, konsultu la PIVon).

Kontraste kun tiuj utilaj neologismoj, oni kelkfoje vidas la aperon de vortoj perfekte senutilaj. Jen kelkaj hazarde plukitaj: **aniversario** (datreveno), **cidi** (mortigi), **dificila** (malfacila), **forsin** (eble), **hebdomado** (semajno), **hilo, kolino** (monteto), **kaŭbojo** (vakero), **kundo** (piĉo), **ma** (sed), **malado** (malsano), **mido** (tagmezo), **nam** (ĉar), **oŭ kej** (konsentite), **oŭt** (ekster), **sekolo** (jarcento), **ultima** (lasta).

Neniu el tiuj vortoj alportas ion ajn, ĉu rilate la precizecon, ĉu la malpezecon, ĉu la mallongecon, ĉu la elegantecon.

1. Slava deveno (глыбѣ, глупієц, глупан). 2. Japana deveno (上野上野).

Participoj, aspektoj

Por la okcident-eŭropanoj, la participa problemo kuŝas en tio, ke la lingvoj de okcidenta Eŭropo posedas nur du participojn, kiujn oni nomas, tute maloportune, "prezenca participo" kaj "preterita participo".

Tiuj terminoj estas la fonto de kolosa miskompreno. Ekzemple, la "preterita participo" (*participé, participio passato, Partizip der Vergangenheit, past participle*) estas ofte preterita. Sed ĝi povas esti ankaŭ prezenca, eĉ kelkfoje futura. La franca *un chien battu* kaj la germana *ein geschlagener Hund* povas signifi tute egale «*batata hundo*» aŭ «*batita hundo*», laŭ la ĉirkaŭteksto. Ni tuj vidos, ke la franca "preterita participo" povas esti jen pasiva, jen aktiva. Tio signifas, ke ĝi povas esti esperantigita laŭ tre diversaj manieroj.

I. La Esperantaj participoj havas nenian similecon kun la Eŭropaj.

Jen ses Esperantaj frazetoj, entenantaj po unu el la ses Esperantaj participoj. Ĉiuj ses francaj tradukoj entenas "preteritan participon".

- 1 Tiu domo estas firme **konstruITA** → *Cette maison est solidement construite.*
- 2 La lernejo estos **konstruATA** de la entrepreno X → *L'école sera construite par l'entreprise X.*
- 3 Princlino Margareta: ĉu **edzinigOTA** ĉi-jare? → *Princesse Margaret: mariée cette année?*
- 4 Ĉi tien, la lernantoj **alveniNTaj** malfrue! → *Par ici, les élèves arrivés en retard!*
- 5 Helpo al la **dronANToj** → *Secours aux noyés.*
- 6 Mi, **subskribONTa**, certigas ke... → *Je, soussigné, certifie que...*

Oni povas do konstati, ke ekzistas neniu simileco inter la sistemo de la Esperantaj participoj kaj la sistemo de la francaj. Kaj kio veras pri la francaj participoj, tio veras ankaŭ, pli-malpli, pri la aliaj latinidaj kaj pri la ĝermanidaj.

Konsekvence, ĉia klopodo por trovi paralelecon inter la Esperantaj participoj kaj la okcident-Eŭropaj iras al kompleta fiasko. Tion oni devus diri dekomence al la lernantoj.

Nun, ni turnu nin al la slavaj lingvoj: ili estas ege pli riĉaj je nombro de participoj.

Kontraste kun la fakto, ke la franca "preterita participo" povas esti prezenca aŭ eĉ futura, kaj ke la participoj plej ofte pasivaj povas esti ankaŭ aktivaj, la rusaj participoj distingas klare prezencon disde preterito, kaj aktivecon disde pasiveco.


Cetere, oni ne sufiĉe konsideras la fakton, ke la tuto de la esperanta konjugacio estas la ekzakta kalkeo de la rusa. Ni komparu la konsiston de ambaŭ.

Esperanta konjugacio	Rusa konjugacio
Indikativo, kun tri tempoj (<i>as is os</i>)	Indikativo, kun tri tempoj
Kondicionalo, sen tempa distingo (<i>us</i>)	Kondicionalo, sen tempa distingo (<i>бы</i>)
Neekzisto de subjunktivo	Neekzisto de subjunktivo
Volitivo, ĉe ĉiuj personoj (<i>u</i>)	Imperativo, ĉe la dua persono (<i>й, йте</i>)
Ses participoj (<i>anta, inta, onta, ata, ita, ota</i>)	Kvar participoj (<i>ающий, авший, аемый, анный</i>)
Ses gerundioj (<i>ante, inte, onte, ate, ite, ote</i>)	Du gerundioj (<i>я, ав</i>)
Infinitivo (<i>l</i>)	Infinitivo (<i>ать, ить</i>)

La diferencoj estas tre malgrandaj: la ĉefa estas la volitivo (ses personoj en Esperanto, du en la rusa), kaj la participoj. Ĉi tiuj estas ses en Esperanto, kun ekzisto de futuraj; la rusaj estas kvar, sen ekzisto de futuraj. Sed fakte, ili estas pli multaj, ĉar ĉiu slava verbo ekzistas sub du aspektoj (imperpektivo kaj perfektivo).


II. La Esperantaj participoj havas valoron nete tempan.

Ni konsideru la tempon sur akso, de maldekstre dekstren. Ni supozu iun agon, prefere aktivan: ekzemple, **kuron** de leporo. Ni loku la diversajn fazojn de tiu kuro (inkluzive la momenton de la komenco kaj la momenton de la fino) sur tiu akso:



- 1 Maldekstre, la kurado ne komenciĝis: la verboformo estas **antaŭ-aga** (futura).
- 2 Centre, la kurado komenciĝis, sed ne finiĝis: la verboformo estas **dum-aga** (prezenca).
- 3 Dekstre, la kurado jam finiĝis: la verboformo estas **post-aga** (preterita).

Evidente, estas same, se oni anstataŭigas la indikativajn formojn per participaj:



- 1 Maldekstre, la kurado ne komenciĝis: la participo estas **antaŭ-aga** (futura).
- 2 Centre, la kurado komenciĝis, sed ne finiĝis: la participo estas **dum-aga** (prezenca).
- 3 Dekstre, la kurado jam finiĝis: la participo estas **post-aga** (preterita).

Oni bone konsciu, ke **kuronta leporo** estas **senmova antaŭ** kurado; **kurinta leporo** estas **senmova post** kurado. Nur **kuranta leporo** kuras efektive.

Kelkfoje, oni emas starigi la jenajn egaligojn:

-onta = kiu -os,	-anta = kiu -as,	-inta = kiu -is,
-ota = kiun oni -os,	-ata = kiun oni -as,	-ita = kiun oni -is.

Por konvinkiĝi pri la malĝusteco de tiuj ĉi egaligoj, sufiĉas konstati, ke:

- *mi vidis leporon, kiu kuris* signifas *mi vidis kurantan* (ne: kurintan) leporon.
- *mi vidis leporon, kiu kuros* signifas *mi vidis kurantan* (ne: kurontan) leporon.
- *li sopiris al la amata virino* signifas *li sopiris al la virino, kiun li amas* (ne: kiun li amas).

III. Al kio rilatas la tempo de la participoj?

Jen la ĉefa demando: **prezenca** rilate al kio? **preterita** rilate al kio?

Antaŭ ol respondi al tiu demando, ni relegu, kion skribis Zamenhof en la Unua Libro: «*Mi aranĝis plenan **dismembrigon** de la ideoj en **memstarajn vortojn**, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj... Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj alktimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi **dismembrigon** de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj...*» (Fundamenta Krestomatio, p.234).


Tiu **dismembrigo** (расчленение) estas la ĉefa trajto de la Esperanta lingvo. Ĝi nete implicas, ke **neniu elemento** havas gramatikan influon, eĉ plej malgrandan, al la apudaj elementoj. Evidente, tio havas nenian rilaton kun la fakto, ke ĉiu ajn vorto kapablas havi diversajn signifojn, influe de la kunteksto (afero semantika, ne gramatika).

Ni ilustru tiun konstaton per tiu frazo el la **Fundamento**:

- *kiam via domo **estis konstruata**, mia domo **estis jam longe konstruita*** (§25).

La nocio "**prezenco**" (en **konstruata**) aŭ "**preterito**" (en **konstruita**) rilatas **NUR** al la **radiko konstru'**, al la **ago konstrui**. Se la frazo entenas la verbon *esti* (aŭ iun alian verbon), la tempo de tiu verbo havas nenian partoprenon en la signifo de la participo.

Ni faru etan ŝanĝon en la ĉi-antaŭa Fundamenta frazo: *kiam via domo **estis en la stato de la desegno*** ②, *mia domo **estis jam longe en la stato de la desegno*** ③.



domo konstruota domo konstruata domo konstruita

Nu, tiu ŝanĝo en la formo ŝanĝas **nenion** en la senco.

Tio estas infanece simpla, kaj oni povas miri, ke tiel multe da inko, papero kaj bavo estis iam elspesita por demonstri tion (aŭ... por provi demonstri la malon de tio).

IV. Participo estiel elemento de kunmetita verboformo.

Kiun sencion alprenas la participoj *konstruata*, *konstruita*, kiam ili estas parto de la kunmetitaj verboformoj *estis konstruita*, *estis konstruata*, *estos konstruita*, ktp?

La demando estas sensenca, simple pro tio, ke kunmetitaj verboformoj **NE EKZISTAS en Esperanto** (☞ *Kunmetitaj verboformoj*).

En la ĉi-supraj esprimoj, la adjektivoj *konstruata* kaj *konstruita* havas la sencion ĵus montritan (respektive desegno ② kaj desegno ③). Kaj *estis*, *estas*, *estos*... havas la sencion de *estis*, *estas*, *estos* (☞ elementan kurson; tamen vidu ankaŭ ĉi-poste).

Domo *estis*, *estas*, *estos*, eventuale *konstruota*, *konstruata*, *konstruita*, tute same, kiel glaso *estis*, *estas*, *estos*, eventuale *malplena*, *duonplena*, tute plena.

La **nete tempa valoro** de la participoj implicas, ke:

- la participo **antaŭ-aga (futura)** indikas fakton, **antaŭ ol** ĝi okazis/okazas/okazos.
- la participo **dum-aga (prezenca)** indikas fakton, **dum** ĝi okazis/okazas/okazos.
- la participo **post-aga (preterita)** indikas fakton, **post kiam** ĝi okazis/okazas/okazos.

Neniu esenca diferenco ekzistas inter **adjektivoj**, kiel *malplena*, *duonplena*, *tute plena*, kaj **participoj**, kiel *konstruota*, *konstruata*, *konstruita*, pro la simpla fakto, ke **participoj estas adjektivoj**. Ili havas do la semantikan konduton de ĉiuj adjektivoj. Ordinara adjektivo estas elektataj laŭ sia propra signifo: participaj adjektivoj estas elektataj, tute same, laŭ sia propra signifo.

IV. La du signifoj de *esti*.

Oni ne sufiĉe atentis la gravan fakton, ke la verbo **esti NE** estas unusignifa. Ni komparu.

① *Kvankam vento tute ne blovis, la lago **estis** kovrita de flosantaj folioj.*

*Tiun vesperon, ŝia robo **estis** ruĝa.*

*Kiam mi alvenis, la aviadilo **estis** jam sur la flughaveno.*

② *La vento ekblovis tiel forte, ke post kelkaj sekundoj la lago **estis** kovrita de folioj.*

*Li ricevis fortan vangofrapon: lia vango **estis** ruĝa.*

*La aviadilo komencis malsupreniĝi: post kelka tempo, ĝi **estis** sur la flughaveno.*

Grava diferenco ekzistas inter la senco de **estis** en ① kaj en ②.

En la frazoj ①, *estis* enkondukas jen particon (*kovrita*), jen ordinaran adjektivon (*ruĝa*), jen lokan adjekton (*sur la flughaveno*). Ĉiufoje, temas pri daŭra kvalito, pri **stato**.

Same, en la frazoj ②. Sed ĉi-foje, la senco montras, ke tiuj kvalitoj estas **ĵus atingitaj**. Alivorte, temas ne pri simpla stato, sed pri **stat-ŝanĝo**. Tiam, la senco de *esti* iom proksimas al tiu de *iĝi*, sed tamen ne identas.

La PAG (p.233-234) asertas, ke en *esti elektita*, *esti balotita*, ja la kopulo **esti** (**ne** la

participo) esprimas la komencon de nova stato.

La verbo *esti* povas indiki, ĉu simplan staton, ĉu stat-ŝanĝon, tute egale, ĉu ĝi enkondukas ordinaran adjektivon, ĉu adjektivan partupon, ĉu ian adjekton.

Ni apliku tiun ĉi konstaton al kelkaj frazoj.

① en 1996, mi aĉetis terenon, sed domo *estis* ankoraŭ **konstruota** (la domo estis en la stato de la desegno ①) → *estis* indikas **staton**.

② en 1997, mia domo *estis* **konstruata**; mi ankoraŭ loĝis ĉe miaj gepatroj (estis en la stato de la desegno ②) → *estis* indikas **staton**.

③ mia domo *estis* **konstruita** komence de 1998; mi enloĝiĝis en Aprilo (atingis la staton de la desegno ③) → *estis* indikas **stat-ŝanĝon**.

Ni anstataŭigu la tri "*estis*" per tri "*estas*" aŭ per tri "*estos*": tio ŝanĝas **nenion** en la senco de la partupon, sed eventuale ŝanĝas la sencan de la kopulo *esti*.

① nun mia domo *estas* ankoraŭ **konstruota**; la konstruado komenciĝos post du aŭ tri monatoj (ĝi estas en la stato de la desegno ①) → *estas* indikas **staton**.

② nun, mia domo *estas* **konstruata**; la muroj estas starigitaj, sed oni ankoraŭ ne metis tegmenton (ĝi estas en la stato de la desegno ②) → *estas* indikas **staton**.

③ mia domo *estas* nun **konstruita**: mi ĵus enloĝiĝis (ĝi estas en la stato de la desegno ③) → *estas* indikas **staton**.

① en 2008, mi aĉetos terenon, sed domo *estos* ankoraŭ **konstruota** (estos en la stato de la desegno ①) → *estos* indikas **staton**.

② en 2009, verŝajne, mia domo *estos* **konstruata**; do mi ankoraŭ loĝos en hotelo (en la stato de la desegno ②) → *estos* indikas **staton**.

③ espereble, mia domo *estos* **konstruita** komence de 2010; tiukaze, mi enloĝiĝos en Aprilo aŭ Majo (ĝi atingos la staton de la desegno ③) → *estos* indikas **stat-ŝanĝon**.

La partuponj *konstruota*, *konstruata*, *konstruita* havas po **unu** signifon. Sed la ĉirkaŭteksto montras, ke la kopulo *esti*, konforme al la aserto de la PAG (p.233-234), povas difini jen staton, jen stat-ŝanĝon.

Kiu komprenis tion, tiu komprenis la tutan esencan de la Esperantaj partuponj.

V. Tamen nocio de *aspekto* estas nedisigebla de nocio de *tempo*.

Nekontesteble, la tri partuponj, karakterizataj de la vokaloj **o**, **a**, **i**, havas signifon **nete tempan**. Sed por klarigi tiun **tempan** signifon, ni devis uzi la nociojn *daŭro* kaj *rezulto*. Alidire, ni devis aperigi la noción de *aspekto*.

Aspekto estas «gramatika kategorio, per kiu la lingvoj esprimas la manieron, kiel oni prezentas procezon, ĉu kun limoj (komenco, fino, rezulto...), ĉu sen limoj (daŭro, ripe-to...)» (PIV, p.117b).

- ◇ Efektive, iuj agoj havas **daŭron** (ekz. *ami, konstrui, legi*): komenco kaj fino **ne** koincidas.
- ◇ Aliaj havas **nenian daŭron** (ekz. *eksplodi, trovi*): ilia komenco koincidas kun ilia fino.
- ◇ Iuj agoj kondukas al **rezulto** (ekz. *aĉeti, bruligi, konstrui, ripari*, kondukas al *aĉetita artiklo, bruligita ligno, konstruita domo, riparita maŝino*).
- ◇ Aliaj kondukas al **nenia rezulto** (ekz. *havi, memori, scii, serĉi*: se oni ĉesas *memori ion*, tio **ne** kondukas al "*io memorita*", sed al *io forgesita*; se oni ĉesas voli ion, ne rezultas "*io volita*").

Tio ne estas propraĵo de Esperanto, sed apartenas al la senco de la verbo. Tio ankaŭ ne estas eltrovaĵo de iu gramatikisto, sed apartenas al la esenco mem de la lingvo.

◇ **Daŭro.** Se ago havas **daŭron**, la *dum-aga participo* montras klare tiun daŭron.

• *mia ora ringo ne estus nun tiel longe **serĉata** (serĉi havas daŭron), se...* (F §25).

◇ **Ne daŭro.** Male, se la ago **ne** havas **daŭron**, oni ne emas uzi la *dum-agan participon*.

• *pasero **kaptita** (kapti ne havas daŭron) estas pli bona, ol aglo kaptota* (F §22).

Tamen se ago ne havas daŭron, sed estas **ripetata**, tiu ripeto iel egalas daŭron, do la *dum-aga participo* montras tiun ripeton/daŭron.

• *de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos **pagataj** (ago sendaŭra, sed ripetata) de mi* (F §25).

◇ **Rezulto.** Se ago havas **rezulton**, la *post-aga participo* montras tiun rezulton.

• *la surtuto estas **aĉetita** (rezulto) de mi, sekve ĝi apartenas al mi* (F §25).

◇ **Ne rezulto.** Se ago **ne** havas **rezulton**, oni ne emas uzi la *post-agan participon*: se oni ĉesas *sciĝi* (verbo sen rezulto) ion, oni pli volonte parolas pri *io ne plu sciata*, ol pri *io sciita* (la du dirmanieroj estas samsignifaj, sed la dua estas iom hezitiva kaj malkomprenebla).

Resume: **Participo DUM-AGA (prezenca) estas nedisigebla de la nocio de DAŬRO.**

Participo POST-AGA (preterita) estas nedisigebla de la nocio de REZULTO.

Evidente, daŭro ne signifas longecon. Ĝi povas varii inter sekundoj, tagoj, jarcentoj...

Tiuj konsideroj pri *daŭro* aŭ *ne-daŭro*, pri *rezulto* aŭ *ne-rezulto*, neniel estas io aldonita pli-malpli arbitre al la **nete tempa** valoro de la tri participoj, sed estas la **konsekvenco mem de ilia nete tempa valoro**.

Cetere, tio estas montrata de la **Sesa Regulo de la Fundamento Gramatiko**, en ĝia rusa parto (p.71). Zamenhof tradukis *farata* per **дѣлаемый**, kio signifas, ke la ago estas en stato de disvolviĝo kaj neniam povas implici komletiĝon de la ago. Por *farita*, li havis je sia dispono du participojn: li uzis **сдѣланный**, kiu signifas, ke la ago komplete plenumiĝis, do atingis rezulton (la alia participo, **дѣланный**, indikus nekompletigitan pasivan agon, do nuran disvolviĝon de la ago en la pasinteco).

VI. Tri kategorioj de verboj.


Ni vidis, ke iuj agoj daŭras, aliaj ne. Iuj agoj kondukas al ia rezulto, aliaj al neniam rezulto. Teorie, tio ebligas la klasadon de la verboj en tri kategoriojn (PAG, p.145-146).

1) Verboj montrantaj nur daŭron (sen ia rezulto).

Jen kelkaj tiaj verboj: *akompani, ami, atendi, bedaŭri, bezoni, bleki, deziri, dormi, esperi, flari, gardi, gvidi, havi, interesi, iri, koni, kredi, laŭdi, memori, miri, opinii, persekuti, posedi, postuli, protekti, regi, sciĝi, serĉi, suferi, ŝuldi, teni, timi, vivi, voli...*

La manko de rezulto kaŭzas, ke oni malofte uzas ilian *post-agan (preteritan) participon*.

Se iu perdis sian ŝlosilon, li serĉas ĝin. Dum daŭras la serĉado, la ŝlosilo estas **serĉata** (*dum-aga participo*). Sed kiam ĉesas la serĉado, neniu rezulto ekzistas: **serĉita** ne signifas alion, ol *ne plu serĉata* (ĉu pro trovo, ĉu pro alia ajn kaŭzo).



• *Aŭgusto estas mia plej **amata** (daŭro) filo* (F §22).


• *mono **havata** (daŭro) estas pli grava ol havita* (F §22).

2) Verboj montrantaj nur rezulton (sen ia daŭro).

Jen kelkaj tiaj verboj: *aĉeti, akiri, aresti, atenci, atingi, decidi, difini, doni, fendi, fermi, fini, fondi, forgesi, frakasi, fuŝi, heredi, kapti, konstati, mordi, naski, perdi, renkonti, ricevi, rifuzi, savi, solvi, surprizi, trafi, trovi...* Ni aldonu ĉiujn ek-verbojn.

La manko de daŭro kaŭzas, ke oni malofte uzas ilian *dum-agan* (prezencan) *participon*.

Dum daŭras la serĉado de la ŝlosilo, ĉi tiu estas **serĉata**. Eventuale, kiam ĉesas la serĉado, oni trovas la ŝlosilon: neniu esperanto-uzanto parolas tiam pri "*ŝlosilo trovata*", sed pri *ŝlosilo trovita*. Cetere, ĉe la trovo de la ŝlosilo, oni ekkrias: «*mi ĝin trovis!* (je l'ai trouvée, l'ho trovata, ich habe ihn gefunden, מְצַאֲתִי אֹתוֹ, ktp)». Ne: "*mi ĝin trovas*".




Tio tamen ne signifas, ke participo kiel *trovata* estas neuzebla. Se la ago estas ripetata, tiu ripeto egalvaloras daŭron (tio estas la *ripeta aspekto*, aŭ *iterativo*).

- *tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte acetata* (ripeto) *de mi* (F §25).
- *la soldatoj kondukis la arestitojn* (rezulto) *tra la stratoj* (F §22).
- Petro *memoras* (daŭro) *la melodion, Paŭlo ĝin forgesis* (rezulto) → *la melodio estas memorata* (daŭro) *de Petro, sed forgesita* (rezulto) *de Paŭlo* (PAG, p.146).
- *ĉu vi perdis* (rezulto) *la ŝlosilon?* - Ne, *mi ĝin havas* (daŭro) → *la ŝlosilo estas havata* (daŭro), *ĝi ne estas perdita* (rezulto) (PAG, p.146).

3) Verboj montrantaj kaj daŭron kaj rezulton.

Jen kelkaj tiaj verboj: *aranĝi, baki, boli, bruligi, desegni, diri, fari, instalii, kolekti, konstrui, krei, kuirii, kuracii, lavi, legii, manĝii, operacii, pentri, plugii, premi, preparii, renversi, riparii, skribii, trinki, vizitii...*

Iliaj tri participoj havas signifojn klarajn kaj ne-interŝangeblajn.



Pano estas unue *bakota*; poste ĝi estas *bakata* (daŭro) dum kelka tempo; fine ĝi estas *bakita* (rezulto), kiam oni eltiras ĝin el la forno.

- *la mono estis longe kolektata* (daŭro), *sed fine ĝi tamen estis kolektita* (rezulto).
- *ĉiu vorto estas legata* (ripeto), *kiel ĝi estas skribita* (rezulto)² (Fund. Krestom., p.240).
- *dum en unu ĉambro la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata* (daŭro) *la vespermanĝo; kiam la tablo estis preparita* (rezulto), *oni invitis la gastojn al la tablo*².
- *granda hundo jetiĝis kontraŭ mi kaj mi estis renversata* (eta daŭro), *sed iu preterpasanto retenis min kaj mi ne estis renversita* (rezulto) (R.Schwartz, Simpozio, p.276).

4) Verboj hibridaj.

Ekzistas verboj, kiujn oni povas rigardi jen daŭraj, jen sendaŭraj, jen rezultaj, jen senrezultaj: *kovri, okupi, ktp*. Plie, la elasteco de Esperanto estas tia, ke ĉiu ajn aŭtoro povas uzi verbon en figura senco, aŭ senti la sencon de verbo laŭ persona maniero. Fine, se la trovo de perdita ŝlosilo daŭras nulan tempon, la trovo de geometria problemo povas efektiviĝi iom post iom, do esti pli-malpli daŭra.

VII. Praktikaj reguloj.

Kiam oni hezitas, influite de nacilingvaj refleksoj, oni apliku la jenajn regulojn.

1) **Regulo de Zamenhof**: «*Uzu -ata, se la ago estas efektiviĝanta rilate al la koncerna tempo. Uzu -ita, se la ago efektiviĝis pli frue, ol la koncerna tempo. Se oni konsideras nur la efektivigitan faron, la rezulton de la ago, kaj ne ĝian disvolviĝadon, oni uzas -ita.*

Resume, **-ata** ĉiam entenas ideon pri ioma daŭro de efektiviĝo de la ago, kiun oni Participoj, aspektoj

rigardas kiel nunan en ĝia modo aŭ tempo. Male, **-ita** ĉiam entenas ideon pri nedaŭra ago, ĉe kiu oni atentis nur la plenumitan agon, la rezulton » (Lingvaj Respondoj, p.91).

• *mia ora ringo ne estus tiel longe serĉita, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi* (F §25). Ĉu *serĉo* daŭras? Evidente jes: **serĉata**. Ĉu *kaŝo* daŭras? Evidente ne: **kaŝita**. Ĉu *serĉo* havas rezulton? Evidente ne: **serĉata**. Ĉu *kaŝo* havas rezulton? Evidente jes: **kaŝita**.

• *li estis naskita en tiu urbo* (Zamenhof, *Rabeno*, p.7). Ĉu *nasko* daŭras? Tre mallonge; sed ne pri tiu daŭro oni parolas. Ĉu *nasko* havas rezulton? Jes: **naskita**.

• *kiam mi venis supren, ĉiuj ĉambroj estis ŝlositaj* (Zamenhof, *Rabistoj*, p.88). Ĉu *ŝloso* daŭras? Tiel mallonge, ke oni ne havas tempon mencii ĝin. Ĉu *ŝloso* havas rezulton? Jes: **ŝlositaj**.

2) Regulo de H.de Hoog: « *Uzu -at nur, se en la aktivo vi uzus -ant, aŭ povus uzi -ad* » (Simpozio, p.109).

• *mi pensas, ke [la fervojo] estos konstruita pli ol tri jarojn* (F §25). Ĉu oni estos konstruanta ĝin dum 3 jaroj? Jes. Ĉu oni konstruados ĝin? Ankaŭ jes: **konstruata**.

• *tiaj oficoj estas tre bone pagitaj* (Zamenhof, *Marta*, p.77). Ĉu oni estas pagantaj ilin? Ne. Ĉu oni bone pagadas ilin, ripete? Jes: tre bone pagataj.

• *kiam la pordego estos malfermita, la virino dejetos la veston* (Zamenhof, *Rabeno*, p.27). Ĉu oni estos malfermanta la pordon? Ne. Ĉu oni malfermados la pordon? Ne: **malfermita**.

3) Regulo de R.Schwartz: « *Oni uzu -at, se oni povas, sen ŝanĝi la sencon, aldoni "plu kaj plu" aŭ "ree kaj ree". Oni uzu -it, kiam oni povas aldoni "definitive"* ».

• *la militkrimuloj estis persekutitaj kaj fine arestitaj* (I.Lapenna, *Simpozio*, p.72). Ĉu *plu kaj plu persekutataj*? Jes. Ĉu *plu kaj plu, ree kaj ree, arestitaj*? Evidente ne: **arestitaj**.

• *ŝi amis kaj estis amita* (Zamenhof, *Marta*, p.14). Ĉu *plu kaj plu amata*? Evidente jes.

• *ho, sinjorino! ĉio estas perditaj* (Zamenhof, *Georgo Dandin*, p.32). Ĉu *definitive*? Jes: **-ita**.

VIII. Du lingvaj malsanoj.

1) La at-malsano.

Ĝi konsistas en la uzo de prezenca formo (**-at**), kiam preterita (**-it**) estus ĝusta.

• *la aŭto estis lavata de Marko; la aŭto estis lavita de Marko* (C.de Vlemincq kaj É.van Damme, *Grammaire ABC d'espéranto*, p.275). Du malsamaj frazoj same francigitaj: "l'auto a été lavée par Marc"! Tamen la franca lingvo tute havas la kapablon distingi ilin.

• *Vaŝingtono estis naskata je la 22a de februaro* (R.Ŝulco, *La Sesa Regulo*, p.62). La naskado (dum-aga participo!) daŭris dum la tuta 22a de Februaro, dum 24 horoj!

• *mi facile promesas inviti vin ĉiujn, ĉar kompreneble la botelo neniam estos trovata* (La Praktiko, majo 1960, p.72).

• *"la domo estis konstruata" do normale signifas, ke la domo fariĝis preta* (Esperanto — moderna lingvo, p.26). En domo preta, sed simila al la desegno ②, pluvombrelo estas urĝe necesa!

2) La it-malsano.

Ĝi konsistas en la uzo de preterita formo (**-it**), kiam prezenca (**-at**) estus necesa.

• *tiam aŭtorita komitato... havos la rajton fari... ĉiujn deziritajn ŝanĝojn...* (Antaŭparolo de la Fundamento, A1). Sed *ŝanĝo dezirita* ne plu estas **dezirata**! Do, kial ŝanĝi ion?

• *...la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita* (Antaŭparolo de la Fundamento, A11). Pli utile, **prezentata**.

• *Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco* (Londona Biblio, Mt 5¹⁰). Sed la pli nova traduko de Beveling tekstas ĝuste: **persekutataj**.

• *Kaj ne juĝu, kaj vi ne estos juĝitaj* (Londona Biblio, Lk 6³⁷). Ree kaj ree **juĝataj**. La simila frazo (Mt 7¹) entenas prave: **juĝataj**.

Planlingvoj ĉiutage parolataj

Oni kelkfoje rigardas – tute malprave – Esperanton kiel artefaritan lingvon, kvazaŭ tio estus grava difekto, ne konsciante, ke ekzistas en la mondo kelkaj lingvoj ĉiutage parolataj, en kiuj la grado de artefariteco estas tiel granda, kiel en Esperanto. Verŝajne, eĉ pli granda.

I. La novhebrea lingvo.

Kiam la Eŭropaj Judoj komencis agadi cele al la kreado de ŝtato, kiu ebligus, ke ili eskapos el la persekutoj, la demando naskiĝis, kiu lingvo estos la lingvo de tiu ŝtato. Unu respondo trudiĝis: la **hebrea**, kvankam multaj cionistoj (Th.Herzl mem!) ne kredis al la ebleco revivigi lingvon mortintan de dudek kvin jarcentoj. Efektive, longe antaŭ la kristana erao, la Judoj ne plu parolis la hebrean lingvon, sed adoptis la aramean (parenkan, sed tamen malsaman). La hebrea lingvo ekestis tiam mortinta lingvo, religia lingvo.

Ĉu eblis, ke lingvo mortinta de tiel longa tempo reviviĝus?

Iu litova Judo, **Eliezer Ben JEHUDA** (1858-1922), dediĉis sin al tiu kolosa laboro, kia estis la kreado de moderna lingvo, kiu estos la nacia lingvo de la juda ŝtato, tiam ankoraŭ estonta kaj esperata.

En tiu laboro, li devis alfronti du esencajn problemojn: gramatikon, leksikon.

1) La gramatiko. Granda plimulto de la Judoj tiam almiĝantaj al Palestino, estis de Eŭropa deveno. Ilia gepatra lingvo estis do iu Eŭropa lingvo, ĉu la jida, ĉu ia alia lingvo (rusa, pola, germana, franca, ktp). Ilia menso estis do adaptita al Eŭropa lingva sistemo, tre malsama de la semida sistemo. Aperis do nepre necese, ke oni ŝanĝu plurajn punktojn de la hebrea gramatiko, por adapti ĝin al la Eŭropa menso. Plie, la abundeco de la juda enmigrado necesigis, ke la revivigita lingvo estu tre rapide lernebla.

a) La verba sistemo.

La Eŭropanoj, precipe latinidoj kaj ĝermanidoj, estas al kutimiĝintaj al verba sistemo, kiu distingas esence preteriton, prezencon, futuron. Ja la nocio de **tempo** gravas.

Sed la bibli-hebrea estas tute malsama (kiel la araba). Ĝia konjugacio entenas nur du **aspektojn**: la **perfektiva** aspekto montras agon ununuran, finitan; la **neperfektiva** aspekto montras agon nefinitan (kutiman, aŭ ripetatan, aŭ daŭran).

Nu, por homoj al kutimiĝintaj al la Eŭropaj lingvoj, tempa indiko estis ege pli grava, ol aspekta indiko (krom por la slavoj, ĉe kiuj la verboj funkcias parte laŭ tiu principo).

Tial Ben Jehuda donis al la **perfektiva** aspekto la tempan signifon de la **preterito**, sen nuanco de finiteco de la ago, kaj al la **neperfektiva** aspekto la tempan signifon de la **futuro**, sen nocio de nefiniteco de la ago.

En bibli-hebrea, עָבַד 'ab^had^h (*perfektiva*) signifas «li finlaboris», dum יַעֲבֹד ya'āb^hod^h (*neperfektiva*) signifas «li laboradis, li laboradas, li laborados (kutime, ofte, longe)». En nov-hebrea, אָבַד avad signifas «li laboris» (nura preterito, sen ia nuanco de aspekto), dum יַעֲבֹד yaāvod signifas «li laboros» (nura futuro).

Restis la neceso fabriki **prezencon**. Tiucele, oni pligrandigis la signifon de la participo, kiu, en bibli-hebrea, estis prefere substantivo. La biblia formo עֹבֵד 'ōb^hed^h signifis prefere «laboristo»; la moderna formo עֹבֵד ēved signifas «laboranta»: אֲנִי עֹבֵד ānī

ōved « mi [estas] laboranta = mi laboras », אַתָּה עוֹבֵד attā ōved « ci [estas] laboranta = ci laboras », הוּא עוֹבֵד hū ōved « li [estas] laboranta = li laboras », הִיא עוֹבֵדֶת hī ōvėdet « ŝi [estas] laboranta = ŝi laboras », אֲנִינְהוּ עוֹבְדִים ānāfinū ōvdīm « ni [estas] laborantaj = ni laboras », ktp.

b) La sistemo de la posesivoj.

La Biblia lingvo esprimas la posesivojn per sufiksoj: סֵפֶר *sép'her* « libro » iĝas סִפְרֵי *síp'rī* « mia libro », סִפְרֵיךָ *síp'rak'á* « cia libro », סִפְרוֹ *síp'rō* « lia libro », ktp. La aldono de sufiksoj modifas la vokalaron de la vorto. La uzado de tiu sistemo estas iom malfacila: vorto kiel צְדָקָה *cəḏ'qah* « justeco » iĝas צִדְקָתְהֶנּוּ *cid'qat'hénū* « nia justeco ».

Por simpligi la aferon, la nov-hebrea lingvo preferas uzadi specon de genitivo. La prepozicio שֶׁל *šel* « de », tre malofta en la Biblio, ludas tiun rolon: ĝi alprenas la posevivajn sufiksojn: שְׁלִי *shellī* « de mi », שְׁלֶךָ *shellĥá* « de ci », שְׁלוֹ *shellō* « de li », ktp.

Tiel oni ricevas: הַסֵּפֶר שְׁלִי *haséfer shellī* « la libro de mi = mia libro », הַסֵּפֶר שְׁלֶךָ *haséfer shellĥá* « la libro de ci = cia libro », הַסֵּפֶר שְׁלוֹ *haséfer shellō* « la libro de li = lia libro », הַסֵּפֶר שְׁלֶנּוּ *haséfer shellánū* « la libro de ni = nia libro », ktp.

Tio estas pli longa, pli peza, sed ege pli facila: sufiĉas, ke oni scias, unufoje por ĉiam, la liston de שֶׁל *šel* « de » kun la personaj sufiksoj.

- La novhebrea gramatiko entenas, rilate al la bibli-hebrea, aliajn simpligojn, kiujn klarigi ĉi tie estus tede.

2) La leksiko.

Por ĉiu vorto, Ben Jehuda depruntis vorton el la Biblio ĉiufoje, kiam tio ĉi estis ebla. Por la plej kutimaj nocioj, tiu vorto ekzistis. Kiam la vorto ne ekzistis en la Biblio, li serĉis en la Talmudo aŭ en la abunda hebrea literaturo de mezepoko.

Sed kiam la antikva literaturo ne liveris adekvatan vorton, pluraj solvoj ekzistis.

a) **Adaptado de antikva radiko, per senco-ŝanĝo:** la vorto הַשְּׂמַל *ĥašmal*, ĉe Jehezkeho (ĉap.1), difinas ian ne precize konatan materion. Sed la greka versio Septuaginto tradukis ĝin (verŝajne arbitre) per ἤλεκτρον « sukceso ». Ĉar tiu greka vorto ἤλεκτρον estas la etimo de *elektro*, oni donis al הַשְּׂמַל *ĥašmal* la sencnon « elektro ».

b) **Adaptado de antikva radiko, per derivado:** la antikva vorto צֵלֶם *célem* signifas « bildo »; de ĝi oni fabrikis צִלְיָם *cillūm* « fotografio », צֵלָם *callam* « fotografo », ktp.

c) **Fabrikado de kunmetitaĵoj:** en la epoko de la senparola *kino*, oni nomis kinon רַאֲיִנוּעַ *ra'ānōa'* « vido-movo »; poste aperis la parolanta *kino*, kio finvenis al קוֹלְנוּעַ *qōlnōa'* « voĉo-movo ». Kelkfoje, oni kunfandis du radikojn: por « rinocero », la kunaĵo « nazo » (ῥινόσ) + « korno » (κέρας) devus finveni al קֶרֶן-אֶף *qeren-af* « korno-nazo », sed oni kunfandis ambaŭ vortojn: קַרְנָף *qarnaf*.

ĉ) **Kreado de neologismoj, per deprunto de vortoj:**

- internaciaj: דוֹלָר *dōlar*, דוֹקְטוֹר *dōqtōr*, סְפוֹרְט *spōrt*, טֵלֶפֶון *telefōn*, טֵנִיס *tennis*,
- latinaj: סְקוּלְפְטוּרָה *sqūlp'tūra* « skulptarto » (latina *sculptūra*),
- anglaj: דוֹלְפִין *dōl'fīn* « delfeno », גִּ'יֵפ *ĝīp* « ĵipo » (angla *dolphin*, *jeep*),
- francaj: קוֹנְיָק *qōnyaq* « konjako » (franca *cognac*),
- italaj: סוֹלְפֶגֶ *sōl'feg* « solfego » (itala *solféggio*, *soprano*),
- klasik-grekaj: סַרְקוֹפֶג *sarqōfag* « sarkofago » (greka *σαρκοφάγος*),
- bizanc-grekaj: אַפִּיפּוֹר *apīfyōr* « papo » (greka *ἐπίφορος*),
- rusaj: וּוֹדְקָה *wōdqa* « vodko », שַׁמָּט *šafmat* « ŝako » (rusa *водка*, *шάκматы*),

- turkaj: **בוסטן** *bustan* « horto » (turka *bostan*),
- arabaj: **وَزِير** *wazīr* « veziro », **يَرْبُوع** *yarbūa'* « ĝerboso » (araba **وَزِير** *wazīr*, **يَرْبُوع** *yarbūa'*),
- japanaj: **גודו** *gūdō* « judo » (japana **柔道** *gūdō*).

Kaj tiu ĉi kunaĵo, tamen tute heterogena en sia konsisto, estas, de pluraj jardekoj, la gepatra lingvo de kelkaj milionoj da homaj estuloj, kiuj pensas hebree, sonĝas hebree, ŝercas hebree, amoras hebree.

La hebrea lingvo estas la vivanta pruvo, ke lingvo artefare konstruita sur natura bazo, kapablas funkcii tute bone kaj naski novan kulturon.

II. La indonezia lingvo.

En la vastega Indonezio, konsistanta el 17508 insuloj (la PIV diras modeste *trimil*), el kiuj 6000 havas nomon kaj estas enloĝataj de 336 etnioj, oni uzas proksimume 540 diversajn lingvojn, inter kiuj oni citu: *balia, java, madura, sasaka, sunda, toraĝa*, ktp.

De longe, la rilatoj inter la diversaj insuloj necesigis la uzadon de komunika lingvo, kiu estus komprenata kaj parolata en ĉiuj havenoj de la insularo. La **malaja lingvo** estis en bona loko por ludi tiun rolon.

Efektive, de la 8a jarcento, le **malaja lingvo** estis la lingvo de Ŝrivigajo (श्रीविजय *śrīviĝaya*, t.e. Sumatro kaj okcidento de Ĵavo) kaj de la Malaka duoninsulo. Sed dank' al la progreso de Islamo kaj de la islama komerco, ĝi disvastiĝis al ĉiuj bordoj de la Indonezia insularo, ĝis Molukoj. La Eŭropaj navigistoj kromnomis ĝin « la Orienta latino » (*Melayu pasar* « bazara malaja, populara lingvo uzata en bazaroj »). Ĝi estis uzata kiel komunika lingvo ankaŭ de la ĉinoj, kiuj parolis diversajn ĉinajn dialektojn, kaj ankaŭ de la Nederlandanoj por ilia komerco.

La malaja lingvo estis tiam skribata per la araba alfabeto, al kiuj oni aldonis kelkajn pliajn literojn (ب خ ج غ ق ز).

En la 19a jarcento, la Nederlandaj koloniistoj, kiuj rigardis la malajan lingvon kiel rivalon por sia superregado, klopodis trudi la nederlandan per ĉiuj rimedoj. En 1901, ili enkondukis la latinan alfabeton por skribi la malajan, kun ortografiaj konvencioj parte nederlandaj: [ĝ] = dj, [j] = j, [ŝ] = sj, [ĉ] = tj, [u] = oe, [h] = ch. Ekzemple,

- يا « jes » iĝis ja ;
- چوچو « nepo » iĝis tjutju ;
- جاوا « Ĵavo » iĝis Djawa ;
- اورغ « homo » iĝis orang ;
- قغغولغ « maniso, pangolino » iĝis penggoeling.

La 28an de Oktobro 1928 estas granda dato por la Indonezia popolo. Ĉe la dua kongreso de la nacia junularo de Ĵakarto, estis proklamita la ĵuro de la junularo. Ĝia slogano estis « *Unu patrio: Indonezio. Unu nacieco: indonezia. Unu lingvo: la indonezia* ». Unu lingvo indonezia, bone ! Sed kiu ?

Fakte, la **malajan** oni elektis, malfavore al la java, tamen prestiĝa kulturlingvo, kaj gepatra lingvo de pli ol la duono de la Indonezianoj. Sed la malaja, kiun oni eknomis *bahasa Indonesia* « la lingvo de Indonezio », havis grandegan avantaĝon: ĝia simpleco forte kontrastas kun la gramatika kaj leksika malfacileco de la java.

Tiam oni komencis publikigi en *bahasa Indonesia* malnovajn tekstojn, kaj ankaŭ tradukaĵojn de Eŭropaj klasikaĵoj. La junaj verkistoj, grupigitaj ĉirkaŭ la revuo *Pujangga Baru* (tiam skribata *Poedjangga Baroe*) « la nova literaturisto », fondita en 1933, komencis

modernigi la malajan lingvon, por fari el ĝi kulturlingvon: publikigo de eseoj, de romanoj kaj poemoj, laborado super gramatiko, ortografio kaj terminologio. En 1938, okazis la unua Kongreso de la indonezia lingvo.

Kiam la japanoj ekokupis Indonezion en Marto 1942, ili malpermesis la uzadon de la nederlanda lingvo, evidente por trudi sian propran lingvon pro koloniismaj celoj. Sed la tradukaj malfacilaĵoj estis tiel grandaj, ke la japanoj devis reveni al la sola komuna lingvo, la *bahasa Indonesia*. Tial ili kreis Komisionon por la indonezia lingvo. Ĉe la foriro de la japanoj, en 1945, la Komisiono jam fabrikis 7000 novajn terminojn.

La sendependeco de Indonezio estis proklamita la 17an de Aŭgusto 1945. Per la artikolo 36 de la nova Konstitucio, la **indonezia lingvo** estis deklarita oficiala lingvo. Post mallonga tempo, okazis la unuaj universitataj kursoj en indonezia lingvo. En 1947, nova komisiono prezentis 5000 novajn teknikajn terminojn. De 1950 ĝis 1966, la Lingva Nacia Instituto kreis pli ol 300 000 novajn vortojn kaj publikigis 29 listojn de sciencaj vortoj.

En 1972, oni faris ortografian reformon, por forigi la memorajojn de la koloniisma ortografio: [ĝ] = j, [j] = y, [ŝ] = sh, [ĉ] = c, [u] = u, [ĥ] = kh. Ekzemple,

- ja « jes » iĝis ya ;
- Djawa « Ĵavo » iĝis Jawa ;
- penggoeling « maniso, pangolino » estas nun pengguling.
- tjutju « nepo » iĝis cucu ;
- orang « homo » restis orang ;

La *bahasa Indonesia*, kiun scipovis nur kelkaj milionoj da homoj en la 1950aj jaroj, estas nun parolata de 130 milionoj da parolantoj (80 % de la popolo), eĉ se ĝi kelkfoje estas la dua lingvo. Ĝi estas uzata en la administracio, en la lernejoj, ĉe la televido, en la gazetaro kaj fare de la scienculoj. Ĝi naskis literaturon de alta kvalito. Post umtridek jaroj (unu generacio), ĝi estos la lingvo de la preskaŭ-tuto de la Indonezianoj.

La indonezia estas do **planlingvo**, kun malaja bazo, kaj tre granda nombro de pruntaĵoj de la ĵava lingvo kaj de aliaj lingvoj.

Kelkaj ekzemploj de depruntoj:

- bahasa « lingvo » venas de la sanskrita भाषा bhāṣā,
- bisnis « aferoj » venas de la angla business,
- buku « libro » venas de la nederlanda boek,
- miskin « malriĉa » venas de la araba مسكين miskīn,
- pasar « bazaro » venas de la persa بازار bāzār,
- sekolah « lernejo » venas de la latina schola,
- sepatu « boteto » venas de la portugala sapato.

III. La Esperanta lingvo.

Ĉu la novhebrea kaj la indonezia estas “naturaj” aŭ “artefaritaj” lingvoj? Ambaŭ, kiel Esperanto. En la lingvoj hebrea, indonezia kaj esperanta, la bazo estas natura. Sed tiu natura bazo estas aranĝita per pli-malpli artefarita planado.

1. Natureco de la gramatiko. Granda parto de la gramatiko de la novhebrea lingvo estas “natura”, ĉar ĝi jam troviĝas en la antikva lingvo kaj konserviĝis spontane. Israelano, kiu konjugacias אָבַדְתִּי avádti, אָבַדְתָּ avádtá, אָבַדְתְּ avádt, « mi laboris, ci laboris, li laboris », uzas la samajn gramatikajn formojn, kiel la reĝo David en la jaro ~1000. Kiam li pasas de אָנוּשׁ ĉnōš « homo » al אָנוּשׁוֹת ĉnōšūt « homeco » (vorto tamen ne ekzistanta en la Biblio), li parolas same nature, kiel liaj antikvaj prapatroj, kiuj pasis de

מֶלֶךְ *mélek* « reĝo » al מַלְכּוּת *malk'ūt* « reĝeco » (la sufikso estas la sama).

Estas same pri la **indonezia gramatiko**. Kiam la malaja lingvo estis elektita kiel bazo de la indonezia lingvo, ĝi estis parolata ekde jarcentoj fare de homoj, el kiuj la pli granda parto sciis nenion pri teoria gramatiko de sia lingvo : ili parolis la aŭdatan lingvaĵon.

Granda parto de la **gramatiko de Esperanto** estas “natura”, ĉar ĝi ekzistas en la “naturaj” lingvoj de Eŭropo kaj de aliaj terpartoj. Esperanto-uzanto, kiu pasas de **bona al boneco**, de **pala al paleco**, parolas same nature, kiel hungaro, kiu pasas de **jó « bona »** al **jóság « boneco »**, aŭ de **halvány « pala »** al **halványság « paleco »** : la Esperanta sufikso **-eco** estas la ekvivalento de la hungara sufikso **-ság**.

2. Natureco de la leksiko. Granda parto de la **leksiko de la novhebrea lingvo** estas “natura”, ĉar ĝi ne estis fabrikita, sed venas de la antikvaj libroj (Biblio, Talmudo, ktp). Israelano, kiu esprimas la nociojn **ĉielo** (שָׁמַיִם *šamáyim*), **arbo** (עֵץ *ec*), **dormi** (יָשַׁן *yašen*), **tri** (שְׁלֹשָׁה *šlōša*), ne parolas pli malnature, ol Salomono aŭ Jesaja, antaŭ tri jarmiloj, kaj uzas la samajn vortojn.

Pro la sama kaŭzo, granda parto de la **leksiko de la indonezia lingvo** estas “natura”.

Granda parto de la **leksiko de Esperanto** estas “natura”, ĉar ĝi ekzistas en tre multaj lingvoj, ĉefe Eŭropaj. Esperantoparolanto, kiu esprimas la nociojn **ĉielo**, **arbo**, **dormi**, **tri**, ne parolas pli artefare, ol iu Romano, kiu diris, antaŭ dumil kvincent jaroj, *caelum*, *arbōr*, *dormire*, *trēs*. Israelano, kiu diras **אֲנִי אוֹהֵב קוֹנֵיךָ** *ānī ohev qōnyaq* « mi ŝatas konjakon » ne pli parolas “miksajon de lingvoj”, ol franco, kiu diras *j'aime la vodka* « mi ŝatas vodkon », aŭ esperantofono, kiu diras *mi ŝatas viskion* (*aimer* venas de la latina, *vodka* estas rusa, *ŝati* estas ĝermandevena, *viskio* estas gaela vorto).

3. Artefariteco de la gramatiko. Malgranda parto de la **gramatiko de la novhebrea lingvo** estas “artefarita”. Ekzemplon de artefariteco donas la decido (de Ben Jehuda), laŭ kiu la du aspektoj de la verbo de la antikva lingvo, iĝos du tensoj de la moderna lingvo. Tiu modifo de la profunda senco de la verbo estas tre oportuna, sed kreita tute arbitre.

Malgranda parto de la **gramatiko de Esperanto** estas “artefarita”. Ekzemplo de artefariteco estas donita de la principo (iniciate de Zamenhof), laŭ kiu predikativo estas ĉiam nominativa, eĉ kiam ĝi rilatas al akuzativa objekto, kio preskaŭ neniam ekzistas en la lingvoj “naturaj” (en tiaj kazoj, la latina kaj la helena uzas akuzativon, la rusa kaj la pola instrumentalon). Sed tiu oportuna principo evitas ambiguaĵojn.

4. Artefariteco de la leksiko. Malgranda parto de la **leksiko de la novhebrea** estas “artefarita”. Ekzemple, la vorto **בְּיַנְלָאִי** *bēniəummī* « internacia » (de **בֵּין** *bēn* « inter » kaj **לְאִים** *ləom* « nacio, popolo ») ne formiĝis spontane per la natura evoluado de la antikva Biblia lingvo, sed rezultas de la iniciativo de iu leksikografo.

Tre malgranda parto de la **leksiko de la indonezia** estas “artefarita”. Ekzemple, la vorto **berdikari** « elturniĝi sola » estas perfekte artefarita : ĝi estis fabrikita el **berdiri diatas kaki sendiri** « stari vertikale proprapiede ». Kaj **rok mini** « minijupo » certe ne venas de la antikva malaja vorttrezoro.

Tre malgranda parto de la **leksiko de Esperanto** estas “artefarita”. Ekzemple, **iū**, **kiom**, **ĉiam**, **neniel**, **-ema**, **-ino**, **edzo**, ne formiĝis spontane per la natura evoluado de iu ajn lingvo, sed rezultas de la iniciativo de doktoro L.L.Zamenhof, kvankam ankaŭ tiuj elementoj havas iom “naturan” bazon, eĉ se ĉi tiu ne tuj aperas.

Pluskvamperfekto kaj antaŭfuturo en pasivo

I. Pluskvamperfekto (aŭ antaŭpreterito) estas «*tenso en kelkaj lingvoj, montranta agon pasintan kaj antaŭan al alia pasinta ago ; pluskvamperfekto ne ekzistas en Esperanto, kiu esprimas ĝin per simpla aŭ perfekta preterito kun adverboj*» (PIV, p.891b).

Oni bone legis : **pluskvamperfekto ne ekzistas en Esperanto** (☞ *Participoj*).

Sed pluskvamperfekto ekzistas en la pliparto de la lingvoj de okcidenta Eŭropo. Tial, kelkaj aŭtoroj volis perforti Esperanton, asertante, ke **estis ...ita** havas nepre pluskvamperfektan sencion. Sed tiel ne estas : **estis ...ita NE** montras antaŭtempecon (PAG, p.152).

• *li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita* (F §33). Se **estis naskita** havus pluskvamperfektan sencion, tio signifus, ke li malbenis tagon pli fruan ol lia naskiĝa tago. Absurde !

• *George Vaŝington estis naskita la 22an de Februaro de la jaro 1732a* (F §12). Alidire, en tiu tago, oni naskis lin. Iu R.Ŝulco, kies fuŝoj estas nenombrebaj, deklaris tiun frazon erara !

• *mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu* (F §39). Neniu mortigis lin : oni ne vidas ĉi tie ian antaŭtempecon.

• *kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero* (Biblio, Gen 2¹). Tiu ago ne povas esti antaŭa al alia ago, ĉar temas pri la kreado de l' mondo. France : *ainsi furent achevés...*; ruse : *так совершены...*

• *la pordo estis denove riglita kaj ŝlosita, kaj denove ŝi staris en la patra domo* (Zamenhof, *La Batalo de l' Vivo*, p.68). Ŝi ne estus en la patra domo, se la pordo estus antaŭe riglita.

• *li jam preskaŭ atingis la pardonon, kiam ĝi subite estis malfermita* (Zamenhof, *La Batalo de l' Vivo*, p.80). La malfermo okazas samtempe kun la atingo, ne antaŭe.

• *vi vidas, kiel false mi estis akuzita* (Zamenhof, *George Dandin*, p.17). Originala teksto : *vous voyez comme j'ai été faussement accusé* (Molière). Ne "*j'avais été accusé*".

• *mi estis enterigita* (Zamenhof, *La Rabistoj*, p.117). Originala teksto : *ich bin begraben worden* (Schiller). Ne "*ich war*".

• *antaŭe ni iradis en la lernejon kaj iom lernis, kaj poste ni estis konfirmitaj* (Zamenhof, *Fabeloj de Andersen*, II, p.78). La teksto diras «*poste*», do antaŭtempeco ne povas ekzisti ĉi tie.

• *via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio* (Aktoj de la Akademio, I, p.74). Oni akceptis la proponon la 3-an de Junio. Eble ĝi estis akceptota matene, sed jam akceptita vespere.

• *oni transportis lin en hospitalon, en kiu li estis operaciita* (Aktoj de la Akademio, I, p.29). Fakte, sinsekve operaciota (unu tagon?), operaciata (unu horon?), operaciita (unu semajnon?).

Do, la dirmaniero **estis ...ita NE** montras agon pasintan kaj antaŭan al alia pasinta ago. Alidire, ĝi NE respondas al la pluskvamperfekto de la Eŭropaj lingvoj.

Sed kiamaniere Esperanto montras agon pasintan kaj antaŭan al alia malpli pasinta ago (pluskvamperfekto de la Eŭropaj lingvoj) ? Per tri rimedoj.

a) Per diversaj tempaj adverboj (*jam, jam antaŭe, jam longe*).

• *kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron* (F §24).

• *kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita* (F §25).

• *la dua pokalo estis jam plenigita* (Zamenhof, traduko de *La Rabeno de Baĥaraĥ*, p.11).

• *la provizoj kaj servistoj estis jam senditaj antaŭe* (Kabe, *La Faraono*).

• *oni transportis lin en hospitalon, en kiu li jam antaŭe estis operaciita* (Aktoj de la Akademio, I, p.29). Oni jam pli frue operaciis lin en tiu sama hospitalo.

• sub Ludoviko XIV^a, multaj artistoj **estis subtenataj** de la reĝa kaso ; sed **jam pli frue**, verŝajne sub ĉiuj reĝimoj, artistoj **estis subtenataj** de mecenatoj (R.Schwartz, *Ne kiel Meier*, p.28). La dua “estis subtenataj” estas klare komprenata kiel antaŭa rilate al la unua “estis subtenataj”.

b) Per tempa adjekto.

• ŝi **sidiĝis sur la seĝo**, kiu **antaŭ momento estis donita** al ŝi (Zamenhof, *Marta*, p.44). Originala teksto : *usiadła na podanym jej przed chwilą fotelu* (E.Orzeszkowa).

c) Simple per la signifo de la frazo.

• *Marta sidiĝis sur seĝo*, kiu **estis montrita** al ŝi (Zamenhof, *Marta*, p.20). Originala teksto : *Marta usiadła na wskazanym sobie fotelu* (Orzeszkowa). Evidente, antaŭe montrita.

• *fine venis al mi Daniel*, al kiu **estis donita** la nomo Beltŝacar (Dan 4⁸). Evidente, kiam Daniel alvenas, li jam havas la nomon Beltŝacar. Originale : *בְּנֵיאֵל דַּי־שָׁמָּה בְּלִטְשָׁאצָּר*.

• oni alportis la orajn vazojn, kiuj **estis prenitaj** el la sanktejo (Dan 5³). Evidente, oni ne povus alporti la vazojn, se oni ne antaŭe prenis ilin el la sanktejo.

II. Antaŭfuturo estas tenso en kelkaj lingvoj, montranta agon futuran sed antaŭan al ia pli futura ago. Se antaŭpreterito ne ekzistas en Esperanto, certe ankaŭ antaŭfuturo ne ekzistas. Tamen kelkaj aŭtoroj volis perforti Esperanton, asertante, ke **estos ...ita** havas nepre antaŭfaturan sencon.

Sed tiel ne estas : **estos ...ita NE** montras antaŭtempecon en la futuro.

- *vi estos entombigita en bona maljuneco* (Zamenhof, *Biblio*, Gen 15¹⁵). Oni entombigos vin.
- *kiu iras en senpekeco, tiu estos savita* (Zamenhof, *Biblio*, Snt 28¹⁸). Ne : antaŭe savita!
- *la idoloj estos tute neniigitaj* (Zamenhof, *Biblio*, Jsa 2¹⁸). Oni neniigos ilin, simple.
- *kontraŭ la vipo de lango vi estos kaŝita* (Zamenhof, *Biblio*, Ijb 5²¹). En stato de kaŝiteco.
- *mi promesas al vi, ke vi estos dece akceptita* (Zamenhof, *George Dandin*, p.15). Originala teksto : *je vous promets que vous serez* (simpla futuro) *reçu comme il faut* (Molière).
- *via senhonteco estos plene elmontrita* (Zamenhof, *George Dandin*, p.42). Originala teksto : *votre effronterie sera* (simpla futuro) *pleinement confondue* (Molière).
- *mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo* (*Aktoj de la Akademio*, I, p.74). La ŝuldo estos pagota matene, pagata posttagmeze (dum kelkaj sekundoj), kaj pagita dum la cetero de 1' tago.

Do, la dirmaniero **estos ...ita** montras agon futuran, sed **NE** antaŭan al alia futura ago. Alidire, ĝi **NE** respondas al la antaŭfuturo de la Eŭropaj lingvoj.

Sed kiamaniere Esperanto montras agon futuran kaj antaŭan al alia pli futura ago (antaŭfuturo de la Eŭropaj lingvoj) ? Per tri rimedoj.

a) Per diversaj tempaj adverboj (*jam, jam antaŭe, jam longe*).

• *mi promesas, ke, la 9-an de Majo, mia ŝuldo estos jam antaŭe pagita*. Mi pagos ĝin pli frue ol la 9-an de Majo, do plej malfrue la 8-an de Majo, vespere.

b) Per tempa adjekto.

• *mi promesas, ke, la 9-an de Majo, mia ŝuldo estos pagita de almenaŭ du semajnoj*. Do mi pagos ĝin iom antaŭ la 25-a de Aprilo.

c) Simple per la signifo de la frazo.

• *...por sciigi al li, ke filo estos naskita al li* (Zamenhof, *La Rabeno de Baŝarafi*, p.12). Originala teksto : *...geboren werde* (H.Heine). La filo estos jam naskita.

• *kiam vi venos, la afero estos farita* (PAG, p.154). Evidente, ĝi estos jam antaŭe farita.

• *post kiam mia haŭto estos tiel detruita...*, *mi vidis Dion* (*Biblio*, Ijb 19²⁶). Jam detruita.


Po, dispartiga prepozicio

La uzo de **po** estas iom delikata por la okcident-Eŭropanoj, kiuj ne havas precizan ekvivalenton en siaj lingvoj.


Plie, kelkaj aŭtoroj malsimpligis la aferon, rifuzante, ke **po** estas prepozicio. Ili nomis ĝin *numeralo, prefikso, adverbo, nepreciza vorto...* Tute neutile. Eĉ malutile.

Por klarigi la aferon, ni konsideru nur la difinon de Zamenhof mem: «**La vorto "po" antaŭ iu esprimo de mezuro signifas, ke tiu mezuro rilatas ne al ĉiuj personoj aŭ objektoj kune, sed al ĉiu aparte**» (*Lingvaj Respondoj*, p.107).

Sekvas ekzemplo: «*ili ricevis po kvin pomojn*» = ne ĉiuj kune ricevis kvin pomojn, sed ĉiu aparte ricevis kvin pomojn. Jen ilustra resumo:



ili ricevis KVIN pomojn



ili ricevis PO KVIN pomojn

Efektive, «*la vorto "po" antaŭ la esprimo de mezuro "kvin" signifas, ke tiu mezuro "kvin" rilatas ne al "ili" kune, sed al ĉiu el "ili" aparte*» (la ĉi-supra desegno supozigas, ke «*ili*» estas 3, kio implicas, ke ili entute ricevis $3 \times 5 = 15$ pomojn).

Ni konstata do, ke:

• **KVIN** pomoj = 🍏 🍏 🍏 🍏 🍏 (*difinita* nombro: kvin, ne pli).

• **PO KVIN** pomoj = 🍏🍏🍏, 🍏🍏🍏, 🍏🍏🍏, 🍏🍏🍏, 🍏🍏🍏, ktp (sinsekvo de kvinopoj da pomoj en *nedifinita* nombro).

La **PO-esprimo**, t.e. la komplekso «*po + numeralo + substantivo*» (ekz. «*po kvin pomoj*»), povas havi ĉiun ajn gramatikan funkcion.

1) Subjekto.

• *po du boteloj staris sur la tabloj* (PAG, p.113): grupo de du boteloj sur ĉiu tablo.

2) Rekta objekto.

• *al ĉiu li donis po kvin dolarojn* (Zamenhof, PAG, p.113). Pri la akuzativo, ni vidos poste.

• *la publiko de la teatro aŭdas nur po unu vorton el du* (G.Waringhien, 1887 kaj la sekvo, p.48): ĉiu grupo de du vortoj estas en rilato kun unu vorto aŭdata.

3) Nerekta objekto.

• *mi ricevis kvin eŭrojn de po du personoj* (Atanasov, p.142): eŭroj estas kvin; personoj estas *po du*, t.e. dispartigitaj laŭ duopoj; ĉiu duopo donis unu eŭron (do la duopoj estas 5).

4) Predikativo.

• *mia kotizo estas po kvardek eŭroj ĉiujare*. 40 € ⇔ unu jaro.

5) Suplemento.

• *trupoj po cent soldatoj* (PAG, p.198): trupoj, el kiuj ĉiu konsistas egale el 100 soldatoj.

6) Diversaj adjektoj (cirkonstancaj komplementoj).

• *mi kudrados po dek horoj ĉiutage* (Zamenhof, Marta, p.109). Dek horoj ⇔ unu tago.

• *la studentoj estis ekzamenataj pri po du tezoj* (PAG, p.114). Unu studento ⇔ du tezoj.

• *mi fumadis cigaredojn po dudek-kvin rubloj por cento* (Zamenhof, Revizoro, p.60). Originalo: *po двадцати пяти рублей сотенка*. 25 rubloj ⇔ 100 cigaredoj.

- *veluro, kostanta po tri guldenoj por ulno* (Zamenhof, *Rabeno de B.*, p.28). 3 gld ⇔ 1 ulno.
- *oni vendas tiujn cigaredojn nur po cent* (PAG, p.279). 1 vendo ⇔ 100 cigaredoj.

7) Objektoj rekta kaj nereakta en unu frazo.

- *mi donis po tri pomojn al po du infanoj* (PAG, p.115): la pomoj estas aranĝitaj laŭ grupoj de tri; la infanoj, laŭ grupoj de du. Duopo de infanoj ⇔ triopo de pomoj.

Rimarko 1. Kiam la PO-esprimo estas rekta objekto, ĉu oni akuzativigu ĝin?

Rilate al tiu ĉi demando, ekzistas du sintenoj, inter kiuj ĉiu elektu laŭ sia lingvosento.

1) Pledo por nominativo. La Fundamento kaj Zamenhof (krom unu escepto) uzas nominativon.

- *se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj...* (F §14).

Cetere, kiam rekta objekto konsistas ne en unu sola vorto, sed en esprimo entenanta prepozicion, estas tute normale, ke ĝi ne entenas akuzativon: *mi trinkis malmulte da vino*.

2) Pledo por akuzativo. La PAG (p.113) demonstros klare, ke **po** rilatas nur al la numeralo kaj ne al la sekvanta substantivo. Efektive, "*ili ricevis po pomoj*" estas sensenca. Tio pruvas, ke **po** ne havas gramatikan rilaton al la substantivo *pomoj*, kiu do alprenas la normalan akuzativan markon, se ĝi estas rekta objekto: *ili ricevis / po kvin / pomojn*, aŭ *ili ricevis pomojn, po kvin*.

- *mi ordonis al ambaŭ trinki po du glasojn da acidsulfura akvo en tago, po dua stakana v denŝ* (E.von Wahl, *Princino Mary*, p.21). Teksto datumanta de 1889, do ne influita de la demonstro de la PAG.

Tia akuzativigo de la PO-esprimo estas same normala, kiel similaj dirmanieroj entenantaj *ĉirkaŭ, ĝis, inter, super*: *mi bezonus nur ĉirkaŭ ducent rublojn* (Zamenhof, *PIV*, p.212a), *ili povis loki en si nur du ĝis kvar homojn* (Zamenhof, *PIV*, p.419a), *ili sendis kontraŭ ni inter cent kaj ducent soldatojn* (PAG, p.109), *mi vidis tie super cent ĉevalojn* (PAG, p.278).

Rimarko 2. La uzo de **ĉiu** kune kun tiu de **po** estas redundanca.

- *po kvar glasoj staris antaŭ ĉiu festenanto* (PIV1, p.841b). Oni povus diri same klare: *po kvar glasoj staris antaŭ la festenantoj* (sen *ĉiu*), aŭ *kvar glasoj staris antaŭ ĉiu festenanto* (sen *po*).

Cetere, oni ĉiam povas eviti la uzon de **po** per la uzo de **ĉiu**.

Rimarko 3. Elipso de unu (tipe slava) estas foje trovebla kaj tute ĝusta.

- *la gastoj trinkis po glaseto da vino* (Zamenhof, *La Gimnazio*, p.62). Ĉiu gasto ⇔ unu glaseto.
- *tri havas po aŭtomobilon* (J.Valano, *Ĉu li venis trakosme?*, p.73). Ĉiu el la tri ⇔ unu aŭtomobilo.

Rimarko 4. Oni devas ne konfuzi la prepozicion **po** kaj la sufikson **-op**.

- *la gastoj venis triope*: ili estis tri entute kaj venis grupigite (♪ ♪ ♪).
- *la gastoj venis po tri* (PAG, p.112): laŭ grupoj de tri (♪ ♪ ♪ , ♪ ♪ ♪ , ♪ ♪ ♪ , ktp).

Rimarko 5. Oni atentu, ke **po** enkondukas ĉiun el la dispartigitaj partoj de kvanto, ne la unuojn, al kiuj tiu kvanto rilatas. "*Mi mem ricevas nur dek frankojn po pakajo*" (R.Schwartz, *Ani kaj Montmartre*, p.85) estas rekte erara. La ĝusta dirmaniero estas «*mi mem ricevas nur po dek frankoj(n) por pakajo*». Bedaŭrinde, tio estas ofta eraro en okcidenta Eŭropo.

Rimarko 6. Kelkaj lingvoj, precipe slavaj kaj baltaj, havas prepozicion respondantan al **po**.

Rusa: **по пять рублѣй штука** «po kvin rubloj por peco».

Pola: **dostali po pięć jabłków** «ili ricevis po kvin pomoj».

Ĉeĥa: **po sto korunách za metr** «po cent kronoj por metro».

Slovaka: **učit' sa denne po 30 minút** «lerni tage po tridek minutoj».

Serba: **добише по три јабуке** «ili ricevis po tri pomoj».

Bulgara: **по шест души седяха на една маса** «po ses personoj sidis ĉe unu tablo».

Litova: **pā rublī už kilogramā** «po (unu) rublo por kilogramo».

Latva: **pa stundai dienā** «po (unu) horo ĉiutage».

Novgreka: **τους έδωσα αλφ πέντε δραχμές** «al ili mi donis po kvin drakmoj».

Japana: **ビールにはいづつやった** *bīru-o nihai zucu yatta* «oni donis po du glasoj da biero».

Propraj nomoj

La propraj nomoj povas esti : geografiaj nomoj (urboj, montoj, lagoj, ktp), homnomoj (famuloj, nekonatoj), nomoj de verkoj, festoj, societoj, ktp.

I. Nomoj troviĝantaj en la PIV.

1. Esperanta formo tute preta. Oni prefere uzu ĝin.

a) La geografiaj nomoj monde konataj havas propran formon en ĉiuj lingvoj. Estas tute normale, ke ili havas ankaŭ propran formon en Esperanto. Ekzemploj :

- La ĉefurbo de Francio estas : france **Paris**, itale **Parigi**, hispane-islande **París**, nederlande **Parijs**, ĉeĥe **Paříž**, pole **Paryż**, ruse **Пари́ж**, litove **Paryžius**, latve **Parīze**, greke **Παρίσι**, armene **Փարիզ** *pariz*, estone **Pariis**, kartvele **პარიზი** *parizi*, hungare **Párizs**, finne **Pariisi**, malte **Parigi**, perse **پاریس** *pārīs*, hebree **פָּרִיז** *parīs*, amhare **ፓሪስ** : *paris*, arabe **باريس** *bārīs*, hinde **पेरिस** *pairis*, bengale **পারিস** *peris*, mongole **Парис**, taje **ប៉ារីស** *pārīs*, japane **パリ** *pari*, koree **파리** *parisi*, vjetname **Ba Lê**, ĉine **巴黎** *bālí*.

- La ĉefurbo de Italio estas : itale **Roma**, france **Rome**, germane **Rom**, islande **Róm**, ĉeĥe **Řím**, pole **Rzym**, kroate **Rim**, ruse **Рим**, greke **Ρώμη**, hungare **Róma**, finne **Rooma**.

- La germana urbo, en kiu sin trovas la tombo de Karolo la Granda, estas nomata : germane **Aachen**, nederlande **Aken**, ruse **Аахен**, france-angle **Aix-la-Chapelle**, hispane **Aquisgrán**, portugale **Aquisgrano**, itale **Aquisgrana**, pole **Akwisgran**, ĉeĥe **Cáchy**.

Evidente, ĉi tiuj nomoj havas ankaŭ Esperantan formon : **Parizo, Romo, Aĥeno**. Nenia alia formo (kiu estus evidente *nacia* formo) estas akceptebla en Esperanta teksto.

b) **Multaj personnomoj** havas Esperantan formon : **Aleksandro, Andreo, Angeliko, Anno, Aŭgusto, Ernesto, Felikso, Georgo, Johano, Jozefo, Ĵeromo, Klaro, Lazaro, Leono, Ludoviko, Mario, Marko, Mateo, Paŭlo, Petro, Sofio, Tomaso**, kaj multegaj aliaj.

Ankaŭ **kelkaj familinomoj** de famuloj havas Esperantan formon. Ekzemploj : **Betoveno, Bodlero, Cervanto, Goeto, Kaloĉajo, Kornelio, Lejbnico, Mickjeviĉo, Moliero, Rabelezo, Racino, Sansimono, Ŝekspiro, Ŝillero, Ŝvarco, Varingjeno, Voltero**.

2. Nacilingva formo, eventuale uzebla.

Sed la ekzisto, registrita en la PIV, de tiuj nomoj, ne implicas devigan uzadon. Ĉiu ajn rajtas uzadi ankaŭ la nacian formon, pro ia ajn kaŭzo : **Paris, Roma, Aachen; Beethoven, Baudelaire, Cervantes, Goethe, Kalocsay, Corneille, Leibniz, Mickiewicz, Molière, Rabelais, Racine, Saint-Simon, Shakespeare, Schiller, Schwartz, Waringhien, Voltaire**.

Tamen la Esperanta formo havas grandan avantaĝon okaze de derivado : **Alensona punto, Bokaĉaj rakontoj, Neŭtona fiziko kaj Ŝillera stilo** estas ege pli oportunaj ol **Alençon-a punto, Boccaccio-aj rakontoj, Newton-a fiziko kaj Schiller-a stilo**.

Unu plia avantaĝo de la uzado de Esperanta formo, estas, ke Esperantan nomon ĉia esperantisto ja kapablas elparoli (ekz. **Pekino, Edinburgo, Kopenhago, Varingjeno**). Sed prononci ĝuste **Běijīng, Edinburgh, København** aŭ **Waringhien** prezentas malfacilaĵon por ĉiuj homoj, kiuj ne regas la fonetikon respektive ĉinan, anglan, danan kaj francan.

Male, sur leterkoverta, la poŝtistoj pli ŝatas **København** ol **Kopenhago**, **Lyon** ol **Liono**, **New York** ol **Nov-Jorko**, **Waringhien** ol **Varingjeno**, **Warszawa** ol **Varsovio**, **Wien** ol **Vieno**.

Do ambaŭ solvoj havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn.

La esperantigo de nacilingvaj nomoj estas farita en la PIV tre oportune. Oni uzu ĝin. Inverse, la esperantigo de *Beethoven*, *Goethe* kaj *Musset* al "*Fanbetovo*", "*Fongojto*" kaj "*Demjuseto*", kiel iam faris la "Analiza Skolo", el Paderborn (Germanio), nur igas tiujn nomojn groteske nerekoneblaj.

II. Nomoj ne troviĝantaj en la PIV.

Ili povas esti nomoj de nekonatoj, sed ankaŭ de famuloj. Ekzemploj: *Alfred de Vigny*, *Fedor Miĥajloviĉ Dostojevski*, *Giuseppe Verdi*, *Henryk Sienkiewicz*, *Ivan Vazov*, *Lope de Vega*, *Martin Heidegger*, *Sándor Petőfi*, *Sean O'Casey*, kaj miloj da aliaj.

Unue, oni konsideru **du kazojn tute malsamajn**.

1. Nomoj origine skribitaj latinlitere.

Se la origina nomo estas skribita **per la latina alfabeto**, la konservado de tiu origina formo estas tute ebla, ĉar Esperanto uzadas la saman alfabeton. Kiel ekzemplon, ni supozu iun hungarinon nomatan *Erzsébet Kovács*. Kvar solvoj ekzistas.

a) **Simpla nacilingva skribado**: *Erzsébet Kovács*, nacilingve, respekte al ŝia origina nomo. Malavantaĝo estas, ke multaj homoj ne scias, kiel elparoli ĝin.

b) **Nacilingva skribado sekvata de prononcindiko**: *Erzsébet Kovács* [erĵebet kovaĉ] (eventuale [érĵebet kóvaĉ], kun la indiko de la akcentita silabo). Sed tio estigas **tri problemojn**.

1. La plej akra malfacilo estas tiam, ke la Esperanta fonetiko ne ĉiam ebligas la indikon de la ĝusta prononco. La Esperanta alfabeto ne kapablas transdoni, ekzemple, la sonojn *ő* kaj *ú* de la hungara lingvo, ankaŭ ne la nazalojn (an, in, on, un) de la franca lingvo.

2. Estus dezirinde, ke la prononcindiko ne estu farita laŭ ridinde erara maniero, kiel okazas tiel ofte en *Monato*. Ekzemple, *François Mitterrand* estas prononcata proksimume [fransŭa miteran] kaj ne [fransoa mitera]; *Hélène Carrère* estas prononcata [elen karer] kaj tute ne [helen kaĥeĥ], kiu eĉ ne estus eldirebla de franclingvano. Kaj kion pensi pri la angla vorto *services* transskribita [srvsz]?!! verŝajne farita dum striko de vokaloj...

3. Fine, ĉu tio vere utilas? Tre dubinde. Oni ne trovas en la francaj gazetoj: «*Schröder* [chreudeur]», nek en la germanaj gazetoj: «*Chirac* [schirak]». Esperanto estas memstara kaj matura lingvo, ne teoria projekto. Oni ne vidas, kial la vivanta lingvo Esperanto bezonus ian aranĝon, kiun postulas neniu alia vivanta lingvo.

c) **Eventuala esperantigo**. La nomo de nia supozata *Erzsébet Kovács* povas esti esperantigita sub la formo *Erĵebet(o) Kovaĉ(o)*. Granda avantaĝo estas, ke ĉiu esperantisto povas elparoli tute ĝuste la tiel aranĝitan nomon. Sed tio estigas **du gravajn problemojn**.

1. Esperanta formo povas ekzisti nur, se la fonetiko de la origina nomo kongruas kun la Esperanta fonetiko. Oni povas ŝanĝi *Braşov* al *Braşovo*, aŭ *Zdeněk* al *Zdenjeko*, sed oni ne facile kreus oportunan formon por *Çatal Höyük*, *Gijón*, *Heathrow*, *Hódmezővásárhely*, *Hradec Králové*, *Hyvinkää*, *Saint-Brieuc*, *Schönbrunn*, *Seyðisfjörður*, *Wałbrzych*.

2. Estas granda risko, ke la nomo estus simple nerekonebla. En iu Esperanta teksto datumanta de la 1930aj jaroj, mi vidis la nomojn de la tiamaj francaj politikuloj *Erjo*, *Kaŝen* kaj *Ŝjap*. Mi bezonis plursekundan viglan cerbumadon, antaŭ ol kompreni, ke temas pri *Herriot*, *Cachin* kaj *Chiappe*. La celo de Esperanto estas **faciligi** la komprenon, ĉu ne?

Praktike, se mi skribas al polo nomata *Vüadesŭavo Uĵenduvo*, loĝanta en *Ĵeŝuvo*, estas tre verŝajne, ke la polaj poŝtistoj **ne** rekonos en tiu skribmaniero s-ron *Władysław Urzędów*, loĝantan en *Rzeszów*. Kaj mia letero revenos, ne trafinte la adresiton.

Mi aldonu, ke tiu sistemo estas **tute kontraŭa al la Zamenhofa spirito**. Sufiĉas foliumi

liajn *Leterojn* kaj la *Originalan Verkaron* por trovi abundajn menciojn de *Beaufront, Boirac, Bourlet, Cart, Hachette, Javal, Leau, Michaux, Saussure, Sébert*, normale skribitaj, kaj neniam karikaturitaj al *Bofron, Būarak, Burle, Kar, Ašet, Javal, Lo, Mišo, Sosur, Seber...*

Li ankaŭ ne ŝanĝis *Clemency* kaj *Snitchey* al *Klemensi* kaj *Sniĉe* (*La Batalo de l' Vivo*)! Verŝajnas, ke li perfekte konsciis pri la groteskeco de tiuj absurdajoj.

ĉ) **Eventuala traduko.** Ĉar la hungara vorto *kovács* signifas « forĝisto », la nomo de nia supozata *Erzsébet Kovács* povas esti tradukita al *Elizabeta Forĝisto*.

Same, *Hayat, Letailleur, Sartre, Schneider, Szabó, Taylor* povas esti tradukitaj al *Tajloro*. Kaj oni facile ŝanĝus *Berg, Bergmann, Delmonte, Dumont, Горский, Horák, Mendi, Menez, Montaigne, Montano, Schönberg, Serrano* kaj *山本 [yamamoto]* al *Montano, Delamonto, Belmonto, ktp.*

Evidente, tiu solvo estas ĉi tie menciata nur por montri ĝian ridindecon. Se franco nomiĝas *Dupont*, okaze de vojaĝo en diversajn landojn, oni ne nomos lin *Da Ponte, Delpuente, Haŝino, Köprünün, Mosta, Ofthebridge, Qiáode, Ŝel-Hageŝer, Tu-Gefirju, Van de Brug, Von der Brücke, Zubiaren*. Esperanto estas memstara lingvo: oni ne vidas kial, nur en Esperantio, li devus alpreni la nomon *Delaponto* (krom se li mem deziras tion humureme).

Iam, la "Analiza Skolo" el Paderborn (Germanio) havis fortan emon al tiu sistemo. Interalie, la analizantaj skoluloj volis "traduki" la francan familinomon *Dubois* al *Delaligno*. Tio estis des pli stulta, ke la origina signifo de *Dubois* tute ne estas "de la ligno", sed evidente "de la arbaro"! Amuza detalo: la germana aŭtoro de la "traduko" "*Delaligno*" estis fakulo (!) pri la franca lingvo.

Persona nomo + familinomo.

Okazas ofte, ke en la duopo "personnomo + familinomo", la unua havas Esperantan formon registritan en la PIV, la dua ne. Ĉu uzi la Esperantan formon de la unua? Ĉu konservi ambaŭ nomojn en ilia nacilingva formo?

La etnolingvoj ne havas regulon pri tio. La francoj, hispanoj kaj germanoj diras *William Shakespeare*, konservante la originan personnomon (kiu estus france *Guillaume*, hispane *Guillermo*, germane *Wilhelm*). Inverse, la germana komponisto *Johann Sebastian Bach* estas nomata en Francio *Jean Sébastien Bach* kaj en Hispanio *Juan Sebastián Bach*, kun tradukita personnomo.

Ankaŭ en Esperanto, regulo pria ne ekzistas. Ĉe Zamenhof, ni trovas:

- Pri fikciaj personoj:
 - jen esperantigitajn personnomojn: *Georgo Dandin, Bertrando de Sottenville* (*Georgo Dandin*, p.5, 12), *Johano Swicki, Ludovikino Zminska, Mario Rudzinska* (*Marta*, p.14, 22, 41).
 - jen nacilingvajjn personnomojn: *Alfred Heathfield, Michael Warden* (*La Batalo de l' Vivo*, p.47), *Jean-Gilles de Sottenville* (*Georgo Dandin*, p.14), *Marta Swicka* (*Marta*, p.13).
- Pri realaj personoj:
 - jen esperantigitajn personnomojn: *Emilo Javal, Leono Tolstoj, Leopoldo Einstein, Josefo Wasniewski* (*OV*, p.246, 290, 365),
 - jen nacilingvajjn personnomojn: *Jozef Wasniewski, Michael Foster, Johann Martin Schleyer, Théophile Cart* (*OV*, p.220, 375, 403, 525).

2. Nomoj origine skribataj per alia skribo, ol la latina.

Se propra nomo devenas de lingvo skribata per alia skribo, ol la latina (skribo araba, cirila, ĉina, devanagara, greka, hebrea, k.a.), oni devas uzadi latinliteran transliteradon, evidente konforman al la Esperanta ortografio, nepre ne konforman al iu ajn nacia ortografio, kiu estus ŝoka, eĉ nelegebla, en Esperanta teksto. Tio ne respondas al onia persona gusto aŭ al iu kutimo, sed estas nepra necesajo.

Ĉiu lingvo transskribas la proprajn nomojn laŭ la reguloj de sia propra ortografio.

La nomo de la rusa verkisto Солженицын estas transskribita: pole Sołżenicyn, france Soljenitsyne, germane Solschenizyn, greke Σολτζενίτσιν, hungare Szolzenyicin. En Esperanto: Solĵenicin, laŭvole Solĵenicino. Alia eblo ne ekzistas.

La egipta loko أسوان estas transskribita: angle Aswan, france Assouan, germane Assuan, ruse Асуа́н. En Esperanto, oni povas heziti inter Asŭano kaj Asuano.

Tiu transskribado ne ĉiam estas simpla. Plej ofte, ĝi necesigas ian scion pri la fonetiko de la origina lingvo. La rusan urbonomon Воронеж (france *Voronej*, angle *Voronezh*, germane *Woronesch*, pole *Woroneż*) oni esperantigu *Voronej*, nepre ne *Voronej*. La Hindia urbonomo जम्मू (france-angle *Jammu*, itale *Giammu*, germane *Dschammu*, ruse *Джамму*) estas transskribenda *Ĝammu*, nepre ne *Jammu*, kiu ne respondus al la Hindia nomo.

Transskribo de la ĉinaj nomoj.

Kazo tute aparta estas tiu de la ĉinaj nomoj. En Ĉinio mem, ekzistas transskriba latinlitera sistemo nomata *pinjino*. Sed en Esperanta teksto, ĝi ne estus oportuna. Tial la PIV ne uzas ĝin. Jen la ekvivalentoj inter *pinjino* kaj la PIVa sistemo, kun la prononco indikita per la Internacia Fonetika Alfabeto (laŭ *Petit Dictionnaire Français-Chinois*, Pekino, Hongkongo, 1983). Akcesora noto: la PIVa transskribo de la nomo *Ŝanhajo* estas erara (*Ŝanhajo*).

Konsonantoj						Vokaloj					
Pinjino	PIV	IFA	Pinjino	PIV	IFA	Pinjino	PIV	IFA	Pinjino	PIV	IFA
b	b	p	q ①	ĉj	tʃ ^h	a	a	a	iong	jong	juŋ
c	c	tʃ ^h	q ②	ĉ	tʃ ^h	ai	aj	aj	iu	joŭ	jow
ch	ĉ	tʃ ^h	r	ĵ	ʒ	an	an	an	o	o	o
d	d	t	s	s	s	ang	ang	aŋ	ong	ong	uŋ
f	f	f	sh	ŝ	ʃ	ao	aŭ	aw	ou	oŭ	ow
g	g	k	t	t	t ^h	e	e	ə, ε	u	u	u
h	h	x	w	ŭ	w	ei	ej	ej	ua	ŭa	wa
j ①	ĝj	tʃ	wu	vu	u	en	en	ən	uai	ŭaj	waj
j ②	ĝ	tʃ	x ①	ŝj	ʃ	eng	eng	əŋ	uan	ŭan	wan
k	k	k ^h	x ②	ŝ	ʃ	er	er	ər	uang	ŭang	wan
l	l	l	y	j	j	i	i	i, ɪ, ɨ	ue	ŭe	we
m	m	m	yi	i	i	ia	ja	ja	ui	uj	wej
n	n	n	z	z	ʒ	ian	jan	jen	un	un	wən
p	p	p ^h	zh	ĝ	tʃ	iang	jang	jan	uo	ŭo	wo
						iao	jaŭ	jaw	ü	ju	y
						ie	je	je	üan	jüan	ɥən
						in	in	in	üe	jüe	ɥe
						ing	ing	iŋ	ün	jün	yn

① : sekvata de i, u, uan, ue, un

② : sekvata de i + vokalo aŭ n

III. Akcesora problemeto.

Ĉu ni uzu *Abraham* aŭ *Abrahamo*, *Gogol* aŭ *Gogolo*, *Hefej* aŭ *Hefejo*, *Metuŝelaĥ* aŭ *Metuŝelaĥo*? Laŭvole. En la unua PIV, multaj propraj nomoj (sed ne ĉiuj) estis skribitaj sen finaĵo. En la dua PIV, ili akiris finaĵon. Ni ankaŭ ne demandu Zamenhof-on pri tio: lia uzado ne estis konstanta. En liaj verkoj, oni trovas, jen *Adamo*, *Agamemnono*, *Davido* kun finaĵo, jen *Abraham*, *Habel*, *Kain*, *Korobkin* sen finaĵo. Akuzative, ĉiuj retrovas la finaĵon: *Abrahamon*, *Adamon*, *Agamemnonon*, *Davidon*, *Habelon*, *Kainon*, *Korobkinon*.

Konkludo: manke de definitiva regulo, ĉiu agu laŭ sia propra deziro.

Refleksivo, ne ĉiam simpla

La Esperanta refleksivo obeas grandparte al la reguloj de la slava refleksivo. Tial, okcident-Eŭropanoj foje renkontas malfacilaĵojn en la ĝusta uzado de la refleksiva pronomo (si), de la refleksiva posesivo (sia) kaj de la poseda pronomo (ties).

Tamen dank' al tiuj esprimiloj, la precizeco de Esperanto estas admirinda :


- **Petro telefonis al la amikino de Anna pri sia afero** (la afero de **Petro**, la subjekto).
- **Petro telefonis al la amikino de Anna pri ŝia afero** (la afero de la **amikino**, ne subjekto).
- **Petro telefonis al la amikino de Anna pri ties afero** (la afero de **Anna**, la laste citita).

En la elementaj kursoj, oni instruas, ke «*la refleksivo resendas al la subjekto ; sekve, la refleksivo mem ne povas esti subjekto (aŭ parto de subjekto)*».

Ĝenerale, la simplaj frazoj, kun nur unu subjekto, ne estigas problemojn. Sed ia malfacileco naskiĝas, kiam la frazo entenas plurajn verbojn kun po unu subjekto. Tiakaze, la **refleksivo resendas al la PLEJ PROKSIMA SUBJEKTO, singulara aŭ plurala**. Sed atentu! tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo.

La **ĉefa regulo** devas do esti formulita jene : **la refleksivo resendas al la SUBJEKTO DE LA PLEJ PROKSIMA AGO**. Mi ja diras “ago”, ne “verbo”. Efektive, tiun agon povas montri konjugacia verba formo, sed ankaŭ infinitivo, participo, ag-substantivo (substantivo de verba deveno).

Tio estas resumita en la jena skemo, en kiu ne troviĝas la vorto “verbo”, sed nur la pli ĝenerala vorto “AGO”.



ORA REGULO por la malfacilaj kazoj.

Oni dividu la frazon en tiom da sekcioj, kiom estas da indikoj de AGO :

Xxxx ago xxxx / xxxx ago xxxx / xxxx ago xxxx...

En ĉiu sekcio,

- **REFLEKSIVO (SI, SIA)** resendas al la subjekto de la ago indikita en tiu ĉi sekcio mem.
- **NE-REFLEKSIVO (LI, ŜI, ĜI, ILI, LIA, ŜIA, ĜIA, ILIA)** resendas al la subjekto de iu ago indikita en alia sekcio (tre povas okazi, ke tiu subjekto estas subkomprenata).

I. Ago esprimata per infinitivo.

• **Ludoviko vidis la najbaron / eniri en SIAN domon.** Du indikoj de ago : *vidis, eniri* → du sekcioj. La subjekto de *eniri* estas *najbaro*. La refleksivo *SIAN* resendas al *najbaro* : la najbaro eniris **en sian propran domon**.

• **Ludoviko vidis la najbaron / eniri en LIAN domon.** La **ne-refleksivo LIAN** ne resendas al *najbaro*, do resendas al *Ludoviko* : la najbaro eniris **en la domon de Ludoviko**.

• **la sinjoro ordonis al la servisto / vesti SIN pli dece** (Aktoj de la Akademio, II, p.55). Du indikoj de ago : *ordonis, vesti* → du sekcioj. La refleksivo *SIN* resendas al la subjekto de la

ag-indiko (vesti) troviĝanta en tiu dua sekcio. Tiu subjekto estas *servisto* (nur subkomprenata en tiu sekcio): la *servisto vestu sin* mem.

• la *sinjoro ordonis al la servisto / vesti LIN por la ceremonio* (Aktoj de la Akad., II, p.55). Du sekcioj. La *ne-refleksivo LIN* *ne* resendas al la subjekto de *vesti*, do resendas al alia vorto, en alia sekcio. Ĉi tiu ne povas esti alia, ol *sinjoro*: la *servisto vestu la sinjoron*.

II. Ago esprimata per participo.

Tiu participo devas nepre havi verban valoron. Tiu verba valoro estas montrata de la fakto, ke oni povas anstataŭigi ĝin per «*kiu ...as, kiu ...is, ktp*».

• *Ludoviko aŭdis la voĉon / de homo parolanta al SI* (oni povas diri: *...de homo, kiu parolis al si*). Du sekcioj. La subjekto de *parolanta* estas *homo*. La *refleksivo SI* resendas al la subjekto *homo*: la *homo parolis al si mem*.

• *Ludoviko aŭdis la voĉon / de homo parolanta al LI (...kiu parolis al li)*. Nun, la *ne-refleksivo LI* *ne* resendas al *homo*, do resendas al *Ludoviko*: la *homo parolis al Ludoviko*.

• *ŝi ekvidis viron / staranta antaŭ ŜI (...viro, kiu staris antaŭ ŝi)* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). La participo ja havas verban valoron: du ag-indikoj → du sekcioj. La subjekto de *stari* estas *viro*. La *ne-refleksivo ŜI* *ne* resendas al *viro*, do resendas al *ŝi*: la *viro staris antaŭ ŝi*. Cetere, la *refleksivo si* estus absurda: oni ne povas *stari antaŭ si mem*!

• *ŝi ekvidis starantan viron antaŭ SI* (oni *ne* povas diri: *viron, kiu staris*) (Aktoj de la Akademio, II, p.56). La participo *ne* havas verban valoron: *staranta viro* estas nur *vertikala viro*. Unu ag-indiko → unu sekcio. La sola subjekto de la sola ag-indiko estas *ŝi*. La *refleksivo SI* resendas al *ŝi*: la *vertikala viro staris antaŭ ŝi*.

• la *pastro sentis la pekulon / tuŝita de LIAJ admonoj* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). La *ne-refleksivo LIAJ* *ne* resendas al la subjekto de *tuŝi*, do resendas al la subjekto de *senti*: la *admonoj de la pastro*.

• la *pastro sentis la pekulon / tuŝita de SIAJ konscienciproĉoj*. La *refleksivo SIAJ* resendas al la subjekto de *tuŝi*: la *konscienciproĉoj de la pekulo*.

• la *juĝisto opiniis la atestanton / influata de SIAJ antaŭjuĝoj* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). La *refleksivo SIAJ* resendas al la subjekto de *esti influata*, t.e. *atestanto*.

III. Ago esprimata per ag-substantivo.

Tiu substantivo devas klare esprimi agon (ag-substantivo): *klarigado* ja esprimas agon; *klarigaĵo*, nepre *ne*; *klarigo*, jes aŭ *ne*, depende de la kunteksto.

• *Marta admiris / lian fidon al ŜI* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). La subjekto de *fidi* estas *LI*. La *ne-refleksivo ŜI* resendas al alia subjekto, ol *li*, do al *Marta*. *Marta admiris la fidon*, kiun *li* havas al *Marta*.

• *Marta admiris / lian fidon al SI* (Aktoj de la Akad., II, p.56). La subjekto de *fidi* estas *LI*. La *refleksivo SI* resendas al la subjekto *li*. *Marta admiris la fidon*, kiun *li* havas al *si mem*.

• *ŝi kompleze aŭdis / la flataĵon de ŜIAJ amindumantoj* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). Du ag-indikoj (*aŭdi, flati*) → du sekcioj (*flataĵo* ja montras agon). La subjekto de *flati* estas *amindumantoj*. La *ne-refleksivo ŜIAJ* resendas al alia subjekto, ol *amindumantoj*, do al *ŝi*.

• *ŝi kompleze aŭdis la flataĵojn de SIAJ amindumantoj*. Unu ag-indiko (*aŭdi*) → unu sekcio (*flataĵo* *ne* montras agon). La sola subjekto de la sola ag-indiko (*aŭdi*) estas *ŝi*. La *refleksivo SIAJ* resendas al *ŝi*.

• *ŝi ribelis / kontraŭ la interveno de edzo en ŜIAJ aferojn* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). Du ag-indikoj (*ribeli, interveni*) → du sekcioj. La subjekto de *interven* estas *edzo*. La *ne-*

refleksivo *ŜIAJN* resendas al alia subjekto, ol *edzo*, do al *ŝi*.

IV. Kaŝita subjekto de adjektiva predikativo.

La afero estas ĉi tie iom pli malsimpla. Ĉe adjektiva predikativo, oni sentas iun verbon esti subkomprenata. Oni konsideru ĝin por apliki la regulon de la refleksivo.

• *li trovas ŝin / atentema nek pri LIAJ demandoj, nek pri SIA laboro (li trovas, / [ke ŝi estas] atentema nek pri LIAJ demandoj, nek pri SIA laboro)*. La subjekto de esti atentema estas *ŝi*. La *ne*-refleksivo *LIAJ* resendas al *li*. La refleksivo *SIA* resendas al *ŝi*.

• *virino, ... kies sintenon li sentis / profunde flata al LI (li sentis, / [ke ĝi estas] profunde flata al LI)* (J.Valano, *Ĉu ni kunvenis vane?*, p.75). La subjekto de esti flata estas sinteno. La refleksivo *SI* resendus absurde al *sinteno*. La *ne*-refleksivo *LI* resendas normale al *li*.

Okazas ankaŭ, ke adjektivo provizita per komplemento ŝajnas epiteta, sed havas fakte predikativan valoron. Ekzemple, en la frazo «*kastelo fama* (ŝajna epiteto) *pro sia historio*», la adjektivo *fama* aspektas kiel simpla epiteto. Sed la senco estas «*kastelo, [kiu estas] fama* (predikativo) *pro sia historio*».

• *li evitu la trinkaĵojn / por LI tro acidajn* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). La adjektivo *acidajn* estas ŝajna epiteto de *trinkaĵojn*. Sed la senco estas: *li evitu la trinkaĵojn, / [kiuj estas] tro acidaj por LI*. La subjekto de esti *acida* estas *kiuj*, reprezentanto de *trinkaĵoj*. La refleksivo *SI* resendus absurde al *trinkaĵoj*. La *ne*-refleksivo *LI* resendas normale al *li*.

• *ĉiu konas homojn / nur por SI indulgajn (ĉiuj konas homojn, / [kiuj estas] indulgaj nur por SI)* (Aktoj de la Akademio, II, p.56). La subjekto de esti *indulgaj* estas *homoj*. La *ne*-refleksivo *LI* resendus absurde al *ĉiu*. La refleksivo *SI* resendas al *homoj*.

• *Hodler vizitis muzeon / faman pro LIAJ pentraĵoj (Hodler vizitis muzeon, / [kiu estas] fama pro LIAJ pentraĵoj)*. La subjekto de esti *fama* estas *kiu*, reprezentanto de *muzeo*. La *ne*-refleksivo *LIAJ* resendas al alia vorto, ol *muzeo*, do al *Hodler*. La muzeo estas fama pro la pentraĵoj de Ferdinand Hodler (svisa pentristo, patro de Hector Hodler, la fondinto de UEA en 1908), kiujn ĝi entenas.

• *Hodler vizitis muzeon / faman pro SIAJ pentraĵoj (Hodler vizitis muzeon, / [kiu estas] fama pro SIAJ pentraĵoj)*. La subjekto de esti *fama* estas *muzeo*. La refleksivo *SIAJ* resendas al *muzeo*. La muzeo estas fama pro la diversaj pentraĵoj, kiujn ĝi entenas.

V. Sendependaj sekcioj.

«*La natura sekvo de la regulo estas la diserigo de la propozicio en malgrandajn vortgrupojn: kaj oni estas rapide alkondukita al tia kutimo, ke en propozicio iom longa, eĉ se ne aperas ag-vorto, oni emas dividi tiun propozicion en plurajn fakojn, kaj uzi la refleksivon nur interne de ili*» (PAG, p.226).

Oni povas konsideri, ke en ĉiu sekcio, troviĝas unu kaŝita subjekto.

1. Kaŝita subjekto de substantiva predikativo.

• *ili elektis lin / ILIA gvidanto (ili elektis lin, / [ke li estu] ILIA gvidanto)* (PAG, p.227).

• *Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam / kiel leĝojn por LI (rigardadis ĉiam, / [ke ili estas] leĝoj por LI)* (Antaŭparolo de la Fundamento, A2/2, p.44).

• *la Eternulo bonvolis / fari vin / LIA popolo (...bonvolis fari vin, / [ke vi estu] LIA popolo)*. La frazo estas de Zamenhof mem (Biblio, I Sam 12²²).

Ni notu, ke la slavaj Biblioj uzas ĉi tie refleksivon: *вас народом Своим, вас народом Своим, was sobie ludem, vás sobě vzdělal v lid, vás sebe ľudom, вас учини својим народом, людете Си*.

2. Kaŝita subjekto de substantiva epiteto (kun predikativa senco).

• li **insultis** la pastron, / **LIA** instruiston (li **insultis** la pastron, / [kiu estis] **LIA** instruisto) (PAG, p.226).

• ŝi **montris**... amon por la malgrandaj reĝidinoj, / **ŜIAJ** nepinoj (ŝi **montris** amon por la malgrandaj reĝidinoj, / [kiuj estis] **ŜIAJ** nepinoj (Fund. Krestomatio, p.33).

• li **ekvidis** sian fraton Benjaminon, / la filon de **LIA** patrino (li **ekvidis** sian fraton, / [kiu estis] la filo de **LIA** patrino). Frazo de Zamenhof (Biblio, Gen 43²⁹). La subjekto de esti la filo estas kiu, reprezentanto de Benjaminon. La **ne**-refleksivo **LIA** resendas al alia subjekto, ol Benjaminon, do al li. Refleksivo **SIA** resendus absurde al Benjaminon (oni ne povas esti filo de si mem). Refleksivo en la slavaj Biblio: сына матери своей, сина матери своєї, сына матки свѣј, сына матку své, сына своеј матку, сина матери свое, единоутробния си брат.

• li **forlasis** la Eternulon, / Dion de **LIAJ** patroj (li **forlasis** la Eternulon, / [kiu estis] **Dio** de **LIAJ** patroj, Biblio, II Reĝ 21²²). Slavaj Biblio: Господа Бога отцов своих, Господа Бога батьків своіх, Pana Бога оjców своіх, Hospodina Boha otců svých, Hospodina Boha svojich otcov, Господа Бога отаца својих, Господа Бога на бащите си.

3. Kaŝita subjekto de substantiva suplemento.

• li **trovis** la leteron de la kamarado / de **LIA** filo (li **trovis** la leteron de la kamarado / [kiu estis kamarado] de **LIA** filo) (PAG, p.226).

• ĉiu filino... **devas edziniĝi** kun iu el la familio / de la tribo de **ŜIA** patro (ŝi **devas edziniĝi** kun iu el la familio / de la tribo [kiu estas tiu] de **ŜIA** patro, Biblio, Nom 36⁸). La slavaj Biblio uzas ĉi tie refleksivon: колена отца своего, племени батька свого, оjца сwego pójdzie, pokoleni otce svého, pokolenia својho otca, племена оца својера.

• en la tria jaro / de **LIA** reĝado, / li **faris** festenon por ĉiuj siaj princoj (li **faris** festenon en la jaro, / [kiu estis la tria] de **LIA** reĝado, Biblio, Est 1³). Same, la slavaj Biblio uzas refleksivon: своего царствования, свого царування, królowania сwego, kralováni svého, својho kral'ovanja, царовања својера, от царуването си.

La fakto, ke Zamenhof ne uzis la refleksivon en ĉiuj ĉi-antaŭaj ekzemploj (kaj en multaj aliaj), ne pro slava influo, sed **malgraŭ la slava influo**, pruvas nekontesteble, ke tio estis nepre intenco. Cetere, tiu uzo estas konforma al la fundamenta dismembriĝa tendenco de la lingvo, sendependigi unu de la alia la sinsekvajn fraz-unuojn.

La PAG konkludas: «Preferinde ne uzu la refleksivon, se ĝi estas apartigita disde la koncerna subjekto per pli ol tri fraz-elementoj (predikato – objekto – suplemento aŭ adjekto» (p.227).

VI. Absoluta funkciado de la refleksivo.

Ekzistas kelkaj tradiciaj dirmanieroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato kun ia subjekto de ago. Ekzemple: *siatempe, sindefendo, sindona, singarda, sinregado*.

- ĉio **sia** estas plej ĉarma (Zamenhof, Proverbaro).
- en ĉiu kranio estas **sia** opinio (Zamenhof, Proverbaro).
- **sia** estas kara pli ol la najbara (Zamenhof, Proverbaro).
- por ĉiu afero estas **sia** tempo kaj maniero (Zamenhof, PIV).
- metu ĉion sur **sian** lokon (PIV).
- oni ne povas ekkoni la realon en **si** (PIV).
- ŝi rimarkis la reĝon de la maro kun **sia** krono (Zamenhof, Fund. Krestomatio, p.51).

La Akademio aldonas, ke «*nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata*» (Aktoj de la Akademio, II, p.55).

Rekta objekto, uzo nekutima

Mi ne klarigos, ke rekta objekto en Esperanto devas esti akuzativa. Tion scias tre bone ĉiuj esperanto-uzantoj. Sed oni rajtas meti la demandon: rekta objekto **de kia vorto**? Ĝenerale de verbo. Sed ĉu ĉiam?

Se iu "*legas libron*", la substantivo *libron* estas rekta objekto de la verbo *legas*. Bone, simple. Cetere, la verbo *legi* estas transitiva: estas normale, logike, atende, ke ĝi estas sekvata de akuzativa objekto.

Sed el la radikalo *leg'*, oni ankaŭ povas pluformi la substantivojn *legado* kaj *leganto*. Kaj se *legi* havas transitivan signifon kaj estigas akuzativan rektan objekton, kial *legado* kaj *leganto* ne havus same transitivan signifon? Evidente, transitivan signifon ili vere havas. Do kial ili ne estigus akuzativan rektan objekton?

Kial oni ne rajtus diri *la legado libron* kaj *leganto libron*? Fakte, tiujn formojn oni ĝenerale ne uzas, precipe pro la fakto, ke ili estas tute fremdaj al la Eŭropaj lingvoj. Anstataŭ tiuj formoj, kiuj iom mirigas, oni diras kutime *la legado de libro* kaj *leganto de libro*. Rezulte, unu el la signifoj de la prepozicio *de*, kiu havas multe, multege da sencoj, estas la enkonduko de la rekta objekto de ago esprimita per substantivo (PIV, p.219a, senco 11). Estas fakto: la lingvo Esperanto estas tia: for de mi la intenco ŝanĝi ion ajn!

Tamen oni devas rekonii, ke ne ekzistas regulo, ĉu Fundamenta, ĉu nur Zamenhofa, kiu malpermesus diri *la legado libron* kaj *leganto libron*.

Tiuj formoj tute **ne** malobeas al la logiko. Oni ne uzas ilin pro la sola kaŭzo, ke tia konstruo estas kontraŭa al la spirito de la pliparto de la hindeŭropaj lingvoj. Sed evidente Esperanto ne estas devigata obei al la hindeŭropaj lingvaj kutimoj. Nacilingva kutimo neniel povas esti leĝo por Esperanto. Oni ja uzas en Esperanto la vorton *oni* kiel objekton (*onin*, *al oni*), kvankam neniu Eŭropa lingvo uzas tiun vorton objekte, ĉu temas pri la franca *on*, ĉu pri la germana *man*. Do, kial ne *la legado libron*, *la trinkado vinon*, *la vido pejzaĝon*? Kial ne *la leganto libron*, *la trinkanto vinon*, *la vidanto pejzaĝon*?

Ne kredu, ke mi intencas pledi favore al la alpreno de nekutima formo. Mi ne pledas, kaj ne intencas ŝoki iun ajn konservemulon. Mi intencas nur informi, ke Zamenhof uzis plurfoje tiajn formojn. Certe tio estas konsiderenda.

1. Akuzativo post ag-substantivo (nomo de agado).

Da tiaj dirmanieroj oni trovas plurajn ekzemplojn en la Zamenhofaj verkoj.

- Akceptu mian koran dankon por la **elekto min** kiel honoran membron (PIV, p.65b).
- La akuzativo estas enkondukita nur el neceso...; sed la **uzado ĝin** en okazo de senbezono pli multe malbeligas li lingvon... (La Esperantisto, 1890, p.27, Lingvaj Respondoj, p.68).
- Tre grava por la progresado de l' lingvo internacia estas diligenta **uzado ĝin** en korespondado (Aldono al la Dua Libro, p.17, Originala Verkaro, p.39).
- La Ligo... havas la celon zorgadi pri la **disvastigado kaj enkondukado** en la tuta mondo **unu neŭtralan lingvon** (La Esperantisto, n-ro 15, 1890, Originala Verkaro, p.65, PAG, p.201).
- kaj ĉi tiu devigata konstanta **alkalkulado sin** al ia speciala gento (Alvoko al la Diplomatoj, 1915, Originala Verkaro, p.357, PIV, p.65b, PAG, p.201).

En sia verko *Lingvo kaj Vivo* (p.155), G.Waringhien citas ankaŭ ĉi tiujn du Zamenhofajn ekzemplojn.

- *labori por la vastigado ĝin* [Esperanton] en la mondo.
- ...sin okupas... je *komparado ĝin* [Esperanton] kun Volapük (gazeto *La Esperantisto*).

2. Akuzativo kun substantiva participo (aganto-nomo).

Unu tia dirmaniero estas trovebla ĉe Zamenhof.

- *Mortu ĉiu intriganto*

Kaj malamon konservanto (*Fundamenta Krestomatio*, p.309).

Tiu Zamenhofa esprimo estis preskaŭ neniam imitata. Tamen oni trovas sub la plumo de Edgar von Wahl (en 1889):

- *aparta speco de homoj inter la atendantoj la movadon de l' akvo* (traduko de *Princino Mary*, de Lermontov, p.8).
- *la trinkantoj vinon vespere* (*Princino Mary*, p.11).

3. Origino de tiuj formoj.

a) Ag-substantivo + akuzativo.

Kiam iu Zamenhofa dirmaniero aspektas iom mirige al la okcidentaj Eŭropanoj, ĉi tiu estas imitado de esprimo rusa, aŭ pola, aŭ jida. Sed ŝajnas, ke tiu konstruo estas fremda al ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive de la slavaj kaj de la jida. Do ni povas nur fari hipotezojn.

• Unua hipotezo: li pruntis tion de la Biblia hebrea lingvo, kiu konas tiajn konstruojn. Jen du ekzemploj.

◊ וַיְהִי יצחק בן-ארבעים שנה בקקחו את-רבקה *wayəhī yicħaq ben-arba'im šana^h bæqəħtō et^h-rib^hqa^h* «kaj Isaak havis la aĝon de kvardek jaroj kiam li prenis Rebekan» (Gen 25²⁰), laŭvorte «kaj-estis Isaak filo-kvardek jaro **ĉe-lia-preno Rebekan**».

◊ כִּי-מִלְאָה הָאָרֶץ דְּעַת אֶת-יְהוָה *kī-mal'a^h ha'árec de'a^h et^h-ăd^honay* «ĉar la tero estos tiam plena de konado de la Eternulo» (Jsa 11⁹), laŭvorte «ĉar-plenas la-tero **konado la-Eternulon**».

• Dua hipotezo: li pruntis tion de Volapuko, en kiu substantivo tre povas esti rekta objekto de alia substantivo.

◊ *menilöf* «homamo, amo al la homoj» ← *men* «homo», *meni* «homon», *löf* «amo», laŭvorte «homon-amo». Kontraste: *menalöf* «homamo, amo venanta de homo».

◊ *tutisanan* «dentisto, dento-kuracisto» ← *tut* «dento», *tuti* «denton», *sanan* «kuracisto», laŭvorte «denton-kuracisto».

Sed tiu dua hipotezo estas forigenda pro la simpla fakto, ke tiaj konstruoj apartenas al la Reformita Volapuko (De Jong, 1930), kiun Zamenhof ne povis koni. En la origina Volapuko (Schleyer, 1879), kiun konis Zamenhof, nur la lig-vokalo a (genitiva finaĵo) estis uzata en ĉiuj kunmetaĵoj.

b) Aganto-nomo + akuzativo.

Tio estas proksimuma kalkeo de la rusa esprimo. Jen la originalaj tekstoj de la du ĉi-supraj ekzemploj eltiritaj el *Princino Mary*, *Княжна Мери*.

- *inter la atendantoj la movadon de l' akvo*: *между чающими движения* (genitive) *ВОДЫ*.
- *la trinkantoj vinon vespere*: *пьющие вино* (akuzative) *повечеру*. Tuj antaŭe, troviĝas simila esprimo: *пьющие утром воду* (akuzative) «trinkantoj akvon matene», sed von Wahl tradukis ĝin «la matenaj trinkantoj de akvo (genitive)».

Rekta objekto tra la mondo

En ĉiuj lingvoj, ekzistas ia maniero esprimi, ke vorto estas rekta objekto. Oni eĉ ne vidas, kiel lingvo povus malhavi tiun rimedon. Oni apenaŭ imagas lingvon, kiu ne kapablus distingi, per iu ajn rimedo, inter *la patrino kisas la infanon kaj la patrinon kisas la infano*.

Se ni esploros multajn lingvojn dise en la mondo, ni elkovros, ke tiu rimedo ekzistas sub **kvar diversaj formoj**.

I. Ekzisto de aparta kazo en la deklinacio.

En multaj antikvaj lingvoj de la hindeŭropa grupo, kaj en kelkaj modernaj, ekzistas speciala kazo en la deklinacio de la substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj. Tiun ĉi kazon oni nomas **akuzativo** (france *accusatif*, angle *accusative*, germane *Akkusativ*, ruse *винительный падеж*, pole *biernik*, ĉeĥe *akuzativ*, hungare *akkuzatívus*, sanskrite *द्वितीया dvitīyā*).

Sanskrita. Ekzistas deklinacio kun ok kazoj: nominativo, vokativo, akuzativo, genitivo, dativo, ablativo, instrumentalo, lokativo (ok estas la maksimuma nombro da kazoj trovebla en la hindeŭropaj lingvoj). La akuzativo estas ofte markita per la finaĵo *म् -m*.

• लिङ्ग *liṅga* « signo, simbolo, faluso » iĝas en akuzativo लिङ्गम् *liṅgam* « signon, faluson », kio finvenas al la Esperanta vorto *lingamo*.

Latina. Deklinacio kun ses kazoj: nominativo, vokativo, akuzativo, genitivo, dativo, ablativo. La singulara akuzativo estas markita per la finaĵo *-m* (krom ĉe la neŭtro).

• *āsinus āsinum frīcat* « la azeno la azenon frotras » (*āsinus* « azeno » → *āsinum* « azenon »).

Helena. Kvin kazoj: nominativo, vokativo, akuzativo, genitivo, dativo. La singulara akuzativo (maskula aŭ femina) estas markita per la finaĵo *-ν (n)*, kiel en Esperanto.

• *διαβαίνω τὴν ἀγοράν* « mi trairas la placon » (*ἡ ἀγορά* « la placo » → *τὴν ἀγοράν* « la placon »).

• *μέλπετε τοὺς θεοὺς* « prikantu la diojn » (*οἱ θεοί* « la dioj » → *τοὺς θεοὺς* « la diojn »).

Germana. Deklinacio kun kvar kazoj: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo. La singulara maskula akuzativo estas foje markita per la finaĵo *-n*, kiel en Esperanto.

• *ich habe einen Menschen gesehen* « mi vidis homon » (*ein Mensch* « homo » → *einen Menschen* « homon »).

Jida. Nur tri kazoj: nominativo, genitiv-dativo, akuzativo.

• *אִיךְ הָאָב גַּעְזַעְהָן אַ מַעַנְשַׁן* *ifi hob gezehñ a menšān* « mi vidis homon » (*אַ מַעַנְשַׁן* *a menš* « homo » → *אַ מַעַנְשַׁן* *a menšān* « homon »).

Islanda. Kvar kazoj, kiel en la germana. En multaj substantivoj (el la maskula deklinacio « forta »), la akuzativo konsistas en forpreto de la nominativa finaĵo: *heimur* « mondo » → *heim* « mondon ».

• *ég keypti hestinn* « mi aĉetis la ĉevalon » (*hesturinn* « la ĉevalo » → *hestinn* « la ĉevalon »).

Pola. Deklinacio kun sep kazoj: nominativo, vokativo, akuzativo, genitivo, dativo, instrumentalo, lokativo. Kompare kun la sanskrita, mankas la ablativo.

• mamy syna i córkę « ni havas filon kaj filinon » (syn « filo », córka « filino » → syna « filon », córkę « filinon »).

Ĉeĥa. Deklinacio kun sep kazoj, kiel en la pola lingvo.

• já čtu českou knihu « mi legas ĉeĥan libron » (česka kniha « ĉeĥa libro » → českou knihu « ĉeĥan libron »).

Soraba. Deklinacio kun sep kazoj, kiel en la pola lingvo.

• čitam nowu knihu « mi legas novan libron » (nowa kniha « nova libro » → nowu knihu « novan libron »).

Kroata-serba. Deklinacio kun sep kazoj, kiel en la pola lingvo.

• dajte mi jednu kafu, дајте ми једну кафу « donu al mi unu kafon » (jedna kafa « unu kafo » → jednu kafu « unu kafon »).

Rusa. Deklinacio kun ses kazoj: la sep kazoj de la pola deklinacio, el kiuj la vokativo malaperis, krom en kelkaj religiaj vortoj (Бог « Dio » → Бóже « ho Dio »).

• я читаю русскую книгу « mi legas rusan libron » (русская книга « rusa libro » → русскую книгу « rusan libron »).

Litova. Deklinacio kun sep kazoj, kiel en la pola lingvo.

• as skaitau lietuvišką knygą « mi legas litovan libron » (lietuviška knyga « litova libro » → lietuvišką knygą « litovan libron »).

Latva. Deklinacio kun sep kazoj, kiel en la pola lingvo.

• es lasu latviešu grāmatu « mi legas latvan libron » (latviešu grāmata « latva libro » → latviešu grāmatu « latvan libron »).

Albana. Ses kazoj: nominativo, vokativo, akuzativo, genitivo, dativo, ablativo.

• këpús lúlen e bárdhë « mi plukas la blankan floron » (lúle « floro », lúlja « la floro » → lúlen « la floron »).

Novgreka. Deklinacio kun kvar kazoj: kompare kun la klasika lingvo, la dativo malestas. Plej ofte, la akuzativa finaĵo ne estas uzata, krom ĉe la difina artikolo.

• ο φύλακας κλείνει την πόρτα « la gardisto fermas la pordon » (η πόρτα « la pordo » → την πόρτα « la pordon »).

Armena. Deklinacio kun kvar kazoj: nominativo-akuzativo, genitivo-dativo, ablativo, instrumentalo. La akuzativo estas simila al la nominativo, krom ĉe la propraj nomoj, ĉe kiuj la akuzativo estas signita per la postmetita difina artikolo -ը -e.

• Պօղոս Պետրոսը ծնեց պօտս պետրօս տշէտս « Паўло Петрон фрапис » (Պետրոս petros « Petro » → Պետրոսը petrose « Petron »).

Ekster la hindeŭropa grupo, akuzativon oni trovas ankaŭ en pluraj lingvoj.

Araba. La klasika araba lingvo konas tri kazojn: nominativo (finaĵo -u, -un), akuzativo (finaĵo -a, -an), genitivo (finaĵo -i, -in). La kazaj finaĵoj malaperis en la modernaj dialektoj.

• وَقَالَ اللَّهُ تَعَالَى نَعْمَلْ آدَمَ إِنْسَانًا waqāla allahu na'malu al-insāna « kaj Dio diris; ni kreu la homon » (آدَمَ al-insānu « la homo » → آدَمَ al-insāna « la homon »).

Kartvela. La deklinacio konsistas el sep kazoj: nominativo, vokativo, ergativo, dativo-akuzativo, genitivo, instrumentalo, adverbialo. La dativo-akuzativo havas finaĵon -ს -s.

• მე ცერისს ვცერ me cerils vcer « mi leteron skribas » (ცერისი cerili « leteron » → ცერისს cerils « leteron »).

Hungara. La hungara akuzativo estas konstante markita per la finaĵo -t.

• hozok bort és vizet « mi alportas vinon kaj akvon » (bor « vino », víz « akvo » →

bort « vinon », vizet « akvon »).

Finna. En multaj okazoj, akuzativo kaj genitivo estas similaj (finajo -n).

• luin suomalaisen kirjan « mi legis finnan libron » (kirja « libro » → kirjan « libron » aŭ « de libro »).

Estona. Lingvo parenca kun la finna.

• ma loen eesti raamatut « mi legas estonan libron » (eesti raamat « estona libro » → eesti raamatut « estonan libron »).

Turka. Akuzativa finajo -i, -ü, -ı, -u, depende de la naturo de la antaŭa vokalo.

• köyü biliyorum « mi konas la vilaĝon » (köy « vilaĝo » → köyü « vilaĝon »).

• hanımı tanıdık « ni rekonis la damon » (hanım « damo » → hanımı « damon »).

Volapuka. Kvar kazoj ekzistas, kiel en germana. La akuzativa finajo estas -i.

• kat fidon bödi « (la) kato manĝas birdon » (böd « birdo » → bödi « birdon »).

Vaska. Kaza sistemo tute aparta: *absolutivo* montras subjekton de netransitiva verbo kaj objekton de transitiva verbo; *ergativo* montras subjekton de transitiva verbo.

• nire laguna (absolutivo) alaia da « mia amiko (subj) ĝoja estas (netrans) ».

• zuk nire laguna (absolutivo) topatu duzu « ĉi mian amikon (obj) renkontis (trans) ».

• nire lagunak (ergativo) liburua du « mia amiko (subj) la libron havas (trans) ».

II. Ekzisto de rekt-objekta prepozicio.

Tio estas trovebla ĉefe en la semidaj lingvoj.

Hebrea (klasika kaj moderna). La objekton montras la prepozicio את *et^h*.

• : את הָאָרֶץ וְאֵת הַשָּׁמַיִם בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית *bərēšit^h barā ʔəlohim et^h hašša-máyim wəet^h ha'árec* « en la komenco, kreis Dio la ĉielon kaj la teron (Gen 1¹) ». La vortoj *הַשָּׁמַיִם* *haššamayim* « la ĉielo » kaj *הָאָרֶץ* *ha'árec* « la tero » alprenas la sencion « la ĉielon » kaj « la teron » pro tio, ke antaŭas ilin la prepozicio את *et^h*.

Ĝenerale, tiu prepozicio estas uzata nur tiam, kiam la rekta objekto estas difinita (komuna nomo kun artikolo, aŭ propra nomo).

Evidente tia rekta objekto povas esti lokita antaŭ la verbo.

• וְאֵת שַׁבָּתוֹתַי קִדְשׁוּ *wəet^h šabbat^hot^hay qaddéšū* « kaj miajn sabatojn sanktigu (Jfz 20²⁰) ».

Aramea. Objekto montrata de la prepozicio יַת *yat^h*.

• : יַת אֲרָעָא וְיַת שָׁמַיָּא בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית *bəqad^hmīn barā yəya yat^h šamayyā wayat^h ar'ā* « en la komenco, kreis Dio la ĉielon kaj la teron (Gen 1¹, Targumo de *Onqelos*) ». La vortoj *שָׁמַיָּא* *šamayyā* « la ĉielo » kaj *אֲרָעָא* *ar'ā* « la tero » alprenas la sencion « la ĉielon » kaj « la teron » pro tio, ke antaŭas ilin la prepozicio יַת *yat^h*.

Siriaka. Tute same, sub la formo יוֹת *yot^h*.

• : יוֹת אֱלֹהֵי בְרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית בְּרֵאשִׁית *bərīšit^h bərō alohō yot^h šamayyō wəyot^h ar'ō* « en la komenco, kreis Dio la ĉielon kaj la teron (Gen 1¹, teksto de la *Pešito*) ».

Kurioza afero estas, ke oni trovas similan sistemon en kelkaj **hindeŭropaj lingvoj** el la latinida grupo.

Hispana (kastilia). Rekta objekto povas esti enkondukata de la prepozicio a « al », sed nur se ĝi difinas personon aŭ personigitan aferon.

• espero a un amigo « mi atendas iun amikon ».

• amar a la patria « ami la patrujon ».

• **quien no ha visto a Sevilla no ha visto maravilla** « kiu ne vidis Sevilon, tiu ne vidis mirindajon ».

Kataluna. Same, sed nur kiam la rekta objekto estas pronomo.

• **a mi em mira i no a tu** « min li rigardas kaj ne cin ».

• **estima a tothom** « li estimas ĉiujn ».

Okcitana. Prepozicio a « al » ofte uzata redundance antaŭ nomo de persono.

• **a aquel òme, lo vesi e l'ausissi** « tiun homon mi vidas kaj aŭdas ».

Gaskona. Prepozicio a « al » uzata redundance kun objekta pronomo.

• **que l'èi vist au Peiròt uei** « mi vidis Petron hodiaŭ (*mi lin vidis al la Petro*) ».

Rumana. Oni foje uzas la prepozicion **pe**, kiu signifas ankaŭ « sur, en, tra, ĝis ».

• **Avraam a născut pe Isaac** « Abrahamo generis Isaakon ».

III. Ekzisto de rekt-objekta postpozicio.

Japana. La objekto estas montrata per la postpozicio **を o**, dum la subjekto estas montrata per la postpozicioj **が ga** aŭ **は wa**.

• **かれはくるまをかう** *karewa kuruma o kau* « li veturilon aĉetas ». La vorto **くるま kuruma** « veturilo » alprenas la sencon « veturilon » pro la ĉeesto de la postpozicio **を o** (**くるま kuruma** « veturilo » → **くるまを kurumao** « veturilon »).

Korea. Sama sistemo kun la postpozicio **을 ŭl** (post konsonanto) aŭ **를 rŭl** (post vokalo).

• **사과를 먹어요** *sagwa rŭl mŏgŏyo* « pomon mi manĝas ». La vorto **사과 sagwa** « pomo » alprenas la sencon « pomon » pro la ĉeesto de la postpozicio **를 rŭl**.

Hinda. Oni trovas ion similan: la postpozicio **को ko** « al » povas enkonduki ankaŭ rektan objekton, se ĉi tiu estas determinita kaj difinas personon.

• **लड़का लड़की को देखता है** *larḱā larḱī ko dekhtā hai* « la knabo la knabinon vidas » (**लड़की larḱī** « knabino » → **लड़की को larḱī ko** « knabinon »).

Urdua. Sama sistemo, kun la postpozicio **کو kō** « al ».

• **اس کو نہیں دیکھا ؟** *us kō nahīn dēkhā* « ĉu lin vi ne vidis? » (**اس us** « li » → **اس کو us kō** « lin »).

Persa. Sama sistemo, kun la postpozicio **را rā**, sed nur kiam la nomo estas difinita.

• **خدا آسمانها و زمین را آفرید** *fiḱā āsmānhā o-zamīn rā āfrīd* « Dio kreis la ĉielon kaj la teron » (**زمین zamīn** « tero » → **زمین را zamīn rā** « teron »).

Taĝika. Same, kun la postpozicio **-ро -ro**, kiam la nomo estas difinita.

• **ин суратро кӣ кашида аст ?** « tiun bildon kiu pentris? » (**сурат** « bildo » → **суратро** « bildon »).

IV. Ekzisto de deviga vortordo.

Tio ekzistas en la pliparto de la okcident-Eŭropaj lingvoj: latinidaj (franca, itala, hispana, portugala), kaj ĝermanidaj (angla, nederlanda, dana, norvega, sveda; parte, la germana). Al tiu listo oni devas aldoni du lingvojn slavajn, la bulgaran kaj la makedonan, kiuj ne havas deklinaciojn.

La norma vortordo (kun tamen kelkaj apartaj kazoj) estas: *subjekto antaŭ la verbo, objekto post la verbo*:

• **la mère embrasse son enfant, la madre bacia suo bambino, la madre besa a su niño, mama sārutā copilul ei, the mother kisses her child** « la patrino

kisas sian infanon ».

• *l'enfant embrasse sa mère, il bambino bacia sua madre, el niño besa a su madre, copilul sărută mama sa, the child kisses his mother* « la infano kisas sian patrinon ».

Tamen la **franca lingvo** konas deklinacion ĉe la pronomoj personaj kaj relativaj, kvankam la vortoj *deklino*, *nominativo*, ktp, ne estas uzataj en la francaj lernejoj.

Nominativo (subjekto): je « mi », tu « ci », il « li », elle « ŝi », ils « ili », elles « iŝi », qui « kiu ».

Akcentita formo: moi « mi », toi « ci », lui « li », elle « ŝi », eux « ili », elles « iŝi », soi « si ».

Genitivo: dont « kies, de kiu ».

Dativo: me « al mi », te « al ci », lui « al li, al ŝi », leur « al ili, al iŝi », se « al si ».

Akuzativo: me « min », te « cin », le « lin », la « ŝin », les « ilin, iŝin », se « sin », que « kiun ».

La lingvoj **itala**, **hispana** kaj **portugala** funkcias pli-malpli sammaniere.

Ĉina. La vortoj estas nevariemaj: nur ilia loko montras ilian funkcion. La subjekto staras antaŭ la verbo, la objekto staras post la verbo. Same en la **vjetnama**.

• 我接吻她 wǒ jiēwěn tā « mi kisas **ŝin** ». • 她接吻我 tā jiēwěn wǒ « ŝi kisas **min** ».

V. Esperanto.

Inter la diversaj planlingvoj, multaj (Ido, Occidental, Novial, Interlingua, ktp) elektis la solvon "deviga vortordo". Ido tamen uzas akuzativon en esceptaj kazoj, kiam tio estas necesa por forigi ambiguecon.

Sed Esperanto (kaj ankaŭ Volapuko) elektis la solvon "**akuzativo**". Tio donas grandan flekseblecon al la lingvo, ĉar tiam la vortordo, libera je tiu funkcio, havas alian rolon, esence nuancon kaj stilan. Efektive, ĝi ebligas nuancojn, kiujn esprimas malfacile la lingvoj, ĉe kiuj la funkcioj subjekto/objekto estas montrataj per la vortordo.

Sed en Esperanto, ekzistas kelkaj okazoj, ĉe kiuj la uzo de akuzativo ne estas ebla.

• Ĉe propraj nomoj neasimilitaj: « **Prodi** (dekstre) *salutas Juncker* (Monato, junio 2004, p.8) ». Neniu el la du propraj nomoj estas akuzativigebla. Do, kiu salutas kiun ?

• Ĉe sigloj: « **UEA kritikis SAT** ». Same, pro manko de akuzativo, oni ne komprenas kiu kritikis kiun.

• Ĉe kvantaj adverboj: « **kelke da ĉeestantoj deziris al la novaj geedzoj multe da infanoj** ». Nur la senco montras, kio estas la subjekto kaj kio estas la objekto.

• Ĉe citaĵoj: « **Pro subita malsano de la ĉefa aktoro, "Sen eliro" anstataŭos "Songe sub pomarbo"** ». Kiu teatraĵo anstataŭos kiun ?

• Ĉe numeraloj: « **unu el la oficistoj kondukis du el la alvenintoj** ».

Tiuj okazaĵoj ne estas tre oftaj, sed tamen ekzistas. Kaj ili povas estigi etan ĝenon.

Unue, ni povas rimarki, ke tiuj frazoj pekas laŭ la stilo. Ilia aŭtoro povis (kaj devus) forigi ĉian dubon. Por tio, ekzistas pluraj rimedoj:

• Ŝanĝo de aktivo en pasivon: **SAT estis kritikata de UEA. Du el la alvenintoj estis kondukataj de unu el la oficistoj.**

• Uzo de anoncvorto: **Prodi (dekstre) salutas sian posteulon Juncker. La teatraĵon "Sen eliro" anstataŭos la antaŭvidita "Songe sub pomarbo".**

• Anstataŭigo de adverbo per adjektivo: **kelkaj ĉeestantoj deziris al la novaj geedzoj multajn infanojn.**

Ni supozu tamen, ke ni legus iun frazon similan al la ĉi-supraj ekzemploj. Vole-nevole, ni devas rekonii, ke ĉiu ajn esperantofono forte emus kompreni la antaŭverban vorton kiel la

Seksoj estas tri, kvar, kvin...

Eble la legantoj miras, ke mi parolas pri **tri, kvar, kvin seksoj**, kaj opinias, ke mi frenezumas aŭ kadukiĝas. Espereble, tute ne!

Cetere, mi tute ne parolas pri gramatika genro, kiu ne ekzistas en Esperanto.

Jen do la **kvin seksoj**:

1. **Sekso maskla** (♂): ĝi estas tiu de konata viro aŭ maskla besto.
2. **Sekso femala** (♀): ĝi estas tiu de konata virino aŭ femala besto.
3. **Sekso ajna** (♂ aŭ ♀): ĝi estas tiu de nekonata vivulo (homo aŭ besto, singulare).
4. **Sekso komuna** (♂ kaj ♀): ĝi estas tiu de grupo da vivuloj (homoj aŭ bestoj, plurale).
5. **Sekso nula** (): ĝi estas tiu de la objektoj (la malvivuloj).

Mi ne volas uzi la vorton *neŭtra*. Laŭ la PIV, *neŭtra* havas du lingvajn signifojn: « 1. *nek vir-seksa, nek in-seksa* » kaj « 2. *prezentanta neniun difinitan sekson* ». La unua difino rilatas al la *sekso nula* (la 5a). La dua rilatas al la *sekso ajna* kaj al la *sekso komuna* (la 3a kaj 4a).

Oni nepre ne konfuzu ĉi tiujn tri konceptojn (ajna, komuna, nula), kiujn oni ofte kunigas malprecize sub la kvalifiko *neŭtra*:

- La **sekso ajna** estas tiu de individuaj homaj aŭ bestaj estuloj, kiujn oni ne konas persone aŭ pri kiuj oni ne sentas la bezonon precizigi ĝin. Tamen **sekson ili havas**.
- La **sekso komuna** estas tiu de grupo de homaj aŭ bestaj estuloj, en kiu **ambaŭ seksoj ekzistas** (statistike: 50% da ♂, 50% da ♀). Evidente, **sekson ili havas**.
- La **sekso nula** estas tiu de la objektoj kaj abstraktaĵoj. Evidente, **sekson ili NE havas**.

Kaj tio ĉi estas vera en ĉiu ajn lingvo. Tio ĉi estas la naturo mem. Sed ne ĉiu lingvo kapablas esprimi tion klare.

I. Fundamentaj ekzemploj.

Ekzemploj de la kvin seksoj estas troveblaj en la Fundamento:

Sekso maskla: *Aleksandro ne volas lerni*; *la filo de la reĝo*; *ŝia frato estas mia bofrato*; *mia onklo ne mortis per natura morto*; *la pastro, kiu mortis...*; *miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn*; *Lia Episkopa Moŝto*.

Sekso femala: *unu vidvino havis du filinojn*; *tio ĉi estis feino*; *mi vokas la knabinon*; *mia fratino estas tre bela knabino*; *lia edzino estas tre laborema*.

Sekso ajna: *leono estas forta*; *infano ne estas matura homo*; *la riĉulo havas multe da mono*; *la falinta homo ne povis sin levi*; *ĉevalido estas nematura ĉevalo*.

Sekso komuna: *la birdoj flugas*; *tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj*; *li promenas kun tri hundoj*; *Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj*; *ili estas rusoj*; *miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn*; *gesinjoroj N.*; *la personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo...*

Sekso nula: *la suno brilas*; *papero estas blanka*; *ŝtalo estas fleksebla*; *sur la tero kuŝas ŝtono*; *mi havas cent pomojn*; *la glacio kaj la neĝo fluidiĝas*.

Fakte, la **sekso ajna** kaj la **sekso komuna** povas esti kunigitaj en unu grupo: la **sekso ajna-komuna**. En «*la birdoj flugas*», oni parolas pri ĉiuj birdoj, el kiuj 50% estas masklaj kaj 50% estas femalaj (sekso komuna). En «*unu birdo flugas*», oni parolas pri iu birdo,

kiu estas ĉu maskla, ĉu femalaj (sekso ajna). La diferenco estas do nura afero de nombro (singularo por la sekso *ajna*, pluralo por la sekso *komuna*).

II. La kvar vivaj seksoj.

Tiuj kvar seksoj estas klare distingitaj en la lingvo *Ido*. Jen ekzemploj kun la vortoj signifantaj laŭorde « ① *kato*, ② *homo*, ③ *infano* (singularo, plurale, maskle, female) ».

- ① *kato* (sekso ajna), *kati* (sekso komuna), *katulo* (sekso maskla), *katino* (sekso femala).
 - ② *homo* « homo » (sekso ajna), *homi* « homoj, geviroj », *homulo* « viro », *homino* « virino ».
 - ③ *infanto* (sekso ajna), *infanti* (sekso komuna), *infantulo* (maskla), *infantino* (femala).
- Oni rimarku, ke la *Ido* sufikso *-ulo* tute ne samsignifas, kiel la Esperanta *-ulo*.

Tiuj kvar seksoj estas klare distingitaj ankaŭ en *Volapuko*. Jen samsignifaj ekzemploj.

- ① *kat* (sekso ajna), *kats* (sekso komuna), *hikat* (sekso maskla), *jikat* (elp. *ŝikat*, sekso femala).
- ② *men* « homo » (sekso ajna), *mens* « homoj, geviroj », *himen* « viro », *jimen* « virino ».
- ③ *cil* (sekso ajna), *cils* (elp. *ĉils*, sekso komuna), *hicil* (sekso maskla), *jicil* (sekso femala).

En Esperanto, la afero estas alia. Esperanto distingas tute klare :

- *homo* (sekso ajna), *homoj* (sekso komuna), *viro* (sekso maskla), *virino* (sekso femala).

Sed tiu distingo estas ebla nur helpe de du apartaj radikoj (*hom* kaj *vir*). Evidente, tio estas unika kazo. Ne eblas, ke ĉia viva specio estus difinita per du apartaj radikoj.

« Ĉe la komunaj personnomoj la vira sekso estas nur negative montrata... la virseksoj montras signo nula » (PAG, p.60). Katastrofe! Ĉar evidente, ankaŭ la seksoj ajna kaj komuna estas negative montrataj, per signo nula. Konsekvence, la negativa montrado estas trisenca !

- mi kredas, ke iu *akademiano* skribis artikolon pri tiu problemo : sekso ajna.
- la *akademianoj* estas kvardek kvin : sekso komuna.
- en Berlino (1999), mi ĉeestis prelegon de Israela *akademiano* : sekso maskla.
- samjare, mi ĉeestis prelegon de Pollanda *akademiano* : sekso femala (unusignifa!).

Ĝenerale, Esperanto estas preciza lingvo, sed ĉi-kaze ne, tute ne. La sama vorto *akademiano* estas jen ajna, jen komuna, jen maskla (trisignifa!).

Ni komparu kun la jena frazo :

- ekzino de *kuracisto* estas *kuracistedzino* (F §36).

Ĉi tie, la vorto *kuracisto* estas komprenebla en la senco « maskla *kuracisto* » nur ĉar ĝin akompanas la vorto *kuracistedzino*. Sen tiu alia vorto, ĉu ĝi estus maskla ? ĉu ajna ?

Sama problemo pri bestoj.

- *bovo muĝas* (PIV) : la sekso estas ajna (la sekso ne influas la blekon).
- *jen staras la bovoj antaŭ la monto* (PIV) : la sekso estas komuna (50% ♂ + 50% ♀).
- ① *mi havas bovon kaj bovinon* (F §33) : unu masklan bovon kaj unu femalan bovon.
- ② *sur la korto staras koko kun tri kokinoj* (F §33) : unu masklo kaj tri femaloj.
- ③ *al feliĉulo eĉ koko donas ovojn* (Proverbaro) : maskla koko.

En la frazoj ① kaj ②, la vortoj *bovon* kaj *koko* estas kompreneblaj en la senco « maskla besto » nur pro tio, ke ilin akompanas la vortoj *bovinon* kaj *kokinoj*. En la frazo ③, *koko* estas komprenebla kiel « maskla koko » nur pro la senco de tiu proverbo.

Sed ekster ĉia kunteksto, vorto nur negative difinita rilate la sekson, estas katastrofe malpreciza. Tiu manko estis sentata ekde la komenco de Esperanto. La unua provo ripari tiun mankon estis la stranga uzado, far Zamenhof mem, de *vir* kiel sufikso : *bovoviro*,

Ĉevalviro (en *La Revizoro*, p.12, oni trovas ankaŭ **hundoviro**, kiel tradukon de la rusa *кобэль*).

Ŝajne, Zamenhof ne estis ĝenata de tiu strangeco kaj malprecizeco: «*la nomo de bestoj signifas ankaŭ la viran sekson; la vorton "viro" (ekzemple "bovoviro") mi aldonas nur en okazo de ekstrema neceseco*» (OV, p.523, skribita en Marto 1906).

Problemo estas, ke en kunmetita vorto, la ĉefelemento staras ĉe la fino. Konsekvence, **bovoviro** kaj **ĉevalviro** elvokas pli volonte **virojn**, kiuj havus ian misteran rilaton kun bovo aŭ ĉevalo (bovoviro povus esti *Minotaŭro*, kaj ĉevalviro *Centaŭro*).

Poste, oni provis plibonigi tiun malbonan solvon per solvo ankaŭ malbona: oni kutimis uzi **vir** kiel prefikso: **virbovo**, **virĉevalo**. Sed ĉu sufikse, ĉu prefikse, tiu uzo de **vir** tute ne kongruas kun la du bazaj difinoj de la substantivo **viro**: «*homo, apartenanta al la maskla sekso; tia homo en la matura aĝo kontraste kun la infano*». Tute male, ĉu prefikse, ĉu sufikse, **vir** estas nek *homo* nek *maturaĝa*.

Ho! la fanfaronado pri la unusenceco de la Esperantaj radikoj!...

Resume: la **femala sekso** estas klare difinita per klara **sufikso** (feliĉaj virinoj! tre malprave ili plendus!); la **maskla sekso** estas malklare difinita per malklara **prefikso**, kaj plej ofte tute ne difinita kaj lasita en la kastrita nenijaĵo de eŭnuka sekso-manko (kompatindaj viroj!).

Diversaj provoj estis faritaj por finfine krei necesan masklan ekvivalenton de *in*, kiu estus uzebla: **iĉ**, **oc**, **oĉ**, **un** (*boviĉoj-bovinoj*, *bovunoj-bovinoj*, ktp).

Ĝis nun, ve, neniuj enradikiĝis...

Por kelkaj privilegiaj specioj, aparta nomo ekzistas: **boko** (*virkapro*, *vir cervo*), **stalono** (*virĉevalo*), **taŭro** (*virbovo*).

III. La singularaj seksaj pronomoj.

Ĉi tie aperas nova problemoj, almenaŭ en singularo. Ĝi ne plu koncernas substantivojn, sed ja pronomojn. Efektive, ni bezonas kvalifiki **kvar** seksojn: maskla, femala, ajna, nula (la sekso komuna ne povas ekzisti en singularo). Sed ni disponas pri nur **tri** pronomoj (*li*, *ŝi*, *ĝi*).

1. **Sekso maskla**. Neniu problemoj: la pronomo estas evidente *li*.

• *li* estas knabo; mi vokas la knabon kaj *li* venas (F §16).

2. **Sekso femala**. Neniu problemoj: la pronomo estas evidente *ŝi*.

• *ŝi* estas knabino; mi vokas la knabinon kaj *ŝi* venas (F §16).

3. **Sekso nula**. Neniu problemoj: la pronomo estas evidente *ĝi*.

• la tranĉilo tranĉas bone, ĉar *ĝi* estas akra (F §16).

• mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi *ĝin* jam ne trovos (F §20).

• trovinte pomon, mi *ĝin* manĝis (F §22).

4. **Sekso ajna**. Ĉi tie, problemego ekestas. Ĉu uzi *ĝi*? Ne estus tre logike, ke ni uzus, por vivanta estulo, kiu certe havas sekson, la pronomon difinantan senseksaĵojn. Ĉu uzi *li*? Ne estus tre logike, ke ni uzus, por estulo, kiu povas esti maskla aŭ femala, la pronomon signifantan masklecon. Kion fari?

Zamenhofa uzado.

a) **Besto aŭ infano (sekso ajna)**. La pronomo estas ordinaro *ĝi*.

«*Kiam oni parolas pri bestoj, mi konsilas ĉiam uzi nur la senseksan pronomon "ĝi", — ne sole kiam (en la plimulto da okazoj) la sekso de la priparolata besto estas por ni indiferenta, sed eĉ en tiaj okazoj, kiam ni parolas precize pri la sekso de la besto. En la tre*

maloftaj okazoj, kiam la precizeco povas nepre postuli, ke ni montru la sekson de la besto per la uzata pronomo, la teorio ne malpermesas al ni uzi la vorton "li" aŭ "ŝi"; sed en ĉiuj ordinaraj okazoj mi konsilus uzi la pronomojn "li" kaj "ŝi" nur por homoj» (Lingvaj Respondoj, p.80).

«Parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj, kies naturan sekson ni ne scias, ni vole-nevole (sen ia ofenda intenco) uzas pronomon mezan inter "li" kaj "ŝi" — la vorton "ĝi". Tiel same ni parolas ankaŭ pri "persono". Cetere, parolante pri infano, pri kiu ni scias, ke ĝi ne estas knabino (aŭ almenaŭ ne scias, ke ĝi estas knabino), ni povas uzi la vorton "li"» (Lingvaj Respondoj, p.79).

Jen Fundamentaj ekzemploj, en kiuj **ĝi** difinas infanon aŭ beston.

- la **infano** ploras, ĉar **ĝi** volas manĝi (F §16).
- mi montris al la **infano**, kie kuŝas **ĝia** pupo (F §18).
- la **birdo** flugas en la ĉambro (**ĝi** estas en la ĉambro) (F §26).

Resume: por infano aŭ besto, oni uzas **ĝi**, sed oni rajtas uzi ankaŭ **li** aŭ **ŝi**.

- melku bovon senfine, **li** lakton ne donos (Zamenhof, Proverbaro).

b) Homo, persono, iu, ĉiu, ktp (sekso ajna). La pronomo estas ordinaro **li**.

«La pronomon "li" ni povas uzi por homo en ĉiu okazo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta» (Lingvaj Respondoj, p.80). Tio signifas, ke **li** taŭgas por la sekso ajna.

Ekzemploj, en kiuj **li** aŭ **lia** rilatas al homo (sekso ajna).

- Kaj Dio kreis la **homon**... Li kreis **lin**... (Zamenhofa Biblio, Gen 1²⁷).
- la ekstero de tiu ĉi **homo** estas pli bona, ol **lia** interno (F §31). Tamen, eble viro, eble virino.
- la riĉeco de tiu ĉi **homo** estas granda, sed **lia** malsaĝeco estas... (F §35).

Ekzemploj, en kiuj **li** rilatas al iu, ĉiu (sekso ajna).

- ĉar **ĉiu** amas ordinaro personon, kiu estas simila al **li**... (F §13).
- se **iu** lernas mian lingvon..., **li** eĉ ne supozos (Unua Libro, Fundamenta Krestomatio, p.234).
- **ĉiu** penis sin savi, kiel **li** povis (Fundamenta Krestomatio, p.40).
- **ĉiu** manĝas, kiel **li** aranĝas; **ĉiu** provas, kion **li** povas (Proverbaro).
- **ĉiu** sin gvidas, kiel **li** vidas; **ĉiu** sin direktas, kiel la kap' al **li** diktas (Proverbaro).

Eta provo de kritiko.

Mia kato ja havas penison, kvankam testikojn ne plu. Spite tiun mankon, li ofendiĝas kaj koleras, kiam mi parolas pri **li**, uzante la senseksan pronomon **ĝi**!

Plie, supoze, ke ni akceptus obeeme la Zamenhofan sintenon, rakontante la vivon de iu viro. «**Ĝi** (ĉar bebo) mamsuĉas sian patrinon. Poste, **ĝi** (ĉar infano) ludas kun samaĝaj kamaradoj, **ĝi** vizitas elementan lernejon... Jaroj pasas. **Li** (ĉar maturaĝa viro) fianĉiĝas...».

Je kioma aĝo tiu estulo devas transiri de **ĝi** al **li**? Vane mi serĉas regulon...

IV. Seksaj objektoj.

Tute escepte, oni trovas kelkajn nomojn de objektoj provizitajn per la sufikso **-ino**.

- **buŝino** (K.Piĉ), vulvo.
- **jambino** (PIV, p.495b), jamba ina verso, kun kroma senakcenta silabo.
- **kvinjambino**, **sesjambino** (PAG, p.455), kvin-jamba aŭ ses-jamba ina verso.
- **objektino** (J.Valano, Ĉu ni kunvenis vane?, p.160), virino uzata kiel nura objekto.
- **ŝraŭbino** (PIV, p.1120a), truo akceptonta ŝraŭbon.

La sono [ĥ]

Ne ĉiuj sonoj en ĉiuj lingvoj estas facile prononceblaj por ĉiuj homoj. Ekzemple, la francoj — krom esceptoj — prononcus tre malfacile la ĉefan frazon: **strĉ prst skrz krk** « enŝovu fingron tra gorĝo », aŭ la polan tekston: **w Szczebreszynie chrząszcz brzmi w trzcinie** « en Ŝĉebjeŝino skarabo zumas en kanoj ».

En Esperanto, ekzistas la sono [ĥ]. Ĝi apartenas al la Fundamenta alfabeto. Tion oni ne povas nei. La lingvistoj nomas ĝin « *senvoĉa frikativa velaro* » kaj skribas ĝin [x] en I.F.A. (*Internacia Fonetika Alfabeto*). Sed ankaŭ tiun fakton oni ne povas nei, ke ĝi estas malfacile prononcebla por multaj homoj, ĉar multaj lingvoj ne havas ĝin en sia fonetika provizo.

En Esperanto, tiu sono ne estas abunde renkontata: *ĉefo, eĥo, ĥaoso, ĥemio, ĥimero, ĥolero, ĥoro, meĥaniko, meĥanismo, monaĥo, paroĥo* estas la plej konataj vortoj entenantaj ĝin. La aliaj estas, jen vortoj ne komune uzataj (*azuleĥo, ĥamsino, ĥiato, ĥedero, ĥoto, iĥtiokolo*), jen propraj nomoj (*Aĥilo, Aŝĥabado, Baĥaraĥ, Ĥanoĥo, Ĥarkovo, Taĥo*).

Etimologie, tiu ĉi sono respondas al: greka χ, rusa x, hispana j, germana ch, hebrea פ אŭ כ, araba-persa خ, armena խ, kartvela ხ, ĉina h. Ekzemploj:

- ĥaoso ← greka χάος.
- ĥedero ← hebrea חדר חדר.
- kolĥozo ← rusa колхоз.
- ĥamsino ← araba خمسين ĥamsīn.

Jen kelkaj ekzemploj el la Fundamento: arĥaismo (← greka ἀρχαϊσμός, rusa αρχαϊзм), arĥitekturo (← greka ἀρχιτεκτονία, rusa архитектура), ĥemio (← greka χημεία, rusa химия), iĥtiokolo (← greka ἰχθύς), meĥaniko (← greka μηχανική, rusa механика), Miĥaelo (← hebrea מִיכָאֵל miĥa'el), monarĥo (← greka μόναρχος, rusa монарх).

Sed Zamenhof, konscia pri la malfacileco de tiu sono por multaj homoj, ne estis egoisto: tial, li anstataŭigis ĝin per la pli komuna litero k en multaj vortoj, en kiuj la k respondas tamen al la greka χ, rusa x: *amfibrako, arkifripono, krizalido, krizolito, kromo, patriarko, politekniko, psika, psikiatro, skismo, tekniko, teknologio, trokeo*. Pluraj el ili eĉ apartenas al la Fundamento: *branko, cikorio, Kristo, kristano, kroniko, likeno*.

Ekzistas aparta kazo, ĉe kiu la litero ĥ estas speciale ne-prononcebla por multaj homoj, interalie, la pliparto de la francoj: kiam ĥ apudas r. Tre malmultaj estas la francoj kapablaj prononci ĝuste la hispanan personnomon *Jorge* [ĥorĥe, horĥe] « Georgo », aŭ la nomon de la Sovetia ŝtatestro *Ĥruŝĉevo* (Хрущёв), aŭ la nomon de sankta Johano Krizostomo, se oni skribus ĝin (laŭ la etimologio) *Ĥrizostomo*.

La sama malfacilo ekzistas ĉe la Esperantaj vortoj *anarĥio, hierarĥio, monarĥio, monarĥio, oligarĥio, oligarĥio*.

Tamen, *Scienca Revuo* (jaro 2003, kajero 1, n-ro 192), pledas por la alprenado de ĥ ĉiufoje, kiam tiu litero respondas al la etimologio (greka χ, rusa x, ktp). La aŭtoro plendas pri la « *trudado de K anstataŭ la laŭfundamenta konservado de Ĥ* » (p.4). Bedaŭrinde, li ne precizigas, sur kiu paĝo de la Fundamento li legis tiun regulon, kiu evidente ne ekzistas. Li postulas la anstataŭigon de *branko, cikorio, ekimozo, eŭkaristio, kamomilo, kloro, krizantemo, kromo, kromato, kromosomo, kronika, kronologio, kronometro, likeno, orkestro, skemo, skismo, tekniko*, kaj dekoj da aliaj, universale uzataj en Esperantio, per *branĥo, ciĥorio, ekĥimozo, eŭĥaristio, ĥamomilo, ĥloro, ĥrizantemo, ĥromo, ĥromato, ĥromosomo, ĥronika, ĥronologio, ĥronometro, liĥeno, orĥestro, ŝĥemo, ŝĥismo, tehniko*, ktp.

Evidente, ĉar la aŭtoro estas ĉeĥo, la prononco de **ĥr** aŭ de **rĥ** estas por li tre facila. Sed verŝajne li plendus, se mi intencus trudi al li la prononcon de la francaj vokaloj *u, eu, an, in, on, un* [y, ø, œ, ɛ, ɛ̃, œ̃]..., kiuj por mi mem estas tre facile prononceblaj.

Inter *anarkio* kaj *anarĥio*, inter *kromo* kaj *ĥromo*, inter *orkestro* kaj *orĥestro*, la ĉefa diferenco estas, ke rusoj, poloj aŭ ĉeĥoj kapablas prononci **ambaŭ formojn**, dum francoj, italoj, ktp, povas prononci **nur la unuan**. Ĉi tiu estas do la pli internacia.

Cetere, jam en 1921, la Lingva Komitato aprobis la laŭvolan anstataŭigon de **ĥ** per **k** en la okazoj, kiam ĝi senpere sekvas la literon **r**. La nuna tendanco estas la vastigo de tiu permeso al aliaj vortoj: *ĥolero* → *kolerao*, *ĥoro* → *koruso*, *Kolĥido* → *Kolĉido*, ktp.

Kaj en 1967, la Akademio publikigis, ke «*la du formoj kemio kaj mekaniko estas tolerataj, kiel paralelaj formoj, apud la Fundamentaj ĥemio kaj meĥaniko. Kompense ambaŭ formoj mekanismo kaj meĥanismo estas rigardataj kiel egale bonaj*» (20an de Junio 1967, *Aktoj de la Akademio*, 1, p.73).

Ekzistas tamen aparta kazo, ĉe kiu la konservado de la origina sono estas pli-malpli oportuna: la propraj nomoj. **Aĥilo** (Αχιλλεύς) ne nomiĝis *Ακιλλεύς. La reĝo de Izraelo **Aĥabo** (Αχάβ, אַחָב) ne nomiĝis *Akabo, kiel la sud-Israela golfo Akabo (אֲכָב, عَقَبَة). **Aĥarkovo** estas Ukraina urbo (Харків, Хάρκίβ); sed, prononcata *Karkovo, ĝi estus nerezonebla por rusoj kaj ukrainanoj. La ĉefurbo de Sudano estas nomata arablingve خَرْطوم, t.e. **Aĥartumo**; kial do la PIV2 kopiis la eraron de la PIV1, nomante ĝin *Kartumo*?



Tiu ĉi sono **ĥ** ne ekzistas en la latinidaj lingvoj. Strange, la hispana, pli ĝuste la kastilia, formas escepton: tiu sono estas skribata **j** (en iu ajn loko) aŭ **g** (antaŭ e kaj i).

En la slavaj kaj ĝermanidaj lingvoj, la litero **j** estas prononcata [j], kiel en Esperanto, kio ne mirigas, ĉar origine, la **j** estis simpla ornama modifo de la **i**. En Francio kaj Anglio, dum mezepoko, ĝia sono pasis iom post iom al [ĝ]. En Francio, ĝi pasis poste al [j]; ĝi havas tiun saman sonon **j** en la lingvoj kataluna, portugala, galega, rumana, turka.

Nur en la kastilia lingvo, ĝia sono estas [ĥ]. Stranga fakto...

Oni kelkfoje kredas, ke tion oni ŝuldas al araba influo. Sed tute ne.

La araboj forlasis definitive Hispanion en 1492, ĉe la falo de la Granada Reĝlando, kiam la araba reĝo Boabdil devis forfuĝi en Marokon. En la sama jaro, Izabela la Katolika, reĝino de Kastilio, plipotencigis la Inkvizicion kaj stulte forpelis la Judojn el sia lando.

Nu, oni povas pruvi, ke en 1492 la sono [ĥ] ankoraŭ ne ekzistis en la kastilia lingvo:

- La **j** (en ĉia loko) kaj la **g** (antaŭ e kaj i) estis tiam prononcataj [j], kiel en franca, kataluna, galega, portugala, aŭ [ĝ], kiel en la angla.

- La **x** estis prononcata [ŝ], kiel en kataluna, eŭska, galega, portugala, malta.

La Judoj forpeltaj de Hispanio instaliĝis en diversaj landoj (Maroko, Turkio, ktp), kie ili plu parolis la kastilian lingvon, kiun ili skribis tamen per la hebrea alfabeto. Tiun kastilian dialekton oni nomis *ĝudezmo*. Dank' al la hebrea skribo, oni scias, kiel oni prononcis tiun ĝudezman lingvon. Ekzemple, «*filo ununaskita*» estas nun **hijo unigénito**, prononcata [iĥo unihénito], sed la ĝudezmaj Judoj skribis ĝin אֵידוֹ אֲוִיגֵינִיטוֹ, do prononcis [iĥo unigénito]; «*Judo*», nun **judío** [ĥudío], estis יוּדִי, do prononcata [ĝudjo]. La vorto por «malalta» estas nun **bajo** [báĥo]; sed tiam ĝi estis skribata **baxo** kaj prononcata [báŝo]. En ĝudezmo, ĝi estis באַשׁוֹ, do prononcata same [báŝo]. Nun, ĝi estas skribata

baixo en portugala kaj en galega, kaj **baix** en kataluna.

La virina nomo *Ĥimeno* estas nun skribata **Jimena** kaj prononcata [ĥiména]. Ĝi venas verŝajne de la latina *Simēna*, greka *Σίμωνα* (urbo en Licio). Sed antaŭ la 16a jc, ĝi estis skribata *Ximena* kaj prononcata [ŝiména]. Cetere, ĝi konservis sian originan prononcon en la franca *Chimène* [ŝimén], ĉefa rolantino en la tragedio de Kornelio, *Le Cid*.

En la ĝudezma dialekto, ekzistas la hebrea litero **פ**, same prononcata [ĥ]. Se la sono [ĥ] tiam ekzistus en la kastilia, la ĝudezma **פ** estus uzata en la transskribo de vortoj kastili-devenaj. Sed tio ne estas trovebla.

Inverse, oni trovas ĝin en la vortoj arab-devenaj aŭ hebre-devenaj: por « dimanĉo », la ĝudezma lingvo uzis **פאלדאג** [alfad]; nu, tiu vorto venas de la araba **أَلْحَد** *al-ħad*.

Plie, la unuaj misiistoj instaligintaj en Meksikio uzis la hispanan alfabeton por transskribi la lingvojn aztekan (*nahŭatl*) kaj majaan. Ekzemple, la nomo de la urbo Meksiko estis prononcata [meŝiko]: la hispanoj skribis ĝin **México** *méŝiko*. Nu, tiu urbo estis prenita en 1521, tridek jarojn post la foriro de la araboj. Nur poste, aperis la hispana ortografio **Méjico**.

Lasta pruvo. La araba lingvo havas la sonojn [ĝ] (skribita ج) kaj [ŝ] (skribita ش): do oni ne vidas ian kaŭzon, kial la hispanoj ŝanĝus ilin al la sono [ĥ]. Tute male!

La vorto **álgebra** « algebro » estas nuntempe prononcata [álĥebra]. Nu, ĝi venas de la araba **أَلْجَبْر** *al-ĝabr*, kun [ĝ], ne kun [ĥ]. Se la hispana vorto estus prononcata laŭ la araba maniero, ĝi estus [álĝebra], ne [álĥebra]. Same, la vorto **Generalife** « Ĝeneralifo » (ĝardeno de Alhambro) estas nuntempe prononcata [ĥeneralife]. Nu, ĝi venas de la araba **جَنَّةَ الرَّيْفِ** *ĝannat ar-rif* (« ĝardeno ĉe marbordo »). Se la hispana nomo estus prononcata laŭ la araba maniero, ĝi estus [ĝeneralife]. Kaj la Kastilia urbo **Guadalajara** estas prononcata [gŭadalafára] (kun ĥ), kvankam la araba nomo estis **وادي الْحَجَّارَة** *wādī al-ħaĝāra* (kun ĝ) « rivero de la ŝtonoj ».

Estas do tute certe, ke en la komenco de la 16a jc, okazis en la kastilia fonetiko la jenaj ŝanĝoj: **g** (+ e, i) [ĝ] → [ĥ], **j** [j] → [ĥ], kaj **x** [ŝ] → [ĥ].

Sed la araboj havas en tio ĉi nenian rolon.

Do, de kiu fonto venas la kastilia prononco [ĥ] de la litero **j** ?

En 1500, naskiĝis la filo de Filipo la Bela (*Felipe el Hermoso*), arkiduko de Aŭstrio, kaj de Johana la Freneza (*Juana la Loca*), reĝino de Kastilio. Tiu filo, Karlo, kiu poste iĝis fama sub la nomo Karlo la Kvina (*Carlos Quinto*, *Carlos V*), naskiĝis kaj trapasis sian tutan junaĝon en Gento, en Flandrio (nuna Belgio). Liaj instruistoj estis flandroj, kaj lia denaska lingvo estis la flandra. En 1516, post la morto de sia avo Fernando II^a de Aragono, li ekposedis la reĝlandojn de Kastilio kaj de Aragono. Sed tute certe, li tiam prononcis la hispanan lingvon **kun la flandra akĉento**.

Kaj estas sciante, ke la flandra lingvo ne konas la sonojn [j] kaj [ŝ]. Pro tio, tute spontane, la flandra nobelaro, kiu akompanis la reĝon en Madridon, prononcis, ekzemple, [ĥénte] la vorton **gente**, kiu ĝis tiam estis prononcata [jénte] aŭ [ĝénte].

La prononco [ĥ] de la hispana litero **j** estas do tute certe **de flandra deveno**.

Cetere, oni rimarku, ke Portugalio, kiu ne estis sub la regado de Karlo V^a, ankaŭ ne suferis tiun fonetikan ŝanĝon: por « ludo », la portugaloj diras **jogo** [jógu], dum la kastilianoj diras **juego** [ĥŭégo]. Kaj la influo de la Kastilia Kortego ne etendiĝis ĝis la foraj provincoj: tial la katalunoj plu prononcis **joc** [jok], kaj la galegoj **xogo** [sógo] « ludo ».

Stilfiguroj, vortfiguroj, sonfiguroj

I. Stilfiguroj.

- alegorio.** Konkretigo de abstrakta ideo : *la glavo de la Leĝo.*
- amfibologio.** Dusenceco : *simpla membro iĝas prezidanto* (komprenebla dumaniere).
- anaforo.** Ripeto de vorto komence de frazeroj : *lando de libereco, lando de estonteco...*
- anakoluto.** Ŝanĝo de konstruo : *la venko — baldaŭ ĝi venos* (Fund. Krestom., p.302).
- anastrofo.** Ŝanĝo de la norma vortordo : *ŝteliston neniu lasas en sian domon* (F §37).
- antifrazo.** Ironia uzo de vorto en kontraŭa senco : *jen belega rezulto ! (= kia fuŝaĵo !).*
- antitezo.** Reliefigo de du malaj vortoj : *malgranda aspekte, sed granda intelekto.*
- antonomazio.** Uzo de propra nomo anstataŭ komuna, aŭ inverse : *li estas Herkulo (= tre forta), la patro de la simfonio (= Betoveno).*
- aposiopezo.** Subita interrompo de frazo : *silentu, aŭ mi vin...*
- asindeto.** Foresto de liga konjunkcio : *mi venis, vidis, venkis* (Cezaro).
- batologio** (M.C.Butler). Plurfoja ripeto de unu vorto : *ŝin mi amas, amas, amas.*
- elipso.** Ellaso de necesa lingva ero : *mi amas ŝin, sed ŝi ne min (= ŝi ne amas min).*
- enalago.** Ŝanĝo de akordo inter du elementoj : *ĉu mi parolu, aŭ ĉu silenti ?*
- entimemo.** Silogismo, en kiu mankas unu premiso : *mi estas homo, do mi estas eraripova* (unua premiso subkomprenita : *ĉiu homo estas eraripova*).
- epanortoza.** Repreno de io dirita, kvazaŭ ĝi ne estus sufiĉe forta : *la x-ortografio estas maloportuna – kion mi diras ? maloportuna ? – ĝi estas mortiga !*
- eŭfemismo.** Mildigo de la krudeco de ĝusta vorto : *“liberalismo”, anst. “kapitalismo”.*
- hendiado.** Eldiro de unu nocio per du esprimoj : *dormi en littukoj kaj en silko (= en silkaj littukoj).*
- hipalago.** Atribuo al vorto, de kvalifiko, kiu konvenas al alia : *li frapis lin per kulpa ponardo* (fakte, kulpa estas la homo frapinta, ne la ponardo).
- hiperbato.** Disrompo de la norma vortordo : *ĝi la homan tiras familion* (Zamenhof).
- hiperbolo.** Esprimo intence tro drasta : *li respondis per tondra voĉo.*
- homeoteleŭto.** Proksimigo de samfinajaj vortoj : *bela paro por altaro.*
- katakrezo.** Banaliĝinta metaforo : *folio de papero, piedoj de tablo.*
- kiasmo.** Inversigo de vortaranĝo : *edzo saĝa kaj saĝa edzino.*
- litoto.** Esprimo intence ne sufiĉe drasta : *mi ŝin ne malamas (= mi ŝin amegas).*
- metaforo.** Subkomprenita komparo : *la kamelo estas la ŝipo de la dezerto.*
- metalepso.** Esprimo de koncepto per nereкта rilato : *sub la neĝo, pano (= neĝo ŝirmas la semon, kiu estigos planton, kiu donos grajnon por fari panon).*
- metonimio.** Interŝanĝo de du vortoj iel sence ligitaj : *li rezignis la kronon (= la reĝecon).*
- oksimoro aŭ enantiozo.** Kunigo de du sence kontraŭaj vortoj : *lia silento estis elokventa.*
- paratakso.** Foresto de ligilo inter du propozicioj : *pluvas, mi restas hejme (= pluvas, do mi restas hejme ; mi restas hejme, ĉar pluvas).* La ĉeesto de ligilo estas hipotakso.
- paronomazio.** Proksimigo de du vortoj preskaŭ samsonaj : *post la festo venas fasto.*
- perifrazo.** Ĉirkaŭfrazo : *ĉe la unuaj fajroj de l' sunleviĝo (= frumatene).*
- pleonasmio.** Superflua uzo de neutilaj vortoj : *mi vidis tion per miaj okuloj.*
- polisindeto.** Ripeto de sama konjunkcio : *kaj la viroj kaj la infanoj kaj la bestoj ekfuĝis.*
- pretericio.** Ŝajna anonco, ke oni ne pritraktos ion : *mi ne diros, ke li agis stultege.*

prolepso. Anticipa refuto de supozata kontraŭdiro: *vi verŝajne argumentos, ke la digramoj gx, hx, jx, ktp, estas oportunaĵo, sed mi pruvas, ke ili estas mortigaj fuŝaĵoj.*

prozopopeo. Prezento de mortinto aŭ senvivaĵo, kvazaŭ io aganta: *Zamenhof, se li ankoraŭ vivus, certe ekkrius: "for la fuŝadon de nia lingvo per la x-reformo!"*

silepso. Akordigo de vortoj laŭsence, ne laŭgramatike: *la popolo malpacis, kaj ili diris...*

silogismo. Logika rezono kun konkludo rezultanta de du premisoj: *ĉiu homo estas eraripova (ĝenerala vero): mi estas homo (individua vero), do mi estas eraripova (konkludo).*

sinekdoko. Interŝanĝo de du vortoj ne havantaj saman signif-amplekson: *ni ekvidis tridek velojn (= tridek ŝipojn).*

taŭtologio. Ripeto de sama nocio sub alia formo: *suferi pri kormalsano, pri kardiopatio.*

tmezo. Dismeto de normale kunmetita vorto: *vin for jam meti ne deziras mi (= formeti).*

truismo^{AC}. Evidenta veraĵo: *la x-ortografio estas idiotaja.*

zeŭgmo. Uzo de verbo aŭ adjektivo rilata al du substantivoj, el kiuj nur unu estas vere koncernata: *figuron vi ne vidis, nur la voĉon (evidente la voĉon vi ne povis vidi, nur aŭdi).*

II. Vortfiguroj (= tropoj).

anagramo. Vorto ricevita per liter-aliordigo de alia vorto: *la komedia ← l' akademio.* En la sakroj *kapro de parko kaj korpo de porko* (J.Valano), unu vorto estas la anagramo de la alia.

aŭtonimo^{AC}. Vorto, kiu referencas al si mem, kaj ne al la signifato: *vespero rimiĝas kun espero (= la vorto "vespero" rimiĝas kun la vorto "espero").*

hiperonimo. Vorto havanta pli grandan nombron da semantikaj trajtoj ol alia: *"mambesto" estas hiperonimo de "leono".*

hiponimo. Vorto havanta malpli grandan nombron da semantikaj trajtoj ol alia: *"leono" estas hiponimo de "mambesto".*

homonimo. Vorto havanta saman formon kiel alia: *drilo (borilo) / drilo (paviano).*

kakofonio. Malharmonio de sonoj: *ĝis ĉesiĝ' de l' sinĝen'.*

metatezo. Inversigo de du sonoj en vorto: *"fromaĝo" ← itala "formaggio".*

palindromo. Frazo legebla ambaŭdirekte: *saĝa nomo naĝas; ne mateno, bone tamen.*

paronimo. Vorto preskaŭ samsona kiel alia: *genro / ĝenro, juro / juro, pesi / pezi.*

sinonimo. Vorto esprimanta la saman nocion kiel alia vorto: *kalva / senhara.*

sonalterno aŭ kontraŭknavo. Interŝanĝo (ofte humura) de fonetikaj elementoj: *labori fiŝe kaj muse (= fuŝe kaj mise).*

III. Sonfiguroj.

aferezo. Forlaso de fonemo(j) komence de vorto: *"buso" anstataŭ "aŭtobuso".*

aliteracio. Ripeto de simila konsonanto: *vibras vok' en vaga vento.*

apokopo. Forlaso de fonemo(j) fine de vorto: *"aŭto" anstataŭ "aŭtomobilo".*

asonanco. Ripeto de simila vokalo: *noktuo ululis sur forumo.*

dierezo. Dusilaba misprononco de diftongo: *"ankaŭ" misprononcata "ankau".*

elizio. Ellaso de fina vokalo: *dank' al. (= danke al).*

epentezo. Aldono de neetimologia sono: *cindro, ĉambro ← latina "cinēris, camēra".*

krazo. Kunfandiĝo de lasta vokalo de vorto kun la unua de la sekvanta vorto: greka *καλὸς καὶ ἀγαθός* « bela kaj bona, altranga », anstataŭ *καλὸς καὶ ἀγαθός*.

metafonio. Vokal-modifo sub la influo de najbara vokalo: *kamarado ← franca camarade ← old-franca camerade (germana Kamerad) ← latina camēra.*

sinerezo. Unusilaba misprononco de du vokaloj: *"miliono" misprononcata "miljono".*

Subjunktivo, nura fantomo

Kiel jam dirite, multaj homoj rigardas sin kiel la centron de l' mondo.

Tial, en la unuaj Esperantaj lernolibroj, naskiĝis kelkaj eraroj, kiuj vivis, pluvis, vivadis, pluvivadis dum pli ol unu jarcento. Kaj ankoraŭ ne mortis. ☞ *Kunmetitaj verboformoj.*

Ekzemple, la fantoma ekzisto de **Esperanta subjunktivo**.

I. Neekzistanta subjunktivo.

Ĉiuj lingvoj de okcidenta Eŭropo (franca, itala, germana, ktp) posedas en sia konjugacio la **modon subjunktivan**. Kvankam nek la *Unua Libro*, nek la Fundamento, nek iu ajn el la Zamenhofaj tekstoj entenas eĉ plej mallongan aludon al ia subjunktivo, la unuaj aŭtoroj de Esperantaj lernolibroj — tute nekonscie — ne povis imagi, ke Esperanto ne havus subjunktivon. Ĉar subjunktivo ekzistas en franca, itala, germana, ktp, subjunktivo **devis ekzisti** en Esperanto. Ja troveblas kelkaj okazoj (nur kelkaj!), ĉe kiuj franca (kaj alia) subjunktivo havas volitivan signifon, do tradukiĝas Esperanten per la *u-modo*. El tio ili konkludis, ke la Esperanta *u-modo* estas subjunktivo.

Jam en 1906, en sia *Commentaire sur la Grammaire Esperanto*, L.de Beaufront skribis tute erare (p.90):

• *on peut dire que l'impératif-subjonctif reçoit en propre tout ce qui ne relève pas, en Esperanto, des deux autres modes personnels: l'indicatif et le conditionnel* (oni rajtas diri, ke la imperativo-**subjunktivo** ricevas kiel proprajn, ĉion en Esperanto, kio ne apartenas al la du ceteraj personaj modoj: indikativo kaj kondicionalo).

Sekvas kelkaj ekzemploj, interalie:

• *il est inadmissible qu'il refuse notre proposition* "estas nesupozeble, ke li **rifuzu** nian proponon". Katastrofa traduko! Jen la ĝusta: *estas neakceptebla, ke li rifuzas* (aŭ *rifuzos*, aŭ *rifuzus*, depende de la kunteksto) *nian proponon*.

Jen aliaj ekzemploj, plukitaj en diversaj malbonaj lernolibroj:

• *L'impératif, que l'on a appelé aussi Impératif-Subjonctif, parce qu'il cumule, avec les emplois de l'impératif, les principaux emplois du subjonctif français...* (*Grammaire complète*, de Camille Aymonier, 3a eldono, Hachette, 1910, p.84).

• *les conjonctions sont suivies [...] du subjonctif quand il y a une idée de but, de finalité* (*L'Espéranto en dix leçons*, de Th.Cart kaj M.Pagnier, 12a eldono, 1924, p.53).

• *en Esperanto, l'impératif et le Subjonctif ont la même forme et s'obtiennent en changeant en U la terminaison I de l'infinif...* *L'impératif Esperanto a cinq personnes, les mêmes que le Subjonctif* (*La Langue Internationale Esperanto en 30 leçons*, de André Ribot, Albin Michel, 1955, p.29). Kaj kie li trovis, ke la Esperanta "imperativo" havas nur " kvin personojn " ???

• *le subjonctif est marqué, comme l'impératif, par la désinence U* (*Esperanto, Manuel d'étude*, de Jean Couteaux, Mulhouse, 1955, p.28). Du apartaj modoj, tamen ne morfologie distingeblaj!

• *Subjonctif. – Présent: mi estu (que je sois). Imparfait: mi estu (que je fusse). Passé: mi estu estinta (que j'aie été). Plus-que-parfait: mi estu estinta (que j'eusse été).* (*L'Espéranto en douze leçons*, de Pierre Delaire, Orléans, 1955, p.109). Fantazia konjugacio!

• *el subjuntivo-imperativo, que no afirma con seguridad el significado del verbo, y sirve para mandar, rogar, etc...* (*Esperanto al alcance de todos*, de F.Soler y Valls, Valencia, 1958, p.53).

• *le subjonctif s'emploie toujours après l'expression POR KE* (*Ni parolu en Esperanto*, de André Ribot, Marmande, 1960, p.51).

Kio estas subjunktivo? Ĝi estas «*verba modo en iuj lingvoj (franca, germana, k.a.), montranta, ke iu propozicio dependas de alia kaj ke iu procezo estas konceptata kiel dependa de alia procezo aŭ de ies volo aŭ opinio, do kiel citita aŭ necerta*» (PIV, p.1093a).

Fakte, en Esperanto, tre ofte okazas, ke iu propozicio "dependas de alia kaj ke iu procezo estas konceptata kiel dependa de alia procezo aŭ de ies opinio, do kiel citita aŭ necerta". Sed ĉiam Esperanto esprimas tion per uzo de indikativo aŭ de kondicionalo.

II. La nacilingva subjunktivo.

Ni vidu kelkajn ekzemplojn de diverslingvaj frazoj, en kiu nacilingva subjunktivo estas tre klare esprimita en Esperanto per indikativo aŭ kondicionalo.

1) Nacilingva subjunktivo montranta nescion, neaserton, neeston.

- *itale*: non sapevo che *fosse* malato « mi ne scias, ke li **estas** malsana ».
- *france*: je ne prétends pas que tu *aies* tort « mi ne asertas, ke ci **malpravas** ».
- *itale*: non so, credetelo, che *sia* l'amor (A.Boito, *Mefistofele*) « mi ne scias, kredu tion, kio **estas** la amo ».
- *angle*: I don't know whether my master *be* in or out « mi ne scias, ĉu mia mastro **estas** hejme aŭ ekstere ».
- *car* il n'y avait point de maison où il n'y eût un mort; perciocchè non vi era alcuna casa ove non fosse un morto; porque no había casa donde no hubiese muerto; porque não havia casa em que não houvesse um morto « ĉar ne estis domo, en kiu ne **estus** mortinto (*Zamenhofa Biblio*; PAG, p.319); ĉar ne estis domo, en kiu ne **estis** mortinto (*Londona Biblio*) » (Elr 12³⁰). Ni notu, ke la slavaj lingvoj uzas ĉi tie kondicionalon: где не было бы мертвеца, щоб не було там померлого, w którgumby nie był umarty, v němž by nebylo něčeho mrtvého, kde by nebolo bývalo mŕtveho, у kojoj не би мртваца.

2) Nacilingva subjunktivo montranta timon, dubon, eblecon.

- *latine*: timeo nē *veniat* « mi timas, ke li **venos** ». La latina vorto "**ne**" ne estas nea.
- *france*: je crains qu'il ne *viene* trop tard « mi timas, ke li **venos** tro malfrue ». Ĉi tie la franca "**ne**" venas de la latina vorto, kaj *tute ne havas nean signifon*.
- *france*: ton aide a permis que je *réussisse* « cia helpo ebligis, ke mi **sukcesis** ». La PIV citas "tio ebligis, ke mi ĉeestu" (p.263b): sed la formo *ĉeestis* estus pli ĝusta.
- *france*: j'ai peur qu'il n'*aille* dire qu'il m'a vu sortir de là-dedans (*George Dandin*, 1a akto, 2a sceno) « mi timas, ke li **rakontos**, ke li vidis min elirantan el tie ». Zamenhofa traduko dufoje erara: "mi timas, ke li **NE rakontu** al iu, ke li vidis min elirantan el tie".
- *hispane*: temo que *haga* mal tiempo « mi timas, ke **estos** malbona vetero ».
- *france, hispane, portugale*: je crains qu'il *pleuve*; temo que *llueva*, temo que va *llover*; tenho medo que *chova* « mi timas, ke **pluvos**, mi timas, ke **pluvus** ».

3) Nacilingva subjunktivo montranta kontraston.

- *france*: bien que vous *soyez* riche, je doute que vous *soyez* heureux « kvankam vi **estas** riĉa, mi dubas, ĉu vi **estas** feliĉa (F §26) ».
- *france kaj korsike*: je suis sorti sans que tu t'en *aperçoives*; sò isciutu senza ch'è tù ti n'*avvechi* « mi eliris sen tio, ke ci **rimarkus** tion ».
- *france*: il est trop tôt pour qu'on *prenne* une décision « estas tro frue, ol ke oni **decidus** ion ».
- *hispane, portugale*: saldré con vosotros aunque *llueva*; vou sair convosco, mesmo que *chova* « mi eliros kun vi, kvankam **pluvus** ».
- *germane*: er ist zu stolz, als dass er so etwas *annähme* « li estas tro fiero, ol

ke li **akceptus** tian aferon ».

4) Nacilingva subjunktivo montranta supozon, opinion, esperon.

• *france* : à supposer que tout *aille* bien, vous serez élu « supoze, ke ĉio glate *iros*, vi estos elektita ».

• *itale* : spero che *siate* in buona salute « mi esperas, ke vi *estas* bonfarta ».

• *france* : je cherche un secrétaire qui *connaisse* l'espéranto « mi serĉas sekretarion, kiu *scipovas* (aŭ *scipovus*) Esperanton ».

• *france* : il suffit que mon fils *soit* encore en vie « sufiĉas, ke mia filo ankoraŭ *vivas*² ».

• *islande* : ég held, að það sé mögulegt « mi opinias, ke tio *estas* ebla ».

5) Nacilingva subjunktivo montranta citadon, demandon.

• *romanĉe* : el disch cha tŭ *hajast* radschun « li diras, ke ci *pravas* ».

• *germane* : man sagte mir, dass du ein Träumer *seist* (Schiller) « oni diris al mi, ke ci *estas* revemulo ».

• *germane* : mir träumte, du *verliebest* mich « mi sonĝis, ke ci *forlasas* min ».

• *germane* : er fragte mich, wo ich geboren *sei* « li demandis al mi, kie mi *estis* naskita ».

6) Nacilingva subjunktivo montranta estontecon.

• *france* : avant que tu *partes*, nous boirons quelque chose « antaŭ ol vi *foriros*, ni trinkos ion ».

• *france* : jusqu'à ce que les politiciens *soient* conscients du problème... « ĝis la politikistoj *konscios* pri la problemo... ».

• *okcitate* : li n'parlarai quand *venga* « mi parolos al li pri tio, kiam li *venos* ».

• *katalune* : sortiràs quan *vulguis* « ci eliros, kiam ci *volos* ».

• *hispane, portugale* : cuando *haga* buen tiempo, saldré; quando *estiver* bom tempo, saio « kiam *estos* bona vetero, mi eliros ».

Oni povas konstati el la ĉi-supraj ekzemploj, ke la nacilingvaj subjunktivoj havas multege da sencoj. Ĉiuj ĉi-supraj ekzemploj tradukiĝas Esperanten per indikativo (is, as, os) aŭ per kondicionalo (us).

III. Nacilingva subjunktivo kiel surogato de imperativo.

Ĉiuj Eŭropaj lingvoj havas komunan punkton: la imperativo ne estas kompleta, ĝi ne estas uzebla kun ĉiuj personoj.

Ĝi ekzistas maksimume en tri personoj (la 2a singulara, la 1a kaj 2a pluralaj), kaj nur *en ĉefpropozicioj* (franca ekzemplo: *viens, venons, venez* « ci venu, ni venu, vi venu »).

Por la tri ceteraj personoj (la 1a kaj 3a singularaj, la 3a plurala), oni uzas diversajn rimedojn, plej ĝenerale subjunktivon.

Ankaŭ *en subpropozicioj* (por ĉiuj personoj), oni uzas subjunktivon.

Sed tiu uzo de subjunktivo estas nur **surogato de la imperativo**. Do, evidente, Esperanto tradukas ĝin kiel ĝi tradukus normalan imperativon, t.e. per la **volitivo (u-modo)**.

1) Rekta parolado (ĉefpropozicioj, 1a kaj 3a personoj singularaj, 3a plurala).

La latinidaj lingvoj uzas subjunktivon devige kun prepozicio *ke* (france-hispane *que*, itale *che*). Evidente, tiu prepozicio estus en Esperanto ne nur neutila, sed eĉ rekte erara.

• *france* : gardes, qu'on le *saisisse* ! (Racine) « gardistoj, vi *kaptu* lin ! ». Ĉi tie, la

franca uzas **on** « oni » en la senco « vi ».

• *france* : que je *meure* plutôt que la revoir ! (libreto de *Werther*) « mi *mortu*, prefere ol revidi ŝin ! ».

• *itale* : allora ch'io *muoia*, e m'inghiotta l'Averno ! (A.Boito, *Mefistofele*) « tiam mi *mortu*, kaj min *forglutu* la Infero ! ».

• *hispane, portugale* : que *entren*, y que el último *cierre* la puerta; eles que *entrem*, e o último que *feche* a porta « ili *eniru*, kaj la lasta *fermu* la pordon ».

• *germane* : er *sterbe* ! (libreto de *Fidelio*) « li mortu ! ».

• *germane* : Gott sei der Seele gnädig (Bürger) « Dio *estu* kompatema al cia animo ».

• *angle* : God save the Queen (nacia himno) « Dio *savu* la Reĝinon ».

2) Nerekta parolado (subpropozicioj, ĉiuj personoj).

• *france* : je ne veux pas que vous *partiez* « mi ne volas, ke vi *foriru* ».

• *okcitane* : volia que *cantèssi* una cançon « li volis, ke mi *kantu* kanzonon ».

• *itale* : voglio che Pietro *scriva* « mi volas, ke Petro *skribu* ».

• *hispane* : deseamos que se *alivie* su mamá « ni deziras, ke via patrino pli bone *faru* ».

• *germane* : ich befehle, dass er seine Pflicht *tue* « mi ordonas, ke li *faru* sian devon ».

Tiu u-modo estas oportune nomata **volitivo**, ĉar ĝi montras esence *volon*. Nomi ĝin *subjunktivo*, aŭ *subjunktivo-imperativo* estas rekta eraro, kiu instigas la lernantojn uzi ĝin kiel tradukon de ĉiuj okcident-eŭropaj uzoj de la subjunktiva modo.

IV. Kial Esperanto ne havas subjunktivon.

Oni ne povas tro insisti pri la fakto, ke la Esperanta konjugacio estas la paŭsaĵo de la slava. Kiel ekzemplon, ni konsideru la konjugacion de pola verbo.

Prezenco indikativo : robię « mi faras », robisz « ci faras », robi « li faras », ktp.

Preterita indikativo : robiłem « mi faris », robiłeś « ci faris », ktp.

Futura indikativo : będę robił « mi faros », będziesz robił « ci faros », ktp.

Kondicionalo : robiłbym « mi farus », robiłbyś « ci farus », ktp.

Imperativo : rób « ci faru », róbcie « vi faru ».

Participo : robiąc « faranta », robiony « farata », ktp.

Infinitivo : robić « fari ».

Oni tuj vidas, ke la pola konjugacio entenas ekzakte la **samajn tempojn kaj modojn**, kiel la Esperanta konjugacio (☞ *Kondicionalo*).

Tute intence mi ne konsideras la fakton, ĉi tie neutilan, ke ĉiuj polaj verboj ekzistas sub du formoj, pli precize du **aspektoj** (☞ *Participo*) :

• la **imperfektiva aspekto** (*niedokonany*, ĉefe *nedokonavý*, serbe *трајни*), kiu montras senliman agon (daŭran, ne finitan, ripetatan) : robić « fari, faradi, esti faranta ».

• la **perfektiva aspekto** (*dokonany*, ĉefe *dokonavý*, serbe *тренутни*), kiu montras kunliman agon (finitan, rezultan) : zrobić « fari, finfari ».

Estas facile konstati, ke ne ekzistas en la pola konjugacio eĉ la plej malgranda spuro de subjunktivo. Kaj la pola lingvo funkcias perfekte sen subjunktivo, same kiel multaj aliaj lingvoj.

Do oni emas respondi al la ĉi-supra demando : **Esperanto ne havas subjunktivon pro tio, ke la slavaj lingvoj ne havas subjunktivon kaj funkcias sen la ekzisto de tiu modo.**

Transitiveco, tikla afero

Inter la ag-verboj (kiuj esprimas ideon de agado: *frapi, promeni...*), oni devas fari zorgan distingon inter du kategorioj: la transitivaj verboj, la netransitivaj verboj.

I. Transitiveco kaj netransitiveco.

1. La transitivaj verboj.

La esprimata ago ekiras de la subjekto kaj **pasas al objekto**. Ĝi celas, atingas, koncernas ulon aŭ ajon. Ekzemploj: *aflikti, ĉagreni, dolori, falsi, fandi, favori, fini, frapi, glui, igi, komenci, kruci, kuiri, limi, loki, movi, naŭzi, pardoni, ruli, ŝanĝi, treni, turni*.

La transitivaj verboj havas do **objekton**. Tiu objekto povas ekzisti **sub du formoj**.

a) La ago povas trafi la objekton **rekte**, sen uzo de prepozicio: *honori la gepatrojn, marteli feron, preni libron, ami ŝin*.

Tio estas **rekta objekto**. Se ĝi estas substantivo aŭ pronomo, ĝi estas en akuzativo.

Sed la rekta objekto povas esti ankaŭ:

- numeralo: *el la tri pomoj, mi manĝis unu kaj kunportis du,*
- infinitivo: *mi donos trinki al ŝi; li sendis voki la kuraciston,*
- kvanta adverbo: *trinki multe da akvo, iom da vino,*
- subpropozicio: *mi petas, ke ŝi venu,*
- citaĵo: *mi legis "La Neĝa Blovado" kaj "Sub la jugo".*

b) La ago povas trafi la objekton **ne rekte**, sed pere de prepozicio: *obei al la patro, helpi al li, profiti de la okazo, dubi pri la utileco de io, sopiri je la perdita feliĉo*.

Tio estas **nerekta objekto**: ĝin enkondukas unu el la prepozicioj *al, de, pri, je*.

La plej bona pruvo, ke tiuj komplementoj estas **veraj objektoj**, estas, ke oni povas diri same ĝuste: *obei la patron, helpi lin, profiti la okazon, dubi la utilecon de io, sopiri la perditan feliĉon*. Oni vidas, ke la rekteco aŭ nerekteco de la objekto ne estas tiel strikta, kiel en la etnolingvoj (la franca diras *helpi iun*, la germana diras *helpi al iu*, kaj neniam inverse).

Evidente, unu transitiva verbo povas havi du aŭ plurajn malsamajn objektojn, jen rektajn, jen nerektajn: *mi donis al ŝi* (nerekta objekto) *kison* (rekta objekto).

◊ Kelkaj verboj povas ricevi du specojn de objektoj, kun la sama signifo: *demandi iun pri io*, aŭ *demandi ion al iu*; *instrui infanojn pri gramatiko*, aŭ *instrui gramatikon al infanoj*; *ŝmiri panon per butero*, aŭ *ŝmiri buteron sur pano*.

La senco mem de *igi* faras, ke la verboj finiĝantaj per tiu sufikso, estas devige **transitivaj**.

La vorto *transitiva* venas de la fakto, ke tiuj verboj *transirigas* la agon sur ion aŭ iun. Cetere, Zamenhof ne uzadis la esprimon *transitiva verbo*, sed *transira verbo*.

Konsekvenco de la transitiveco estas, ke la transitivaj verboj povas esti uzataj en la **pasiva voĉo**, se ilia objekto estas rekta. La fakto, ke *turisto vizitas kastelon* (rekta objekto), implicas, ke *kastelo estas vizitata* (pasivo) *de turisto*. La frazo estas iel returnita.

Male, la pasiva voĉo ne estas ebla, se la objekto estas nerekta: la frazo *la patro pardonis al la kulpa infano* (nerekta objekto) ne povas esti returnita pasiven en tiu formo. Tio estas ebla nur, se oni antaŭe ŝanĝis la nerektan objekton al rekta: *la patro pardonis la kulpan infanon* (rekta objekto) → *la kulpa infano estis pardonata* (pasivo) *de la patro*.

2. La netransitivaj verboj.

La esprimata ago koncernas **nur** la subjekton. Ĝi havas nenium celon, ĝi atingas nenion kaj nenium. Ekzemploj: *almozi, boli, bruli, ĉesi, daŭri, diboĉi, dormi, evolui, manki, pasi, promeni, situi*. Ĉar celo ne ekzistas, ankaŭ objekto (rekta aŭ nereakta) ne ekzistas. Oni **manĝas** (transitiva verbo) **ion**; sed oni simple **dormas** (netransitiva verbo), ne "dormas ion".

Inter la netransitivaj verboj, troviĝas la kopuloj: *esti, iĝi, resti, ŝajni...* Ili ne transirigas agon sur objekton, sed nur atribuas iun kvaliton al la subjekto (*la ĉielo estas blua, restas hela, iĝas nigra...*). Ili do ne havas objekton, sed nur predikativon.

La senco mem de **iĝi** faras, ke la verboj finiĝantaj per tiu sufikso, estas **netransitivaj**.

Konsekvenco de la netransitiveco estas, ke en absoluta logiko, tiuj verboj **ne** povas esti uzataj en la pasiva voĉo, kiu ne havus sencon. Do principo estas, ke la netransitivaj verboj ne akceptas la pasivajn sufiksojn *-it, -at, -ot, -ebl*. La vortoj **brulita, *ĉesata, *daŭrebla, *evoluita, *indigniĝi, *situita*, estas eraraj, ĉar sensignifaj.

Praktike, la afero ne estas tiel simpla. Ni pristudos ĝin iom pli poste.

Kiamaniere scii, ĉu verbo estas transitiva aŭ netransitiva? Simple per la scio de ĝia difino, aŭ per la konsulto de la vortaro.

- **kui** signifas «**prepari** nutraĵon, elmetante ĝin al varmego, ĝis ĝi fariĝas manĝebla». Tio implicas, ke **kui** estas **transitiva**: oni kuiras terpomojn, la terpomoj estas kuireblaj, kurotaj, kuirataj, kuiritaj, la terpomoj kuirigigas (sed ne kuiras!).

- **boli** signifas «**varmiĝi** ĝis svarma formiĝo de vaporbobeloj». Tio implicas, ke **boli** estas **netransitiva**: akvo bolas, akvo estas bolanta, bolinta (sed **bolita* ne havas sencon), oni boligas akvon.

Adjekto (aŭ *cirkonstanca komplemento*) estas komplemento esprimanta unu el la cirkonstancoj, en kiuj okazas la ago.

Evidente, ĉiaj verboj, ĉu transitivaj, ĉu netransitivaj, povas havi unu aŭ plurajn adjektojn. Ekzemple: *li manĝis* (transitiva verbo) *dum unu horo* (tempa adjekto), *kun apetito* (maniera adjekto), *por la plezuro* (cela adjekto); *li kuris* (netransitiva verbo) *dum unu horo* (tempa adjekto), *kun kuraĝo* (maniera adjekto), *por la venko* (cela adjekto).

II. Ĝenerala principo pri la Esperantaj verboj.

En la lingvoj latinidaj kaj ĝermanidaj, okazas ofte, ke unu verbo havas du signifojn, unu transitivan, unu netransitivan. La franca **commencer**, la itala **cominciare**, la hispana **comenzar**, la portugala **começar**, la rumana **a începe**, la angla **to begin**, la germana-nederlanda **beginnen**, la norvega **begynne**, la sveda **börja**, la novgreka **αρχίζω**, signifas same «**komenci** (transitive)» kaj «**komenciĝi** (netransitive)». Tiuj verboj povas esti uzataj same bone en la esprimo «**komenci** (transitive) **konstruadon**», kaj en la esprimo «**jam komenciĝis** (netransitive) **la vintro**».

Tiun duoblan signifon oni trovas en multaj francaj verboj: **arrêter** (haltigi/halti), **baïner** (bani/baniĝi), **brûler** (bruligi/bruli), **changer** (ŝanĝi/ŝanĝiĝi), **finir** (fini/finiĝi), **passer** (pasigi, trapasi/pasi), **pendre** (pendigi/pendi), **peser** (pesi/pezi), **pleurer** (priplori/plori), **remuer**, **bouger** (movi/moviĝi), **rouler** (ruli/ruliĝi), **tourner** (turni/turniĝi), **traîner** (treni/treniĝi), ktp.

Male, en la slavaj lingvoj, por la du nocioj, la transitiva kaj la netransitiva, ekzistas du apartaj (tamen parencaj) verboj: la rusa **начинать**, la pola **zaczynać**, la ĉeĥa **začínat**, la slovaka **začať** signifas nur «**komenci** (transitive)». Ili taŭgas en «**komenci** **konstruadon**», «**mi komencas la kurson**». Sed la esprimoj «**jam komenciĝis la vintro**», «**la kurso komenciĝos je la 3a horo**» necesigas la uzadon de alia verbo: la rusa uzas **начинаться**, la pola **zaczynać się**, la ĉeĥa **začínat se**, la

slovaka **Zaĉat' sa**, kiuj signifas « komenciĝi (netransitive) ».

En Esperanto, la pliparto de la verboj havas la saman konduton, kiel la slavaj: unu verbo ne estas samtempe transitiva kaj netransitiva. Ĝenerala principo estas do, ke la dusenceco de multaj verboj el la okcident-Eŭropaj lingvoj ne ekzistas en Esperanto. Esprimoj, kiel *“mi brulas lignon (anst. bruligas)”*, *“la Tero turnas (anst. turniĝas)”*, estas nuraj barbarismoj.

Kelkaj afiksoj ebligas la pason de unu kategorio al la alia:

- Transitiva verbo povas iĝi netransitiva helpe de la sufikso **-iĝ** (bani → baniĝi).
- Netransitiva verbo povas iĝi transitiva helpe de la sufiksoj **-iĝ** kaj **-um** (kuŝi → kuŝigi, pleni → plenumi), aŭ helpe de la prefiksoj **pri-** kaj **tra-** (plori → priplori, dormi → tradormi).

Sed tio estas nur ĝenerala principo. Kiel ni tuj vidos, lingvo ne estas io perfekte kaj matematike logika, sed io vivanta.

III. La elasteco de la Esperanta transitiveco.

Efektive, la aferoj ne estas tiel simplaj, ke oni povus klasi ĉiujn Esperantajn verbojn en du striktajn kaj definitivajn kategoriojn.

En elementaj kursoj, oni instruas, ke la netransitivaj verboj ne havas rektan objekton kaj ne akceptas la pasivajn sufiksojn *-it*, *-at*, *-ot*, *-abl*. Al lernanto, kiu skribis erare *“evoluita lando”* aŭ *“urbo situita en Francio”*, oni klarigas, ke la ĝusta formo estas *evoluinta lando*, *urbo situanta en Francio*, ĉar la netransitivaj verboj *evolui* kaj *situi* havas aktivan senco (la lando *evoluis*, estas *evoluinta*, sed neniu *“evoluis la landon”*; la urbo *situas*, estas *situanta*, sed neniu *“situas la urbon”*, kio estas rekte sensenca).

Nu, oni konstatas, ke ĉe la plej bonaj aŭtoroj, estas troveblaj **transitivaj verboj uzataj laŭ maniero ŝajne netransitiva**, kaj ankaŭ **netransitivaj verboj sekvataj de komplemento en akuzativo (do laŭ maniero ŝajne transitiva)**. Tio ŝajnas kontraŭdiri la ĉi-supran aserton.

Ekzemple, la unua PIV deklaras « *netransitiva* » la verbon *paroli*, kaj tamen tuj donas la ekzemplojn: *ĉu vi parolas nian lingvon?* (Zamenhof); *en Svislando estas parolataj kvar lingvoj*. Oni povus aldoni: *vi parolas sensecaĵon*, *mia amiko* (Fundamento, §35).

Plie, se oni foliumas la duan PIVon, oni trovas multajn verbojn (mi nombris 78), kiuj posedas du aŭ plurajn signifojn, el kiuj unuj estas “transitivaj”, aliaj estas “netransitivaj”. Ekzemple, *soni*: *ŝia voĉo sonas* (netransitiva) *agrabla*; *soni* (transitiva) *la retiriĝon*. Ankaŭ tio ŝajnas kontraŭdiri la ĉi-antaŭajn asertojn.

Tio estas inda je detala studo.

1) Transitiva verbo ja povas ne mencii sian objekton.

La senco mem de la transitivaj verboj neprigas, ke ili havas objekton. Sed tiun objekton oni povas mencii aŭ ne mencii. Ekzemple, *ami*, *obei*, *studi* supozigas, ke iu/io estas la celo de la amo, de la obeo, de la studo: *oni amas iun*, *obeas al iu*, *studas ion*. Sed oni povas ankaŭ diri simple *mi amas*, *mi obeas*, *mi studas*, sen precizigi la identecon de la amato, de la obeato, de la studata fako. La objekto (rekta aŭ nereakta) estas iel inkluzivita en la senco de la verbo, eĉ se ĝi ne estas esprimita.

Kiam la PIV (p.107b) deklaras “**netransitiva**” la verbon **argumenti** en la frazoj « *ili senfine argumentas* », « *batanto povas argumenti* », kaj “**transitiva**” la saman verbon en la frazoj « *ili argumentas lian nescion* », « *argumenti, ke ekzistas lingvoj, kiuj...* », ĝi ne montras du apartajn sencojn de tiu verbo, sed nur du fraztipojn, en kiuj rekta objekto forestas aŭ ĉeestas. Pruve, oni ja povas komenci frazon « *ili senfine argumentas...* » (la aŭskultanto eble

sentas la verbon netransitiva), sed tiam la parolanto finas sian frazon «...argumentas, ke ekzistas lingvoj, kiuj...» (tiam la aŭskultanto elkovras la transitivecon de la verbo).

Laŭ la PIV (p.132a), ankaŭ **babili** estas "**netransitiva**" en «*ili ĉiuj babilis france*», kaj "**transitiva**" en «*anstataŭ babiladi teorian sensenciĝon...*». Sed oni povas kunfandi la du frazojn kaj diri «*anstataŭ babili france teorian sensenciĝon...*». Do oni ne povas aserti, ke **babili** estas netransitiva. Kiam «*ili babilis france*», fakte, *ili babilis ion france...*

Spite la PIVan aserton, ankaŭ la verbo *kontraŭdiri* **ne** estas netransitiva: la esprimo «*oni kontraŭdiros al mi*» entenas **transitivan verbon**, kies objekto povas esti laŭvole **rekta** (*oni kontraŭdiros min*) aŭ **nerekta** (*oni kontraŭdiros al mi*).

Multaj verboj montrataj en la du PIVoj (kiuj tamen ne ĉiam samopinias) kiel samtempe *transitivaj* kaj *netransitivaj*, apartenas al tiu kategorio.

Ekzemple, *afekti, argumenti, babili, balbuti, blovi, cedi, for'cedi, danci, kontraŭ'diri, disponi, dubi, insulti, kanti, (mal)konsenti, kraĉi, kredi, krii, nei, paroli, pensi, preĝi, raport, servi, suferi, zorgi*, estas prefere **transitivaj**, ĉar ilia senco faras, ke ili povas akcepti objekton (foje rektan, foje nerekthan). Sed tiu objekto estas menciata aŭ ne.

2) Akuzativo post NEtransitiva verbo.

Oni devas insisti, ke «*ĉiu verbo povas esti uzata transitive, se la tiel formita esprimo povas havi senco*» (PAG, p.243). Sed «*uzata transitive*» **NE** signifas «*esti transitiva*».

Tiu transitiva uzateco estas konsekvenco de la 14a Regulo de la Fundamenta Gramatiko: «*...se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian efektive prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion je, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio je oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio*» (Fundamenta Krestomatio, p.241). La nacilingvaj tekstoj (krom la rusa) aldonas tiun ĉi gravan frazon: «*...quand aucune amphibologie n'est à craindre, when no confusion is to be feared, wo kein Doppelsinn zu befürchten ist, gdzie nie zachodzi obawa dwuznaczności*» (kiam neniu dusenceco estas timinda).

Tiu timo al dusenceco malhelpas, ke oni uzus akuzativon por anstataŭigi la prepoziciojn **de** kaj **el**: la esprimo «*eliri la ĉambron*», anstataŭ «*eliri el la ĉambro*», estus facile komprenata kiel «*eliri (el iu loko nemenciita) kaj iri la ĉambron*».

La indiko de la 14a Regulo estas ripetata en la Ekzercaro: «*Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion "je". [...] Anstataŭ la vorto "je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio*» (§ 29).

Sekvas ekzemploj kun *je*-komplemento kaj kun akuzativa komplemento:

- *mi ridas je* (aŭ *pro*) *lia naiveco*; *mi sopiras je mia perdita feliĉo* (§ 29).
- *mi ridas lian naivecon*; *mi sopiras mian perditan feliĉon* (§ 29).

3) Akuzativa uzado NE signifas transitivecon.

Atentu! **Transitiveco kaj akuzativo estas du apartaj mondoj**. Verbo povas esti sekvata de akuzativa komplemento kaj tamen **nepre konservi sian netransitivan karakteron**.

La ĵus cititaj ekzemploj (*mi ridas lian naivecon*; *mi sopiras mian perditan feliĉon*) **ne** montras, ke *ridi* kaj *sopiri* estas transitivaj, nek iĝis transitivaj en tiuj du frazoj. Ili montras nur, ke post multaj verboj, **inkluzive de netransitivaj**:

- oni rajtas uzi *je*-komplementon (kiam neniu dusenceco estas timinda),
- oni rajtas ŝanĝi tiun *je*-komplementon al akuzativa komplemento.

Ekzemple. La verbo **taŭgi** estas **netransitiva** (tion rekonas ambaŭ PIVoj). Ni deiru de la frazo «**ĝi taŭgas por nenio**» aŭ «**ĝi taŭgas je nenio**». Ni uzu la permeson donitan de la Fundamento, ŝanĝante la **je**-komplementon al akuzativa komplemento: **ĝi taŭgas nenion**. Nu, tiu frazo estas tute ĝusta, kun akuzativa komplemento, **spite la netransitivecon de la verbo taŭgi**. Cetere, ĝi troviĝas en la *Grand Dictionnaire Espéranto-Français*, de G. Waringhien: «**ĝi nenion taŭgas**» (2a eldono, p.327a, 3a eldono, p.388b). Tio signifas, ke eĉ netransitivaj verboj povas havi akuzativan komplementon, **tamen ne perdante sian netransitivan sencon**.

En 1892, Zamenhof donis tiun ĉi tre gravan precizigon: «*en ĉiuj okazoj, kiam ni ne scias, kian prepozicion uzi, ni povas uzi la akuzativon anstataŭ la prepozicio "je"; ekzemple en la esprimo "mi kontentiĝas tion ĉi" la akuzativo ne dependas de la verbo "kontentiĝas" sed anstataŭas nur la forlasitan prepozicion "je" (= mi kontentiĝas je tio ĉi)*» (*Lingvaj Respondoj*, p.67).

Tio estas klara: en tia frazo, **la akuzativo NE dependas de la verbo**, la akuzativigo de la komplemento (*tion ĉi*) estas **sen rilato kun la verbo kontentiĝi**. La verbo *kontentiĝi* tute ne iĝis transitiva (imagi, ke verbo kun sufikso *-iĝi* estus transitiva, estus absurde); sed la sekvanta komplemento (iu ajn komplemento, krom la *el-* kaj *de-*komplementoj, kiel ni vidis) estas esprimita per akuzativo, laŭ la klara permeso de la Fundamento.

Alia Zamenhofa ekzemplo: la verbo **sciigi**, kiu signifas «*iĝi scianta*». Tiu verbo estas netransitiva pro la ĉefa rolo de *iĝi*. Nu, Zamenhof skribis «*vi nepre devas tion sciigi*» (citita en PIV2, p.1012b). Fakte, la senco «*iĝi scianta*» tre proksimas al la senco «*komenci scii, ekscii*» (transitiva). Pro tio, **sciigi** kuŝas ĉe la limo inter transitiveco kaj netransitiveco (cetere, ĝi arkaikiĝis: nuntempe, oni uzas pli volonte *ekscii*). La Fundamento (p.214/160) tradukas **sciigi** jene: *apprendre | perceivre | erfahren | узнавать | dowiedzieć się*. Nu, tiuj kvin verboj estas cititaj en la nacilingvaj vortaroj kun la mencio "transitiva"!

Oni trovas ĉe Zamenhof ankaŭ «*tiu gravediĝis malbonon kaj naskis mensogon*» (PAG, p.243), «*koniĝi tiun ĉi lingvon*» (OV, p.22), «*hundo bojas la vojon*» (*Proverbaro*), «*ĝi nenion utilus*» (*Marta*, p.97), «*mi miras la saĝecon de tiu ĉi homo*» (PIV, p.745a), «*iri longan vojon*» (PIV, p.487a), «*glavo sangon soifanta*» (OV, p.586).

Oni trovas ankaŭ ĉe Kabe «*dormi ŝtonan dormon*» (PIV, p.254b), ĉe Valano «*li ridis belan blankdentan ridon*» (*Ĉu li venis trakosme?*, p.52), en la PIV2 «*li galopis sian rolon*» (p.381a).

Sed tiuj uzoj **ne** signifas, ke *gravediĝi, koniĝi, boji, utili, miri, iri, soifi, dormi, ridi, galopi* estas aŭ iĝis transitivaj.

Multaj verboj montrataj en la du PIVoj (kiuj tamen ne ĉiam samopinias) kiel samtempe *transitivaj* kaj *netransitivaj*, apartenas al tiu kategorio.

Ekzemple, *aborti, boji, drinki, enui, eskapi, ĉe'esti, galopi, guti, iri, antaŭ'iri, ĉirkaŭ'iri, en'iri, post'iri, (mal)supren'iri, koleri, komedii, kontrakti, kontrasti, kosti, loĝi, lumi, majstri, miri, pasi, penetri, plendi, plori, ridi, soifi, el'veturi, vivi, voĉ'doni (odori kaj re'veni* estas eĉ indikitaj kiel nur transitivaj!), estas prefere **netransitivaj**, ĉar ilia esenca signifo **ne** kondukas al objekto.

Sed la PIV citis ilin kun akuzativa komplemento, kio estas tute alia afero.

4) La dukategoriaj verboj (*trans-netrans*).

La PAG (p.163) asertas, ke «*unu verbo ne povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva, konservante la saman sencon... sola escepto estas fumi (la cigaro fumas: mi fumas la cigaron)*». Oni povas rebati al tio, ke *fumi-transitiva* kaj *fumi-netransitiva* **ne** havas la saman

sencon: *fumi-transitiva* signifas «*ardigi toksan substancon per inspiro*», dum *fumi-netransitiva* signifas «*ellasi fumon aŭ alian odoron*». La diferenco estas grava: se uzinkameno *fumas*, tio ne signifas, ke ĝi «*ardigas toksan substancon per inspiro*».

Kiel jam dirite, mi trovis en la dua PIV **78 verbojn**, al kiuj ĝi atribuas unu transitivan sencon kaj unu netransitivan, kun la klaraj mencioj “tr” kaj “ntr”.

Kiu pravas? Ĉu la PAG, kun **1** verbo *trans* kaj *netrans*? Ĉu la PIV, kun **78** tiaj verboj? Ni vidis, ke granda parto de tiuj verboj *laŭdire dukategoriaj* estas fakte *unukategoriaj*, kaj klasendaj, jen en la netransitivajn verbojn, jen en la transitivajn.

Sed restas kelkaj, kiuj estas **vere dukategoriaj, kun du malsamaj sencoj**.

Ekzemple, *bati-transitiva* signifas «*frapi*» (*bati sian hundon*), dum *bati-netransitiva* signifas «*esti ripete skuata*» (*ŝia koro batas forte*). La du signifoj estas tre malsamaj. Pruve, oni ne povas kunfandi la du frazojn “*ŝia koro **batas** forte*” kaj “*ŝi **batas** sian hundon*”; tio alvenus al “*ŝia koro **batas** forte sian hundon*”, kiu estus perfekte sensenca.

Se oni kunfandas la du frazojn “*la infano **ludas** en la korto*” kaj “*li **ludas** violonon*” en “*la infano **ludas** violonon en la korto*”, oni ricevas tute alian sencon. Oni ankaŭ ne povas miksi “*la arboj **folias***” kaj “*mi **folias** libron*” por fari “*la arboj **folias** libron*”.

Tio pravas, ke pluraj verboj estas vere **dukategoriaj: transitivaj KAJ netransitivaj. Sed ili havas DU signifojn tute malsamajn** (vidu iliajn signifojn en la PIV).

Jen ili: *bati, bat'adi, ek'bati, kontraŭ'batali, beki, diskuti, folii, fumi, garantii, kalkuli, korni, ludi, manovri, trans'pasi, pepi, peri, plafoni, radiki, regi, ek'regi, super'regi, respondi, snufi, soni, re'soni, sonori, ŝipi, temperi, venĝi*.

Do la regulo, ke **unu verbo ne povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva**, estas la ĝenerala regulo, imite al la slavaj lingvoj. Ĝi estas konsiderinda, sed oni nepre **ne** rigardu ĝin absoluta.

IV. Pasivigo de la netransitivaj verboj.

Zamenhof klarigis en 1890, en la gazeto *La Esperantisto*: «*En la lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon. La logiko diras, ke **ĉia verbo povas havi pasivon**, se nur la senco ĝin permesas. [...] En ĉia duba okazo oni povas uzi la prepozicion “je” aŭ la akuzativon sen prepozicio. Eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas akuzativon, vi povas en nia lingvo libere **ĉiam fari pasivon**, se nur la senco de tiu ĉi pasivo estos komprenebla*» (*Lingvaj Respondoj*, p.93).

Klare: **ĉia verbo povas havi pasivon**. Ne ĉiu verbo, sed ja **ĉia verbo**, do ĉiu speco de verbo, transitiva kaj netransitiva. Cetere, tio perfekte kongruas kun la antaŭa klarigo, ke ĉia verbo, ĉu transitiva, ĉu netransitiva, povas havi akuzativan komplementon, do povas esti uzata transitive (pli ĝuste estus “uzata kvazaŭ-transitive”).

Jen ekzemplo, kun la verbo *alveni*. Ĝia esenca signifo implicas, ke ĝi estas **netransitiva**.

La PIV1 (p.1175b) pravis, deklarante ĝin **netransitiva**; pravas ankaŭ la *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* de E.D.Krause (p.849a). Sed la PIV2 (p.1219a) bedaŭrinde eraregas, deklarante ĝin **transitiva**. Efektive, la nacilingvaj tradukoj de *alveni* estas indikitaj en la respektivaj vortaroj kun la mencio “netransitiva”: latina *advēnīre*, franca *arriver*, itala *giungere*, hispana *llegar*, portugala *chegar*, rumana *a sosi*, angla *to arrive*, germana *ankommen*, pola *nadchodzić*, rusa *прибѣтъ*.

Spite tiun netransitivecon tute certan, la lasta verso de la poemo *Al la “Esperantisto”* estas «*Kiam la celo estos **alvenita***» (OV, p.591). Kaj en la *Aldono al la Dua Libro*, ni trovas

« ni vidos, ke *nia komuna celo estas alvenita* » (p.14; OV, p.37; PIV, p.1219a).

Pro la netransitiveco de *alveni*, kelkaj personoj kredas, ke temas pri preseraro (*alvenita* anstataŭ *alveninta*). Interalie, J.Dietterle, la kompilinto de la *Originala Verkaro*, sentis sin devigata aldoni piedpaĝe « *tiel en la teksto!* » (p.37). Sed tio tute ne estas preseraro! Tiuj personoj ne atentis, ke *celo alveninta* ne havas sencon: celo ne alvenas! Ni imagu pafarkiston, kiu sendas sagon al pafcelo; evidente la sago alvenas al la pafcelo (aŭ alvenas la pafcelon!), ne la pafcelo alvenas al la sago!

Tamen, jam en 1890, Zamenhof bone klarigis la aferon: « *Eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas en nia lingvo libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu ĉi pasivo estos komprenebla. Tiel ekzemple en la versaĵo "Al la 'Esperantisto'" estas ne malregule uzita la esprimo "la celo estos alvenita" (= oni alvenos al la celo)* » (*La Esperantisto*, 1890, *Lingvaj Respondoj*, p.93).

Por esti konvinkita pri la ĝusteco de la esprimo « *celo alvenita* », sufiĉas, ke ni ekzamenos la jenan sinsekvon de modifoj: *ni alvenos al la celo* → *ni alvenos je la celo* → *ni alvenos la celon*. Tio **ne** signifas, ke *alveni* estas transitiva (eraro de la PIV2!), sed nur ke post netransitiva verbo, ni rajtas libere uzi *je*-komplementon aŭ akuzativan komplementon.

Kaj okazas ekzakte la samo, kio okazas kun transitiva verbo:

- *ni trinkos la kafon* → *la kafo estos trinkita*.
- *ni alvenos la celon* → *la celo estos alvenita*.

Pluraj tiaj esprimoj estas troveblaj, kun verbo nekontesteble netransitiva (laŭ ĝia signifo) kaj tamen uzata pasive. La unua PIV rigardis ilin, tute prave, *netransitivaj*. Bedaŭrinde, tre malprave, la PIV reviziita ligis la nocion *akuzativo* kun la nocio *transitiveco*, kaj ornamis ilin per la erara mencio "*transitiva*". Jen ekzemploj:

- *plena konscio pri la irota vojo* (Zamenhof).
- *jam lacigitaj de la mallonga pasita vojo* (Zamenhof).
- *multe da larmoj estis ploritaj pro ĝi* (Zamenhof).

La sufikso *-ebl*.

Ĝia senco estas esence pasiva. Se akvo estas *trinkebla*, ĝi estas ankaŭ *trinkota*, *trinkata*, *trinkita*, oni povas *trinki ĝin*. Ĝi aldoniĝas ĉefe al transitivaj radikoj: *legi ion* (→ *io legebla*), *manĝi ion* (→ *io manĝebla*), *rompi ion* (→ *io rompebla*), ktp.

Sed ni vidis, ke verboj nekontesteble netransitivaj povas en iaj okazoj konduki kiel transitivaj verboj, t.e. akcepti akuzativan komplementon, alpreni pasivan formon. Do en tiuj ekstremaj kazoj, ili akceptas ankaŭ la sufikson *-ebl*.

La PIV (p.1229b) citas prave *veturi* kiel netransitivan verbon, sed citas ankaŭ la formon *veturebla*. Efektive, se oni povas *veturi sur vojo*, *veturi je vojo*, *veturi vojon*, tio implicas, ke tiu vojo **estas veturebla**.

La PAG (p.464) citas aliajn ekzemplojn:

- *nekuŝebla lito* (*kuŝi en lito* → *kuŝi liton* → *kuŝebla lito*).
- *nesidebla seĝo* (*sidi sur seĝo* → *sidi seĝon* → *sidebla seĝo*).
- *irebla vojo* (*iri sur vojo* → *iri je vojo* → *iri vojon* → *irebla vojo*).

Zamenhofa ekzemplo: *la vojo estis preskaŭ neirebla kaŭze de la sablo*. Tio implicas, ke oni rajtus diri ankaŭ, ke *se forestus la sablo, oni povus iri la vojon*. Sed tio **ne** faras *iri* transitiva verbo.

Spite tiujn ekzemplojn, *kuŝi*, *sidi* kaj *iri* estas kaj restas netransitivaj verboj.

Evidente, tiuj dirmanieroj estas maloftaj, kaj ne konsilindaj al komencantoj!

Uskleco, serioza afero

Usklo, laŭ la PIV2, estas « *minusklo aŭ majusklo* ». Kaj la PIV aldonas la jenajn ekzemplojn: *atentu pri uskleco, usklecoblinda*.

Efektive, uskleco, t.e. necesa elekto inter minusklo kaj majusklo, estas nepreterlasebla parto de la skriba lingvo en ĉiuj Eŭropaj lingvoj, ĉu ili uzadas latinajn literojn, ĉu cirilajn, ĉu grekajn, ĉu armenajn. Sed tiu apartaĵo ne ekzistas en la skriboj araba, hebrea, kartvela, hindia, taja, birma, ĉina, japana, korea.

La graveco de la uskleco estas tute sama en Esperanto, kiel en la Eŭropaj skriboj.

Sed rilate al uskleco, ĉiu lingvo havas siajn proprajn kutimojn. La germana lingvo majuskligas ĉiujn substantivojn. La dana agis same ĝis antaŭ kelkaj jardekoj.

En la franca, tiu uzado estas perfekte regulita de la Tipografia Kodo. Sed Esperanto estas lingvo ege pli juna, kaj plej ofte uzata je amatora nivelo. Tial la uskleco ne obeas al reguloj same striktaj. Tamen, per la esploro de la Fundamento, de la Zamenhofaj skribaĵoj kaj de la PIV, ni klopodu trovi la **regulojn** obeatajn de la pliparto de la kleraj esperanto-uzantoj.

I. La unuagradaj reguloj pri uskleco.

Laŭ unuanima interkonsento, la jenaj vortoj alprenas komencan majusklon.

1. La vortoj troviĝantaj ĉe la **komenco de frazo aŭ de verso**.

2. La **homnomoj** (personaj nomoj, familinomoj, pseŭdonimoj), ĉu nacilingvaj, ĉu Esperantaj: *Anno, Grabowski, Izraelo, Jesuo, Kabe, Ludoviko, Napoleono, Petro, Sganarelo, Sokrato, Tolstoj, Unuel, Zamenhof*.

Kiam homnomo estas akompanata de kutima epiteto adjektiva aŭ substantiva, ankaŭ ĉi tiu prefere alprenas majusklon (PIV): *Aleksandro la Granda, Aleksandro la Macedona, Filipino la Bela, Haruno la Saĝa, Karolo la Granda, Karolo la Maltima, Tomaso la Akvinano*.

Sed la PAG (p.99) skribas: *Frederiko la granda*.

3. La nomoj de **dioj, diinoj, anĝeloj, sanktuloj**: *Alaho, Avalokiteŝvaro, la Ĉiopova, Dio, la Eternulo, la Ĝinnoj, Lucifero, la Madono, Oziriso, la Plejpotenculo, la Sankta Spirito, la Sankta Virgulino, Satano, la Triunuo, Zeŭso*.

Analoge: *la Forto reganta la mondon, la Fortuno, la Morto, Notoso* (suda vento).

4. La nomoj de **dinastioj**: *la Almoravidoj, la Ĝoŝoj, la Hohenstaŭfoj, la Karolidoj, la Makabeoj, la Merovidoj, la Napoleonidoj, la Plantaĝenetoj, la Stuartoj*.

5. La **geografiaj nomoj**, t.e. la nomoj de kontinentoj, landoj, provincoj, urboj, montoj, maroj, insuloj, riveroj, lagoj, ĝardenoj: *Alpoj, Alzaco, Azio, Danubo, Ekstrem-Oriento, Kanado, Kazohinio, Koreo, Lemano, Majorko, Mediteraneo, Nord-Ameriko, Romo, Rusio, Sud-Koreo, Tuilerioj*. Same pri la nacilingvaj: *Fürth, Vjazma* (OV, p.89).

Ĝenerale, oni majuskligas ankaŭ la nomojn de fikciaj lokoj: *Averno, Edeno, Eldorado, Elizeo, Hadeso, Infero, Limbo, Paradizo, Ŝeolo, Tartaro*.

La nomoj de **kardinalaj punktoj** alprenas majusklon nur tiam, kiam ili difinas parton de la Tero: *la Eklezio de Oriento, la homoj de Nordo, la landoj de Sudo*.

Sed ili estas komunaj nomoj, kiam ili rilatas al parto de lando: *Skotlando situas en la*

nordo de Britio, Skotlando situas norde de Anglio.

Kiam geografia nomo konsistas el **substantivo plus adjektivo**, laŭ kiu ajn ordo, ambaŭ estas majusklaĵ. PIVaj ekzemploj: *Andoro Malnova, Arabia Duoninsulo, Balta Maro, Bengala Golfo, Beringa Markolo, Bristola Golfo, Brita Insulo, Brita Kolumbio, Flava Rivero, Franciĵ Alpoj, Francia Centra Montaro, Franca Gujano, Gvineo Ekvatora, Ĝeneva Lago, Hinda Oceano, Hinda Unio, Malgrandaj Antiloj, la Malnova Mondo, Maro Blanka, Maro Nigra, Monto Blanka, Morta Maro, Okcidenta Bengalio, Pakistana Panĝabo, Persa Golfo, Persa Maro, Salomonaj Insuloj, Valona Brabanto.*

Tamen vidu ĉi-poste la paragrafon pri adjektivoj.

La vorto **ŝtato**, majuskla en pluraj nacilingvoj (*l'État, lo Stato*), estas minuskla en Esperanto.

6. La loĝantonomoj (kiujn oni ne konfuzu kun la popolnomoj). Temas ĉi tie pri la nomoj formitaj el geografia nomo plus sufikso *-ano*.

Fundamento: *Parizanoj, Rusujanoj* (§37), *Nov-Jorkano, Varsoviano* (§37, en la vortlisto).

Zamenhofaj ekzemploj: *Babilonanoj* (*Revizoro*, p.9), *Frankfurtanoj* (*Leteroj*, I, p.285), *Ĝenovanoj* (*Leteroj*, II, p.315), *Kembriĝanoj* (*OV*, p.375), *Krakovanoj* (*Leteroj*, II, p.303), *Laplandano* (*Rabistoj*, p.13), *Taŭridanoj* (*Ifigenio*, p.30), *Troĵanoj* (*Ifigenio*, p.103), *Usonanoj* (*OV*, p.394), *Vienanoj* (*Leteroj*, II, p.303).

PIVaj ekzemploj: *Atenanoj, Eŭropanoj, Islandano, Kartaganoj, Romanoj, Sud-Afrikanoj, Usonano, Vendeano.*

Estas do unuanima (preskaŭ) interkonsento por majuskligi la loĝantonomojn.

La popolnomoj (simplaj nomoj, sen sufikso) estas alia afero. Vidu ĉi-poste.

7. La nomoj de planedoj, steloj, konstelacioj, zodiakaj signoj: *Granda Hundo, Luno, Neptuno, Polusa Stelo, Riĝelo, Sagitario, Suno, Taŭro, Tero, Venuso.*

8. La nomoj de grandaj konstruaĵoj: *Forumo, Koloseo, Kremlo, Luvro, Panteono, Partenono, Taĝ-Mahalo, la Templo.* Sed *la Pariza triumfarko* havas minusklon en la PIV.

9. La nomoj de institucioj, oficialaj aŭ ne: *la Akademio, la Centra Komitato, la Dieto, la Eklezio, la Eŭropa Unio, la Komunista Partio, la Korteso, la Parlamento, la Ronda Tablo, la Tri Koboldoj, Universala Esperanto-Asocio, Universala Kongreso, la Unuiĝintaj Nacioj.*

10. La titoloj de libroj kaj kantoj: *la Bagavadgito, la Biblio, la Espero, la Fundamenta Krestomatio, la Hagado, la Korano, la Lingvaj Respondoj, la Marseljezo, Nova Testamento, la Odisead, la Plena Ilustrita Vortaro, la Proverbaro Esperanta, Streĉita Kordo, la Torao, la Universala Vortaro, la Unua Libro, la Vedioj.*

Sed la PIV skribas *evangelio* kun minusklo.

Se difina artikolo apartenas al la titolo, ankaŭ ĝi alprenas majusklon: *La Batalo de I' vivo, La Neĝa Blovado, La Rabistoj, La Revizoro, La Ŝtona Urbo.*

Kiam titolo estas kompleksa, oni ofte majuskligas nur la unuan vorton kaj eventuale la antaŭajn artikolon kaj adjektivon: *Ĉu vi kuiras ĉine?, Dua Libro de I' lingvo internacia, La Eta Princo, La Fundo de I' mizero, Koko krias jam, Kredu min, Sinjorino!, Sen eliro, Sonĝe sub pomarbo, Ŝia lasta poŝtkarto.*

Sed ne temas pri konstanta uzado. Oni trovas ankaŭ: *La Fundo de I' Mizero, Sen Eliro, Ŝia Lasta Poŝtkarto.*

11. La titoloj de gazetoj: *El Popola Ĉinio, Fonto, Heroldo de Esperanto, Monato.*

Se difina artikolo apartenas al la titolo, ankaŭ ĝi alprenas majusklon: *La Esperantisto,*

La Gazeto, La Kancerkliniko, Le Monde de l'Espéranto, La Sago.

12. La monatomoj: *Januaro, Februaro* (Fundamento, §12), *Vendemiero, Ramadano* (PIV), *Tiŝrio, Muharamo, Toto, Hekatombeo* (nePIV).

Ĉi-rilate, la uzado de Zamenhof ne estis konstanta, sed la majuskligo de la monatomoj estas preferinda: uzata en la Fundamento kaj en ambaŭ eldonoj de la PIV.

Inverse, la nomoj de tagoj kaj sezonoj neniel estas propraj nomoj: *lundo, somero*.

13. La nomoj de festoj kaj historiaj periodoj: *Anunciacio, Aŝuro, Ĉieliro, la Granda Fasto, Kipuro, Kristnasko, Mezepoko, Pasko, Pentekosto, la Renesanco.*

La Fundamento skribas iom ne-konsekvence: *kristnasko, Pasko* (U.V.). Tamen la majuskligo ŝajnas preferinda en ĉiuj tiaj kazoj.

14. La nomoj de eventoj kaj gravaj objektoj: *la Bulonja Deklaracio, la Centjara Milito, la Granda Ĉarto, la Ora Ŝaffelo, la Reformacio, la Sankta Gralo.*

15. La vortoj Esperanto, Esperanta, Esperante, Esperantujo, por diferencigi ilin de la participo de la verbo *esperi*. Sed oni skribas per minusklo *esperantaĵo, esperantisto, esperantista, esperantistaro, esperantlingva*.

Analoge, oni majuskligas: *Lingvo Internacia, Volapük*, kiujn oni rigardu propraj nomoj.

16. La nomoj de titoloj (*prezidanto, generalo, ktp*) alprenas majusklon (laŭvole) nur en la leterkapoj: *Estimata Sinjoro, Sinjoro Prezidanto, Kara Generalo, ktp*. En la aliaj kazoj, oni uzas minusklon: *mi ricevis leteron de sinjoro X., de la prezidanto Y., ktp*.

Restas nun pluraj specialaj kazoj pritraktotaj aparte kaj detale.

II. Specialaj kazoj.

1. La popolnomoj.

Koncerne la popolnomojn (kiujn oni ne konfuzu kun la loĝantonomoj, ĉi-antaŭe), la problemo ĝis nun ne ricevis definitivan solvon, kiu estus de ĉiuj aplikata.

«*La popolnomoj per si mem neniel estas propraj nomoj: esti franco, ruso ktp. ne estas pli individuiga eco, ol esti longkraniulo, avarulo aŭ ftizulo. Sed tial ke la popolnomoj estas en strikta rilato kun la landonomoj, kiuj ja estas propraj, ĉar personigaj, oni plurfoje atribuis la majusklecon ankaŭ al ili.*» (PAG, p.67).

En la Fundamento, ni trovas kun minusklo: *ruso* (§16, en la vortlisto), *poloj* (§27), *hebreoj* (§36), *francoj* (§37), *germano, rusoj* (§27, 37, 40).

Sed kun majusklo: *Turko* (§20, en la klarigoj pri *-uj'*, kaj ankaŭ en la U.V. sub *-uj'*), *Hispano* kaj *Germano* (§34, en la vortlisto), *Franco* (§37, en la vortlisto).

Do la Fundamento agas ajne, ne donante definitivan regulon.

En siaj verkoj, Zamenhof uzis:

- Jen minusklon: *angloj, francoj, poloj, rusoj* (OV, p.362), *poloj, rusoj* (OV, p.322), *juna dano* (*Hamleto*, p.143), *la francino* (*Marta*, p.28), *la grekoj* (*Ifigenio*, p.23), *la grek' Atreo* (*Ifigenio*, p.96), *hebreo* (*Genezo*, XIV,13, *Leteroj*, I, p.106), *ĉiu hebreo* (*Rabeno*, p.8, *Rabistoj*, p.32), *la Frankfurtaj hebreoj* (*Rabeno*, p.20), *la hispano* (*Rabeno*, p.44), *la poloj* (*Hamleto*, p.140), *la turkoj* (*Revizoro*, p.10, 11).

- Jen majusklon: *Tataroj kaj Armenoj* (OV, p.370), *Ludoj, Anamoj, Lehaboj, Naftuĥoj, Patrusoj, Kasluĥoj, Filiŝtoj, Kaftoroj* (*Genezo*, X,13-14), *Hagar la Egiptino* (*Genezo*, XVI,3), *la lando de la Hebreoj* (*Genezo*, XL,15), *Asiroj* (*Revizoro*, p.9), *la Aŭstrojn* (*Rabistoj*, p.21), *kielaj*

Danoj (*Hamleto*, p.48), kontraŭ la *Francoj* (*Rabistoj*, p.25), la *Dano Holger* (*Fabeloj*, II, p.109), *Hotentoto* (*Rabistoj*, p.13), la *Turkojn* (*Rabistoj*, p.17).

Do ankaŭ Zamenhof ne donis definitivan regulon.

En *La Faraono*, Kabe skribas kun majusklo: *la Grekoj, Hebreino, la Hebreoj*.

La unua PIV majuskligis ĉiujn popolnomojn: *Abiseno, Afgano, Ajnuo, Albano*, ktp. Mi mem sekvis tiun kutimon en mia *Konciza Etimologia Vortaro*, ne pro persona prefero, sed pro obeemo al la kutimo prezentata en la tiama PIV.

Sed la dua PIV (reviziita) revenis al pli logika sinteno, kun la konstanta **minuskligo** de tiuj nomoj: *abiseno, afgano, ajnuo, albano*, ktp. Mi juĝas tiun sintenon nepre aprobinda: oni neniel povas atribui al tiuj nomoj la kvaliton de propraj nomoj.

Iom nekonsekvence, la PIV2 skribas tamen kun majusklo: *Akeo, Akvitano, Feako, Gallo, Lapitoj, Pikardo, Toskano* (kapvortoj); *Heleninoj* (p.424b).

Cetere, la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (*Aktoj de la Akademio*, II, p.13) entenas 15 oficialigitajn popolnomojn **minuskle** skribitajn: *albano, arabo, armeno, belgo, bulgaro, dano, estono, etiopo, greko, hungaro, italo, latvo, norvego, rumano, svedo*.

2. Adjektivoj formitaj el popolnomo.

Almenaŭ ĉi tie ekzistas, eble ne absoluta unuanimeco, sed tamen tre forte majoritata sinteno: la uzo de **minusklo**. Tiu uzado estas apogita de la plej elementa logiko: se ĉi tiu rigardas *franco, ruso* aŭ *ĉino* kiel komunajn nomojn, oni ne vidas per kia miraklo ili iĝus propraj per adjektiviĝo.

Cetere, jen klara indiko de la **Fundamento** (§34): *lingvo hispana, vortaro hispana-germana*, kun **minuskloj**. Al tiu Fundamenta ekzemplo preskaŭ nenio estas aldonenda, krom eventuale la Zamenhofaj ekzemploj: *hebrea knabinon, hebrea famiĉestro, la hebrea komunumo, hispanaj hebreaj kaj hispana kavaliro* (*Rabeno de B.*, p.8, 12, 20, 40), *kurso de latina kaj greka lingvoj, la germanaj kursoj* (cititaĵe de PIV, p.642a).

Bedaŭrinde, Zamenhof mem ne ĉiam obeis la Fundamenton: *la Bohemaj arbaroj, la Dana blazono, la flagoj Dana kaj Sveda, lando Egipta, la Egipta sklaveco, la Egiptaj plagoj, la tutan Egiptan teron, Franca ĝardeno, la Grekan landon, Hungara kavaliro, la Norvega reĝo, la Ŝvabaj provincoj*.

La PIV (1 kaj 2) uzas preskaŭ ĉiam **minusklon**: *angla vigla danco, angla reĝ(in)o, frua angla stilo, la armena genocido, belga monunujo, sub brita regado, ĉina frandajo, ĉinaj ideogramoj, la franca lingvo, francaj regimentoj, franca respublika kalendaro, germana duklando, du germanaj urboj, reĝolando germana, ĝermana tribo, la greka alfabeto, la helenaj gedioj, tri helenaj herooj, helena oratoro, hinda epopeo, la hispana gripo, hispana piŝtolo, hungara kostumo, itala komedio, japana kuirarto, japana imperiestro, mongola dinastio, la norvegaj dialektoj, persa kato, de persa deveno, la persan satrapon, la pola literaturo, la rusa alfabeto, iama rusa monunujo, sveda klimato, svedaj reĝoj, svisaj horloĝoj, la turka lingvo, la turka ŝtato*.

Eĉ la unua PIV, kiu tamen uzadis majusklon por la popolnomoj (*Anglo, Ĉino, Franco*, ktp), ĉiam uzis nur **minusklon** (*angla, ĉina, franca*, ktp) por la respondaj adjektivoj.

Sama uzado de la **minusklo** estas trovebla, kiam la apuda nomo estas propra, do majuska: *la angla Eklezio, franca Konvencio, franca Mezepoko, franclingva Kanado, la germana Regno, la helena Elizeo, la helena Pozidono, la itala Renesanco*.

Sed en nia suba mondo nenio estas perfekta. La PIV2 liveras ankaŭ (tamen tre minori-

tate): *la Japano, Germana, Aŭstra imperio, la Franca, Brita imperio* (p.466a), *Frankaj ĉefoj aŭ reĝoj* (p.731a), *Maŭraj reĝoj* (p.417a), *Brita kronprinco* (p.553a).

Analoge: *Franca Revolucio, Mezepokaj ekleziuloj, Mezepokaj eposoj, Mezepoka kredo, Renesanca kastelo.*

La uzado de majusklo estas normala, kiam temas pri oficiala nomo: *la Germana Demokratia Respubliko (G.D.R.), la Rom-Germana Imperio.*

3. Adjektivoj formitaj el propra geografia nomo.

Ekzistas ia majoritato por **majuskligi la geografiajn adjektivojn.**

En la Zamenhofa *Originala Verkaro*, ni trovas: *la kongreso Antverpena* (p.406), *Barcelonaj okazintaĵoj* (p.391), *la Bjelostoka buĉado* (p.370), *niaj aliaj Dresdenaj amikoj* (p.565), *Usonaj amikoj* (p.400), *Usonaj samideanoj* (p.394).

En aliaj Zamenhofaj verkoj: *la Alkantara ponto* (Rabeno, p.43), *la Andaluziaj floroj* (Rabeno, p.41), *la Aragoniaj hiacintoj* (Rabeno, p.41), *Lombardiaj ŝtofoj* (Rabeno, p.10), *Nurenbergaj elpelitoj* (Rabeno, p.32), *Saratova gubernio* (Revizoro, p.14, 32), *Trojaj muroj* (Ifigenio, p.6).

La foliumado de la PIV liveras (tre majoritate): *Afrikaj lingvoj, la Anglia krono, Atlantikaj specioj, Atlasa cedro, Aŭstraliaj birdoj, Azia popolo, Babilona ekzilo, Balkanaj landoj, Ĉinia efedro, Egiptia landlimo, Eŭropaj koloniistoj, Frigia reĝo, la Graŭbinda lando, Himalaja lariko, Hindia antilopo, Hindiaj kaj Pacifikaj insuloj, Kamĉatka rododendro, Kartagaj generaloj, la Kordova kalifejo, Londona kvartalo, Lorena kiŝo, Mediteraneaj fiŝoj, Mediteranea regiono, Napola komedio, Nepala gento, la Nicea koncilio, Pariza grupo, Praga printempo, Rodana valo, la Roma aristokrataro, la Romaj cirkoj, la Roma gento, Romana amfiteatro, Romiaj imperiestroj, Siria gento, Sud-Amerika, Svislanda kantono, Tibeta budhismo, Troja princo, Venecia skolo.*

Sed en la PIV oni trovas ankaŭ (tre minoritate): *havaja gitaro* (p.1197b), *specio mediteranea, usona film-industrio.*

Tamen la konstanta majuskligo eble ne estas la perfekta solvo. La Antaŭparolo de la PIV (p.24a) ŝajnas pledi por **minuskligo**: «*la ĝenerala minuskligo estas certe rekomendinda por eviti tiajn nekoheraĵojn, kiaj la germanaj, Nederlandaj, japanaj kaj Usonaj kongresanoj*». Certe ĝi pravus. Mi aldonas: «*la lingvoj angla, Nederlanda, sveda kaj Islanda*» estas katastrofe nekohera skribmaniero.

4. Geografiaj nomoj konsistantaj el adjektivo + substantivo.

Se la tuto de ambaŭ vortoj (adjektivo + substantivo) formas unu geografian (aŭ historian) unuon, la **majuskligo** de ambaŭ vortoj ŝajnas preferinda. Jen PIVaj ekzemploj: *Arabia Maro, la Ĝeneva Konvencio, Italia Riviero, Marŝalaj Insuloj, Mediteranea Eŭropo, Norda Maro, Ontario Provinco, grandaj Usonaj Lagoj, Viena Kongreso.*

Sed oni minuskligas la substantivon, kiam la tuto de ambaŭ vortoj **ne** konsistigas unuon: *Mediteranea regiono, la Roma imperio, Rusia duoninsulo, Usonaj negroj.*

Tamen la PIV kelkfoje, iom ne-konsekvence, minuskligas la substantivon, eĉ kiam la tuto de ambaŭ vortoj konsistigas unuon: *Ganga delto, Ĝeneva lago, Ĝibraltara markolo, Hindia duoninsulo, Ioniaj insuloj, Manikaj insuloj, Mesina markolo, la Sundaj insuloj, Tonkina golfo.*

Kelkfoje, ĝi prezentas du versiojn en du malsamaj lokoj: *Boromeaj insuloj kaj Boromeaj Insuloj, Egea maro kaj Egea Maro, Kaspia maro kaj Kaspia Maro.*

En tiaj kazoj, la konstanta majuskligo de ambaŭ vortoj ŝajnas preferinda.

Kiel en ĉiuj kazoj, ni ne estu dogmemaj. La PIV skribas tute ĝuste (p.24a): « *plena stila libereco ja ekzistas por elvoki la Parizajn monumentojn kaj la parizajn morojn, la Usonan politikon kaj la usonan vivmanieron* ».

Saĝaj paroloj.

5. Adjektivoj formitaj el propra homnomo, di-nomo aŭ bestonomo.

Tre ofte la PIV majuskligas ilin: *Aristotela skolo, Bartolomea nokto, Ezopa Saĝo, Freŭda, Furiera, la Gregoria kalendaro, Haleja kometo, Homeraj himnoj, Jova templo, Kristofora herbo, Leona golfo, Markova procezo, Paŭlaj letĉeroj, la Ptolemea epoko, la Ŝekspira dramo, Tajlora*.

Ĉe Zamenhof: *Atrea gento, Tantalado domo (Ifigenio, p.52, 96, 98), Herostrata laboro*.

Sed oni trovas en la PIV ankaŭ minusklajn adjektivojn homnomajn: *cezara, diofanta, diraka, eŭklida, farenhejta, freŝea, hevisida, kartezia, koŝia*.

Estus malfacile starigi regulon aplikindan en ĉiuj kazoj.

6. Komunaj nomoj formitaj el propra homnomo kun sufikso.

Estas evidente, ke vortoj kiel *kristano* aŭ *marksisto* havas neniun el la karakterizaĵoj de propra nomo. Sed ili estas formitaj el propra nomo. Ĉu do majuskligi ilin aŭ ne?

Ankaŭ ĉi tiu problemo ĝis nun ne ricevis unuaniman solvon.

En la Fundamento, ni trovas en la sama paragrafo (§37): *Luteranoj* kaj *Kalvinanoj*, kiuj evidente estas pluformitaj el la propraj nomoj *Lutero* kaj *Kalvino*. Sed ankaŭ: *kristanoj*, kun minusklo, tamen derivitan de *Kristo* (hom-nomo aŭ di-nomo, dependas de onia opinio), skribita kun majusklo. La antaŭa paragrafo (§36) liveras: *Izraelidoj*, derivitan de la propra homnomo *Izraelo*. Do la Fundamento ne liveras unuecan uzadon.

Same, en la Zamenhofa Biblio, ni trovas: *Amonidoj, Ĥetidoj, Jebusidoj, Kenidoj, Moabidoj*, kaj multajn aliajn.

Sed Zamenhof skribis ankaŭ *mahometanoj* kaj *volteranoj*, kun minusklo, kvankam tiuj vortoj venas de la propraj homnomoj *Mahometo* kaj *Voltero*.

Foliumante la PIVon, oni trovas kun minusklo: *aristotelismo, benediktano, bernardanoj, cezarismo, dominikano, epikurano, epikurismo, franciskanismo, hilelismo, hitlerismo, judaro, judismo, karmelano, karteziismo, leninismo, marksismo, marksisto, platonismo, saturnismo, stalinismo, ŝvarcaĵo, tajlorismo, zamenhofeco*.

Sed kun majusklo: *Amoridoj, Evemerismo, Freŭdismo, Hegelano, Hegelismo, Hitlerano, Kitidoj, Spinozismo, Ŝvanomo, Trockismo, Volterano*.

Starigi regulon ŝajnas do neeble. Tamen la uzado de minusklo ŝajnas pli ofta kaj pli logika.

7. Vica numeralo ĉe la nomo de reĝo, imperiestro, papo.

La PIV pekas ĉi-rilate per granda manko de konstanteco: *Elizabeto la Unua* (p.283a), *Gregorio la Unua* (p.408a), *Karolo la Unua* (p.537a), *Napoleono la Unua* (p.773a, 1200b), *Konstanteno 1a* (p.649a), *Viktoro 1a* (p.1234a), *Napoleono 1a* (p.1216b), *Napoleono la 1-a* (p.1006b), *Napoleono la dua* (p.259a), *Amenemheto la Tria* (p.649b), *Napoleono la Tria* (p.773a, 1179a), *Henriko la kvara* (p.645b), *Siksto la Kvara* (p.1036a), *Karolo la Kvinna* (p.537a, 648a), *Georgo la Sesa* (p.1029b), *Karolo la Sepa* (p.1024b), *Karolo la oka* (p.803b), *Karolo la IXa* (p.775b), *Pio la deka* (p.222a), *Ludoviko la 14a* (p.962a).

Sed la PAG (p.99) skribas : *Ludoviko la dekkvara*. Kabe skribas : *Ramzes XII*, kaj la Fundamenta Krestomatio : *Francisko I, Leono X, Johano II, Henriko VII* (p.73, 90, 94).

Eventuale, ni starigu kiel regulon : *Gregorio la Unua*, aŭ *Karolo la IX^a*, ktp.

8. La pronomoj *mi, vi, li, ni*, la adjektivoj *mia, via, lia, nia*.

Kiam oni konsultas la leterojn de Zamenhof, oni konstatas kun eta miro, ke li ofte skribas la pronomon *Vi* kun majusklo. Li klarigis : « *Ordinare mi skribas "vi", kiam mi parolas al unu persono familiare, kaj "Vi", kiam mi parolas al multaj personoj aŭ al unu persono kun respekto. Vi trovas tiun ĉi diferencon ne bezona, kaj mi konsentas, ke vi estas prava. Tiu ĉi maniero de skribado estas nur mia persona kutimo kaj havas nenion komunan kun la gramatiko de nia lingvo* » (*Lingvaj Respondoj*, p.77).

La afero estas klara : tio estas nur persona kutimo, kiun imiti neniu estas devigata.

Aliflanke, oni trovas la pronomojn *Mi, Vi, Li, Ni, Si* kaj la posesivojn *Mia, Via, Lia, Nia, Sia*, kun majusklo, kiam ili rilatas al Dio, en religiaj tekstoj, interalie en la Biblio.

- *Ni kreu homon laŭ nia bildo, similan al ni* (*Zamenhofs Biblio*, Gen 1²⁶).
- *Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni* (*Londona Biblio*, Gen 1²⁶).
- *Tiam Li parolos al ili en Sia kolero* (*Biblio*, Psa 2⁵).
- *Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min?* (*Biblio*, Psa 22¹).
- *apud trankvilaj akvoj Li kondukas min* (*Biblio*, Psa 23²).

Tio estas evidente laŭvola.

III. Du strangaj malsanoj : majuskulto, minuskulto.

Unue, ni iom ekzamenos kelkajn nacilingvajn kutimojn, komparante diverslingvajn tradukojn de la esprimo "la franca lingvo" :

France : la langue française

Itale : la lingua francese

Hispane : la lengua francesa

Portugale : a língua francesa

Rumane : limba franceză

Germane : die französische Sprache

Svede : det franska språket

Novgreke : η γαλλική γλώσσα

Litove : prancūzų kalba

Ruse : французский язык

Bulgare : френски език

Pole : francuski język

Ĉeĥe : francouský jazyk

Albane : gjuha frenge

Hungare : a francia nyelv

Finne : ranskalainen kieli

Oni konstatas, ke ĉiuj skribas la adjektivon *franca* kun komenca minusklo. Ekzistas esceptoj, sed ili estas tre malmultaj :

Angle : the French language

Nederlande : de Franse taal

Interesa konstato : kun tre forta majoritato, la etnaj lingvoj uzas minusklan adjektivon, same kiel Esperanto.

a) Stranga malsano : majuskulto.

Foje okazas, ke anglalingvanoj aŭ nederlandlingvanoj (ve, ne nur ili...) insistas por imiti blinde sian nacilingvan kutimon, kaj nepre skribadas en Esperanto : *Hebrea originalo, Greka traduko, la Germana lingvo, la Latina skribo, la Araba historio, la lingvoj Latina kaj Rusa, la Okcitanana ortografio*, ktp. Ridinde...

Kvankam tio eble ne estas konsiderenda kiel grava eraro, tio tamen ŝokas la okulojn de ĉiu ajn, kiu al kutimiĝis al la legado de klasikaj Esperantaj tekstoj bonstile skribitaj.

Efektive, ĉu obei blinde al siaj propraj nacilingvaj kutimoj, ĉu obei al la **Fundamento** kaj

al la Zamenhofa uzado, en ĉi tiu dilemo, mi nepre voĉdonas por la lasta.

Kaj tiel devus agi ĉiuj Esperanto-uzantoj, inkluzive de la akademianoj.

Estus do dezirinde, ke oni ne imitu la kutimajn, obsedajn kaj obstinajn maniojn de iu Francia bulteno, *La Sago*, eble saga, sed nek saĝa nek sagaca: "la Franca kaj Germana registaroj, la Angla lingvo, Franclingva parolado, Franca generalo, libro Franclingve titolita, verkita de Angla filozofo, Svisaj frankoj, ktp".

Tiu stranga manio (konstatebla ekde la n-ro 1) trovas apogon nek en la Fundamento, nek ĉe Zamenhof (krom malmultaj esceptoj), nek en la etnaj lingvoj (krom en tre malmultaj). **Kaj ĉefe: nek en la logiko.** Do: ĝi estas absolute ne pravigebla.

Por klarigi la ekziston de tiu manio, la sola senc-hava hipotezo estas do, ke ĝi **imitadas sklave la uson-anglan kutimon.** Ĉu ne estas priplorinde, ke la uson-anglisma lingva diktatorado infektas eĉ Esperanton, kvankam Esperanto devus esti la lingvo plej rezista kontraŭ ĝi?!!!

b) Stranga malsano: minuskito.

Estas tre bedaŭre, ke la japano nomita *Itô Kanzi*, kaj kromnomita *Ludovikito*, ne komprenis, ke la ĝusta uzo de uskloj estas grava nepreterlasebla parto de la skriba lingvo en multegaj lingvoj, interalie en Esperanto. Lia serio "*iam kompletigota plena verkaro de I.I.zamenhof*" montras katastrofan kripligon de la Zamenhofaj tekstoj per la konstanta uzo de ĉiuokazaj nuraj minuskloj.

Al tiu homo tre oportune aplikiĝas la PIVa adjektivo *usklecoblinda*.

Lia reeldono de "*fabeloj de andersen*" (koboldoimuna!) estas makulita de postparolo lia (ne koboldoimuna, almenaŭ rilate la usklecon). Ho Zamenhof, ho Andersen, vi tamen pardonu lin!

Por klarigi tiun manion, la sola senc-hava hipotezo estas do, ke ĝi **imitadas sklave la japanan kutimon.** Efektive, la japana skribo (same kiel ĝenerale la Aziaj skriboj) ne konas diferencojn inter majuskloj kaj minuskloj. Kvazaŭ apartaĵo de la japana skribo devus fariĝi la normo en la Esperanta skribo!!!

Tiu nekuracebla malsano igas tiun grandegan laboron preskaŭ senvalora.

IV. Lastvorte.

La regulojn, kiujn mi provis starigi, oni devas rigardi tute ne kiel mian propran preferon aŭ deziron, ankoraŭ malpli kiel mian ordonon (kiarajte mi donus ordonojn?), sed kiel la esprimon de la **majoritata uzmaniero de Esperanto far kleraj homoj.** Tiu majoritata uzado fontas ĉefe el la studo de la kutimoj de diversaj aŭtoritatuloj: la *Fundamento*, la verkoj de Zamenhof, la *Plena Ilustrita Vortaro*.

Evidente, ĉiu ajn plene rajtas memaŭtoritate flankeniĝadi de tiuj ĉi reguloj, nur kondiĉe, ke li farus tion ne ajne kaj senpripense, sed **intence kaj konscie.**

Neniu persono kaj neniu Akademio, devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon, eĉ ŝanĝi majusklojn al minuskloj!... ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus LA KOMENCO DE NIA MORTO »
(Antaŭparolo de la Fundamento, iom modifita).

Virinaj nomoj

Ĉiu esperantisto scias, eĉ post nur unu horo da lernado, ke substantivoj finiĝas per **-o**. Kaj homnomoj estas ja substantivoj. Jen ekzemploj el la Fundamento: *Aleksandro, Antono, Aŭgusto, Ernesto, Georgo, Johano, Jozefo, Ludoviko, Miĥaelo, Nikodemo, Nikolao, Paŭlo, Petro, Stefano, Teodoro, Vilhelmo*; *Anno, Berto, Elizabeto, Emilio, Henrieto, Klaro, Mario, Sofio*.

Ni povas konstati, ke la lastaj ok estas virinaj nomoj kaj tamen finiĝas per **-o**. Kial ne? Virinaj nomoj estas ja substantivoj. Kaj en Esperanto, gramatika genro ne ekzistas. Ekster la Fundamento, en diversaj Zamenhofaj verkoj, oni trovas virinojn nomatajn *Amalio, Angeliko, Anneto, Diano, Elizo, Evelino, Frino, Gertrudo, Heleno, Ifigenio, Jadvinjo, Jakelino, Janjo, Julinjo, Karonjo, Karolino, Lukrecio, Malvino, Ofelio, Perpetuo, Sonjo*.

Sed en la hindeŭropaj lingvoj, oni plej ofte distingas facile inter viraj nomoj kaj virinaj. En tuta Eŭropo, *Maria* estas virino; male, viro povas nomiĝi *Mario, Marius*, sed ne *Maria* (krom tamen kelkaj esceptoj).

Same, en la semidaj lingvoj: la hebreaĵoj *Ada, Eva, Lea, Rebeka, Sara* estas virinaj; la arabaj nomoj *Aiŝa, Fatima, Ĝamila, Ĥadiĝa, Malika, Nahida, Zohra* estas virinaj.

Do, en Esperanto, kiel distingi virojn nomatajn (france) *Antoine, Auguste, Emmanuel, Jacques, Jean, Joseph, Louis, Michel, Pierre*, disde virinoj nomataj (france) *Antoinette, Augustine, Emmanuelle, Jacqueline, Jeanne, Joséphine, Louise, Michelle, Pierrette*?

La Fundamenta respondo estas simpla: ni uzu la sufikson **-ino**. La Fundamento liveras *Paŭlino* (§ 3). Ĉe Zamenhof ni trovas: *Jakelino, Johanino, Karolino, Klaŭdino, Kristino, Ludovikino, Maturino*. Ni aldonu pelmele: *Antonino, Aŭgustino, Emanuelino, Jakobino, Jozefino, Juliino, Miĥaelino, Petrino*. Tiu solvo estas Fundamenta: ni ne povas forigi ĝin. Bedaŭrinde, tiuj nomoj estas terure longaj kaj pezaj. Kaj kiel traduki la italajn nomojn *Emilio, Mario* (por viroj) kaj *Emilia, Maria* (por virinoj)? Ĉu *Emilio, Mario* por ambaŭ? Ĉu *Emilio/Emiliino* kaj *Mario/Mariino*? Kaj ĉu *Lukrecio* respondas al la latina *Lucretius* (vira) aŭ al *Lucretia* (virina)? Ne tre kontentige...

En 1931, Kalocsay trovis unu solvon (sed ne la solvon) kaj proponis ĝin en sia eseo *Lingvo Stilo Formo* (p.81). Li deiras de la nomo *Marta*, ĉefa persono de la samnoma romano de Eliza Orzeszko, tradukita de Zamenhof. Kalocsay skribas pri la nomo **Marta**: « Ĝin naskis neceso. Marto estus ja nomo de monato. Martino ŝajnus vira nomo. Martenino estus vortomonstro. » Por Kalocsay, la solvo *Marta* « montras al ni vojon, solvi preskaŭ tute nian problemon » (prave, li diras "preskaŭ"). La nova regulo estas do, ke « ĉiu virina nomo finiĝas per **-a** ». Kaj por ne enmeti rompon en la Fundamenton, oni faru la ruzan supozon, ke *Johana, Jozefa* aŭ *Marta* estas adjektivoj: ili estas mallongigoj de *Johana ino, Jozefa ino, Marta ino*, ktp. Tiu elturniĝo estas tre lerta, sed tamen — ni konfesu tion — iom artefarita. Plie, virinoj rajtus plendi, ke ili estas nur adjektivoj...

La PAG (p.455) liveras al ni tutan kolekton da tiaj nomoj: *Ada, Agata, Angelika, Anna, Antonia... Viola, Virginia, Zaira, Zenobia, Zita*.

Oni tuj vidas la profundan eŭropecon de tiu sistemo. Mi forte dubas, ke por japana orelo, homnomo finiĝanta per **-o** elvokus viron, dum homnomo finiĝanta per **-a** elvokus virinon. Mi iam konatiĝis kun japanino nomata *Sumiko* (スミ子). Al mia franca orelo — ĉar

mi konfesas, ke mia orelo estas franca —, tiu nomo sonas pli vire ol virine. Tamen virino ŝi ja estis, kaj plu estas. Evidente, franca orelo ne estas internacia kriterio. Same, por ŝia japana orelo, ĉu *Johano* sonas vire, dum *Johana* sonus virine? Tre dube...

Oni vidas ankaŭ la malavantaĝon de tiu sistemo: se propra virina nomo finiĝas per **-a**, kiamaniere pluformi posed-adjektivan formon? Tiam malaperas unu fundamenta trajto de la lingvo: la tuja rekono de la kategorio de vorto (substantivo se finiĝas per **-o**, adjektivo se finiĝas per **-a**).

La Epistolojn de Paŭlo mi povas nomi *Paŭlaj Epistoloj*. Sed ni supozu, ke iuj Epistoloj estus de *Paŭlo* (viro), aliaj de *Paŭlino* (virino): *Paŭlaj Epistoloj* kaj *Paŭlinaj Epistoloj* estas esprimoj tre klaraj kaj tute konformaj al la fundamento de la lingvo. Sed kun la Kaloĉaja sistemo, ni diras, ke iuj Epistoloj estas de *Paŭlo*, aliaj de *Paŭla*. Ni alvenas do al *Paŭlaj Epistoloj* (de Paŭlo) kaj... *Paŭlaj Epistoloj* (de Paŭla). Ne estas troige, se ni asertas, ke tiu sistemo ne estas perfekta. En *Ariadna fadeno*, *Elizabeta epoko*, *Minerva ŝildo*, nenio montras, ke *Ariadna*, *Elizabeta* kaj *Minerva* estas adjektivoj rilataj al la substantivoj *Ariadna*, *Elizabeta* kaj *Minerva*.

Laŭ la PAG (p.455), «*nenio malhelpas diri Elizabeta epoko; tiam oni rezignas pri la markado de virineco, sufiĉe evidenta per si mem; ankaŭ Johana mano estas nemiskomprenebla, se antaŭe temis pri Johano. Krome estas ĉiam ebla rimedo, uzi sufiksoidon: Elizabetana epoko, Johanina mano.*»

Fakte, ĉe Zamenhof, krom *Marta*, aliaj virinaj nomoj finiĝas per **-a**: *Ada, Bilha, Debora, Delila, Dina, Eva, Gerda, Ida, Ketura, Lea, Milka, Nadejda, Naema, Rebeka, Sara, Suzana, Timna, Zilpa*. Sed tiu finaĵo **-a** neniel estas virina marko, ĝi nur venas de la fakto, ke tiuj nomoj ne estas esperantigitaj: ili estas senŝanĝaj transskribaĵoj de vortoj, kiuj jam etnolingve finiĝas per **-a**. Pruvo, ke tiu finaĵo havas nenian rilaton kun la sekso, estas, ke tiaj **a**-nomoj estas ankaŭ virnomoj (*Bela, Bera, Eliŝa, Ezra, Jehuda, Luka, Noa*) kaj loknomoj (*Arba, Efrata, Gaza, Gomora, Ĥavila, Meŝa, Micpa*).

La Kaloĉajan sistemon adoptis G.Waringhien en la unua PIV. Sed la nova PIV revenas al la zamenhofa sistemo, kun la finaĵo **-o** por ĉiuj homnomoj, ĉu viraj, ĉu virinaj.

En la dua PIV, troviĝas interesa kaj oportuna novaĵo: la ne-asimilitaj nomoj estas presitaj kursive (ekz. *Abiŝag, Adonaj, Aŝtar, Aŝtarot, Baŭcis, Bernike, Cebaot, Ceres, ktp*). Tiel, multaj propraj nomoj finiĝas per **-a**, sed dank' al tiu tipografia aranĝo, oni tuj vidas, ke ili estas ne-asimilitaj, ĉar kursivaj: ili eventuale estas virinaj aŭ diinaj (ekz. *Atalja, Atena, Barbara, Bat-Ŝeba, ktp*), sed povas ankaŭ tute ne rilati al virineco (ekz. *Ahura, Cefanja, Zefarja, ktp*).

Kelkfoje, la dua PIV lasas elektelecon inter du solvoj. Ekzemple, ĝi donas apude la asimilitan formon **Evo**, laŭ la Zamenhofa Biblio, kaj la ne-asimilitan formon **Eva**, laŭ la Fabeloj de Andersen (I, p.179, IV, p.103) kaj la Londona Biblio (Gen 3²⁰). Oni povas elekti ankaŭ inter **Jeremio** (asimilita) kaj **Jeremia** (ne-asimilita, kaj ankaŭ ne virina).

Resume, kiel nomi vian amikinojn? Ĉu *Kristino*, ĉu *Kristina*? Vi elektu laŭ via prefero. Ni ne estu dogmemaj.

Vortfarado, koncize

Multaj esperantistoj, dum sia tuta vivo, scias nenion pri la reguloj de la vortfarado, kaj tamen parolas kaj skribas tute ĝustan lingvaĵon. Kvazaŭ instinkte.

Sed se iu instruas Esperanton, povas okazi, ke lernanto fabrikas la erarajn vortojn *belvirino* aŭ *kukmanĝi*, anstataŭ la ĝustaj *bela virino* kaj *manĝi kukon*. Tiam, okazas, ke la kursgvidanto **ne** scias klarigi, kial *belvirino* kaj *kukmanĝi* estas malĝuste sintezitaj.

Por klarigi tion, li/ŝi devas informiĝi, almenaŭ supraĵe, pri la teorio de la **vortfarado**.

La **vortfarado** estas tiu parto de la leksikologio, kiu studas la elementojn, el kiuj konsistas la vortoj, kaj la manierojn, kiel ili kombiniĝas inter si por formi novajn vortojn.

Sed unue, estas necesege, ke **oni legu, komprenu kaj memoru** la ĉapitrojn *Finajoj estas vortoj* kaj *Gramatika karaktero de la radikoj*. Efektive, sen la scio, ke simplaj finajoj (*o, a, i*) kaj sufiksoj (*aro, ilo, isto...*) estas **vortoj**, kaj ke la nudaj radikoj (*hom', bel', kur'*) jam havas difinitan **gramatikan karakteron**, la tuta vortfarado estus nekomprenebla, ĉar senseca.

La vortfarado estas pristudita laŭ nerefutebla formo en la *Plena Analiza Gramatiko* (p.393-432) kaj en *Aktoj de la Akademio* (I, p.58-68).

Mi mem provis klarigi la aferon, ne per la fantazia invento de ia nova arbitra teorio, sed per la prezentado de la Zamenhofa teorio, en miaj du broŝuroj **Vortkonsisto Vortfarado Vortanalizo Vortordo** (1996) kaj **La Vortfarado en dek lecionoj** (2003). Mi nek aldonis nek ŝanĝis ion, mi nur provis prezenti pli klare aferojn, kiujn mi trovas en la PAG tute ĝustaj, sed ne ĉiam tute klaraj.

I. Samelementaj kaj malsamelementaj vortoj.

a) Oni nomas **samelementaj vortoj** la vortojn konsistantajn el:

- radiko substantiva kun finaĵo **-o** (domo, homo, martelo, floro, vesto),
- radiko adjektiva kun finaĵo **-a** (bela, bona, prava) aŭ **-e** (bele, bone, prave),
- radiko verba kun finaĵo **-i** (bati, dormi, kuri).

En tiuj ĉi vortoj, la **finajo** estas **redundanca**: ĝi havas rolon nur gramatikan (ĝi montras singularon aŭ pluralon, nominativon aŭ akuzativon). Sed rilate la vortfaradon, ĝia rolo estas nula: ĝi **ne** aliigas la gramatikan kategorion de la vorto, kiu havas ekzakte la saman sencon, kiel la nuda radiko.

Tiuj **samelementaj vortoj** estas do **unelementaj**: en *domo, bela, kuri*, oni **ne** kalkulu la redundancan finajon kiel apartan elementon.

b) Oni nomas **malsamelementaj vortoj** la vortojn konsistantajn el:

- radiko substantiva kun finaĵo **-a** aŭ **-e** aŭ **-i** (doma, home, marteli),
- radiko adjektiva kun finaĵo **-o** aŭ **-i** (belo, boni),
- radiko verba kun finaĵo **-o** aŭ **-a** aŭ **-e** (bato, dorma, kure).

En tiuj ĉi vortoj, la **finajo** **ne** estas redundanca, sed **memstara, proprafunkcia**: ĝi aliigas la gramatikan kategorion de la vorto, kiu **ne** havas la saman sencon, kiel la nuda radiko. Tiam la finajo havas ĉiujn karakterojn de **vera vorto**.

Tiuj **malsamelementaj vortoj** estas do **duelementaj** (fakte, ili konsistas el **duopa kunmet-ajo**): en *dom|a, bel|o, kur|e*, oni **jes** kalkulu la memstaran finajon kiel apartan elementon.

Efektive, ne estas esenca diferenco inter *dom|a* kaj *dom|rilata* aŭ *dom|apartena*, en kiuj *a, rilata* kaj *apartena* ja estas vortoj. Ankaŭ ne estas esenca diferenco inter *martel|i* kaj *martel|agi* aŭ *martel|frapi*, en kiuj *i, agi* kaj *frapi* ja estas vortoj.

II. La reguloj de la vortfarado.

BAZA REGULO. La lasta elemento de kunmetita vorto estas la **ĉefelemento**. Ĝi fiksas la esencan signifon de la vorto: *ter/pomo* estas ja *pomo*, ĝi ne estas *tero*; *ŝaf/isto* estas ja *isto*, li ne estas *ŝafo*; *ped/bati* signifas ja *bati*, ĝi ne signifas *piedo* aŭ *piedi*.

La unua elemento, la **flankelemento**, nur kompletigas la signifon de la ĉefelemento: *ŝaf/isto* estas isto rilatanta al *ŝafoj*; *ped/bati* estas bati helpe de *piedo*.

La **ĉefelemento** fiksas ankaŭ la gramatikan funkcion de la **flankelemento**. Kaj tiu konstato estas nepre necesa por kompreni la sencon de la kunmetaĵo.

LA TRI REGULOJ DE LA VORTKUNMETO La ĉefelemento efikas al la flankelemento (de dekstre maldekstren: "←") laŭ la jenaj reguloj.

REGULO 1. Ĉefelemento "-o" donas al la antaŭa flankelemento substantivan valoron.

Kia ajn estas la kategorio de la flankelemento, ĝi alprenas **substantivan valoron**: *bel/diino* ne estas *bela diino*, sed *diino de belo*; *neces/ejo* ne estas *necesa ejo*, sed *ejo de neceso* (*ejo por la vivnecesoj*); *rikolt/maŝino* estas *maŝino por rikolto*.

REGULO 2. Ĉefelemento "-a" donas al la antaŭa flankelemento substantivan valoron.

Kia ajn estas la kategorio de la flankelemento (substantiva, adjektiva, verba), ĝi alprenas **substantivan valoron**: *bel/riĉa* ne signifas *bela kaj riĉa*, sed *riĉa je belo* (kvankam *bel* estas adjektiva radiko); *honor/riĉa* signifas *riĉa je honoro* (kvankam *honor* estas verba radiko); *varm/plena* signifas *plena je varmo*; *servo/preta* signifas *preta por servo*.

REGULO 3. Ĉefelemento "-i" donas al la antaŭa flankelemento valoron de adverbo aŭ de predikativa adjektivo. Kia ajn estas la kategorio de la flankelemento, ĝi alprenas:

a) aŭ adverbajn valoron: *dis/iri* (*iri dise*), *for/iri* (*iri foren*), *re/fari* (*fari ree*), *sub/aĉeti* (*aĉeti sube*), *kun/labori* (*labori kune*), *paŝ/murdi* (*murdi pafe*), *ped/bati* (*bati piede*), *rond/iri* (*iri ronde*), *bon/farti* (*farti bone*).

b) aŭ predikativajn valoron: *ruĝ/pentri* (*pentri ruĝa*), *plen/stopi* (*stopi plena*), *bel/igi* (*igi bela*), *pur/igi* (*igi pura*), *kant/igi* (*igi kant[ant]a*), *kun/veni* (*veni kunaj*).

Oni notu, ke ĉiuj verboj finiĝantaj per *-igi* kaj *-igi* apartenas al la kategorio **b**.

III. Trielementaj vortkunmetaĵoj.

Oni povas trovi trielementajn kunmetaĵojn kiel *vapor/ŝip/asocio*, *urb/dom/turo*.

En tiaj kombinaĵoj, du ebloj ekzistas, kiujn oni facile dispartigas laŭ la senco:

• Tipo "FFĈ": flankelemento duobla, ĉefelemento unuobla. Ekz. *labor/ist/aro* estas evidente «*aro de laboristoj (F/FĈ)*», kaj ne «*istaro de laboro (F/ĈĈ)*» (sensa).

• Tipo "FĈĈ": flankelemento unuobla, ĉefelemento duobla. Ekz. *ŝton/kamen/tubo* estas certe «*kamentubo el ŝtono (F/ĈĈ)*», kaj ne «*tubo de ŝtonkamen (F/FĈ)*» (neverŝajna).

IV. Finaja ĉefelemento.

En la esprimo *urbdoma ĝardeno*, ni konsideru la adjektivon *urbdoma*. Se ni rigardas ĝin duelementa (*urb/doma*), ni devas apliki la **regulon 2 (ĉefelemento "a")**, kio alvenas al la analizo «*doma je urbo*» (tute sensenca).

Fakte, ni devas konsideri, ke **finajtoj estas vortoj** kaj ke *doma* estas **Duelementa** (substantiva radiko + adjektiva finajo a). Nun ni konstatas, ke *urbdoma* ne estas duelementa, sed **Trielementa** (*urb/dom/a*), evidente laŭ la tipo FFĈ (la tipo FĈĈ kondukus denove al la sensenca analizo «*doma je urbo*»). Plia pruvo, ke la finajo **a** estas vera **vorto**!

La finajo **a** estas ne nur **vorto**, sed **ĉefelemento** de la kunmetaĵo *urb/dom/a* (la flank-

elemento estas *urb|dom*).

Do *urb|dom|a* estas komprenebla kiel “*a je urbdomo*” (rilata al urbdomo).

Aliaj ekzemploj: *blank|har|a* (karakterizata de blankaj haroj), *paŝ|murd|o* (ago pafmurdi, ago murdi pafe), *unu|ĉambr|a* (karakterizata de unu ĉambro), *voĉ|don|a* (rilata al voĉdono).

V. Ŝajna samelementeco.

Unuavide, vorto kiel *triangulo* estas duelementa (*tri|angulo*). Efektive, *angulo* estas unuelementa: samelementeco inter *angul* kaj *o* (*substantiva* radikoj *angul* + *substantiva* finaĵo *o*). Sed la **regulo 1 (ĉefelemento “o”)** alvenas al la sensencaĵo “*angulo de trio*”.

La kaŭzo estas, ke la finaĵo *o* NE rilatas al la sola radikoj *angul*, sed al la tuto “*tri + angul*” (*o* estas “komuna faktoro”). La samelementeco inter *angul* kaj *o* estas nur ŝajna. Tiu vorto ne estas duelementa, sed **TRielementa** (*tri|angul|o*), evidente laŭ la tipo FFĈ (la tipo FFĈ alvenus denove al la sensencaĵo “*angulo de trio*”).

La finaĵo *o* estas do vera **vorto**, **ĉefelemento** de la kunmetaĵo *tri|angul|o* (la flank-elemento estas *tri|angul*), analizebla kiel “*o kun tri angul*” (io posedanta tri angulojn).

Aliaj ekzemploj: *ĉirkaŭ|brak|o*, *du|punkt|o*, *inter|mont|o*, *kvar|vers|o*, *Kvin|petal|o*.

VI. Inversa vortefiko.

La tri reguloj de la vortkunmeto asertas, ke la dekstra elemento determinas la naturon de la maldekstra: tion oni nomas **rekta vortefiko** (←). Sed ekzistas ankaŭ la malo: la **inversa vortefiko**, kiu funkcias de maldekstre dekstren (→).

Ekzemple, *homo grandkuraĝa* ne estas “*kuraĝa je la granda*”, sed *granda* rilate la *kuraĝon*. La maldekstra elemento *grand* substantivigas la dekstran elementon *kuraĝ* (*kuraĝ* estas *adjektiva* radikoj). La analizo estas do: *grand|kuraĝ|a* (karakterizata de granda *kuraĝo*). Same, en *grand|valor|a* (karakterizata de granda valoro), la maldekstra elemento *grand* substantivigas la dekstran elementon *valor* (*verba* radikoj).

Tiu inversa vortefiko okazas, kiam la unua elemento estas adjektivo aŭ prepozicio, kaj la dua ne estas substantivo. Tiam la unua elemento ĉiam substantivigas la duan.

Aliaj ekzemploj: *bon|far|a*, *bon|fart|o*, *de|nask|a*, *ĝis|fin|a*, *kontraŭ|vol|a*, *per|fort|a*, *per|labor|i*, *sen|fort|a*, *sen|mov|a*, *sen|pov|o*, *sen|util|a*, *sen|util|o*.

VII. Kunmetaĵoj ŝajne eraraj (sed fakte, ne).

Kelkaj personoj kritikas kunmetaĵojn kiel *partopreni* (kiun ili komprenas “*preni parton*”) aŭ *solinfano* (kiun ili komprenas “*sola infano*”).

Sed *partopreni* estas Fundamenta kaj *solinfano* estas Zamenhofa. Fakte tiajn vortojn (multaj estas Zamenhofaj) oni analizu kiel trielementajn kunmetaĵojn kun finaĵa ĉefelemento.

La analizo de *parto|pren|i* kondukas do al “*i partoprene*” (agi per preno de parto), kio estas ja la senco de tiu vorto. Same, *fiŝ|kapt|i* ne signifas “*kapti fiŝojn*” (oni ja povas fiŝkapti dum horoj kaj kapti nenium fiŝon), sed “*i fiŝkapte*” (agi cele al fiŝkaptado).

En tiuj verboj, estas ŝajna samelementeco inter *pren* kaj *i*, ktp.

Aliaj ekzemploj: *almoz|pet|i*, *genu|fleks|i*, *konfes|pren|i*, *pardono|pet|i*, *voĉ|don|i*.

Same, *solinfano* estas infano sen gefratoj; *dikfingro* estas alia nomo de la polekso; *junedzo* estas edziĝinta freŝdate. Sed *solinfano* havas eventuale multajn amikojn; *dikfingro* ne estas dika ĉe malgrasa homo; *junedzo* povas esti jam ne plu juna.

Aliaj ekzemploj: *molanas*, *Nov-Jorko*, *sekinbera* (Fundamenta), *etburĝo*, *ĝentilhomo*, *Novjaro*, *novluno*, *plenluno*, *plenmano*, *rapidkuriero*, *rapidvagonaro*, *sovaĝbesto*.

Vortorda normo

Ni relegu pecon de *La Nobela Burĝo*, de Moliero.

«Oni povas aranĝi tiujn vortojn kiel vi diris: “Bela markizino, viaj belaj okuloj igas min morti pro amo”. Aŭ “Pro amo morti igas min, bela markizino, viaj belaj okuloj”. Aŭ “Viaj okuloj belaj pro amo igas min, bela markizino, morti”. Aŭ “Morti viaj belaj okuloj, bela markizino, pro amo igas min”. Aŭ “Igas min viaj okuloj belaj morti, bela markizino, pro amo”.

- Sed, el ĉiuj ĉi dirmanieroj, kiu estas la plej bona?

- Tiu, kiun vi diris: “Bela markizino, viaj belaj okuloj igas min morti pro amo”.

Nu, kiom da esperantoskribantoj kredas montri sin originalaj, aŭ inventemaj, aŭ rafinitaj, aŭ elegantaj, aŭ belstilaj, skribante laŭ la “belmarkizina stilo”! Fakte, dank' al artefarita tordado de la plej normala fluo de la penso, ili sukcesas nur igi siajn frazojn malfacile kompreneblaj, eventuale tute ne kompreneblaj, eĉ groteske ridindaj.

Kiel diris R. Schwartz, *vortordo ne estu vorttordo!*

I. La Esperanta vortordo NE estas hazarda.

La plej granda krimulo en la Esperanta historio estas tiu, kiu unua imagis, antaŭ pli ol unu jarcento, ke «en Esperanto, la vortordo estas tute libera, kaprica, hazarda, kaj ne influas la signifon de frazo». Li skribis tion, kaj ekzistis homoj tiel naivaj, ke ili kredis lin! Pro la kulpo de tiu sencerbullo, ankoraŭ nuntempe okazas, ke kursgvidantoj asertas tiun absurdajn. Iom poste, ili klarigas al la kompatindaj lernantoj, ke **tute ne** kaj **ne tute** havas tre malsamajn signifojn! Kaj pro ilia kulpo, dekmiloj da esperanto-parolantoj, eĉ kleraj, ofte eldiras aserton objektive tute malsaman de sia penso.

La ĉi-supra aserto (vortordo tute libera, t.e. hazarda) estas stulta pro la simpla kaŭzo, ke en ĉiu ajn lingvo, la **vortordo estas unu el la elementoj de la penso**. En neniuj lingvoj la vortordo povas dependi nur de la hazardo. Ĝi estas nur pli-malpli fleksebla, pli-malpli malfleksebla, depende de la lingvoj.

Jen unu el la frazetoj de la Fundamento, laŭ diversaj vortordoj:

<i>la patro tajloro estas</i>	<i>tajloro la patro estas</i>	<i>estas la patro tajloro</i>
<i>la patro estas tajloro</i>	<i>tajloro estas la patro</i>	<i>estas tajloro la patro</i>

El tiuj ses frazoj, kiu estas la aŭtenta? Evidente, la plej simpla: **la patro estas tajloro** (§5). Kelkaj aliaj estas escepte allaseblaj, en iaj kazoj, en iaj kuntekstoj, sed aldonas ian nuancon. Kaj kelkaj estas iom ŝokaj.

Kaj kiu estus tiel aŭdaca, ke li jurus, ke “*la patro estas tajloro*” estas samsignifa, kiel “*la tajloro estas patro*” ???

Alia frazo de la Fundamento.

- **de la patro mi ricevis libron** (§9). Evidente, *de la patro* estas komplemento de *mi ricevis*. Tio signifas, ke la patro estas la sendinto de la libro.

Nun, ni ŝanĝu la vortordon:

- **libron de la patro mi ricevis**. Nun, *de la patro* estas komplemento de *libron*. Tio signifas, ke la patro estas la posedanto aŭ la aŭtoro de la libro, sed ne la sendinto, kiun tiu frazo ne mencias. Ŝanĝante la vortordon, ni ricevis **tute alian frazon**.

Konklude: la vortordo en Esperanto ne estas hazarda, sed forte rilatas kun la signifo.

II. La norma vortordo.

«Ankaŭ en Esperanto validas certaj principoj, kiujn malobei ne estas konsilinde, ĉar ili konformas al la natura irado de l' penso. Kaj eĉ ekzistas kelkaj maloftaj okazoj, kiam oni devas sin teni al **fiksa vortordo**. **La norma vortordo estas: subjekto, predikato, objekto, adjekto**» (PAG, p.362).

Konsideru ĉiujn frazojn de la Fundamento: ili estas simplaj, ordinaraj, fluaj, ili havas nenian literaturan valoron, ili ne celas mirigan efekton, ili ne intencas ŝoki. Tute simple: **ili estas Esperantaj frazoj**. De 1887 ĝis nia tempo, **miliono**j da esperantlingvanoj esprimis sin laŭ la stilo de tiuj frazoj, suferigante nek sian propran cerbon nek siajn legantojn.

Kaj faru statistikan kalkulon: ĉirkaŭ 95% el ili sekvas la norman vortordon:

- **SUBJEKTO / KOPULO / PREDIKATIVO**,
- **SUBJEKTO / PREDIKATO / KOMPLEMENTOJ** (*predikato* estas ĝenerale verbo).

Kelkaj personoj jam riproĉis al mi, ke mi egoisme predikas favore al tiu vortordo pro tio, ke ĝi estas la plej kutima en mia denaska lingvo, la franca. Por tiuj nekomprenemuloj, mi sentas la neceson frapi sur la tablon cele al la enkapigo de tiuj du objektivaj veraĵoj:

- **Mi ne predikas, mi KONSTATAS.**

- **La vortordo en mia denaska lingvo situas centprocente ekster la afero. Mi studas la ESPERANTAN vortordon, ne la francan. Kaj mia studo de la ESPERANTA vortordo havas sian fonton esence en la FUNDAMENTO, kiun aŭtoras ne mi.**

La vortordo "SUBJEKTO / VERBO / PREDIKATIVO aŭ KOMPLEMENTOJ" estas la plej kutima en Esperanto tute simple pro tio, ke ĝi «konformas al la natura irado de l' penso» (PAG, p.362): ĝi deiras de la aganto, poste mencias la agon aŭ la staton, fine la celon de la ago aŭ la kvaliton de la stato kaj la kondiĉojn de tiu ago aŭ stato.

Ni rezonu pri tiu simplega frazo: «*mi / vojaĝas / en Hispanujo*» (F §26). Ni malkomponu ĝin en tri elementojn laŭ la plej simpla ordo de la homa penso:

- 1) pri kio aŭ pri kiu temas? pri **mi**,
- 2) kion mi as? mi **vojaĝas**,
- 3) vojaĝas kie? vojaĝas **en Hispanujo**.

Oni konstata, ke la versio «*mi vojaĝas en Hispanio*» sekvas la iradon de la penso laŭ la natura ordo 1-2-3. Kontraste, la versioj «*mi en Hispanujo vojaĝas*», «*en Hispanio vojaĝas mi*», «*vojaĝas en Hispanujo mi*», ktp, sekvas la iradon de la penso laŭ la ordo 1-3-2, aŭ 3-2-1, aŭ 2-3-1, ktp. Ĉiu ajn devas konfesi, ke la sinsekvo 1-2-3 ja estas plej natura, do pli Esperanta, ol la aliaj fantaziaj sinsekvoj.

Efektive, en la normala frazo, kiam mi estas dirinta **du elementojn** (*mi vojaĝas*), la aŭdantoj estas jam komprenintaj **du elementojn** (t.e. du trionojn de la informo).

Kontraste, en la vortordo «*mi / en Hispanujo / vojaĝas*», kiam mi diris **du elementojn** (*mi en Hispanujo*), la aŭdantoj ankoraŭ komprenis **nenion**, ĉar «*mi en Hispanujo*» signifas nenion. Ili devas atendi ĝis la aŭdo de la **tria elemento**, por kompreni la du antaŭajn. Tiu nova aranĝo ne estas natura: la menso devas resti en dubo aŭ en nescio, eĉ dum kelkaj sekunderoj, pri la nocio ludonta la ĉefan rolon en la frazo.

Jen pro kio la PAG nomas **norma vortordo** la vortordon "subjekto-verbo-cetero". Sed **norma NE** signifas *sole permesata* (vidu pli poste).

Jen kelkaj **Fundamentaj ekzemploj** de la vortordo "**subjekto / kopulo / predikativo**". Mi memorigu, ke kopulo estas verbo rilatiganta subjekton kun predikativo (*esti, ŝajni, iĝi*, ktp).

- *la ĉielo / estas / blua* (§6).
 - *infano / ne estas / matura homo* (§6).
 - *la dentoj de leono / estas / akraj* (§7).
 - *la patro / estas / bona* (§8).
 - *papero / estas / blanka* (§10).
 - *lakto / estas / pli nutra, ol vino* (§10).
 - *ili / estas / rusoj* (§16).
 - *sinjoroj, vi / estas / neĝentilaj* (§16).
 - *li / estas / bona parolanto* (§31).
 - *tiu ĉi malfreŝa pano / estas / malmola* (§33).
 - *mia onklino / estas / bona virino* (§33).
 - *la acideco de tiu ĉi vinagro / estas / tre malforta* (§35).
- Evidente, oni povus citi dekoble pli.

Jen kelkaj ekzemploj (daŭre, **Fundamentaj**) de la vortordo **"subjekto / verbo / komplementoj"** (la komplementoj povas esti rektaj objektoj, nerektaj objektoj, adjektoj).

- *la knabo / forpelis / la birdojn* (§9).
- *Aleksandro / ne volas / lerni* (§9).
- *la patro / donis / al mi / dolĉan pomon* (§10).
- *unu vidvino / havis / du filinojn* (§11).
- *li / promenas / kun tri hundoj* (§12).
- *tiu ĉi libro / havas / sesdek paĝojn* (§14).
- *venu / al mi / hodiaŭ vespere* (§18).
- *mi / rakontos / al vi / historion* (§18).
- *mia frato / havis / hodiaŭ / gastojn* (§18).
- *montru / al ili / vian novan veston* (§18).
- *mi / konas / neniun / en tiu ĉi urbo* (§28).
- *mi / ridas / je lia naiveco* (§29).
- *li / loĝas / ekster la urbo* (§31).
- *lia heroeco / tre plaĉis / al mi* (§35).

Oni povus trovi centojn... Plian fojon: mi ne inventas, mi konstatas.

Sincere, kion pli belan, kion pli bonan, kion pli precizan, kion pli internacian, alportus la fantaziaj ŝanĝoj: *"la knabo la birdojn forpelis, sur la tablo blanka papero kuŝas (oni eĉ ne scias, kio estas blanka! ĉu la tablo? ĉu la papero?), havis hodiaŭ gastojn mia frato, estas ili rusoj, al mi donis dolĉan pomon la patro, al vi mi historion rakontos"?*

Strange, el la multaj libroj donantaj stilajn aŭ lingvaj konsilojn, neniu mencias la vortordajn problemojn. Escepto estas *Ne tiel, sed tiel ĉi!*, de F.Faulhaber (Dansk Esperanto Forlag, Aabyhøj 1965, p.26). Li citas multajn malbonegajn (sed aŭtentajn) frazojn. Interalie:

- *ŝi ne sin movis* (do ŝi movis iun alian) → korekto: *ŝi ne movis sin*.
- *ne tion forgesu* (do forgesu alion) → korekto: *ne forgesu tion*.
- *ĉu ankoraŭ vi min aŭdas?* (vi, unu plian fojon) → korekto: *ĉu vi ankoraŭ aŭdas min?*
- *mi nur havas dudek jarojn* (nur havas! stultege!) → korekto: *mi havas nur dudek jarojn*.
- *kian malbonon ŝi al mi povus fari?* (mi povus!) → korekto: *... ŝi povus fari al mi?*
- *en Londono oni jam lin konsideris strangulo* → korekto: *jam en Londono oni...*

La ofta neceso de lokado de **la rekta objekto post la verbo** estas bone reliefigita en tiuj du frazoj, kies signifoj estas tute malsamaj, nur pro la vortordo:

- *li igis la soldatojn mortigi* (li ordonis, ke la soldatoj mortigu).
- *li igis mortigi la soldatojn* (li ordonis, ke oni mortigu la soldatojn).

III. La ora regulo.

Ree, ĝin aŭtoras ne mi, sed la *Plena Analiza Gramatiko*, alidire K.Kalocsay kaj G.Warinhien: « **Ĉiu frazelemento staru apud tiu, al kiu ĝi senpere rilatas** » (p.362).

Pekoj kontraŭ tiu ĉi regulo estas ne rektaj gramatikaj eraroj, sed markoj de peza stilo. Interrilatantaj frazelementoj estas ĉefe (sed ne nur): “artikolo-substantivo”, “subjekto-verbo”.

- *la laŭ la itala maniero preparita kafo* (korekto: **la kafo** preparita laŭ la itala maniero).
- *mi pri tiu afero baldaŭ al li parolos* (korekto: **mi** baldaŭ **parolos** al li pri tiu afero).
- *tion vi de mi donace ricevos* (korekto: **tion vi ricevos** de mi donace).
- *la patro al mi donis dolĉan pomon* (→ **la patro donis** al mi dolĉan pomon, F §10).
- *lia parolo dolĉe kaj agrable fluas* (korekto: **lia parolo fluas** dolĉe kaj agrable, F §31).
- *li foriris, sen tion diri al mi* (korekto: ... **sen diri** tion al mi).
- *kiel ŝi havas belan voĉon!* (korekto: **kiel belan voĉon ŝi** havas!).

Tiu regulo havas korolarion, sian inverson: « **oni evitu, ke frazelemento staru senpere apud iu alia frazelemento, al kiu ĝi ŝajnas rilati, sed NE rilatas** ».

- *rakonti tiun aferon por ŝi estus hororo* (oni sentas “aferon por ŝi”, kaj ankaŭ “ŝi estus”, tamen ne rilatantajn, kiel po unu tuton). Korekto: **rakonti tiun aferon estus hororo por ŝi**.
- *ili deziras tion pridiskuti private* (oni sentas “deziras tion”, tamen ne rilatantajn, kiel unu tuton). Korekto: **ili deziras pridiskuti tion private**.

Unu tia ĉi ĝeno estas nur duongrava, sed se similaj ĝenoj estas multaj, ilia amasiĝo estas kaŭzo, ke multajn frazojn oni devas legi dufoje aŭ trifoje, antaŭ ol ekkompreni ilin.

Tiu fenomeno havas tre simplan nomon: **malbona stilo, eventuale malbonega**.

IV. Epiteta adjektivo kun komplemento.

Tiu kazo estas trafa ekzemplo de la ĉi-antaŭa “ora regulo”. La komplemento povas esti antaŭ aŭ post la adjektivo, kaj la tuto adjektivo + komplemento povas esti antaŭ aŭ post la substantivo. Teorie, ekzistas do tri eblaj vortordoj.

- *la fama pro siaj inventaĵoj inĝeniero*. “Pro siaj inventaĵoj” estas komplemento de *fama*.
- *la pro siaj inventaĵoj fama inĝeniero*. Vortordo tipe germaneca.
- *la inĝeniero fama pro siaj inventaĵoj*.

Kiu estas konsilinda? Prefere la tria, ĉar en ĝi ĉiu frazero staras senpere apud la frazero, al kiu ĝi rilatas (la + inĝeniero; inĝeniero + fama; fama + pro; pro + inventaĵoj).

V. Demandaj vortoj.

Eĉ la homoj plej fanatike predikaj al la teorio “vortordo tute kaprica” (ĉar da tiaj, ve, ekzistas) neniam diras aŭ skribas: *iras vi kien, ci revenos kiam, faras kion li, ŝi estas kiu?*

Efektive, de 117 jaroj (skribite en 2004), milionoj da Esperanto-uzantoj diradas kaj skribadas: *kien vi iras, kiam ci revenos, kion li faras, kiu ŝi estas?*

Alivorte, unu aspekto de la **deviga vortordo** en Esperanto estas: **demanda vorto (eventuale enkondukita de prepozicio) situas preskaŭ ĉiam ĉe la komenco de la demando**.

- *kiun daton ni havas hodiaŭ?* (F §12).
- *de kio tio ĉi venas, mia filino?* (F §17).
- *kie estas la knabinoj?* (F §16).
- *kial vi ne respondas al mi?* (F §20).

Cetere, tiu devigo povas eventuale naski dusencecon.

- *kio iĝas akvo post varmigo?*

- ◊ Unua supozo: *kio* estas subjekto, *akvo* estas predikativo. Tiam la respondo estas *glacio* (efektive, *glacio iĝas akvo post varmigo*).

- ◊ Dua supozo: *kio* estas predikativo, *akvo* estas subjekto. Tiam la respondo estas *vaporo* (efektive, *akvo iĝas vaporo post varmigo*).

nenio montras, kiu supozo estas ĝusta, pro la fakto, ke la demanda vorto *kio* staras **devige** ĉe la komenco de la frazo, senkonsidere ĉu ĝi estas subjekto, ĉu predikativo.

Tiun ambiguecon oni facile forigas, se oni nur anstataŭigas la predikativan dirmanieron per komplementa esprimo: *iĝi akvo* (predikativo) → *ŝanĝiĝi al akvo* (komplemento).

- *kio ŝanĝiĝas al akvo post varmigo?* sola respondo: *glacio*.

- *al kio ŝanĝiĝas akvo post varmigo?* sola respondo: *vaporo*.

VI. La rilativo *kies*.

Alia ekzemplo de **deviga vortordo** estas la determinato de *kies*, kiu nepre **devas sekvi** senpere la rilativon.

- *la lando, kies gastoj ni estas* (Z).
- *scias la kato, kies lardon ĝi manĝis* (Z).

VII. Subjekto post la verbo.

La ordo "*subjekto-verbo-komplementoj*" estas la **norma vortordo** (PAG). Tio tute ne signifas, ke ĝi estas la sola ĝusta. Tute male! Ĉiaj aliaj vortordoj estas eblaj kaj permesataj, **SED NE AJNE: ŝanĝi ion en la norma vortordo nepre ŝanĝas ion en la senco**.

La subjekto povas stari post la verbo, eventuale ĉe la fino de la frazo, **sed kondiĉe, ke estas kaŭzo por tio; kondiĉe, ke tio estas intenca, ne hazarda**. Ekzemple, por akcenti parton de la frazo.

- *kore ridegos niaj posteuloj, kiam ili aŭdos tiujn naivajn kontraŭparolojn* (Zamenhof, OV, p.279). Akcentado de *kore ridegos*, pro ĝia nekutima loko.

Tiu postverba lokado de la subjekto estas oportuna, ankaŭ kiam la subjekto estas tre longa aŭ kiam longigas ĝin iu dependa propozicio.

- *en la salonon eniris en du vicoj deko da gvardiistoj en oritaj kaskoj kaj kiraso, kun nudaj glavoj, poste du vicoj de pastroj, kaj fine la faraono, portata sur trono, ĉirkaŭita de nuboj de bonodorfumo* (Kabe, *La Faraono*, I, p.44). La tuta subjekto, kun siaj komplementoj, estas 31-vorta. Ĝia lokado antaŭ la verbo estus tre maloportuna.

- *en la jaro 1895 Odeson venis svedaj studentoj, kiuj sciis sole svede kaj esperante* (Zamenhof, OV, p.291). Tre oportune, la subjekto *svedaj studentoj* situas apud la verbo *venis*.

- *svedaj studentoj, kiuj sciis sole svede kaj esperante, venis Odeson en la jaro 1895* (ŝanĝo de la antaŭa frazo). La subjekto *svedaj studentoj* situas malproksime de la verbo *venis*.

Tio estas oportuna ankaŭ por variigi la stilon.

- *eksonis la sonoriloj en la granda blanka konstruo* (Zamenhof).

- *alflugis la ventoj de l' okcidento* (Kabe, *La Fundo de l' Mizero*, p.78).

- *grandiĝis la infanaro kaj estis nesufiĉa la salajro* (E.Privat, *Vivo de Zamenhof*, p.23).

Sed ne estas konsilinde, imiti la manieron de Kabe kaj de von Wahl, kiuj konstante lokas la subjektan pronomon post la verbo en la esprimoj "*li diris, li respondis*", ktp. Tio estas senkaŭza sklava imitado de la franca *dit-il*, germana *sagte er*, rusa *сказал он*, ktp.

- "*Mi tre ĝojas*", *komencis li* (Kabe, *Patroj kaj Filoj*, p.9).

- *Tiu ĉi princino Mary estas tre bela, **diris mi al li*** (von Wahl, *Princino Mary*, p.13).

VIII. Komplemento antaŭ la verbo.

Ja okazas ankaŭ, ke komplemento staras antaŭ la verbo. Kial ne?

Kelkfoje, la simpla kaŭzo estas, ke, kiam komplementoj estas pluraj, la lokado de unu (aŭ de kelkaj) el ili antaŭ la verbo estas pli eleganta kaj donas eblecon variigi la stilon.

- **post la vespermanĝo** (tempa adjekto) *niaj fratoj **eliris** kun la gastoj el sia domo* (F §18).
- **el sub la kanapo** (unua loka adjekto) *la muso **kuris** sub la liton* (dua loka adjekto) (F §26).
- **la junulo... kuraĝe** (maniera adjekto) ***batalis** kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj* (F §39).

Same, rekta aŭ nereкта objekto povas troviĝi antaŭ la verbo, eĉ ĉe la komenco de la frazo, **sed kondiĉe, ke estas kaŭzo por tio; kondiĉe, ke tio estas intenca, ne hazarda.**

- **al leono ne donu** la manon (F §7). Akcentado de *al leono* ĉe la komenco de la frazo.
- **la tempon venontan** neniu ankoraŭ **konas** (F §22). Akcentado de *tempon venontan*.
- **lernolibron oni devas** ne tralegi, sed tralerni (F §31). Akcentado de *lernolibron*.
- **ŝteliston** neniu **lasas** en sian domon (F §37). Akcentado de *ŝteliston*.
- **li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron** vi ne **trovos** sur lia vesto (F §41). Akcentado de *eĉ unu polveron* lokita antaŭ *vi ne trovos*.
- **eĉ la plej nekredablajn aferojn**, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj **kredas** (F §41). Akcentado de *plej nekredablajn aferojn*.
- **dolĉan anĝelan naturon** **havis** la patrino (E.Privat, *Vivo de Zamenhof*, p.24).

IX. Adjektiva predikativo antaŭ la verbo.

Ja okazas, ke **adjektiva predikativo** staras antaŭ la kopulo *esti*. Kial ne? Sed tio ne estas la norma, kutima, banala, simpla, vortordo. Oni do uzu tiun vortordon ne ajne, sed intence, por reliefigi la predikativon kaj krei specialan efekton.

- *la ĉielo estas **blua*** (F §6). *Banala* aserto verkita laŭ *banala* vortordo, aŭ dirata laŭ *banala* tono.
- ***viola** estis la ĉielo*. *Ne-banala* aserto verkita laŭ *ne-banala* vortordo, aŭ dirata laŭ *emfaza* tono.
- ***sankta** estas por ni la hodiaŭa tago* (Zamenhof, *OV*, p.361). Akcentado de *sankta*.
- ***ne multaj** estis la lernantoj* (E.Privat, *Vivo de Zamenhof*, p.23). Akcentado de *ne multaj*.
- ***saĝa kaj severa** estis la patro* (samverke, p.24).
- ***pala kaj malforta** li estis ja kiel infaneto* (samverke, p.25).

X. Substantiva predikativo antaŭ la verbo.

La problemo estas tute alia, kiam temas pri **substantiva predikativo**.

En la frazo « *leono estas besto* » (F §5), ambaŭ substantivoj estas nominativaj, kaj nenio indikas morfologie, kiu estas subjekto, kaj kiu estas predikativo.

Kion diri pri la vortordo? Ni deiru de la hipotezo, ke la vortordo povas esti tute egale kaj samsignife « *subjekto-verbo-predikativo* » aŭ « *predikativo-verbo-subjekto* ».

Tiam du hipotezoj estas fareblaj:

◊ aŭ *leono* estas subjekto, kaj *besto* estas predikativo: la senco estas « *la leono apartenas al la kategorio de la bestoj* ».

◊ aŭ *leono* estas predikativo, kaj *besto* estas subjekto: la senco estas « *la besto apartenas al la kategorio de la leonoj* ».

Evidente, ĉiu komprenas, ke en tiu frazo, *leono* estas subjekto kaj *besto* estas predikativo (la ĝusta hipotezo estas la unua). Sed tiu ĝusta kompreno venas **nur** de tio, ke

leono kaj *besto* estas **vortoj konataj de ĉiuj**. Efektive, ĉiu scias, ke *besto* difinas pli vastan kategorion, ol *leono*. Alidire, *leono* estas **hiponimo** de *besto*, kaj *besto* estas **hiperonimo** de *leono* (vidu en PIV *hiponimo* kaj *hiperonimo*). Oni do komprenas tiun frazon **nur ĉe la kondiĉo**, ke oni **jam antaŭe scias la sencon** de la vortoj.

Sed se oni diras « *falangiulo estas traŭeulo* » aŭ « *pterigulo estas lepidoptero* », ĉiu ajn homo, se li ne estas zoologo kaj ne konsultis la paĝon 1224 de la unua PIV (informoj bedaŭre forestantaj de la PIV reviziita), estas malkapabla scii, kie estas la subjektoj, kie la predikativoj, simple pro tio, ke li **ne scias antaŭe la sencon** de la vortoj. Li do **ne kapablas kompreni tiujn frazojn**.

Vane oni insistos, mi neniel povas akcepti, ke Esperanta frazo estas ĝusta, se ĝi estas komprenebla nur por la personoj, kiuj jam antaŭe scias ĝian signifon.

Male, en la franca lingvo, ekzemple, tiuj du frazoj estas perfekte kompreneblaj: « *un phalangide est un trachéate, un lépidoptère est un ptérygote* »; neniu ambigueco kuŝas tie ĉi.

Ĉu konkludi, ke la franca lingvo estas pli preciza, ol la Esperanta? Bedaŭrinde jes, se oni akceptas, ke la vortordo povas esti tute egale kaj samsignife “*subjekto-verbo-predikativo*” aŭ “*predikativo-verbo-subjekto*”.

Sed Esperanto retrovas sian mirindan precizecon, se oni akceptas, ke **la norma vortordo en tiaj frazoj, estas “subjekto-verbo-predikativo”**, kaj NE la inverso.

Cetere, nur al tiu vortordo obeas **ĉiuj** similaj frazoj en la Fundamento, senescepte :

- *rozo*_{subj} / estas / *floro*^{pred} kaj *kolombo*_{subj} / estas / *birdo*^{pred} (§5).
- *la patro*_{subj} / estas / *tajloro*^{pred} (§5).
- *infano*_{subj} / ne estas / *matura homo*^{pred} (§6).
- *ni*_{subj} / estas / *homoj*^{pred}; *ili*_{subj} / estas / *rusoj*^{pred} (§16).
- *Aŭgusto*_{subj} / estas / *mia plej amata filo*^{pred} (§22).
- *ligno*_{subj} / estas / *bona brula materialo*^{pred} (§31).
- *akvo*_{subj} / estas / *fluidaĵo*^{pred} (§35).
- *tiu ĉi granda altaĵo*_{subj} / ne estas / *natura monto*^{pred} (§35).
- *glaciaĵo*_{subj} / estas / *dolĉa glaciigita frandaĵo*^{pred} (§35).
- *La Parizanoj*_{subj} / estas / *gajaj homoj*^{pred} (§37).
- *la tamburisto*_{subj} / restis / *netuŝita*^{pred} (Zamenhof, PIV).

Evidente, kiam neniu ambigueco estas ebla, **sed nur tiam**, nenio malhelpas, ke oni uzus la vortordon “*predikativo-verbo-subjekto*”. Interalie, kiam la subjekto estas propra nomo.

- *vera geniulo*^{pred} estis *d-ro Zamenhof*_{subj}.

XI. Finaj komparoj.

- *la libro* / estas / *sur la tablo* (F §6: subjekto / verbo / komplemento).
- *sur la tablo* / estas / *la libro* (komplemento / verbo / subjekto).

Ĉu samsignifaj? **Ne**. La unua respondas al la demando « *kie estas la libro?* ». La dua respondas al la demando « *kio troviĝas sur la tablo?* ».

- *sur la korto* / staras / *koko kun tri kokinoj* (F §33: komplemento / verbo / subjekto).
- *koko kun tri kokinoj* / staras / *sur la korto* (subjekto / verbo / komplemento).

Ne samsignifaj. La unua respondas al la demando « *kio staras sur la korto?* ». La dua respondas al la demando « *kie troviĝas koko kun tri kokinoj?* ».

Ĉu oni plu dirados, ke la vortordo ne influas al la signifo?

Vortordo (loko de la adverbo)

Estis iam... aŭtoro de Esperanta lernolibro, kiu rimarkis, ke oni ĉiam diras «*ŝi tre plaĉas al mi*», kaj neniam «*ŝi plaĉas al mi tre*», ankaŭ ne «*ŝi plaĉas tre al mi*», ankaŭ ne «*tre ŝi plaĉas al mi*». El tiu banala konstato, ne plu studante la aferon, eĉ unuminte, li fiere skribis en la verkata lernolibro, ke «*adverbo devas ĉiam stari antaŭ la verbo*».

Kaj armeoj da senpripensuloj rekopiis tiun stultaĵon. Kaj armeoj da kursgvidantoj rediradis tiun stultaĵon. Ili tiel konfuzis «*paroli nur Esperante (ne nacilingve)*», kun «*nur paroli Esperante (ne kanti, ne skribi)*», kaj konfuzigis, eble poreterne, la menson de la lernantoj.

La redirantoj de tiu fantaziaĉo estas bona ilustraĵo de la proverbo «*esti en Parizo kaj ne vidi la Efel-turon*». Ili rimarkas detaleton kelkfoje observeblan, kaj ne vidas la kolosan realaĵon tute malan.

I. La loko de la adverbo en la Fundamento.

Efektive, se la aserto «*adverbo staras ĉiam antaŭ la verbo*» estus prava, almenaŭ la tri kvaronoj de la **Fundamentaj frazoj** estus eraraj. Ni konstatu.

- *bonaj infanoj lernas diligente* (§9; ne *diligente lernas*).
- *ĉar ĉiu amas ordinare personon...* (§13; ne *ordinare amas*).
- *ŝi devigis ŝin... laboradi senĉese* (§13; ne *senĉese laboradi*).
- *ŝi devis... alporti domen plenan grandan kruĉon* (§13; ne *domen alporti*).
- *tiu ĉi du amikoj promenas ĉiam duope* (§14).
- *por ke la virino povu trinki pli oportune* (§15).
- *la tranĉilo tranĉas bone* (§16).
- *tiu ĉi bela knabino venis domen* (§17).
- *kial ŝi revenis tiel malfrue* (§17).
- *mi restis tiel longe* (§17).
- *la malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion...* (§17).
- *vi donos ĝin al ŝi ĝentile* (§17).
- *venu al mi hodiaŭ vespere* (§18).
- *oni ne forgesas facile sian unuan amon* (§18).
- *ili ĉiuj sidas silente* (§20).
- *se la lernanto sciis bone sian lecionon...* (§20).
- *ni uzu bone la vivon* (§20).

Mi haltas ĉe la 20a paragrafo, ĉar mi povus citi la tutan Fundamenton. Kaj poste, mi devos citi ankaŭ la tuton de la *Originala Verkaro*, ktp.

Kiam lernolibro asertas, ke «*adverbo devas stari antaŭ la verbo*», ĝi parolas pri afero, kies unuajn elementojn ĝi ne konas.

Ĉar fakte, oni devas zorge distingi inter tri tute malsamaj specoj de adverboj.

II. Tri specoj de adverboj.

1. La adverboj «universalaj».

Ili povas rilati al ĉiu ajn vorto. La ĉefaj estas: *almenaŭ, ankaŭ, ankoraŭ, apenaŭ, eĉ, ja,*

jam, ne, nur, preskaŭ. Demandi, ĉu ili devas stari “antaŭ aŭ post la verbo” estus tute sense: ili devas stari antaŭ la vorto, al kiu ili rilatas, tute egale, ĉu tiu ĉi estas verbo, adjektivo, substantivo, ktp. De tiu loko dependas la signifo de la frazo. LA LOKADO DE TIUJ ADVERBOJ ESTAS DEVIGA, tute ne laŭvola, tute ne hazarda. Ne temas pri akcesoraj nuancetoj, sed pri fundaj kontraŭsencoj en kazo de mislokado.

Ni pripensu tiujn Fundamentajn frazojn.

- **ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla** (F §41). Ne ĉiu, do nur parto de la kreskaĵoj. Tute absurda estus la jena ŝanĝo: **ĉiu kreskaĵo ne estas manĝebla** (la tuto de la kreskaĵoj estas ne manĝeblaj !)
- **mi havas nur unu buŝon** (F §12). Absurda estus la vortordo: **mi nur havas unu buŝon**. Kaj tute alisignifa, sed same absurda, estus: **nur mi havas unu buŝon** (la aliuoj havas plurajn...).
- **via vino estas nur ia abomena acidaĵo** (F §35). Pura kretenaĵo: **via vino nur estas...**

Ni komparu la jenajn duopojn aŭ triopojn.

- **almenaŭ ili aprobis la principon** (aliaj tion eĉ ne faris).
- **ili aprobis almenaŭ la principon** (sed ne la ceteron).
- **ankaŭ mi ĉeestis la prelegon** (ne nur mia edzino).
- **mi ankaŭ ĉeestis la prelegon** (ne nur preparis ĝin).
- **mi ĉeestis ankaŭ la prelegon** (ne nur la postan balon).
- **eĉ mi kantos dum la festo** (ne nur la belvoĉaj kantistoj).
- **mi eĉ kantos dum la festo** (ne nur legos poeziojn).
- **mi kantos eĉ dum la festo** (ne nur kiam mi estos sola, kun fermitaj fenestroj).
- **ja tiun ulon mi bone konas** (tiun precizan ulon, ne alian).
- **tiun ulon ja mi bone konas** (certe mi, eble ne aliaj ol mi).
- **tiun ulon mi ja bone konas** (mi vere konas lin, ne nur aŭdis pri li).
- **ne mi iris fiŝkapti** (sed verŝajne iu alia).
- **mi ne iris fiŝkapti** (sed sidis hejme).
- **mi iris ne fiŝkapti** (sed nur promeni).
- **ekde la 6a horo, li plu ne dormis** (la nedormado daŭris eĉ post la 6a).
- **ekde la 6a horo, li ne plu dormis** (la dormado ĉesis je la 6a).
- **li tute ne komprenis la aferon** (li komprenis nenion en tiu afero).
- **li ne tute komprenis la aferon** (li komprenis nur parton de la afero).
- **nur mi legis la leteron** (ne la aliaj komitatanoj).
- **mi nur legis la leteron** (mi ne faris komenton).
- **mi legis nur la leteron** (ne la aldonitan dokumenton).
- **preskaŭ je la oka, ĉiuj membroj ĉeestis** (je la sepa kaj 55 minutoj...).
- **je la oka, preskaŭ ĉiuj membroj ĉeestis** (mankis nur kelkaj):
- **je la oka, ĉiuj membroj preskaŭ ĉeestis** (absurdaĵo: ili havis unu piedon en la salono, kaj unu piedon ankoraŭ sur la ŝoseo).

2. La adverboj “akcesoraj” aŭ “diafanaj”.

Ili estas tre kutimaj, ofte mallongaj (la terminon “*diafana*” mi depruntas de K.Kalocsay, sed li uzas ĝin en alia kunteksto), sed neniam havas la ĉefan rolon en la frazo.

Ekzemploj: *bone, ĉiam, iel, ĵus, multe, nepre, ofte, pli, plu, tre, tro, tuj, tute...*

Tiu listo ne estas limiga, tute ne. Ĉiu ajn alia adverbo povas troviĝi en tiu grupo, depende de la signifo de la frazo.

Tiuj "diafanaj adverboj" havas unu precizan karakterizaĵon: **ONI POVAS FORIGI ILIN**. Tiu forigo senigas la frazon je unu akcesora elemento, sed la frazo konservas sian esencan signifon. Estas nur nuanceta diferenco inter «*mi bone scias mian lecionon*» kaj «*mi scias mian lecionon*», aŭ inter «*vi nepre finu vian laboron*» kaj «*vi finu vian laboron*».

Ĉi tiuj adverboj (nur ili!) staras plej ofte **antaŭ la verbo**.

- *la vero ĉiam venkas* (F §16). Preskaŭ samsence: *la vero venkas*.
- *li ĝentile salutis min* (F §20). La ĉefa informo estas, ke *li salutis min*.
- *Dio facile pardonas* (F §22). Alidire: *Dio pardonas*.
- *tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon* (F §13).
- *sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn* (F §18).
- *ni forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon* (F §33).
- *en la kota vetero mia vesto forte malpurigis* (F §39).
- *mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ* (F §41).
- *malfeliĉo ofte kunigas la homojn* (F §42).
- *en malbona vetero oni povas facile malvarmumi* (F §42).

Ĉiuj ĉi-supraj adverboj (*ĉiam, ĝentile, facile, forte, kredeble, ofte, tre, varmege*) povas esti forigitaj: la frazoj restas preskaŭ samsignifaj.

3. La adverboj "adjektaj".

Manieraj, tempaj, lokaj adjektoj (= cirkonstancaj komplementoj) povas esti sub adverba formo. Koncerne la vortordon, oni nepre rigardu ilin kiel adjektojn.

Ilia ĉefa karakterizo estas, ke **ONI NE POVAS FORIGI ILIN**. Tiu forigo senigus la frazon ne de unu nuanca elemento, sed de ĝia fundamenta signifo. Estas abisma diferenco inter «*honesto homo agas honeste*» (F §25) kaj «*honesto homo agas*», aŭ inter «*la tablo staras malrekte*» (F §33) kaj «*la tablo staras*». La forigo de *honeste* aŭ de *malrekte* senigas la frazon de ĝia ĉefa elemento. Tio montras, ke *honeste* kaj *malrekte* apartenas al tiu kategorio de la "adverboj adjektaj". Ili vere estas manieraj adjektoj.

Kiel ĉiuj adjektoj, la "adjektaj adverboj" povas eventuale stari antaŭ la verbo, sed ilia pli kutima kaj plej norma loko estas **POST la verbo**. Efektive, se la komplemento estas en adverba formo, oni ne vidas, pro kia mistera kaŭzo tio devus ŝanĝi la normalan fluan kaj banalan vortordon *subjekto / verbo / komplementoj* (unu plian fojon, vortordon, kiun mi konstatas, ne imagas).

Jen frazoj el la Fundamento. Ĉu necesas insisti, ke **ne mi** aŭtoras ilin?...

- *li venis al mi tute ne atendite* (§22).
- *honesto homo agas honeste* (§25).
- *nu, iru pli rapide!* (§26).
- *mi restos hodiaŭ dome* (§28).
- *li fermis kolere la pordon* (§31).
- *lia parolo fluas dolĉe kaj agrable* (§31).
- *tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero* (§31).
- *li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon* (§33).
- *mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn* (§36).
- *mi saltas tre lerte* (§40).
- *la pafado daŭris tre longe* (§40).
- *viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble* (§41).
- *li ne portas longe la koleron* (§41).

Zamenhof ne skribis: *lia parolo dolĉe kaj agrable fluas, hodiaŭ mi dome restos, mi telegrafe gratulis, pli rapide iru*, kiuj estus ne lingve eraraj, sed terure malbonstilaj!

Ni faru alian interesan komparon inter du malsamaj frazoj.

• *ĉu li trakosme venis?* (X...). La demando koncernas esence la **venon**. La adverbo *trakosme* alportas nur akcesoran informon. Ĝi apartenas al la kategorio de la “diafanaj adverboj”: oni tre povas forigi ĝin: *ĉu li venis?*

• *Ĉu li venis trakosme?* (J.Valano, titolo). La demando koncernas ne la venon mem, sed la **manieron**, laŭ kiu li venis. La adverbo *trakosme* estas la ĉefa vorto de la frazo. Ĝi apartenas al la kategorio de la “adjektaj adverboj”: oni ne povas forigi ĝin (tiu forigo senigus la frazon de ĝia ĉefa signifo).

Jen resuma ekzemplo, en kiu oni trovas du adverbojn: unu “diafanan adverbon” (lokitan antaŭ la verbo, kaj eventuale forigeblan) kaj unu “adjektan adverbon” (lokitan post la verbo, kaj nepre **ne** forigeblan).

• *Via filiino sendube povas vin akcepti siahejme?* (J.Valano, *Ĉu... ĉine?*, p.9). Se oni forigas *sendube*, la frazo restas preskaŭ **samsenca**. Se oni forigas *siahejme*, ĝi iĝas **sensenca**.

Pliaj komparaj ekzemploj.

• *mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min* (F §20). La adverbo *ĝentile*, lokita antaŭ la verbo, estas “diafana adverbo”. La ĉefa informo de la frazo, estas, ke la filo **salutis** min.

• *kvankam li estis malbonhumora, li salutis min ĝentile*. La adverbo *ĝentile*, lokita post la verbo, estas “adjekta adverbo” (maniera adjekto sub adverba formo). La ĉefa informo de la frazo, estas la **ĝentileco** de la saluto.

Jen du frazoj, iom similaj, de la Fundamento. Ilia vortordo estas instrua.

• *lia kolero longe daŭris* (§31). • *la pafado daŭris tre longe* (§40).

La maldekstra respondas al la demando «*kio iĝis lia kolero? ĉu daŭris aŭ ĉesis (ekzemple, post mia foriro)*», kaj la respondo estas esence «*daŭris*», akcesore «*longe daŭris*» (*longe* estas “diafana adverbo”).

La dekstra respondas al la demando «*kiom da tempo daŭris la pafado?*», kaj la respondo estas esence «*tre longe*» (*tre longe* estas tempa adjekto sub adverba formo, la ĉefa elemento de la respondo; ĝi estas ĉe la norma loko de la adjektaj).

Alia komparo inter du Fundamentaj frazoj (§14).

• *tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope*.

• *kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn*.

Ambaŭ entenas po unu adjektan adverbon. En la unua, la adjekto *duope* staras ĉe la banala loko de adjekta adverbo, post la verbo, ĉar kaŭzo ne estas, por reliefigi ĝin.

Male, en la dua, la adjekta adverbo *kvinope* staras en nekutima loko, ĉe la komenco de la frazo. Por tio ekzistas simpla kaŭzo: tiu lokado estas frapa, reliefiga, do akcentas la vorton *kvinope*, kaj montras pli bone la opozicion inter la fakto, ke la atakantoj estis pluraj kaj tamen mi venkis ilin ĉiujn.

Regi la Esperantan lingvon je literatura nivelo nepre necesigas la komprenon de tiaj nuancoj.



Kuriozaj etimoj

Abrikoto, ĝia spirala vojaĝo

Dum siaj vojaĝoj ĝis Armenio, la Romanoj elkovris iun novan specion de frukto, kiun la sciencistoj nomas nuntempe *Prunus armeniaca*. Ĝia apartaĵo estas, ke ĝia florado okazas tre frue. Tial la Romanoj nomis ĝin persica *præcox* «frua persiko».

Tiu vorto *præcox* «frua» venas de *præcōquĕre* «rapidigi la maturecon» (*præ* «antaŭ» kaj *cōquĕre* «kuiiri»). Ĝi pasis al la helena lingvo sub la formo *πραϊκόκκλιον*.

Sub tiu formo, la vorto estis pruntita de la araboj. Sed en la araba lingvo, tiu vorto estigis fonetikajn problemojn: la araba lingvo ne konas la konsonanton *p*, ankaŭ ne la vokalon *o*; plie, ĝi ne akceptas du sinsekvajn konsonantojn ĉe la komenco de vorto (ekz. *Platon* iĝas *Aflaton*, *Fransa* iĝas *Faransa*). Pro tio, la helena radiko *prakok* alprenis la tute novan veston *barquq* (بَرْقُوق *barqūq*). Kun la difina artikolo: *أَلْبَرْقُوق* *al-barqūq*.

En 711, sub la gvidado de la ĉefo *Tariq* (طارق), la araboj transiris la Kolonojn de Herkulo, kiuj alprenis la nomon *جَبَل طَارِق* *ġabal ṭāriq* «la Monto de *Tariq*», kio finvenas al la nuna nomo *Ĝibraltaro*. Tiam la araba *أَلْبَرْقُوق* *al-barqūq* disvastiĝis en la Iberian duoninsulon: *albaricoque* en Hispanio, inkluzive de Galegio, *albricoque* en Portugalio. En Malto, la vorto *berquqa* venas rekte de la araba.

Pli norde, en Katalunio, la vorto mallongiĝis al *albercoc* kaj *abercoc*. En suda Francio ĝi iĝis *albricòt*; en Italio, *albicocca*; kaj en Grekio *βερίκοκκο*.

La du katalunaj formoj pasis en Francion sub la duobla formo *aubercot* kaj *abricot*. La unua formo malaperis post la 16a jarcento, kaj la dua pasis al: angla *apricot* [*eiprikot*], gaela *aipriocóg*, *aipriocós*, bretona *abrikezenn*, germana *Aprikose*, nederlanda *abrikoos*, sveda-norvega-dana *aprikos*, islanda *aprikósa*, litova *aprikosas*, latva *aprikoze*, rusa-ukraina *абрикós*, belorusa *абрыкós*, finna *aprikoosi*, japana *アブリコ* *aburiko*, ktp.

Dumtempe, la turka nomo *kayısı* de tiu frukto konkeris plurajn landojn: bulgara *кайсия*, serba-makedona *кајсија*, albana *kajsí*, novgreka *καϊσί*, rumana *caisă*.

En Hungario, *barack* venas de la latina *persicus* «persa».

Jen la mapo de la spirala vojaĝo de *præcox* ĝis *abrikot*.



En la Esperanta *abrikoto*, aŭ en la Volapuka *brikod*, kiu rekonas la latinan *præcox*?

Absinto, artiŝoko, melongeno

La vorto *absinto* venas simple de la latina *absinthium* kaj ĉi tiu de la greka ἄψινθιον aŭ ἄψινθος, vorto ne origine greka, sed venanta de la mediteranea regiono.

Kuriozaĵo estas, ke absinto kaj artemizio estas du variaĵoj de la sama planto. Kaj la rusa vorto por «*artemizio*» estas чернóбиль, ukraine чорнóбиль. Fakte tiu vorto estas la nomo de la mondfama Ukraina urbo Ĉernobilo. Nu, Apokalipso (8¹⁰⁻¹¹) anoncas, ke «*falis el la ĉielo granda stelo, brulanta kiel torĉo... kaj la nomo de la stelo estas Absinto*»... Ĉu la Ĉernobila katastrofo estis antaŭvidita de Apokalipso?



Ni pasas al la araba lingvo kun *artiŝoko*. La germana *Artischoke*, la angla *artichoke*, la nederlanda *artisjok*, la franca *artichaut*, la ĉeĥa *artyčok*, la slovaka *artičoka*, la rusa *артишóк*, la belorusa *артышóк* kaj la litova *artiŝokas* rilatas al la lombarda *articioc*, kiu venas de la hispana *alcachofa*, portugala *alcachofra*, de araba deveno: *خَرْشُوف* *ĥarŝūf*, kun la artikolo *الْخَرْشُوف* *al-ĥarŝūf*. Sen la difina artikolo, tiu vorto pasis al: itala *carciòfo*, okcitana *carchòfa*, kataluna *carxofa*, pola *karzoch*.

La helena nomo de tiu planto estas κινάρα *kinara*, vorto trovebla ĉe Dioskorido. Ĝi pasis al: persa انگنار *engenār*, turka *enginar*, rumana *anghinare*, bulgara *ангинар*, novgreka *αγκινάρα*, albana *angjinári*.

La scienclatina nomo de la artiŝoko estas *cyndara*, vorto kiun *Linné* pruntis de la helena. Sed li skribis ĝin kun ortografia eraro: la greka κινάρα devus normale finveni al *cinara*, kun simpla *i*, ne kun *ipsilono*.



Kiu franclingvano estus tuj konvinkita ĉe la klarigo, ke la vorto *melongeno* estas parenca de sia franca traduko *aubergine*? Tamen tiel estas...

La deirpunkto estas la persa بادنجان *bādenĝān*. Ĝi pasis al kelkaj lingvoj, konservante sian komencliteron *b*: rusa-ukraina баклаж́ан *baklaĵan*, pola *bakłażan*, litova *bakla-žanas*, hispana *berengena*, portugala *beringela*, araba بادِنجان *bāḍinĝān*, kartvela ბადრიჯანი *badriĝani*, hinda बैंगन *baingan*.

En kelkaj lingvoj, la komenca litero ŝanĝiĝis al *p*: serba патлиџан *patliĝan*, bulgara патладж́ан *padladĵan*, albana *patëllxhán*, hungara *padlizsán*, turka *patlıcan*. Kelkfoje, la unua litero preferis esti *m*: itala *melanzana*, korsika *melzana* aŭ *merzana*, okcitana *merinjana*, novgreka *μελιτζάνα* *melintzana*.

La itala vorto *melanzana* estas la origino de la scienclatina *melongena*, kaj ĉi tiu donis la Esperantan vorton. En Francio, oni uzadis *melongène* (ankoraŭ troveblan ĉe *Littré*), sed nun tiu vorto ne plu estas uzata.

Kun la difina artikolo, la araba vorto estas *أَلْبَادِنجَان* *al-bāḍinĝān*. En Katalunio, tiu vorto simpliĝis al *alberginia*, kio finvenas al la franca *aubergine*, cetere poste pruntita de la germanoj.

La ova formo de la frukto klarigas la svedan *äggplanta*, la anglan *egg-plant* kaj la norvegan *eggplanten* «*ovoplanto*», kaj ankaŭ la finnan *munahedelmä* «*ovofrukto*», kalkeon de la germana *Eierfrucht*.

Aŭtobuso, universala kvankam artefarita

En la pasintaj jarcentoj, okazis, ke kantoro, t.e. preĝeja kantisto, aparte brilis, kiam li kantis iun latinan antifonon dum la katolikaj di-servoj. Kelkfoje, li brilis tiagrade, ke la kamparanoj de lia vilaĝo kromnomis lin per la latina vorto, kiun li kantis laŭ maniero tiel talenta. Iom post iom, tiu kromnomo iĝis hereda familinomo. Tiel naskiĝis la kuriozaj francaj familinomoj *Agnus, Amen, Clamamus, Dabo, Dixi, Dominé, Domino, Dorémus, Ignotis, Kirié, Libéra, Manificat, Mater, Nobis, Nos, Nominé, Omnès, Ozanam, Pater, Pronobis, Quoniam* (cititaj en *Dictionnaire des noms de famille et prénoms de France*, de A.Dauzat). Tiuj ĉi familinomoj ekzistas en Francio, kvankam ili ne abundas.

Manificat estas misŝanĝo de *Magnificat* en la fama kanto *Magnificat anima mea Dominum* « Gloras mia animo la Sinjoron ». Kaj **Omnès** venas de la vorto *omnes* « ĉiuj » en la frazo *Laudate Dominum omnes gentes* « Gloru la Sinjoron ĉiuj popoloj (Psa 117¹) ».

En Nanto (okcidenta Francio), en la komenco de la 19a jarcento, iu sinjoro **Omnès**, verŝajne malproksima ido de tiu hipoteza kantoro, estis posedanto de ĉapelvendejo. Sur la butiketo de tiu s-ro **Omnès**, estis skribita la devizo *Omnes omnibus* « **Omnès** por ĉiuj » (*omnibus* estas la plurala dativo de *omnes*), vortluda aludo al la latina signifo de lia nomo.

En 1825, estis starigita kompanio de publikaj veturiloj (veturiloj *por ĉiuj*). La ekstrema stacio de la linio troviĝis proksime de la ĉapelvendejo de *Omnès*; tiu proksimeco instigis la fondinton de tiu kompanio vortludi per tiu nomo. Tial, li nomis tiujn veturilojn *omnibus* « veturiloj *por ĉiuj* » kaj ankaŭ « veturiloj *por Omnès* ».

Iom poste, en Aprilo 1828, en Parizo, iu s-ro *Baudry* fondis similan kompanion de publikaj veturiloj. Li reprenis la vorton *omnibus* jam kutiman en Nanto. Tiel naskiĝis definitive en la franca lingvo la vorto **omnibus** « omnibuso ».

Ĉirkaŭ la jaro 1907, danke la teknikan progreson, tiuj omnibusoj ne plu funkciadis per ĉevaloj, sed iĝis aŭtomobilaj. Anstataŭ lanĉi la pezan kunmetaĵon *automobile-omnibus*, oni mallongigis ĝin al **autobus**. Tiel naskiĝis nova vorto en la franca lingvo.

Tiu stranga kunmetaĵo konsistas do el du partoj, kies origino estas sen iu eĉ plej malgranda rilato !

- **auto** (komenco de *automobile*) estas la greka **αὐτός** « mem »,
- **bus** estas la stumpigita fino de la latina dativplurala finajo -**ibus**.

Pli montran artefaritaĵon oni ne povas imagi.

Tio ne malhelpas, ke tiu vorto disvastiĝis, ne nur en okcidentan Eŭropon sub la formo **autobus**, sed ankaŭ en grandan parton de la mondo kun diversaj adaptiĝoj: ruse-ukraine **автoбyс**, beloruse **аўтoбyс**, bulgare **автoбyс**, litove **autobusas**, latve-estone **autobuss**, armenie **ավտոբուս** *avtobus*, kartvele **ავტობუსი** *avtobusi*, perse **اتوبوس** *otobūs*, turke **otobüs**, hungare **autóbusz**, finne **autobussi**, hebree **אוטובוס** *otobūs*, arabe **أوتوبيس** *awtübīs*, amhare **አውቶብስ**: *awtobus*, indonezie **otobis**, vjetname **ô tô buýt**.

En kelkaj landoj, oni kutimiĝis je la populara mallongigo **bus**; ĝi pasis ankaŭ al kelkaj aziaj lingvoj: hinde **बस** *bas*, panĝabe **ਬਸ** *bas*, bengale **বাস** *bas*, sinhale **බස්** *bas*, tamule **பஸ்** *bas*, japane **バス** *basu*.

Tio estas okulfrapa pruvo, ke plej artefarita vorto kapablas iĝi **plej natura**, se ekzistas favoraj kondiĉoj por ĝia alprenado.

Ĉinio, mistera nomo

La origino de tiu nomo estas plej mistera. Oni eĉ ne scias, en kiu epoko ĝi aperis. Tre granda parto de la modernaj lingvoj uzas ĝin, jen sub la formo **ĉin**, jen sub la formo **kin**: angle-germane-nederlande **China**, france **Chine**, itale **Cina**, katalune **Xina**, hispane-portugale-rumane **China**, novgreke **Κίνα**, dane-norvege-svede **Kina**, pole **Chiny**, ĉeĥe-slovake **Čína**, serbe-makedone **Кина**, litove **Kinija**, latve **Ķīna**, islande-hungare **Kína**, albane **Kinë**, armene **Չինաստան** *ĉinastan*, finne **Kiina**, estone **Hiina**, turke **Çin**, kartvele **ჩინეთი** *ĉineti*, novhebree **יִדִן** *sīn*, amhare **ቻይና**: *ĉayna*, arabe **صين** *šīn*, malte **Ĉina**, perse **چين** *ĉīn*, hinde-nepale **चीन** *ĉīn*, panĝabe **ਚੀਨ** *ĉīn*, bengale **চীন** *ĉīn*, sinhale **චීනය** *ĉīnaya*, tamule **சீனா** *ĉīnā*, malajale **ചൈന** *ĉīna*, taje **ចិន** *ĉīn*, indonezie **Cina**.

Sed la ĉinoj mem ne uzas tiun vorton. Nuntempe, la du nomoj uzataj en Ĉinio estas 中国 *zhōngguó* «lando de la mezo» kaj 中华 *zhōnghuá* «floro (aŭ ornamo) de la mezo». La nomo 中国 *zhōngguó* (aŭ pli klasike 中國 *zhōngguó*) estas oficiala ekde 1911, ĉe la starigo de la respubliko. Antaŭe, la lando havis la nomon de la koncerna dinastio. Sed tamen, ekde la antikveco, la ĉinoj jam donis al si la nomon 中國人 *zhōngguó rén* «la homoj de la reĝlando centro de la tero».

Ofte oni asertas, ke la origino de la nomo **Ĉinio** estas la nomo de la dinastio **Ĉin** (秦 *qín*). Tiu dinastio reĝis en la 3a jarcento antaŭ nia erao: laŭ la *Dictionnaire classique de la langue chinoise*, de F.S.Couvreur, ĝi reĝis de ~255 ĝis ~202, do dum duonjarcento. Sed la nuntempaj historiistoj reviziis tiujn datojn: la *Esperanto-ĉina Vortaro* (Pekino, 1990) kaj la Granda Enciklopedio *Larousse* atribuas al ĝi nur 15 jarojn da reĝado: de ~221 ĝis ~206.

Ĉu tiel mallonga reĝado povas klarigi la daŭrecon de tiu nomo?

Plie, estas tute certe, ke la nomo **ĉin** estis konata plurajn jarcentojn pli frue ol en la 3a jarcento antaŭ nia erao. Jen kelkaj pruvoj.

- La ĉina nacio estis konata de la araboj de la antikveco sub la nomo **صين** *šīn* aŭ **چين** *ĉīn*, kaj de la Sirianoj sub la nomo **رُيْنُ** *rīnoyē*. Sed en kiu epoko? Malfacile direble. Eble nur en malfrua epoko, kiel la latina **Sina** kaj la greka **Σίνα**. Do tio pruvas nenion.

- Kiam Aleksandro la Granda konkeris Hindion (en ~326), Ĉinio estis jam nomita **Cin**stan fare de la tjurkaj popoloj.

- En antikvaj budhanaj libroj, oni trovas menciojn de la popolo **जीन** *ĝīna*.

- Longan tempon antaŭe, en Hindio, la brahmana *Leĝaro de Manu* (मनुस्मृति *manusmṛti*) mencias la popolon **चीन** *ĉīna*. Oni ne konas la precizan daton de tiu teksto, sed tute certe ĝi entenas la plej malnove konatan mencion de la ĉinoj.

Jen io pli stranga. En la Biblia libro de la profeto Jesaja, oni trovas tre enigman esprimon (49¹²): **יְרֵךְ סִינִים** *érec sīnīm*. Jen la tuta frazo en la traduko de la Londona Biblio, kiu bedaŭrinde ne tradukas, sed nur transskribas la koncernan nomon: «*Jen tiuj venos de malproksime, kaj aliaj de nordo kaj de okcidento, kaj aliaj el la lando Sinim*». Laŭ la kunteksto, temas pri lando tre malproksima. La germana erudiciulo Wilhelm Gesenius (1786-1842) vidis tie aludon tute certan al la «lando de la ĉinoj». Post Gesenius, multaj aliaj ekzegezistoj komprenis **יְרֵךְ סִינִים** *sīnīm* kiel la nomon de la ĉinoj.

Estas notinde, ke la ĉinlingva versio de la Biblio (The Bible Societies in Hongkong, 1964) tradukas la hebrean esprimon **יְרֵךְ סִינִים** *érec sīnīm* per 秦國 *qínguó* «la lando de la

Ĉin-dinastio ».

La profeto Jesaja vivis de ~740 ĝis ~687, do longan tempon antaŭ la reĝado de la Ĉin-dinastio (秦). Sed tiu peco troviĝas en la t.n. Jesaja II, do ĝi datumas de ĉirkaŭ la jaro ~550. Nu, la Ĉin-dinastio estis verŝajne konata plurajn jarcentojn antaŭ ol posedi la tronon de Ĉinio. Oni trovas pruvon de tio ĉi en la jena konstato. En la periodo nomata de *Printempo kaj Aŭtuno* (春秋 *chūnqiū*, de ~770 ĝis ~476), konkuris ĉefe dek du princlandoj. Inter ili, unu nomiĝis 秦 *qín*. Do ni retrovas tiun faman dinastion 秦 *qín*, ĝuste en la sama tempo, kiam vivis Jesaja.

Tio allasas do la eblecon, ke tiu dinastio estis jam konata en la 6a jarcento antaŭ nia erao. En la sama tempo, alia princlando nomiĝis 晉 *jìn*. La silaboj *qín* kaj *jìn* ne estas identaj, sed tamen iom proksimaj. Kaj ambaŭ similas al la internacia radiko *ĉin*. Ĉu unu el ili, aŭ ambaŭ ili, estas ĉe la fonto de la internacia nomo de Ĉinio? Tre verŝajne, jes. Sed tio ne estas firme demonstrebla.

Spite tion, oni devas konfesi, ke la plejparto de la modernaj tradukoj de la Biblio ne akceptas, ke tiu 𐤒𐤓𐤓𐤐 *sīnīm* rilatus al la ĉinoj. Ne alportante plej etan pruvon, ili ĝenerale elektas la plej facilan solvon: lasi la vorton *sinim* netradukita, kiel faras la Londona Biblio. Kelkaj el ili aldonas piedpaĝe kaj senpruve, ke tiu vorto estas verŝajne legebla 𐤒𐤓𐤓𐤐 *səwenīm*, kaj rilatas al la loĝantoj de la antikva egipta urbo *Sieno* (Syēnē, Συήνη, nuntempe Asŭano, أسوان), kie juda kolonio estis instalita.

La esploro de la antikvaj tradukoj de la versiklo 49¹² de Jesaja ne estas pli instrua: la Vulgato diras de *terra australis* «el suda tero»; la Septuaginto preferas ἕκ γῆς Περσῶν «el la lando de la persoj». Koncerne la Peŝiton, ĝi simple lasas la vorton senŝanĝa: 𐤒𐤓𐤓𐤐 *de-sinīm*.

Kelkaj Aziaj lingvoj nomas Ĉinion per nomo derivita de la ĉina nomo: japane 中国 *ĉūgoku* aŭ 中華 *ĉūka*, koree 中華 aŭ 중화 *ĝunghŭa*, tibete 𑄎𑄣𑄢𑄣𑄢 gyanák, vjetname Trung Hoa (trung «centra», hoa «floro»), indonezie Tiengkok.

Alia radiko estas trovebla en orienta Eŭropo kaj en Azio: ruse-ukraine-bulgare Китáй, beloruse Китáй, taĝike-uzbeke Хитой, mongole Хятад, pra-mongole Kitat. El la sama radiko, ankaŭ Marko Polo nomis Ĉinion Cathay (franclingve); Daniel Moirand transskribis ĝin Kataj (en sia traduko de *La Libro de la Mirindaĵoj*). La origino de tiuj nomoj estas la tataro reĝlando Кытай, Kitay (ĉine 契丹 *qīdān*), kiun la orientaj tataroj establis en norda Ĉinio, de 1118 ĝis 1234.

En la frua tempo de Esperanto, Zamenhof uzis la formon *ĥino*, *ĥina*, *ĥinujo*, kiu poste arkaikiĝis kaj estis anstataŭita de la nuntempa formo. Al ĝi mankas internacieco, ĉar ĝia sola apogo estas la pola *Chiny*, prononcata *ĥini*.



Aksesore, ni notu, ke la vorto *japano* ne estas japandevena, sed ĉindevena: ĉine 日本 *ribĕn* (prononcata *jāpen*) «suno leviĝanta» (日 *rì* «suno» kaj 本 *bĕn* «origino, fonto»). La sama vorto estas prononcata de la japanoj: 日本 *nihon* aŭ *nippon*. Marko Polo nomis Japanion Ĉipango, laŭ la ĉina 日本國 *ribĕnguó* «japana lando».

Kaj la nomo *Koreo* venas de 고려 *koryŭ*, nomo de dinastio fondita en 918 (ĉine 高麗 *gāoli*), signifanta «alta sereneco». La sud-korea nomo de la lando estas 한국 aŭ 韓國 *hanguk* «lando *Han*» (nomo de la prahistoriaj triboj de suda Koreo). La nord-korea nomo estas 조선 aŭ 朝鮮 *ĝosŭn* «freŝa mateno» (kromnomo de la dinastio *Yi*).

Edzo, edzino

Edzo estas la sola vorto, en la tuta Esperanta leksiko, kiun oni preskaŭ povas nomi artefarita. Efektive, ekzistas neniu etna lingvo, en kiu viro laŭleĝe ligita kun virino, estus nomata per vorto simila al *edz*, ĉu oni serĉas en la hindeŭropaj lingvoj, ĉu en la semidaj, ĉu en ĉiu ajn alia lingvogrupo.

Tamen, tute arbitra aŭ artefarita ĝi **ne** estas. *Edzo* havas etimon. Ĉar pluraj stultaĵoj estis skribitaj pri tio, necesas iom raciigi la aferon.

La unua paŝo de nia esploro konsistas en demando farita al la aŭtoro de la vorto : d-ro Zamenhof mem, kiu dufoje klarigis la aferon.

La unua klarigo estas trovebla sur poŝtkarto, kiun Zamenhof sendis la 22an de Majo 1906, de Varsovio, al iu sinjoro L.Herz, loĝanta en Zuriko. Ĝi troviĝas en la Internacia Esperanto-Muzeo, en Vieno. Jen la teksto :

« Kara Sinjoro ! La vorto "edz" estas sufikso (kiu tamen kiel ĉiuj aliaj sufiksoj estas uzata ankaŭ memstare); ĝi havis en la komenco la formon **es** (prenitan el la francaj "princesse", "maîtresse" k.t.p.); laŭ la leĝoj de Esperanto ĝi devis tamen por la virinoj havi la formon **esino** kaj **es** restis sekve por la viroj. Sed "es" tiam estis okupita por la verbo, en kiu ĝi signifas la tempon "imperfectum", tial mi el "es" devis fari "edz", tiom pli, ke pri "es" oni ĉiam pensas pri virino. Poste "es" el la verbo malaperis, kaj "edz" restis. » (teksto trovebla en *Doktoro kaj Lingvo Esperanto*, de A.Holzhaus, 1969, p.222-223).

Efektive, antaŭ sia publikigo, Esperanto havis kvar indikativajn finaĵojn : *is*, *es*, *as*, *os*. Poste, Zamenhof konsciis, ke la imperfekta finaĵo **es** estas senutila balasto kaj forigis ĝin.

Resume, la franca sufikso *-esse* finvenis al **es**, kiu estis ŝanĝita al **edz**, pro homonimeco kun la tiama imperfekta finaĵo *-es*.

Ŝanĝi la silabon **es**, sekve de homonimeco, estas kompreneble. Sed demando restas : kial ne ŝanĝi simple al **ez**, aŭ al iu ajn alia silabo, kiu ne estigus homonimecon ? De kie venas la afrikato **edz** ? (afrikatoj estas la sonoj *c*, *ĉ*, *dz*, *ĝ*).

Ni daŭrigu la esploron. **La dua klarigo** de Zamenhof datumas de 1913. Tiam, li estis demandita pri tio fare de la rektoro É. Boirac. Ĉi tiu publikigis la respondon de Zamenhof en la *Oficiala Gazeto* (Decembro 1913, p.144). Jen la tuta artikolo.

« Dank' al la afableco de Sro Dro Zamenhof, mi ricevis la solvon de tiu malgranda enigmo... La vere primitiva formo estas *ne edz*, sed *edzin*, de kiu devenas la formo *edzo*. Tiel same fraŭlo devenas de fraŭlino, kuzo de kuzino, kaj feo, kiun oni povus uzi, por montri fablan estulon, ekz. Oberono, kaj kiun oni povas devenigi de feino.

La vorto *edzino* estis primitive sufikso, kiu poste fariĝis sendependa de la radikoj, al kiuj ĝi estis primitive aldonita. Jen kiamaniere la Majstro klarigis al mi la aferon :

En la germana lingvo, reĝido heredonto de la krono estas nomata Kronprinzo, kiu fariĝas en Esperanto kronprinco. La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane Kronprinzessin. Ĉi tiun lastan vorton Dro Zamenhof transskribis Esperante kronprincezino, kaj li tuj rimarkis, ke la finiĝo de tiu vorto, t.e. *edzino*, ricevis per si mem la sencon de virino kunigita kun viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto : unue, ĝeneralan suflkson, esprimantan difinitan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu

sama signifo. Poste el la vorto edzino li tute logike devenigis la vorton edzo. » (teksto trovebla en *Lingvaj Respondoj*, p.28).

Tiu dua klarigo similas al la unua, kio estas pruvo de ĝusteco, krom unu negrava detalo :

- En la unua klarigo, la franca sufikso -esse finvenas al es, ŝanĝita al edz, pro homonimeco kun la tiama imperfekta finaĵo -es. Kaj in estas aldonita sufikso.

- En la dua klarigo, la franca-germana sufikso -essin finvenis al esin, ŝanĝita al edzin. Ĉi tie, in apartenas al la radiko.

Sed la demando plu restas : kial ne ŝanĝi ĝin simple al ez, aŭ al iu ajn alia silabo, kiu ne estigus homonimecon ? De kie venas la afrikato edz ?

La definitiva klarigo venas de Gaston Waringhien. En sia verko *Lingvo kaj Vivo* (p.67), li kompletigas la informon de Zamenhof, klarigante, ke la preciza deveno de **edzo** devas esti serĉata ne en la germana lingvo, sed en la **jida** lingvo.

Kiel klarigis Zamenhof mem, **edzo** estas nenio alia ol la latinida sufikso -esse, -ess, -esa, -essa, kiu signifas «-ino». Ekzemploj : franca **comtesse**, kataluna-okcitana **comtessa**, itala **contessa**, hispana **condesa**, portugala **condessa**, rumana **contesă**, angla **countess** «grafino». Tiu sufikso venas de la latina -issa (ekz. **diācōnissa** «diakonino», greka -ισσα (ekz. **βασίλισσα** «reĝino»).

Tiu latinida sufikso pasis al kelkaj germanaj vortoj (ekz. **Delikatesse** «delikateco, frandaĵo», **Mätresse** «amatino, konkubino»).

Sed en la germana lingvo, la plej kutima ina sufikso estas -in (ekz. **Lehrerin** «instruistino», **Schülerin** «lernantino»). Nun, ni konstata, ke vorto kiel **Prinzessin** «princino» estas iom stranga : la germana sufikso -in estis aldonita al la franca vorto **princesse** «princino», kiu jam entenas la francan sufikson -esse. Rezultas, ke la sufikso -essin montras dufoje la inecon, unufoje france, unufoje germane.

Estas sciata, ke la jida lingvo estas germana dialekto skribata per hebreaj literoj kaj entenanta sporade kelkajn hebreajn vortojn. Nu, tiu sufikso -essin pasis en la jidan lingvon sur la formo -ecin, eble sub la influo de la slavaj finaĵoj -cin, -cyn, -цѣн. Ekzemple, el la jida vorto רב **reb** «rabeno» (de hebrea deveno), oni pluformis רב-עצין **reb-ecin** «edzino de rabeno, rabenedzino». De tiu kunmetitaĵo, Zamenhof tiris ecin, kiu normale kondukus al la esperanta vorto **ecino**, el kiu estus facile eltiri **eco**.

Sed tiu vorto **eco** estigus bedaŭrindan kolizion kun la sufikso -eco.

Efektive, plej ofte (tamen ne ĉiam), Zamenhof evitis radikojn, kies fino similus al iu sufikso :

- *azen'*, *ĉagren'*, *maten'*, kun fina *en'*, anstataŭ la etimologie atendata *in'* ;
- *bufed'*, *piked'*, *sterled'*, kun fina *ed'*, anstataŭ la etimologie atendata *et'* ;
- *barel'*, *makzel'*, *mirtel'*, kun fina *el'*, anstataŭ la etimologie atendata *il'* ;
- *artikol'*, *muskol'*, *popol'*, kun fina *ol'*, anstataŭ la etimologie atendata *ul'* .

Tiel, **bufeto** (france **buffet**, germane **Büffet**) anstataŭ **bufedo** estus komprenata en la senco «malgranda bufo», **barilo** (france **baril**) anstataŭ **barelo** povus esti «ilo por bari».

Pli grave, en **eco**, **ecino**, oni erare kredus rekoni la du sufiksojn -ec kaj -in.

Tial, tre oportune, Zamenhof ŝanĝis ecin al edzin. Kaj de edzino, li tiris **edzo** per retroderivado.

Tio estas unu ekzemplo de derivado, en kiu la vira vorto venas de la virina, kaj ne inverse. Aliaj ekzemploj estas *fraŭlo*, kiu venas de *fraŭlino*, kaj *kuzo*, kiu venas de *kuzino*. Efektive, neniu etnolingvo liveras vortojn, kiuj similas al *fraul*, *kuz*. Male, etnolingvoj liveras al ni: la germana *Fräulein* « fraŭlino », la franca-angla *cousin* « kuzino », en kiuj la finaĵoj *-ein* aŭ *-in* neniel estas signo de ineco.

G. Waringhien konkludas: « *En 1913, kiam Boirac demandis lin pri la origino de la vorto, Zamenhof, timante la idistajn mokojn, kiujn povus estigi tia judgermana deveno, konfesis al li nur la duonon de la vero, kaj li citis la germanan Kronprinzessin kiel la originon: sed, ĉar Kronprinzessin povas egale esti fraŭlino, estas evidente, ke la precizan signifon kaj la afrikaton li pruntis de la judgermana* ». Efektive, Waringhien pravas: **edzin** pli proksimas al la jida (aŭ judgermana) **ecin** ol al la germana **essin** (c estas la afrikato responda al la simpla s).



La seriozeco kaj evidenteco de tiuj klarigoj devus esti sufiĉaj por fermi la buŝon de kelkaj kontraŭuloj, kiuj ne povas akcepti ion, kio venus de aliulo.

Ni tamen esploru diversajn aliajn proponojn, kiujn elcerbigis kelkaj fantaziuloj, kies nomojn mi prisilentos.

1. Kelkiuj dekretis, ke estas vane serĉi la etimon de tiu vorto, kiu estas tute arbitre elpensita. Sama opinio esprimita per aliaj vortoj: “*Zamenhof estis fia mensogulo*”.

2. Aliaj esploris la polan lingvon kaj eltrovis, ke **edzo** venas de la pola **jędza** (tiele!). Fakte, tiu pola vorto signifas « furio, malbonulino » kaj situas je kelkaj lumjaroj de la signifo **edzo**, kaj ankoraŭ pli malproksime de la signifo **edzino**. Zamenhof neniam montris tiajn mizoginajn emojn. Oni supozis ankaŭ la popularan formon **jędzyna** « virinaĉo ». Kvazaŭ ĉiuj virinoj estus virinaĉoj! Aliaj proponis la polan vorton **gaździna** « kamparanino », aŭ **szędzina** « juĝistedzino ». La homa imagpovo estas admirinda...

3. Oni serĉis ankaŭ en la greka lingvo. Tie, oni trovis **ἐδζυγήν edzugen** « mi estas ligata » (parencan kun **ζυγόν** « jugo »), vorto en kiu la **έ** eĉ ne apartenas al la radiko, sed estas tempa aŭgmento! La kulmino de la fantaziaĵoj estas la eltrovo de **ἑκκυρός hekurós** « bopatro », transskribita latinen **hecycros**; la komenco **hec** estus ŝanĝita al **ec**, poste al **edz**. Kiel dirus Moliero, *jen pro kio via filino estas muta*.

4. Aliaj, aŭ eble la samaj, mi ne memoras, kapablaj akcepti nek la Zamenhofan klarigon nek la kompletigon de Waringhien, asertis, ke la jida vorto **reb-ecin** ne ekzistas: « la vorto por “rabenedzino” ne estas *reb-ecin*, sed *reb-etsn*, sen i ». Bedaŭrinde por la famo de tiuj ventofaruloj, la vorto **reb-ecin** estas klare trovebla sub la formo **רב-עצין reb-ecin** en la *Plena Esperanto-Juda Vortaro*, p.255, de Harry Fineman (Montréal, 1966):

raben'in'o.

רב-עצין .

edz'in'o de raben'o.

Certe la aŭtoro de tiu vortaro ne “elpensis arbitre” tiun jidan vorton nur por pravigi la Zamenhofan klarigon.

Oni trovas la saman vorton, kun iom malsama ortografio, **רביצין rebecin**, en *Parler Yiddish*, p.61, de Paul Fuks (eld. Paul Fuks, Parizo, 1980):

Rabbin : m [ROV-RABONIM]

רב רבנים

sa femme : f [REBETSN-S]

רביצין ם

Oni konstata, ke ambaŭ formoj רב-עצין *reb-ecfn* kaj רביצין *rebecfn* entenas la vokalon i (י) en la lasta silabo. Almenaŭ skribe: la praktika prononco estas alia afero, ne konsiderenda ĉi tie; cetere, ĝi tre povas esti diversa laŭ la regionoj.

5. Mi rezervis por la fino la plej amuzan. Iuj argumentis, ke **edzino** ne povas veni de la dua parto de *reb-ecin* pro la malsimileco de la ĉefa konsonanto en la jida *ecin* (c) kaj en la esperanta **edzin** (dz). Tio estas same senseca, kvazaŭ oni asertus:

- ke **aldo** ne povas veni de la itala *alto*, pro ŝanĝo de **t** al **d**,
- ke **amelo** ne povas veni de la latina *amylum*, pro ŝanĝo de **y** al **e**,
- ke **cendo** ne povas veni de la angla *cent*, pro ŝanĝo de **t** al **d**,
- ke **cigaredo** ne povas veni de la franca *cigarette*, pro ŝanĝo de **tt** al **d**,
- ke **dungi** ne povas veni de la germana *dingen*, pro ŝanĝo de **i** al **u**,
- ke **graveda** ne povas veni de la latina *gravidus*, pro ŝanĝo de **i** al **e**,
- ke **haladzo** ne povas veni de la latina *halatio*, pro ŝanĝo de **ti** al **dz**,
- ke **kaĉo** ne povas veni de la rusa *каша*, pro ŝanĝo de **ŝ** al **ĉ**,
- ke **kaskedo** ne povas veni de la franca *casquette*, pro ŝanĝo de **tt** al **d**,
- ke **klopodi** ne povas veni de la rusa *хлопотать*, pro ŝanĝo de **h** al **k** kaj de **t** al **d**,
- ke **kubuto** ne povas veni de la latina *cubitus*, pro ŝanĝo de **i** al **u**,
- ke **kutimo** ne povas veni de la franca *coutume*, pro ŝanĝo de **u** al **i**,
- ke **paŝi** ne povas veni de la latina *passus*, pro ŝanĝo de **ss** al **ŝ**,
- ke **planedo** ne povas veni de la greka *πλάνητος*, pro ŝanĝo de **t** al **d**,
- ke **pordo** ne povas veni de la latina *porta*, pro ŝanĝo de **t** al **d**,
- ke **tremolo** ne povas veni de la latina *tremulus*, pro ŝanĝo de **u** al **o**,
- ke **verŝi** ne povas veni de la latina *versare*, pro ŝanĝo de **s** al **ŝ**,
- ke **veŝto** ne povas veni de la latina *vestis*, pro ŝanĝo de **s** al **ŝ**,
- ke **vosto** ne povas veni de la rusa *хвост*, pro ŝanĝo de **fv** al **v**.

Centojn da ekzemploj oni povus trovi, kiuj estus laŭdire "arbitre elpensitaj", simple pro tio, ke Zamenhof tre saĝe kaj oportune ŝanĝis unu konsonanton aŭ unu vokalon por eviti dusencon de iu radikoj. Sen la ĉi-supre cititaj literŝanĝoj, la vortoj *alto*, *amilo*, *cento*, *cigareto*, *kasketo*, ktp, estus dusencaj.

G. Waringhien ĉiam miris konstatante, kiom malofte la esperantistoj uzis la avantaĝon, kiun ili ĝuis dum la vivo de Zamenhof, demandi lin pri la klarigo de enigmaj vortoj. La vorto *edzo* konsistigas escepton preskaŭ unikan, ĉe kiu ni havas la grandan ŝancon, posedi **klarigo de Zamenhof mem**.

Ni nepre ne malkonsideru ĝin.

Elefanto, duobla kaj afabla



La etimologio de *elefanto* entenas ion strangan. La latina *ĉlĉphans* aŭ *ĉlĉphas* venas tute banale de la helena *ĉléφας*. Sed la strangeco kuŝas en tio, ke la helena vorto entenas du partojn: el kaj *eph* (as estas simpla finaĵo). Kaj ĉiu el tiuj du partoj signifas «elefanto»: oni rajtas diri, ke laŭ la etimologio, la helena vorto *ĉléφας* signifas «elefanto-elefanto».

• La elemento el venas de la semida radiko *fel* aŭ *fil*, kiu nomas elefanton en pluraj semidaj lingvoj: akada *pīlu*, hebrea פִּיל *pīl*, araba-persa *فيل* *fīl*, siriaka ܦܝܠ *pīlō*. Ĝi pasis al la tjurkaj lingvoj: turka *fil*, uzbekata-tatara *Фил*, kazaĥa *пiл*, kirgiza *бил*.

Strange, oni retrovas ĝin en kelkaj eŭropaj lingvoj: albana *fil*, armena *փիլ* *pił*, kaj eĉ islanda *fíll*.

• La elemento *eph* venas de la egipta *ꜥꜣꜥ* *ābū*, kiu pasis al la kopta *ⲉβⲟϣ* *ebu*, kaj ankaŭ al la sanskrita *इभ* *ibha*, kaj de tie al la hinda *इभ* *ibh*, al la panĝaba *ਹਾਬੀ* *hābī* kaj al pluraj aliaj aziaj lingvoj.

De la latin-greka, la vorto iĝis iom internacia: franca *éléphant*, angla *elephant*, itala-hispana-portugala *elefante*, rumana *elefant*, germana *Elefant*, albana-hungara *elefánt*, malta *ljunfant*.

En Londono, foje okazas, ke turistoj serĉas elefantojn kaj kastelon en la kvartalo *Elephant and Castle*. Sed ili trovas tie nek unu nek alian: tiu nomo, fakte, estas misformiĝo de la nomo de olima taverno, kies hispana nomo estis *Infanta de Castilla* «*Infantino de Kastilio*». Kaj tiu nomo estis malbone komprenata de la tiamaj Londonanoj.

Alia elefanta kuriozaĵo estas, ke la latina *ĉlĉphans/ĉlĉphantis* ŝanĝiĝis al *ulbandus* en la gota lingvo. Kaj de tie ĝi iris al kelkaj slavaj lingvoj, en kiuj ĝi strange ŝanĝiĝis ĝis nereconebleco. Sed, ankoraŭ pli strange, ĝi tie alprenis la novan signifon «*kamelo*» (kvankam kamelo tute ne similas al elefanto, krom eventuale por iu ebrulo, kiu konfuzas la kamelan kolon kun la elefanta rostro): pola *wielbłąd*, ĉeĥa *velbloud*, soraba *wjelbłud*, rusa-ukraina *верблюд*, belorusa *вярблюд*.

Ofte la cirkaj elefantoj havas la nomon *Jumbo*. Kial? Simple pro tio, ke pluraj bantuaj lingvoj nomas elefanton *jumbo* (*tembo* en svahila).

Mi precizigu, ke la Afrika elefanto kaj la Hindia elefanto estas iom similaj rilate al sia ekstero. Sed fakte, ili estas du animalaj genroj tute apartaj kaj ne interfekundaj. La latina nomo *elephas* estas uzata de la zoologoj nur pri la Hindia elefanto. La Afrika «elefanto» ne estas vera elefanto, sed *loksodonto*: la zoologoj nomas ĝin *loxodonta*, de la greka *λοξός* «*oblikva*» kaj *ὀδόντος* «*dento*».

La molaroj de la du genroj estas facile rekoneblaj: ĉe la Afrika elefanto, la kuspidoj havas lozangan formon (◊, kiu memorigas la **A** de *Afriko*); ĉe la Hindia elefanto, la kuspidoj havas rektangan formon (◻, kiu memorigas la **I** de *India*). Afablaj bestoj...

Kaj oni sciu, ke la longaj defendodontoj de la elefanto ne estas kaninoj, sed ja incizivoj.

Kanono, kanono, kanono kaj kanono

Oni ofte asertas, ke en Esperanto ĉiu vorto havas nur unu signifon, malkiel en la pilparto de la etnolingvoj. Tiu aserto povas esti taŭga por la propagando, sed ne eltenebla antaŭ kelksekunda kritikemo.

Kiel ekzemplon de tiu "unusignifeco", ni citu la vorton *kanono*. Ĝi estas :

- « 1. *cilindra metala tubego por eljeti pafajojn* »,
- « 2. *eklezia regulo koncernanta la kredon* »,
- « 3. *regulo por difini la proporciojn de statuo* »,
- « 4. *muzikaĵo, en kiu temo estas imitata senŝanĝe* ».

Diable! Kvar signifoj tute senrilataj! Fakte, eĉ pli multe, ĉar la signifo n-ro 2 ricevas almenaŭ kvar aplikojn (vidu PIV, p.523).

Kaj tiu diverseco estas pli-malpli internacia, do Esperanta. Oni neniam tro rediros, ke Esperanto NE estas artefaritaĵo!

La deirpunkto estas semida. La akada (asira-babilona) *qanū* difinis planton kun kava tigo: temis verŝajne pri kalamo, aŭ pri kano, aŭ pri fragmito (kreskaĵoj iom similaj). De tie, oni uzis tiun vorton ankaŭ en la senco «tubo». Parencaj estas la hebrea קנה *qane^h*, la siriaka قنّ *qanyō*, la araba قنّ *qanan*. Estas ebleco, ke tiuj vortoj venus de la sumera *gin*. Nuntempe, la novhebrea tradukas la vorton קנה *qane* per «fragmito» kaj קנה-סוכר *qane-sukkar* per «sukerkano».

Povas esti, ke la urbo *Kana* (latina *Cana*, greka Κανᾶ, aramea קנה *qana^h*) fama pro la edziĝo de *Kana*, en la Evangelio (Jh 2¹), venus de la hebrea קנה *qane^h* «kano, fragmito».

La semida vorto pasis al la greka Κάννα *kánna*, al la galla *cano* kaj al la latina *canna*, kun la samaj signifoj, ĉefe «tubo, stango». En la franca, *canne* estas «lambastono». En la itala, *canna* «kano, tubo» kondukas al la pligrandiga formo *cannóne* «tubego», do «kanono, paflego». Jen la unua senco de *kanono*.

Same, la franca havas *canon*, la hispana *cañón* kaj la portugala *canhão*. Sed la hispana vorto difinas ankaŭ «krutegan profundan valon», kvazaŭ ĝi estus tubo fosita en la tero. De tie, ni havas la vorton *kanjono*, ekzemple la kanjonon de Kolorado. Ni restu en Usono: la nomo de la Kabo *Canaveral*, de kie forflugas la raketoj, venas de la hispana *cañaveral* «kanejo».

Pri la dua senco, la afero estas iom pli malsimpla. El Κάννα, la greka lingvo havas ankaŭ Κανών *kanôn* «tigo, kano, stango, liniilo, rekta linio». De la senco «rekta linio», oni pasis al la senco «regulo, modelo», kaj fine al «listo de la modelaj klasikajoj». En la eklezia latino, *cānōn* specialiĝis en la senco «eklezia regulo», kaj de tie oni uzadis *cānōnicus* «kanona, kanoniko» kaj *cānōnizāre* «kanonizi».

De «eklezia regulo», la senco glitis al simpla «regulo». En la franca popola lingvo, oni (ĉefe la junuloj) parolas pri «*kanona knabino*»: tio signifas «knabino bela laŭ la moderna regulo pri beleco», t.e. malgrasa kiel biciklo. Jen la tria senco.

La kvara senco difinas ian formon de polifonia imitado, kiu strikte obeas la *regulon*, la *kanonon*. Konata franca *kanono* estas *Frère Jacques*, *Frato Jako* (ĝi troviĝas en *L'Espéranto en douze leçons*, de Pierre Delaire, Orleano, 1955, p.30).

Karagano, karakalo, karakulo...

Tiuj tri vortoj havas komunan punkton: ili entenas la radikon *kara*, kiu signifas «nigra». Ĝi ekzistas en la lingvoj turka (*kara*), kazaha (*қара*), kirgiza, tatara (*кара*); ankaŭ en la uzbeka sub la formo *кора* *kora* kaj en la turkmena kaj azerbajĝana sub la formo *гара* *gara*.

Karagano (kazaha *қараған*, ruse *караган*) estas iu planto, specio de sovaĝa akacio, kies nomo estas trovebla ankaŭ en la nomo de la kazaha urbego *Karagando* (kazaha *Қарағанды*, ruse *Карагандá*). *Karakalo* estas linko, kies nomo signifas «nigra orelo», kaj *karakulo* estas ŝafo el regiono de *Karakulo* «nigra lago» (*Каракуль*) en Taĝikistano.

Tiu radiko *kara* estas trovebla ankaŭ en aliaj geografiaj nomoj: *Karakorumo* (azia montaro: *कराकोरम* *karākoram* «roka monto nigra»), *Karakumo* (*Каракумы*: azia dezerto de «nigra sablo»). Ni aldonu la *Karan Maron* (*Кáрское мóре*), norde de Siberio, kaj la *Karakalpakojn* (*каракалпáки*, nomo signifanta «nigra ĉapo»), kiuj vivas sude de la Arala Maro.

Ni citu ankaŭ la fondinton de la jugoslava dinastio de la Karadjordjević, nomo signifanta «Nigra Georgo» kaj iun federacion de turkmenaj triboj (14a-15a jc), kiu nomiĝis *Karakoyunlu* «tiuj de la Nigra Ŝafo» (*kara* «nigra», *koyun* «ŝafo», *-lu*, sufikso).

En Kroatio kaj Serbio, fama homo estas Vuk Stefanoviĉ KARADŽIĆ, Вук Стефановић КАРАЦИЋ (1787-1864), verkisto kiu dediĉis grandan parton de sia vivo por instigi siajn samlandanojn al la adopto de la ĉiutaga lingvo kiel literatura lingvo. Tial li kreis du alfabetojn: unu, por la kroatoj, estis adapto de la latina alfabeto; la alia, por la serboj, estis adapto de la cirila alfabeto. Li ankaŭ tradukis la Novan Testamenton. Lia nomo entenas la turkan *kara* «nigra», kun la turka sufikso *-ĉi ĝi*. Ni aldonu, ke lia antaŭnomo Vuk, Вук signifas «Lupo», kiel la germana Wolf.

Iu turka teatra rolanto nomiĝas Karagöz «Nigra Okulo» (*kara* «nigra» kaj *göz* «okulo»). Tiu nomo pasis al la novgreka *Καραγκιόζης*.

La nomo de la fama orkestrestro Herbert von KARAJAN (1908-1989) estas de greka deveno: *ΚΑΡΑΓΙΑΝΝΗΣ*, de la turka *kara* «nigra», sekvita de la greka *Γιάννης* «Johano».

Strange, la sanskrita vorto por «nigra» estas *काल* *kāla* kaj la japana estas *黒* *kuro*, iom similaj. Ĉu parencaj? malfacile certigeble...

La sanskrita *काल* *kāla* estas trovebla en la nomo de la diino *Kalia*, *काली* *kālī*, ŝaktio de Ŝivao. Kaj la japana *黒* *kuro* troviĝas en *Kuroŝio*, japane *黒潮* *kuroŝio* «nigra akvo», varma fluo en Pacifiko.

En la rusa kaj belorusa lingvoj, ekzistas la vorto *карадаш* «kraĵono». Sed fakte, tiu vorto ne estas slav-devena: ni retrovas en ĝi la tjurkan radikon *kara* «nigra». La finaĵo *daŝ* signifas «ŝtono», aludo al la nigra minerala materio, el kiu oni faras kraĵonojn.

Tiu radiko *даш* «ŝtono» troviĝas en la lingvoj turkmena kaj azerbajĝana. Sub la formo *taŝ*, ĝi estas turka; sub la formo *таш*, ĝi estas tatara kaj kirgiza; kaj ĝi estas *тош* en uzbeka. En Esperanto, ni trovas ĝin en *Taŝkento*, nomo de la ĉefurbo de Uzbekio (ruse

Ташкент, uzbeko Тошкент); ĝia dua parto kent signifas «urbo, fortikaĵo»; la senco estas do «ŝtona fortikaĵo».

Nu, tiu rusa vorto карандаш «krajono» estis alprenita de la franca humura desegnisto Emmanuel POIRÉ (1859-1909), kiu famiĝis sub sia pseŭdonimo CARAN D'ACHE.

Ĝuu liajn du desegnaĵojn, kiuj aperis en la franca gazetaro ĉirkaŭ la jaro 1900, en la tempo de la fama Dreyfus-Afero (1894-1906).



– Ni nepre ne parolu pri la Dreyfus-afero.

Sed bedaŭrinde...



Ili parolis pri ĝi...

Ĉi tiuj desegnaĵoj bone spegulas la klimaton, kiu reĝis en Francio dum la tempo de tiu fama politika afero, kiu tragike dividis Francion en du klanojn: la por-Dreyfus-anoj kaj la kontraŭ-Dreyfus-anoj. Dignaj burĝoj ĉetabligitaj iĝas furiozaj batalantoj nur pro tio, ke ili parolis pri tiu afero, kaj ne samopinias rilate la kulpecon aŭ senkulpecon de la kapitano Dreyfus.

La dua desegnaĵo trafe elvokas esperantistan kunvenon, en kiu partoprenus partianoj de *-ujo* kaj partianoj de *-io* (en la 20aj jaroj), aŭ “itistoj” kaj “atistoj” (en la 60aj jaroj), aŭ “neŭtraluloj” kaj “laboristoj” (en la 20-30aj jaroj, kaj plu...), aŭ “raŭmistoj” kaj “finvenkistoj” (en la 90aj jaroj).

Tamen ĉiuj esperanto-uzantoj vaste propagandas, ke Esperanto estas la plej taŭga rimedo por certigi efikan kaj pacan komunikaĵon inter la homoj...

Krokodili, aligatori, kajmani, gaviali

Verŝajne ne estas en la mondo eĉ unu esperantoparolanto, kiu ne konus la verbon *krokodili* «paroli nacilingve en esperantista medio». Sed ne ĉiuj konas ĝian devenon. Kelkfoje, plej neimageblaj fantazioj estis elmetitaj pri la origino de tiu vorto. Krokodiloj estas ĉarmaj bestoj, ĉu ne? Precipe de malproksime, aŭ sur televida ekrano.

Sed kiu rilato inter krokidiloj kaj nacilingva parolado?

En la dua distrikto de Parizo, ne tre malproksime de la Nacia Biblioteko, troviĝas la *passage Choiseul*. Ĝi ne estas ordinara strato, sed tegmentita pasejo kun butikoj; ĝi iras de la *rue des Petits-Champs* ĝis la *rue Saint-Augustin*. Nu, en la tridekaj jaroj, unu el la kafejoj de tiu pasejo estis la kafejo *Talma* (el la nomo de fama franca aktoro, dum la tempo de Napoleono). Ĝi estis la ĉiumonata rendevuejo de la Pariza Esperanto-Grupo. Kial ĝuste tiu ĉi kafejo? Pro tio, ke la kelnero, iu *Ferrari*, estis esperantisto. Antaŭ ol esti kelnero, li praktikis aliajn metiojn: li estis sinsekve hartondisto kaj taksiŝoforo. Lia lingva nivelo ne estis tre alta, tiel ke *Raymond Schwartz* diris iam pri li, kun sia kutima humuro: «*Kelkfoje Ferrari... povas erari*».

Sed *Ferrari* estis tre fervora esperantisto, eĉ iom fanatika. Kiam iu el la kunvenantoj cedis al la pigreco, kaj parolis ne plu esperante, sed france, la brava kelnero grumblis: «kia sovaĝulo! kia krokodilo!». Verŝajne, li konsideris, ke paroli nacilingve en esperantista rondo estas ago de sovaĝulo. Kaj en lia buŝo, la vorto *krokodilo* difinis sovaĝan beston, sovaĝulon.

La uzado de tiu vorto amuzis la grupanojn, kiuj rapide ŝanĝis ĝin al verbo: «li krokodilas, ni krokodilas, ne plu krokodilu, ktp». Tiel, la Esperanta leksiko pliriĉiĝis tiam je unu verbo: *krokodili* «paroli nacilingve en esperantista medio (PIV)». Iom post iom, tiu dirmaniero internaciĝis. El tiu antikva tempo, ĝis antaŭ kelkaj jaroj, restis vivanta nur *Roger Bernard*, kiu tre bone memoris la naskiĝon de tiu vorto kaj rakontis ĝin al mi. Sed li mortis la 10an de Aŭgusto 1997, precize naŭdekjara.

Estas sciate, ke en la medio de TEJO, naskiĝis pli poste la verbo *aligator* «paroli nacilingve en lingvo, kiu estas gepatra lingvo nur de parto de la ĉeestantaro» kaj ankaŭ la verbo *kajmani* «paroli nacilingve en lingvo, kiu estas gepatra lingvo de neniu el la ĉeestantoj» (difinoj troveblaj en *Knedu min Sinjorino!*, de *Renato Corsetti*).

Sed io mankas. Antaŭ kelkaj jaroj, en Grezijono, ĉe la matenmanĝo, mi interŝangis kelkajn vortojn kun iu samideano: «ĉi-lipol-li gudiko? — si, vemo gudiko, danob oli» (traduko: *ĉu vi dormis bone? — jes, tre bone, mi dankas vin*). Ĉi-okaze, neniu taŭgas, el la tri ĉi-supre cititaj verboj, ĉar ni parolis ne *nacilingve*, sed *internacilingve*, kvankam ne Esperante, en esperantista medio: tio estis Volapuka konversacioto.

Por tiu nocio, oni eble povus krei la plian neologismon *gaviali*. Ĉu? Tiel, estus reprezentitaj la kvar bestoj de tiu amema kaj aminda reptilia ordo.

Sed ĉu tio valoras la penon? La *gavialado* estas tiel malofta evento...



Nigra Maro, belege blua

Mi vidis tiun maron en Aŭgusto 1963, kiam mi vizitis Bulgarion kaj parton de Turkio post la Universala Kongreso ĵus okazinta en Sofio. Ĝi tiam estis, kaj verŝajne plu estas, belege blua.

Kial do oni nomas ĝin *nigra*? Strange...

Des pli, ke tiu nomo estas universala. Ĉiuj bordaj aŭ proksimaj landoj, kvazaŭ unuvoĉe, nomas ĝin *nigra*: ruse Чёрное море, ukraine Чорне море, rumane Marea Neagră, bulgare Чёрно морè, greke Μαύρη Θάλασσα, turke Karadeniz, armenie Առ սիւ Սիւլ sev tzov, kartvele შავი ზღვა šavi zĝva.

Ni rimarku, ke la turka lingvo nomas ĝin Karadeniz (kara « nigra », deniz « maro ») kaj pro komparo ĝi nomas Mediteraneon Akdeniz « Blanka Maro » (ak « blanka », deniz « maro »).

Kaj en la lingvoj de aliaj landoj, eĉ malproksimaj, oni tute same nomas ĝin *nigra*: angle Black Sea, germane Schwarzes Meer, svede Svarta havet, france mer Noire, itale Mare Nero, hispane-portugale Mar Negro, albane Deti i Zi, ĉeĥe Černé moře, litove Juodoji jūra, hungare Fekete-Tenger, finne Mustameri, hebree הַיָּם הַשְּׁחֹרַי hayyam haššaĥor, arabe اَلْبَحْرُ اَلْاَسْوَدُ al-baĥr al-aswad, mongole Хар тэнгис, indonezie Laut Hitam, japane 黒海 kokkai, ĉine 黑海 hēihǎi, volapuke Blägamel.

Nun, restas la ĉefa problemo: kial oni nomas *nigra* tiun **bluan maron**?

Ekzistas geologia fenomeno nomata *eŭksenismo*. Ĝi konsistas en tio. Kiam maro estas enfermita kaj komunikigas kun alia maro nur pere de mallarĝa markolo, la vertikala akvomoviĝo estas tre malgranda en tiu enfermita maro. Rezultas, ke en la profundaj akvotavoloj, la oksigenokvanto estas nesufiĉa, kaj inverse tro abundas la kvanto de sulfida hidrogeno, de bakteria deveno. Tio estigas en la fundo amasiĝon de organika materio sub la formo de malhela ŝlimo.

Tio ĝuste okazas en la Nigra Maro. Plie, la markolo kuniganta la Nigran Maron kun Mediteraneo konsistas el Bosporo, Marmara Maro kaj Dardaneloj. Nu, Bosporo kaj Dardaneloj estas profundaj je maksimume 100 metroj, dum la averaĝa profundo de la Nigra Maro estas 1200 metroj. Evidente, tio ege malhelpas la fluon de la profundaj malhelaj akvotavoloj de la Nigra Maro direkte al Mediteraneo. La fundo de la Nigra Maro konsistas do en kolosa kvanto da malhelaj sedimentoj.

Ĉe kvieta suna vetero, tiu malhela ŝlimo restas en la fundo: la maro estas pli-malpli blua. Sed ĉe ŝtorma vetero, la akvokirliĝo suprenirigas la malhelajn sedimentojn, kaj la ondoj alprenas tre malhelan koloron.

Alia afero. Kial tiu fenomeno nomiĝas *eŭksenismo* (nePIVa vorto)? La kaŭzo estas, ke la antikva nomo de la Nigra Maro estis *Pont-Eŭkseno* (PIVa vorto).

Unuavide, la nomo *Pont-Eŭkseno* neniel rilatas kun la nomo *Nigra Maro*. Fakte, jes ja, ĝi tute rilatas. Ĝia historio estas inda je rakonto.

La latina nomo estis *Pontus Euxīnus*, simpla kopio de la helena Πόντος Εύξεινος.

Ni ekzameni la unuan parton, Πόντος.

La helena Πόντος elvokas nian vorton *ponto*, sed fakte ĝi signifis « maro », precipe

« alta maro ». Ĝi parenkas kun πᾶτος « vojo » kaj πατέω « trovi ». La komuna fonto estas la hindeŭropa pent « pasi, pasejo ». Tiu fonto donis: sanskrita पंथास् panthās, slavona ПЯТЬ pŝt' « vojo », ĝermana findan « trovi », galla ponto « ŝipo », latina pons/pontis « ponto ».

Antikve, *Ponto* (latine Pontus, greke Πόντος, armene Պոնտոս *pontos*) estis la nomo de reĝlando situanta ĉe la oriento de la Nigra Maro, proksimume en la loko de la nuna Kartvelio. La plej fama reĝo de Ponto estis Mitridato VI^a Eŭpatoro.

La latina vorto estas trovebla en la latinidaj lingvoj kun la sama senco « ponto »: itala pónte, hispana puente, portugala ponte, franca-okcitana-kataluna pont, rumana pod, volapuka pon. Same, la bretona-kimra pont signifas « ponto ». En la latinidaj lingvoj, la sama vorto signifas ankaŭ « ferdeko ».

Nuntempe, la papo estas nomata *la Suverena Pontifiko* (latina pontifex, de pons « ponto » kaj fācĕre « fari »), kvankam li tute ne kapablus konstrui ponton. Sed ĉe la Romanoj la Pontifex maximus « Granda Pontifiko » estis eble komisiita prizorgi la sekurecon de la pontoj. La naskiĝanta kristanismo plukis la vorton.

La ĝermana formo pludivas en: germana finden, angla find, nederlanda vinden, frisa fine, sveda-islanda finna, norvega finne, dana finde « trovi ».

Kaj la slavaj lingvoj havas: rusa-ukraina путь, belorusa пуць, bulgara път, serba пут, makedona пат, slovena pot, soraba ruć. Ĉiuj signifas « vojo ». La geografoj konas la vorton *rasputitsa* (rusa распутьца « sezono de kotaj vojoj »). Samfamilie, oni trovas спутник « sputniko », распутник « malĉastulo », kaj ankaŭ la nomon de la fama rusa monaĥo *Rasputino* (Распутин).

Konklude, en *Pont-Eŭkseno*, la unua parto signifas « maro ». Jen kio revenigas nin al la konata nomo *Nigra Maro*. Sed kion klarigi pri la dua parto, εὐξεινος ?

La helena εὐξεινος signifas « akceptema, gastama » (εὖ « bone », ξένος « fremdulo »; do, la « bonaj fremduloj »). Ni povas supozi, ke la popoloj loĝantaj en la bordaj regionoj de tiu maro estis aparte gastamaj. Sed tute ne! Eĉ male! Tiu nomo estis donita antifraze, eble pro superstiĉo, al popoloj ege malakceptemaj. Ĉar fakte, la pli antikva nomo estis *Pont-Akseno*, Πόντος Ἄξεινος « maro ne-gastama » (ἄ- « ne- », ξένος « fremdulo »), latine *Axenus Pontus*.

Ĝis nun, ni ankoraŭ ne trovis rilaton kun la nocio *nigra*.

Fakte, tiu ἄξεινος « ne-gastama » estis tute simple imitaĵo, aŭ adapto, aŭ paŭsaĵo, de la persa vorto aḥšaēna, kiu signifis « malhela, nigra ». Jen la nigreco !

Ni vidas, ke de la plej malproksima antikveco, tiu maro estis nomata « nigra, malhela ». Sed ĝia nigreco estis iel kaŝita sub tiu gastam-aspekta nomo *Eŭkseno*.



Oranĝo, mandarino, mandareno

La unuagrada etimo de *oranĝo* estas simpla: la franca *orange*.

Sed de kie venas la franca vorto? La latina *aurantium* instruas nenion pri tio: ĝi apartenas al la mezepoka latino, ne al la klasika. La Romanoj tute ne konis tiun frukton.

Fakte, la franca vorto estas adaptito de la hispana *naranja*, kaj ricevis la influon de *or* « oro », kio klarigas la scienclatinan *aurantium*, faritan el *aurum* « oro ». Tiu aludo al oro estas indico, ke oranĝoj povus esti la famaj « pomoj el oro », χρυσόμηλα, de la antikva ĝardeno de la Hesperidinoj. Ĉi tiuj estis tri fratinoj, kiuj gardis, kun la helpo de la drako *Ladon*, tiujn famajn or-pomojn, kiujn *Gaia* estis doninta al *Hera*. Tio ne malhelpis, ke Herkulo sukcesis ŝteli ilin. Tiu ĝardeno troviĝis ĉe la ekstremo de l' mondo konata, eble en Hispanio; tamen oni ĝenerale akceptas, ke la helena χρυσόμηλον « pomo el oro » difinis ne oranĝon, sed cidonion.

En la modernaj lingvoj, la greka donas al la vorto χρυσόμηλον *krisómilo* la signifon « tomato », same kiel la itala *pomodoro* aŭ *pomidoro*.

Kaj la hungara vorto *paradicsom* signifas same « paradizo » kaj « tomato ».

Ni revenu al la hispana vorto *naranja*. Ĝi venas de la araba نارنجة *nāranĝa*, kaj ĉi tiu de la persa نارنگ *nāreng*. La araba vorto, kun sia komenclitero *n*, pasis al la novgreka νεράντζι *nerándzi*, kroata *narandža*, serba *наранџа*, armena նարինջ *narinĝ*, hungara *narancs*, turka *narenc*, hinda नारंगी *nāraṅgī*. Kurioza afero estas, ke ĝi pasis ankaŭ al diversaj lingvoj, kun modifoj de la komenclitero: portugala *laranja*, galega *laranxa*, kataluna *taronja*, itala *arancia*, sarda *arangu*, okcitana *arange*, malta *laringĝa*. Ni aldonu la polan *pomarańcza*, la ĉeĥan *pomeranč* kaj la ukrainan *помаранч*, kiuj signifas laŭvorte « pomo-oranĝo » aŭ « frukto-oranĝo ».

La franca vorto, kun sia referenco al oro, pasis al la angla *orange* [brənʤ], germana *Orange*, japana オレンジ *orenĝi*, korea 오렌지 *orenĝi*, malagasa *laoranjy* (notindas, ke kelkfoje la malagasa leksiko pruntis francajn vortojn kune kun ilia artikolo la), volapuka *roĵat* (elp. *roŝat*). Eble imite, la novhebrea lingvo uzas *tappūz* (תפוז, moderna mallongigo de בתפוזים *tappūfi-zahav* « pomo el oro »).

Oni ne miru pri tiu araba deveno: ja la araboj disvastigis oranĝon en Afriko ekde la 10a jarcento; poste, en la 15a jarcento, la Ĝenovanoj kaj portugaloj enkondukis ĝin en la Mediteranean Basenon. La rolo de la portugaloj klarigas la fakton, ke la esenca oleo ricevita per premado de oranĝo estas ankoraŭ nuntempe nomata *Portugala esenco*. Plie, pluraj lingvoj nomas ian varietaton de oranĝo per vorto derivita de la nomo de Portugalio: itala *portogallo*, rumana *portocală*, bulgara-makedona *портокал*, novgreka *πορτοκάλι*, kartvela *ფორთოხალი* *portofali*, albana *portokall*, araba *بورتقال* *burtu-qāl*, turka *portakal*, persa *پرتقال* *portoqāl*.

Laŭ la fakuloj, la origino de oranĝo situas sude de la Himalaja regiono. Tial, antaŭ kelkaj jarcentoj, la francoj nomis ĝin *pomme de Sine* (nun, oni dirus *pomme de Chine*) « pomo el Ĉinio ». Tiu esprimo pasis al: germana *Apfelsine*, nederlanda *sinaasappel*, frisa *sinasappel*, sveda *apelsin*, dana-norvega *appelsin*, finna *appelsiini*, litova *apelsinas*, latva *apelsīns*, rusa-ukraina *апельсин*, belorusa *апельсін*, islanda *appelsína*.

Sed la Islandanoj diras ankaŭ **glóaldin** («brila frukto», de **glóa** «brili» kaj **aldin** «frukto»).

Iu speco de oranĝo estis nomata far la hispanoj **naranja mandarina**, laŭvorte «oranĝo mandarena, oranĝo de la mandarenoj», en la senco «supera oranĝo»: la mandarenoj formis superan klason de ŝtatoficistoj. De tie venas la esperanta vorto **mandarino**, kun sia pseŭdofemala fino. Cetere, **mandareno** neniel estas ĉindevena: la portugaloj kreis la vorton **mandarim** el la malaja **mantari**.

Iu ĉina speco de oranĝo estas la **kumkvato**. Tiu nomo, angle **cumquat** aŭ **kumquat** [*kʌmkwɒt*], venas de la sud-ĉina 金橘 *kumquat* (nord-ĉina 金橘 *jīnjú*) «ora oranĝo», de 金 *kum* «oro» kaj 橘 *quat* «oranĝo».

Alia varietato estas **klementino**, eltrovita en 1902 en Alĝerio, ĉe iu franca kultivisto nomita **Clément**.

Mi aldonu, ke la Sud-Francia urbo **Oranĝo** (france **Orange**, okcitane **Aurenja**) havas nenian rilaton kun la similnoma frukto: ĝia latina nomo estis **Arausio**. Temas nur pri hazarda homonimeco.

Graflando, poste princlando, formiĝis ĉirkaŭ tiu Provenca urbo, kaj en 1544 la nederlanda reĝa familio **Nassau** ricevis ĝin herede kaj tiam alprenis la nomon **Orange-Nassau**. Kaj en 1777, la nederlanda esploristo **R.J. Gordon**, flate al la reĝa familio, donis la nomon **Orange** al granda rivero en suda Afriko. Poste, la nomo de la rivero pasis al la nomo de la ŝtato.

En la sama botanika familio kiel la oranĝo, troviĝas la **pampelmuso**. La etimo de tiu nomo ne estas tute certa. Verŝajnas, ke la nederlanda **pompelmoes** venas de la tamula பழம்பழம் *pommalmācu*. Oni proponas ankaŭ iun nederlandan **pompel** «dika» kun la malaja **limoes** «citrono».

Sateno kaj silko

Tiuj du vortoj havas komunan punkton: la esploro de ilia origino kondukos nin al Ĉinio.

Efektive, la hispana *satén*, la albana *satén*, la hungara *szatén*, la franca-angla-itala *satin*, la portugala *cetim*, la germana *Satin*, la rusa *сатѣн*, la kartvela *სატინო* *satini* venas de la hispana vorto *aceituní*, de araba deveno, kiel multaj hispanaj vortoj. La hispana vorto (sen rilato kun *aceituno* «olivo») venas de la araba *أَلزَيْتُونِي* *az-zaytūnī*, kiu signifas «la *Zajtun*-ano»: *زَيْتُون* *zaytūn* estis la araba nomo de la ĉina urbo *梓潼* *zītóng*, en la provinco Siĉŭano, kie sateno estis fabrikata.

En Esperanto, sinonimo de *sateno* estas *atlaso*, kiu respondas al la rusa *атлас*, germana *Atlas*, albana *atlas*, novgreka *ατλάζι*. La simpla kaŭzo estas, ke satenon, aŭ atlason, oni fabrikis ankaŭ en la Atlasa regiono (*الأطلس* *al-aṭlas*), en norda Afriko. En la helena mitologio, la giganto Atlaso estis kondamnita far Zeŭso, porti la Ĉielon sur sia dorso. Poste, li estis ŝtonigita, ĉar li vidis la kapon de Meduza, kaj li estis ŝanĝita al montaro.

La sama vorto *atlaso* havas ankoraŭ du aliajn sencojn (nur propagande oni asertas, ke ĉiuj Esperantaj vortoj estas nur unusencaj!). Ĝi signifas «maparo», ĉar la koverto de la unua atlaso (1595), kies aŭtoro estis la geografo *Merkatoro* (*Gerhard Kremer*, kiu latinigis sian nomon), montris figuron de la giganto Atlaso. Fine, ĝi difinas la unuan kolan vertebron, kiu portas la kapon, kiel Atlaso la Ĉielon.



Koncerne la vorton *silko*, la afero estas iom malpli simpla. La angla *silk* [*sɪlk*] venas de la old-angla *sioloc*, kiu respondas al la norena (old-norvega) *silk*, slavona *шѣлкѣ* *ŝ'elk*. Ĉiuj tiuj vortoj venas, iom ŝanĝitaj, de la latina *sēricus*, helena *σηρικός* «*silka*», adjektivoj rilatantaj al *Sēr* (plurale *Sēres*), helene *Σήρ* (plurale *Σήρες*), kiu difinis popolon de orienta Hindio, aŭ eble la ĉinojn, oni ne scias precize. Tiu nomo estas trovebla, interalie, ĉe Plinio, Seneko, Strabono kaj Vergilio.

Siavice, la latina-helena vorto estas adaptaĵo de la ĉina *絲* *sī* «*silko*» (pli moderna formo *𦉳*). Tiu ideogramo estas uzata ankaŭ en Japanio kun la senco «fadeno», kaj ĝia prononco estas plej ofte *ito*, sed kelkfoje *ŝi*.

La sama radiko estas trovebla en: rusa *шелк* *ŝolk*, ukraina *шовк* *ŝovk*, belorusa *шолк* *ŝolk*, finna *silkki*, litova *šilkaš* (ĉiuj signifas «*silko*»).

La latina *sēricus* finvenas al la franca *sériciculture* «*bombiksobredado*».

Samfamilia estas ankaŭ la vorto *ŝelko*, kvankam ŝelkoj plej ofte ne estas el silko. Ĝi devenas de la pola *szelki*, jda *שעלקע* *ŝelkə*, parencaj kun *silk*.

Terpomo kaj patato

Estas sciante, ke *terpomo* kaj *patato* (aŭ *batato*) estis ambaŭ eltrovitaj en Ameriko. Sed temas pri du plantoj tute malsamaj.

La *patato* apartenas al la familio de la konvolvulacoj. Ĝia scienca latina nomo estas *batatas* (precize *ipomea batatas*), laŭ la indiĝena nomo (de aravaka deveno) de tiu specio. La hispana-portugala vorto *batata* pasis al la plejparto de la eŭropaj lingvoj: germana *Batate*, rusa *батát*, pola *batat*, finna *bataatti*, ktp. En la lingvoj angla kaj franca, la komenca litero ŝanĝiĝis: franca *patate*, angla *potato*. En Esperanto, ambaŭ formoj ekzistas: *batato*, *patato*.

Sed en la mezo de la 16a jarcento, oni ekkonis alian amerikan tuberon, la *terpomon*, origine nomitan laŭ la keĉua vorto *papa*. Ĝi apartenas al la familio de la solanacoj (samkiel tabako, tomato, melongeno). Pro simileco de formo, iu angla botanikisto faris konfuzon kaj nomis la terpomon *batato de Virginio*. Ekde tiu esprimo, la vorto *potato* [pə'teɪtəʊ] aŭ [pə'teɪtəʊ] restis en la angla kun la signifo «terpomo». Kaj ĝi pasis al multaj lingvoj kun la sama signifo: sveda *potatis*, norvega *potet*, albana *patáte*, novgreka *πατάτα*, turka *patates*, malta *patata*, japana *ポテト* *poteto*, volapuka *pötet*.

En Francio, *patate* estas oficiale la nomo de la batato/patato, sed populare ĝi difinas ankaŭ la terpomon. Kaj en Nederlando, la franca depruntaĵo *patates frites* signifas «terpomfritoj» (pli konciza neologismo: «fritoj»).

En aliaj landoj, oni nomis tiun solanacon per komparo kun pomo: nederlanda *aardappel* «terpomo». Same, islanda *jarðeppli*, novgreka *γεώμηλο* kaj franca *pomme de terre*. De tie venas la esperanta kunmetaĵo *terpomo*. En Israelo, oni imitis la francan: *תפוח-אדמה* *tappūah-ādama* «pomo-tero».

En Flandrio, oni komparis la terpomon ne kun pomo, sed kun piro: tio finvenas al *grund birn* «terpiro». Tiu vorto franciĝis sub la formo *crompire*, kelkfoje uzata en valona Belgio kaj en Alzac-Loreno, kaj pasis ankaŭ al la kroata *krompir* kaj al la ĉeĥa *brambor*.

Kaj la ĉinoj, spite la grandan dimension de la tubero, preferis kompari ĝin kun pizo: *土豆* *tūdòu*, laŭvorte «terpizo».

Strange, la germana *Erdapfel* (laŭvorte «terpomo») difinas ne terpomon, sed topinamburon. Por difini la terpomon, la germanoj pruntis la italan vorton *tartùfòlo* «eta trufo» (diminutivo de *tartufo* «trufo», cetere etimo de *Tartufo*, fama komedia protagonisto); tiu vorto iĝis *Tartuffel*, poste *Kartoffel*.

La rusoj adoptis ĉi tiun vorton sub la formo *картофель*, la ukrainanoj sub la formo *картопля* kaj la kartveloj sub la formo *კარტოფილი* *kartofili*. La bulgarioj kaj rumanoj mallongigis ĝin: bulgare *картоф*, rumane *cartof*. El la sama germana deveno, la letonoj diras *kartupelis*. Ankaŭ la poloj uzas eventuale *kartofel*, sed ĝenerale ili preferas uzi *ziemniak* (el *ziemia* «tero»), same kiel oni diras *zemiak* en Slovakio.

Sed la belorusoj kaj la litovoj preferas vorton parencan kun *bulbo*: en la belorusa *бўльба*, en la litova *bulvė*.


Tomaso kaj tomaso

En la tempo de niaj praavoj, en ĉiu dormoĉambro, proksime de la lito, troviĝis pispoto, iom oportuna dumnokte, por eviti iradon ĝis la necesejo, kiu estis eventuale en komuna koridoro aŭ eĉ ekster la domo, en korto.


En Francio, la popola lingvaĵo nomis tiun pispoton **thomas** « tomaso ».

Kial? Ĉu rilato ekzistas kun la apostolo Tomaso? Jes, tute jes.

Estas konate ke, post la reviviĝo, Jesuo aperis meze de la apostoloj (Johano, 20¹⁹⁻²⁹). Sed tiun tagon, Tomaso forestis. Kiam li poste eksciis tiun okazaĵon, li montriĝis nekredema: «*se mi ne vidus en liaj manoj la truon de la najloj, kaj se mi ne metos mian manon en lian flankon, mi ne kredos*» (Joh 20²⁵). Memore al la Reviviĝo, ĉe la katolikaj mesoj de la Paska tempo, oni kantis la latinan kanton *O Filii et Filiae*. En ĝi, troviĝis interalie tiu strofo: «*Vide, Thoma, vide latus, Vide pedes, vide manus, Noli esse incredulus*» (Vidu, ho Tomaso, vidu mian flankon, Vidu miajn piedojn kaj manojn, Ne estu nekredema). La ario estis facile memorebla, kaj multaj katolikoj havis ĝin en memoro.



Vī- de, Tho- ma, vī- de la- tus, Vī- de pedes, vī- de manus, No-



li es- se in- cre- du- lus, Al- le- lu- ia!

Nu, la latina vorto **vide** «vidu» sonas ekzakte kiel la franca verbo **vider** «malpleniĝi». Pro tio, kiam oni *malpleniĝis* la pispoton, ĉe la ellitiĝo, oni emis ŝerci, dirante latine «*Vide, Thoma* (Vidu, ho Tomaso)», kiu estis vortlude komprenata kiel «malpleniĝi Tomason», t.e. «malpleniĝi la pispoton».

De tiu vortludo, venis la kutimo nomi la pispoton «tomaso», populara kromnomo trovebla eĉ en kelkaj francaj literaturaĵoj.



Alia kurioza afero koncernanta Tomason, estas, ke tiu nomo signifas «ĝemelo». La aramea תֹמָא *tōmā*, hebrea תֹמָא *tōmā*^h, venas de תֹאִם *tə'ōm* aŭ תְאִם *tə'am* «ĝemelo», de la verbo תָאֵם *ta'am* «esti duobla». La Evangelio de Johano (11¹⁶ kaj 20²⁴) diras pri li: «Tomaso, nomata Didimo (Θωμάς ὁ λεγόμενος Δίδυμος)». Sed ankaŭ *Didimo* signifas «ĝemelo» (δίδυμος «duobla, ĝemelo, testiko»). Do fakte, «Tomaso, nomata Didimo» signifas «*Ĝemelo, nomata Ĝemelo*».

Verŝajne, Tomaso estis ĝemelo de iu. Sed de kiu?

Jen interesa hipotezo. Unu el la kristanaj tekstoj nomataj «apokrifaj» estas la Evangelio de Bartolomeo, kopta manuskripto de la 5a jarcento. En ĝi ni vidas, ke Jesuo, ĉe unu el siaj postmortaj aperoj, alparolas la apostolojn tiel: *χρεε παεπισκοπος εττααλλη πετροс χρεε θωμαс παμερσλαγ λχрс* «*Saluton, mia respektinda zorganto Petro. Saluton, Tomaso, mia dua Kristo*».

Ĉu Tomaso, «dua Kristo», estis ĝemelo de Jesuo?... Estas tute certe, ke Jesuo havis gefratojn (la Evangelioj mencias ilin plurloke, klare kaj ne ambigue). Oni povas ankaŭ supozi, tamen ne aserti, ke li havis ĝemelon...


Urso, kurioza ekzemplo de vortmalpermeso

En 1917, la du svisaj prahistoriistoj *Bächler* kaj *Nigg* esploris kavernon el la neandertala epoko: la kavernon de la *Truo de l' Drako*. Ili eltrovis en ĝi specon de altaro, sur kiu sep ursokranioj, tre bone konservitaj, estis intence ordigitaj. Ilia muzelo estis direktita al la enirejo de la kaverno. Du el tiuj kranioj estis ankoraŭ provizitaj per la unuaj du vertebroj (atlaso kaj aksiso).

Oni tiam opiniis, ke tiu kaverno estis ia sanktejo, en kiu oni praktikadis, antaŭ jarmiloj, ian strangan kulton, la kulton al Urso. La tiamajursoj (*Ursus spelæus*) estis grandegaj bestoj, kiujn la homoj timegis, do kies favoron ili penis akiri, eventuale per adorado.



Oni ankaŭ supozis, ke tiu kulto al Urso estas iel ligita kun kulto al la Poluso, al la Nordo, ĉar Poluso estas ja la centro de l' mondo. Efektive, la du konstelacioj Granda Urso kaj Malgranda Urso neniel similas al duursoj, sed pli ĝuste al du kaseroloj:



Kial do oni nomas ilin *Ursoj*? Tiuj nomoj havas originon verŝajne religian. Se la grekoj nomis la Nordon de la Tero *ἄρκτιος* *árktios* (derivaĵo de *ἄρκτος* *árktos* «urso»), de kiu ni havas la *Arktan Oceanon*, la kaŭzo tute ne estas la tiea ĉeesto de blankajursoj, ĉar la antikvaj Atenanoj certe ne vizitis Spicbergon.

La hindeŭropa radiko por *urso* estas *orks*. Ĝi estas rekonebla en la sanskrita *मृत्* *ṛkṣa*, en la vaska *artz*, en la albana *arí*, en la armena *արջ* *arĝ*, en la persa *خرس* *fiers*, en la taĝika *хирс*, en la galla *artos* kaj en la latina *ursus*.

La sanskrita vorto postvivis en la cigana *riĉ* kaj en la moderna hinda *रीक* *riĉh*. Sed en Hindio, la urso estas ankaŭ nomata *भालू* *bhālū*, kaj *بھالو* *bhālū* en Pakistano. Oni memoru, ke en *La Libro de la Ĝangalo*, de R.Kipling, unu el la fikciaj personoj, ĝuste urso, nomiĝas *Baloo* [balu].

En la modernaj lingvoj, la kelta formo finvenas al: bretona *arzh*, kornvala *ors*, kimra

arth, old-gaela ART. La latina formo donis: itala ORSO, franca OURS, korsika ORSU, okcitana ORS, sarda URSU, kataluna ÓS, kastilia-galega OSO, portugala URSO, romanĉa UORS, rumana URS, malta ORS. La helena evoluis al la novgreka αρκούδα arkúða.

Sed la plej interesa aspekto de tiu afero estas, ke ĉe la antikvaj ĝermanoj kaj slavoj, laurso estis ankoraŭ aŭreolita, almenaŭ parte, de sia prahistoria sakraleco. Tial, ĝia normala hindeŭropa nomo estis trafita de **vortmalpermeso**. Tiu superstiĉa kutimo signifas, ke oni ne rajtis eldiri ĝian nomon, ĉar diri la nomon de besto povas eventuale venigi ĝin, aŭ kolerigi ĝin. Ĝian normalan nomon oni devis anstataŭigi per iu kromnomo. Iom post iom, ĝia vera nomo iĝis sekreta kaj eĉ malaperis de la leksiko.

Pro tio, ĉe la ĝermanoj, oni kutimis nomi la ursos « la bruna », t.e. « la bruna besto ». Tiu kromnomo finvenis al la moderna nomo de laurso en la ĝermanidaj lingvoj: germana Bär, nederlanda beer, angla kaj frisa bear, islanda kaj sveda björn, norvega kaj dana bjørn, jida בער ber, al kiuj Schleyer aldonis la volapukan ber. Ĉiuj tiuj vortoj venas de la radiko signifanta « bruna ».

Ankaŭ ĉe la slavoj, la hindeŭropa nomo de laurso iĝis malpermesata: oni kutimis kromnomi ĝin « la mielmanĝanto ». Tio estas la preciza signifo de: rusa медвѣдь, belorusa мядзвѣдзь, ukraina ведмідь, pola niedźwiedź, soraba mjedwjedź, ĉeĥa medvěď, slovaka medveď, kroata-serba medved, медвед. Ĉiuj tiuj vortoj entenas la radikon med « mielo » aŭ « medo » (fermentinta mielo, laŭ la PIV) kaj la radikon ed « manĝi », parencon kun la latina ēdēre. La slava formo pasis al la hungara medve.

Kontraste, la litova mėšėdis signifas etimologie « viandomanĝanto ».



La plej konata ekzemplo de **vortmalpermeso** rilatas al la nomo de Dio en la juda religio. La ĉefa hebrea nomo atribuita al Dio estas la t.n. **tetragramo**: יהוה. Tio estas sinsekvo de kvar konsonantoj: JHWH (la litero ך w estas nuntempe prononcata v; sed la antikva prononco estis verŝajne simila al la angla w, al la araba و).

Oni ne scias kun certeco, kiel tiu tetragramo estis antikve prononcata. La plej verŝajna hipotezo estas *Jahweh* (יהוה). Ĝi kondukas al la Esperanta formo *Javeo* (PIV).

Tiun ĉi prononcon konfirmas la diversaj transskriboj troveblaj ĉe la antikvaj aŭtoroj: 'Iαθέ ĉe Teodoreto (prononco, kiun li atribuis al la Samarianoj), 'Iαού ĉe Klemento el Aleksandrio, 'Iαώ ĉe Origeno kaj sur multaj gnostikaj talismanoj.

Estas verŝajne, ke tiu sinsekvo de kvar konsonantoj estas en rilato kun la radiko יהה haya^h « esti ». Ĝi povas ankaŭ esti akronimo de יהיה יהוה יהיה Yihyeh Howeh WaHayah « estos estas kaj estis ».

Pro superstiĉa respekto, la eldiro de tiu nomo estis severe malpermesata: vidante יהוה en la teksto, oni fakte legis אֲדֹנָי ad^honay « Adonaj, Sinjoro ». Tial, oni kutimis kombini la konsonantojn יהוה yhw kun la vokaloj de אֲדֹנָי ad^honay « Adonaj »: *āoa*, kun tamen *ā* ŝanĝita al *ə*. Tio finvenas al יהוה yəhowa^h, skribita latine Jehovah. Ĝi estis adoptita en diversaj lingvoj: angla-germana Jehova, franca Jéhovah, itala Ièova, hispana Jehová.

Pro nescio, dum jarcentoj, oni kredis, ke *Jehovo* (PIV) estas la hebrea nomo de Dio. Fakte, tiu nomo, kiu rezultas de miksaĵo de la konsonantoj de unu nomo kun la vokaloj de alia, neniam ekzistis. Nur la *Atestantoj de Jehovo* rigardas ĝin kiel ion aŭtentan.

Vagino, vanilo...

Unuavide, neniu rilato ekzistas inter tiuj du aferoj. Nek loke, nek uzade, nek odore, nek guste. Tamen...

La latina *vāgīna* (pli ĝuste *uāgīna*, ĉar la skribo kun *v* estas moderna) difinis glavingon, kaj pli ĝenerale iun ajn ingon, ujon. Ĉu ĝi difinis ankaŭ vaginon? Verŝajne jes, akcesore.


Ĝi pasis al ĉiuj modernaj latinidaj lingvoj (krom la rumana), kun la senco «iu ingo». En la franca kaj en la itala, ofte okazas, ke la komenca *u* de la latinaj vortoj, ŝanĝiĝas al *g*: ekzemple, *uiscum* «visko» finvenas al la franca *gui*; kaj *Uitus* (propra nomo) finvenas al la franca *Guy*, itala *Guido*. La latina *uāgīna* finvenas do al la franca *gaine*, la okcitana *gaina*, la itala *guaina*. En la Iberia duoninsulo, tiu ŝanĝo de *u* al *g* ne okazis, sed la meza *g* de *uāgīna* malaperis: hispana *vaina*, kataluna *beina*, galega *vaíña*, portugala *bainha*.

Aliflanke, kiam la hispanoj konkeris Meksikion, ili eltrovis tie bongustan spicaĵon, kiun la aztekoj nomis *tlilxochitl* kaj uzadis kiel kondimenton de ĉokolado: ĝi devenas de grimpa herbo, el la familio de la orkidacoj. La fruktoj estas guŝoj, ili havas formon de longa maldika *ingo* entenanta multajn grajnoj. Tial, el la vorto *vaina* «ingo», la hispanoj pluformis la diminutivon *vainilla* «eta ingo» por nomi la frukton, kaj poste la planton.

Tiu vorto *vainilla* perdis sian unuan *i* pasante al la aliaj Eŭropaj lingvoj: angla *vanilla*, itala *vaniglia*, franca-nederlanda *vanille*, rumana *vanilie*, germana *Vanille*, sveda *vanilj*, pola *wanilia*, serba *ванилија*, rusa *ваниль*, ukraina-belorusa *ваніль*, litova *vanilė*, novgreka *βανίλια*, albana *vanílje*, hungara *vanília*, finna *vanilja*, kartvela *ვანილი* *vanili*, turka *vanilya*, japana *ワニラ* *wanira*, Volapuka *vanel*, ktp.

En la moderna epoko (la franca vorto datumas de 1680), oni alprenis la latinan vorton *vāgīna* por nomi specialan ingon: la kanalon inter la utero kaj la vulvo ĉe la femaloj de diversaj mambestoj, interalie ĉe niaj ĉarmaj edzinoj kaj amantinoj.

Tial, *vagino* kaj *vanilo* estas tre proksime parencaj.



Lingvaj verkoj de la sama aŭtoro

Pri Esperanto.

- Espéranto ou Babel: faut choisir, 1995, 28 pages.
La Aglutinaj Lingvoj kaj Esperanto, 1988, 24 paĝoj.
Konciza Etimologia Vortaro de Esperanto, eld. UEA, 2002, 520 paĝoj.
Les Langues agglutinantes et l'espéranto, 1989, 24 pages.
Une Langue pour l'Europe, 2003, 80 pages.
Mil Ekzotaj Vortoj, 1992, 122 paĝoj.
Mots rares et faux amis, 1992, 52 pages.
Nepivaj Vortoj, 1988, 182 paĝoj.
Po, la diabla vorto, 1996, 20 paĝoj.
La Tradukarto kaj ties problemoj, 2003, 126 paĝoj.
La Vortfarado en dek lecionoj, 2003, 24 paĝoj.
Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo, 1996, 56 paĝoj.
Voyage au fil des mots, 1995, 156 pages.
La Zamenhofa Radikfarado, 1990, 32 paĝoj.

Pri la franca lingvo.

- Dictionnaire Étymologique des noms géographiques, éd. Masson, 1986-1990, 544 pages.
Dictionnaire Étymologique des noms d'hommes et de dieux, éd. Masson, 1988, 512 pages.
Difficultés et subtilités de la langue française, 2002, 174 pages.
Éloge de l'orthographe, 2000, 74 pages.
Orthographe française, 1999, 60 pages.
Les Racines scientifiques du français, 1988, 36 pages.

Pri aliaj lingvoj.

- Akada Leksikono, 1989, 88 paĝoj.
La Galla Lingvo, 1998, 108 paĝoj.
Konciza Gramatiko de Volapuko, 1995, 48 paĝoj.
La Langue gauloise, 1998, 114 pages.
La Misteroj de la ĉina skribo - Les Mystères de l'écriture chinoise, 2003, 80 paĝoj.
Vortaro Volapük-Esperanto kaj Esperanto-Volapük, 2003, 208 paĝoj.

Pri doktoro Zamenhof kaj Gaston Waringhien.

- L.L.Zamenhof: datoj, faktoj, lokoj, 1997, 32 paĝoj.
Zamenhof et le judaïsme, 1997, 68 pages.
Zamenhof kaj judismo, 1997, 62 paĝoj.
G.Waringhien, heroldo de la internacia lingvo (dulingva), 2000, 80 paĝoj.

Literaturaj tradukoj.

- Le Chant des chants - שִׁיר הַשִּׁירִים (bilingue), de la Bible, 1989, 138 pages.
Historio de farmobiena servistino - Histoire d'une fille de ferme (dulingva), de Guy de Maupassant, 2003, 36 paĝoj.
Jeanne d'Arc au Bûcher - Ĵana d'Arko ĉe la Ŝtiparo (dulingva), de Paul Claudel, 1986, 140 paĝoj.
Kanto de kantoj - שִׁיר הַשִּׁירִים (dulingva), el la Biblio, 1988, 138 paĝoj.
Mateo Falkono - Mateo Falcone (dulingva), de Prosper Mérimée, kunlabore kun Th.Saladin, 2003, 28 paĝoj.
La Mortinta Reĝino (La Reine morte), d'Henri de Montherlant, 1986, 132 paĝoj.

Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k. t. p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi *dismembrigon* de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), - li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.

L.L.Zamenhof

Unua libro, Fundamenta Krestomatio, p.234.

Kiu ne bone enkapigis la entenaĵon de tiu teksto, tiu ankoraŭ ne bone komprenis la intiman naturon de la lingvo Esperanto.